

Gaston Leroux

La Mistero

de la

Flava Ĉambro.

Verko el la publika fako.



https://fr.wikisource.org/wiki/Le_Mystère_de_la_chambre_jaune

Enhava tabelo.

01 - En kiu oni komencas ne kompreni.....	3
02 - En kiu unuafoje aperas Jozefo Rultabio.....	11
03 - "Viro trapasis kiel ombro tra la ŝutroj".....	17
04 - "Meze de sovaĝa naturo".....	26
05 - Kie Jozefo Rultabio direktas al S ^{ro} Roberto Darzak frazon kiu produktas sian efiketon.....	31
06 - Funde la kverkejo.....	36
07 - Kie Rultabio entreprenas ekspedicion sub la lito.....	48
08 - Le enketjuĝisto pridemandas F ^{inon} Stangerson ^{on}	57
09 - Reportero kaj policano.....	64
10 - "Nun necesos manĝi sangan bifstekon".....	72
11 - Kie Frederiko Larsano klarigas kiel la murdinto sukcesis eliri el la Flava Ĉambro.....	80
12 - La irbastono de Frederiko Larsano.....	100
13 - "La prepostejo nenion perdis pri sia ĉarmo, nek la ĝardeno pri sia brilo".....	105
14 - "Mi atendas la murdinton tiun ĉi vesperon".....	116
15 - Embusko.....	123
16 - Stranga fenomeno de disocio de la materio.....	134
17 - La neklarigebla galerio.....	137
18 - Rultabio desegnis cirklon inter la du ŝvelaĵoj de sia frunto.....	144
19 - Rultabio regalias min per tagmanĝo ĉe la gastejo de la "Ĉefturo".....	147
20 - Iu gesto de F ^{ino} Stangerson.....	160
21 - En la embusko.....	165
22 - La nekredebla kadavro.....	174
23 - La duobla spuraro.....	178
24 - Rultabio konas la du duonojn de la murdinto.....	183
25 - Rultabio foriras en vojaĝon.....	192
26 - Kiam Jozefo Rultabio estas senpacience atendata.....	193
27 - Kiam Jozefo Rultabio aperas en sia tuta gloro.....	200
28 - Kie estas pruvita ke oni ne ĉiam pensas pri ĉio.....	232
29 - La mistero de F ^{ino} Stangerson.....	237

01 – En kiu oni komencas ne kompreni.

Ne estas sen ia emocio ke mi komencas rilati ĉi tie la eksterordinarajn aventurojn de Jozefo Rultabio. Ĉi tiu ĝis nun tiom firme malpermesis tion, ke mi fine malesperis iam publikigi la plej strangan polican historion el tiuj dek kvin lastaj jaroj.

Mi eĉ imagas ke la publiko neniam sciintus la tutan veron pri la mirindega afero tiel nomata "de la Flava Ĉambro", naskanta tiom da misteraj kaj kruelaj kaj sensaciaj dramoj, kaj al kiu mia amiko estis tiel intime implikita, se, okaze de la freŝdata nomumo de la famkonata Stangerson al la rango de Ĉefkruculo de la **Honora Legio**, iu vespera ĵurnalo, en iu senvalora artikolo de nesciado aŭ de aŭdaca perfidaĵo, ne revigligis teruran aventuron kiun Jozefo Rultabio volintus scii, li diris al mi, forgesitan por ĉiam.

La "Flava Ĉambro"! Kiu do memoris pri tiu afero kiu verŝigis tiom da inko antaŭ dekkvinkelke da jaroj? Oni forgesas tiom rapide en Parizo.

Ĉu oni ne forgesis la nomon mem de la proceso de **Naive⁽¹⁾** kaj la tragikan historion pri la morto de juna **Menaldo⁽¹⁾**? Kaj tamen la publika atento estis en tiu epoko tiel inklina al debatoj, ke ministeria krizo kiu intertempe eksplodis, restis tute nerimarkita. Nu la proceso de la "Flava Ĉambro", kiu antaŭis la aferon de **Naive⁽¹⁾** de kelkaj jaroj, havis ankoraŭ pli da sensacioj. La tuta mondo sin klinis dum monatoj super tiu malklara problemo - la plej malklara el mia sperto, kiu iam estis proponita al la sagaceco de nia polico, kiu iam sin staris ĉe la konscienco de niaj juĝistoj. La

(1) Fraŭlino de Beaudreuil [Bodrej] deksesjaraĝa estis allogita de ĝardenisto kies ŝi havis infanon, kiun la familio sekrete edukigis en Orleano sub la nomo de Hipolito Menaldo. La markizo de Naive edziĝis la heredantino. En septembro de 1883, post ok jaroj de geedzeco, li elprenis la infanon ĉe lia vartistino kaj kondukis lin al seminario en Savojo. Timigita pro la stato de turmentigo, en kiu troviĝas lia lernanto kiu ne konas sian patrinon, la superulo de la seminario skribas al la markizo ke ne plu eblas gardi la. junan Menaldoⁿ. Kelkajn tagojn poste, la 29^{an} de oktobro 1885, la korpo de la filo de la markizino de Naive estis trovita sur la rifo de Fusarella (Italio). Ĉu akcidento? Ĉu memmortigo?

solvon de tiu freneziga problemo, ĉiu serĉis ĝin. Estis kiel drama rebuso kontraŭ kiu batalis la malnova Eŭropo kaj la juna Ameriko.

Estas vere ke - estas permesata al mi diri tion "ĉar ne povus esti en ĉio ĉi neniu memestimo de verkinto" kaj ke mi nur transskribas faktojn pri kiuj escepta dokumentaro permesas al mi alporti novan lumon - estas vere ke mi ne scias ke, en la kampo de la realeco aŭ de la fantazio, eĉ ĉe la aŭtoro de la "duobla murdo de la strato Kadavrejo", eĉ en la imagaĵoj de la sub-Edgaro Poe kaj de la pitoreskaj Konan Dojlo, oni povas konsideri ion komparebla, pri la MISTERO, al la natura "mistero de la Flava Ĉambro".

Tio kion neniu sukcesis malkovri, la juna dekokaĝa Jozefo Rultabio, tiam negrava reportero en fama ĵurnalo, trovis tion ! Sed kiam, en asiza kortumo, li alportis la ŝlosilon de la tuta afero, li ne diris la tutan veron. Li lasis nur aperi tion kio nepris por klarigi la neklarigeblaĵon kaj por malkondamnigi senkulpulon. La kialoj kiujn li havis por silenti, hodiaŭ malaperis. Eĉ pli bone, mia amiko devas paroli. Vi do baldaŭ scios ĉion; kaj, sen plua antaŭparolo, mi tuj metos antaŭ viaj okuloj la problemon de la "Flava Ĉambro", tiel kiel ĝi estis antaŭ la okuloj de la tuta mondo, je la morgaŭo de la dramo de la kastelo de la Glanejo.

La 25^{an} de oktobro 1892, la jena noto legiĝis en la lasta eldono de *La Tempo* :

"Terura krimo ĵus estis farita en la Glanejo, rando de la arbaro de Sankta-Ĝenoveva, supren Epine-sur-Orĝe, ĉe la profesoro Stangerson. Tiun nokton, dum la majstro laboris en sia laboratorio, oni provis murdi F^{inon} Stangerson kiu ripozis en ĉambro apud la laboratorio. La kuracistoj ne responsas pri la vivo de F^{inon} Stangerson".

Vi imagas la kortuŝon kiu ekregis Parizon. Jam, en tiu epoko, la instruita mondo estis treege interesita de la laboroj de la profesoro Stangerson kaj lia filino. Ĉi tiuj laboroj, la unuaj kiuj estis provitaj pri la radiografado, devis pli poste konduki S^{on} kaj S^{inon} Kurioⁿ al la malkovro de la radiumo.

Oni cetere atendis sensacian memuaron kiun la profesoro Stangerson baldaŭ legos ĉe la akademio de Sciencoj pri sia nova teorio : La Disocio de la Materio. Teorio destinita skui sur ĝia

bazo, la tutan oficialan sciencon kiu jam de longe baziĝas sur la principo : nenio perdiĝis, nenio kreiĝas.

La morgaŭon, la matenaj ĵurnaloj estis plenaj de ĉi tiu dramo. **La Mateno**, inter alie, publikigis la jenan artikolon, titolita "Supernatura krimo":

Jen la solaj elementoj - skribis la anonima redaktoro de La Mateno - kiujn ni sukcesis ricevi pri la krimo de la kastelo de la Glanejo. La afliktostato, en kiu troviĝas la profesoro Stangerson, la neebleco kie oni estas, kolekti ajnan informon el la buŝo de la viktimo, tiom malfaciligis niajn esploradojn kaj tiujn de la justico, ke oni ne kapablus en ĉi tiu horo, estigi al si la plej malgrandan ideon pri tio kiu okazis en la "Flava Ĉambro", kie oni trovis f^{non} Stangerson^{on} en nokta vestaro, stertoranta sur la planko. Ni almenaŭ sukcesis intervjui ulĉjon Jakobo" - kiel oni nomas lin en la regiono - maljuna servisto de la familio Stangerson. Ulĉjo Jakobo eniris en la "Flavan Ĉambron" samtempe kun la profesoro. Ĉi tiu ĉambro estas samlima kun la laboratorio. La laboratorio kaj la "Flava Ĉambro" stariĝas en pavilono ĉe la fundo de la parko, je ĉirkaŭ tricent metroj de la kastelo.

Estis noktomezo kaj duono, rakontis al ni tiu bravulo, kaj mi troviĝis en la laboratorio kie ankoraŭ laboris S^o Stangerson kiam la afero okazis. Mi estis ordiginta, puriginta instrumentojn dum la tuta vespero, kaj atendis la foriron de S^o Stangerson por iri enlitigi. F^{no} Matilda estis laborinta kun sia patro ĝis noktomezo; la dek du batoj de noktomezo sonitaj ĉe la kukolhorloĝo de la laboratorio, ŝi leviĝis, kisis S^{on} Stangerson^{on}, dezirante al li bonan nokton. Ŝi diris al mi : "Bonan vesperon, ulĉjo Jakobo !" kaj puŝis la pordon de la "Flava Ĉambro". Ni aŭdis ŝin kiu ŝlosis la pordon kaj puŝis la riglilon, tiel bone ke mi ne sukcesis deteni min ridi pri tio kaj diris al sinjoro : "Jen Fraŭlino kiu duturne enŝlosas sin. Certe ja ŝi timas pri la "Dibesteto" ! Sinjoro ne eĉ aŭdis min tiom li estis enpenso. Sed abomeninda miaŭo respondis al mi el ekstere kaj mi ĝuste distingis la krion de la "Dibesteto" !... tio donis al vi la ektrememon... "Ĉu ĝi denove nebligas nin dormi tiun ĉi nokton ?" mi pensis, ĉar necesas ke mi diru al vi, sinjoro, ke ĝis la fino de oktobro mi loĝas en

la subtegmento de la pavilono, super la "Flava Ĉambro", kun la nura celo ne lasi fraŭlinon solan dum la tuta nokto funde de la parko. Estas ideo de fraŭlino pasigi la bonan sezonon en la pavilono; ŝi verŝajne trovas ĝin pli ĝoja ol la kastelo, kaj ekde jam kvar jaroj ke ĝi estas konstruita, ŝi neniam forgesas enloĝiĝi tien ekde la printempo. Kiam la vintro revenas, fraŭlino reiras al la kastelo, ĉar en la "Flava Ĉambro" ne ekzistas kameno.

Ni do restis, sinjoro Stangerson kaj mi mem, en la pavilono. Ni faris nenian bruon. Li ja sidis ĉe sia skribotablo. Pri mi, sidanta sur seĝo, fininta mian laboron, mi rigardis lin kaj diris al mi: "Kia homo! Kia inteligenteco! Kia klereco!" Mi taksas kiel grava ĉi tion ke ni faris nenian bruon, ĉar "pro tio, la murdonto certe kredis ke ni foriris". Kaj subite, dum la kukolhorloĝo aŭdigis la duonon post noktomezo, terurita ŝriko eliĝis el la "Flava Ĉambro". Estis la voĉo de fraŭlino kiu kriis: "Murdanton! Murdanton! Helpon!" Tuj pafadoj de revolvero klakis, kaj estis bruego de tabloj, de mebloj faligitaj, ĵetitaj surplanken, kvazaŭ dum lukto kaj denove la voĉo de fraŭlino kiu kriis: "Murdanton!... Helpon!... Paĉjo! Paĉjo!"

Vi imagas kiel ni eksaltis kaj kiel S^o Stangerson kaj mi, ni kuregis al la pordo. Sed, bedaŭrinde! Ĝi estis ŝlosita kaj bone ŝlosita "interne" zorge de fraŭlino, kiel mi diris al vi, per ŝlosilo kaj riglilo. Ni provis skui ĝin, sed ĝi estis solida. S^o Stangerson estis kvazaŭ freneza, kaj vere estis sufiĉe por frenezigi ĉar oni aŭdis fraŭlinon kiu stertoris: "Helpon! ... Helpon!" Kaj S^o Stangerson frapis terurajn batojn kontraŭ la pordo, kaj li ploris pro furiozo, kaj li plorsingultis pro malespero kaj senpoveco.

Estas tiam kiam mi ricevis inspiron. "La murdinto enŝovis sin tra la fenestro, mi ekkriis, mi iras al la fenestro!" Kaj mi eliris el la pavilono, kurante kiel frenezulo!

La malbonŝanco estis ke la fenestro de la "Flava Ĉambro" rigardas al la kamparo, tiel ke la muro de la parko, kiu finiĝas sur la pavilono, malhelpis min tuj alveni al tiu fenestro. Por atingi ĝin, necesis unue eliri el la parko. Mi kuris direkte al la krado, kaj survoje, mi renkontis Berniero" kaj lian edzinon, la gepordistoj, kiuj venis, altiritaj de la eksplodbruoj kaj

niaj kriadoj. Mi resume informis ilin pri la situacio; mi diris al la pordisto tuj iri kuniĝi al S^{ro} Stangerson, kaj ordonis al lia edzino veni kun mi por malfermi al mi la kradon de la parko. Kvin minutojn pli poste, ni troviĝis, la pordistino kaj mi, antaŭ la fenestro de la "Flava Ĉambro". Estis bela lunlumo kaj mi bone vidis ke oni ne tuŝis la fenestron. Ne nur la stangoj estis sendifektaj, sed ankaŭ la ŝutroj, malantaŭ la stangoj, estis fermitaj, kiel mi mem fermis ilin, hieraŭ vespere, kiel ĉiuvespere, kvankam fraŭlino, kiu sciis min tre laca kaj superŝarĝita de laboro, diris al mi tute ne ĝeni min, ke ŝi mem fermos ilin; kaj ili estis restitaj kiel ili estis, alfortikigitaj per fera klinko, kiel mi prizorgis tion, "de interne", La murdinto do ne trapasis tien kaj ne povis fuĝi tra tio; sed ankaŭ mi ne povis eniri tien !

Estis la malbonŝanco ! Oni perdintus la kapon per malpli. La pordo de la ĉambro ŝlosita "interne", la ŝutroj de la sola fenestro "interne" fermitaj, ili ankaŭ, kaj, antaŭ la ŝutroj, la stangoj sendifektaj, stangoj tra kiu vi ne kapablus trapasigi la brakon... Kaj fraŭlino kiu petis helpon !... Aŭ pli ĝuste ne, oni ne plu aŭdis ŝin... Ŝi eble estis morta... Sed mi ankoraŭ aŭdis, ĉe la fundo de la pavilono, sinjoro kiu provis por ŝanceli la pordon...

Ni rekomencis nian kuradon, la pordistino kaj mi, kaj ni revenis al la pavilono. La pordo ankoraŭ eltenis, malgraŭ la furiozaj batoj de sinjoro Stangerson kaj de Berniero. Finfine ĝi cedis sub niaj koleraj puŝoj, kaj tiam kion ni vidis ?

Necesas diri al vi ke, malantaŭ ni, la pordistino tenis la lampon de la laboratorio, energia lampo kiu lumigis la tutan ĉambron.

Necesas ankoraŭ diri al vi, sinjoro, ke la "Flava Ĉambro" estas tre malgranda. Fraŭlino meblis ĝin per relative larĝa fera lito, per malgranda tablo, per noktotablo, per tualetloko kaj per du seĝoj. Tial, en la granda lumo de la lampo kiun tenis la pordistino, ni vidis ĉion ekde la unua ĉirkaŭrigardo. Fraŭlino, en sia noktoĉemizo, kuŝis sur la planko, meze de nekredebla malordo. Tabuloj kaj seĝoj estis renversitaj indikante ke okazis tie serioza "kverelo". Oni certe eltiris Fraŭlinon el ŝia lito; ŝi estis plena de sango kun teruraj

ungovundoj ĉe la kolo - la karno de la kolo estis preskaŭ elŝirita de la ungoj - kaj truo ĉe sia dekstra tempio, per kiu fluis sangoflueto kiu faris malgrandan flakon sur la planko. Kiam S^{ro} Stangerson ekvidis sian filinon en tia stato, li rapidis al ŝi, eligante senesperan krion kies la aŭdo vekis kompaton. Li konstatis ke la malfeliĉulino ankoraŭ spiris kaj nur zorgis pri ŝi. Pri ni, ni serĉis la murdinton, la malŝatindulo kiu volis mortigi nian mastrinon, kaj mi asertas vin, sinjoron, ke se ni trovintus lin, ni mistraktus lin. Sed kiel komprenigi ke li ne estis tie, ke li jam forkuris ?... Tio superas ĉian imagpovon. Neniu sub la lito, neniu malantaŭ la mebloj, neniu ! Ni trovis nur siajn spurojn: la sangajn makulojn de larĝa mano de viro sur la muroj kaj la pordo, grandan naztukon ruĝa pro sango, sen ia inicialo, malnovan bereton kaj la freŝan spuron sur la planko de multajn paŝojn de viro. La viro kiu tie paŝis, havis grandan piedon kaj la plandumoj lasis malantaŭ si ian nigretan fulgon. Tra kie ĉi tiu viro pasis ? Tra kie li svenis ? Ne forgesu, sinjoro, ke ne ekzistas kameno en la "Flava Ĉambro". Li ne povis eskapi tra la pordo kiu estas tre mallarĝa kaj sur la sojlo de kiu la pordistino eniris kun sia lampo, dum la pordisto kaj mi, ni serĉis la murdinton en ĉi tiu malgranda peco de ĉambro kie ne eblas sin kaŝi kaj kie cetere, ni trovis neniun. La pordo frakasita kaj forigita al la muro ne povis maski ion ajn, kaj ni certigis nin pri tio. Tra la fenestro restita fermita kun ĝiaj fermitaj ŝutroj kaj ĝiaj stangoj al kiuj oni ne tuŝis, neniu fuĝo estis ebla. Tiam ? Tiam... mi komencis kredi al la diablo.

Sed jen ni malkovris surplanke, "mian revolveron". Jes, mian propran revolveron... Tio ja revenigis min al la nocio de realeco ! La diablo ne bezonintus ŝteli al mi mian revolveron por mortigi fraŭlinon. La viro kiu pasis tie, unue supreniris en mian mansardon, prenis mian revolveron el mia tirkesto kaj uzis ĝin por siaj malbonaj intencoj. Estis tiam kiam ni rimarkis, ekzamenante la kartoĉojn, ke la murdinto pafis du pafojn de revolvero. Tamen, sinjoro, mi havis ŝancon en tia malfeliĉo, ke S^{ro} Stangerson ĉeestis en sia laboratorio kiam la afero okazis kaj li rimarkis per siaj propraj okuloj ke ankaŭ mi ĉeestis, ĉar pro ĉi tiu afero de revolvero, mi ne

scias tion kio okazintus; laŭ mi, mi jam sidus post kradoj. Ne necesas pli al justico por suprenirigi homon sur la eŝafodo !"

La redaktoro de *La Mateno* sekvigas ĉi tiun intervjuon per la jenaj linioj :

Ni lasis, sen interrompi lin, la ulĉjon Jakobo" maldetale rakonti al ni, tion kion li scias pri la krimo de la "Flava Ĉambro". Ni ripetis la samajn vortojn kiujn li uzis; ni nur ŝparis al la leganto la senĉesajn lamentojn per kiuj li ornamis sian rakontadon. Kompreneble, ulĉjo Jakobo ! Kompreneble, vi bone amas viajn gemastroj ! Vi bezonas ke oni sciu tion, kaj vi ne ceŝas ripeti tion, ĉefe depost la malkovro de la revolvero. Estas via rajto kaj tio ne ĝenas nin ! Ni ŝatintus ankoraŭ meti multajn demandojn al ulĉjo Jakobo - Jakobo-Ludoviko Mustie - sed oni ĝuste venis ŝerci lin je la nomo de la enketjuĝisto kiu daŭrigis sian enketon en la granda salono de la kastelo. Ne eblis al ni eniri en la Glanejo", kaj pri Kverkaro, ĝi estis gardata, laŭ larĝa cirklo, de kelkaj policanoj kiuj zorgege priatentas pri ĉiuj spuroj kiuj povas konduki al la pavilono kaj eble al la malkovro de la murdinto.

Ni ankaŭ volintus pridemandi la gepordistojn, sed ili estas nevideblaj. Fine ni atendis en gastejo, ne for de la krado de la kastelo, la eliro de S^{ro} de Marketo, la enketjuĝisto de Korbejo. Je la kvina kaj duono, ni ekvidis lin kun sia registristo. Antaŭ ol li enveturiĝis, ni sukcesis meti al li la jenan demandon :

- Ĉu vi povas, sinjoro de Marketo, doni al ni kelkan informon pri ĉi tiu afero sen ke tio malhelpas vian enketon ?

- Ne eblas al ni, respondis al ni S^{ro} de Marketo, diri kion ajn. Cetere, estas ja la plej stranga afero kiun mi konas. Ju pli ni kredas scii ion, des pli ni scias nenion !

Ni demandis al S^{ro} de Marketo bonvoli klarigi al ni ĉi tiujn lastajn parolojn. Kaj jen ĉi tio kion li diris al ni, tio kies la graveco ne eskapos iun :

- Se nenio aldoniĝos al la materialaj konstatoj hodiaŭ faritaj de la prokuroraro, mi fakte timas ke la mistero kiu ĉirkaŭas la abomenan atencon kies F^{ino} Stangerson estis viktimo, ne estu preta klariĝi; sed necesas esperi, por la homa racio, ke la sondadoj de la muroj, la plafono kaj la planko de la "Flava Domo", sondadoj al kiuj mi dediĉos min

ekde morgaŭ kun la entreprenisto kiu konstruis la pavilonon antaŭ kvar jaroj. , alportos al ni la pruvon ke necesas neniam senesperigi pri la logiko de aferoj. Ĉar tie estas la problemo : ni scias tra kie la murdinto enigis - li eniris tra la pordo kaj kaŝis sin sub la lito atendante F^{non} Stangersoⁿ; sed tra kie li eliris ? Kiel li sukcesis forfuĝi ? Se oni trovas nek klappordon, nek sekretan pordon, nek kaŝangulon, nek ajnan aperturon, se la esploro de la muroj kaj eĉ ilia malkonstruado - ĉar mi estas decida, kaj S^o Stangerson estas decida iri ĝis la malkonstruado de la pavilono - ne venas aperigi nenian traireblan pasejon, ne nur por homa estulo, sed ankaŭ por kiu ajn estaĵo, se la plafono ne havas truon, se la planko ne kaŝas subteraĵon, "necesos ja kredi al la diablo", kiel diras ulĉjo Jakobo !

Kaj la anonima redaktoro rimarkigas, en ĉi tiu artikolo - artikolo kiun mi elektis kiel la plej interesa el ĉiuj kiuj estis eldonita tiun tagon, pri la sama afero - ke la enketjuĝisto ŝajnis formi ian intencon en ĉi tiu lasta frazo : "necesos ja kredi al la diablo", kiel diras ulĉjo Jakobo.

La artikolo finiĝas per ĉi tiuj linioj : Ni volis scii tion kion la ulĉjo Jakobo volis diri per "la krio de la Dibesto". Oni tiel nomas la aparte sinistran krion, klarigis al ni la proprietulo de la gastejo de la Ĉefturo, kiun kelkfoje dumnokte, eligas la katon de iu maljunulino, la ulnjo "Genuine" kiel oni nomas ŝin en la regiono. La ulnjo "Genuine" estas speco de sanktulino kiu loĝas en kabano, meze de la arbaro, ne for de la groto de "Sankta-Ĝenoveva".

La "Flava Ĉambro", la "Dibesteto", la ulnjo "Genuine", la diablo, Sankta-Ĝenoveva, la ulĉjo Jakobo, jen tre konfuzita krimo kiun bato de pioĉo en la muroj morgaŭ malimplikos al ni; almenaŭ ni esperas tion, por homa racio, kiel la enketjuĝisto diras tion. Intertempe, oni kredas ke F^{ino} Stangerson, kiu ne ĉesis deliri kaj kiu klare prononcas nur ĉi tiun vorton : "Murdinto ! Murdinto ! Murdinto !..." ne trapasos la nokton...

Fine, en la lasta horo, la sama ĵurnalo sciigis ke la estro de la Ŝtatsekureco telegrafis al la fama inspektoro Frederiko Larsano, kiu estis sendita al Londono por iu afero de ŝtelitaj valorpapiroj, tuĵ reveni en Parizon.

<http://www.ipernity.com/blog/58225/242354>

02 – En kiu unuafoje aperas Jozefo Rultabio.

Mi memoras, kvazaŭ la afero okazis hieraŭ, pri la eniro de la juna Rultabio en mia ĉambro, tiun matenon. Estis ĉirkaŭ la oka, kaj mi ankoraŭ estis en la lito, legante la artikolon de *La Mateno* rilate al la krimo de la Glanejo.

Sed, antaŭ ĉio alia, la momento por prezenti al vi mian amikon estas veninta.

Mi konatiĝis kun Jozefo Rultabio kiam li estis negrava reportero. En tiu epoko, mi debutis en advokataron kaj ofte havis la okazon renkonti lin en la koridoroj de la enketjuĝistejo, kiam mi iris peti "komunikpermeson" por **Mazas** aŭ por **Sankta-Lazaro**. Li havis, kiel oni diras, "bonan pilkon"¹. Lia kapo estis ronda kiel globo¹, kaj estas pro tio, mi opiniis, ke liaj kamaradoj de la gazetaro donis al li tiun ĉi alnomon, tio kio devis glui al li kaj kiun li devis famkonigi. "Rultabio"¹! Ĉu vi vidis Rultabio"? Ej! Jen tiu fama Rultabio"! Li ĉiam estis ruĝa kiel tomato, jen li gaja kiel fringo, kaj jen li serioza kiel papo. Kiel, tiel juna - li aĝis, kiam mi vidis lin por la unua fojo, dek ses jarojn kaj duono - li jam perlaboris sian vivrimedon en la gazetaro? Jen tio kion oni povintus demandi al si se ĉiuj kiuj alproksimiĝis al li, ne estis informitaj pri lia debuto. Okaze de la afero de la virino dispecigita de la strato Oberkampfo - ankoraŭ tute forgesita rakonto - li alportis al la ĉefredaktoro de *La Epoko*, ĵurnalo kiu faris tiam rivalecon pri informoj al *La Mateno*, la maldekstran piedon kiu mankis en la korbo kie estis malkovritaj la funebraj restaĵoj. Ĉi tiu maldekstra piedo, la polico vane serĉis ĝin ekde oktagoj, kaj la juna Rultabio trovis ĝin en kloako kie neniu havis la ideon iri tien serĉi ĝin. Necesis por tio dungiĝi en skipo de okazaj kloakistoj kiun la administracio de la Pariza urbo rekviziciis sekve de la damaĝoj kaŭzitaj de escepta inundo de Sejno.

Kiam la ĉefredaktoro ekposedis la valoran piedon kaj kiam li komprenis per kiu serio da spertaj deduktoj, iu infano estis

¹ En sia franca originala lingvo "Rouletabille" estas la kunpremata formo de la frazo "Roule ta bille" kiu tradukiĝas esperante per "Rulu vian globon".

alkondukita malkovri ĝin, li hezitis inter la admiro kiun kaŭzis al li tiom da polica lertaĵo en dekseŝjarjara cerbo, kaj la ĝojego povi elmontri en la "funebra-kolumno" de la ĵurnalo, "la maldekstran piedon de la strato Oberkampfo".

"Per tiu piedo, li ekkriis, mi faros frontartikolon".

Poste, kiam li konfidis la sinistran pakaĵon al la nekropsiisto alligita al la redakcio de *La Epoko*, li demandis al tiu kiu baldaŭ estos Rultebio, tiom kiom li volis lukri por aliĝi, estiel malgrava reportero, al la servo de la "diversaĵoj".

- Po ducent frankojn ($\pm 825\text{€}$ en 2018) monate, modeste eligis la junulo, surprizita ĝis la sufokiĝo de tia propono.

- Vi havos ducent kvindek, respondis la ĉefredaktoro; sed vi sciigos al ĉiuj ke vi aniĝis al la redakcio de antaŭ unu monato. Estu bone komprenite ke ne estas vi kiu malkovris "la maldekstran piedon de la strato Oberkampfo" sed la ĵurnalo *La Epoko*. Ĉi tie, amiketo mia, la individuo estas nenio; la ĵurnalo estas ĉio !

Post tio, li invitis la novan redaktoron eksteriĝi. Ĉe la sojlo de la pordo, li tamen retenis lin por demandi al li lian nomon. La alia respondis : "Jozefo Jozefino".

- Tio ja ne estas nomo, eligis la ĉefredaktoro, sed ĉar vi ne subskribas, tio ne gravas...

Tuj la senbarba redaktoro akiris multajn amikojn, ĉar li estis komplezema kaj dotita de bona humuro kiu ensorĉis la plej grumblemaj kaj kvietigis la plej ĵaluzaĵn. Ĉe la trinkejo de la Advokatejo kie la reporteroj de la diversaĵoj tiam kuniĝis antaŭ ol supreniri al la prokurejo aŭ al la prefektejo por serĉi sian ĉiutagan krimon, li komencis akiri reputacion de elturniĝemulo, kiu baldaŭ transpasos la pordojn mem de la kabineto de la estro de la ŝtata Sekureco ! Kiam afero valoris la penon kaj ke Rultabio - li jam posedis sian alnomon - estis ĵetita sur la spuraro de la batalo de sia ĉefredaktoro, ofte okazis al li "superi" la plej famajn inspektorojn.

Estas en la kafejo de la Advokatejo ke mi faris kun li pli kompletan konon. Advokatoj, krimuloj kaj ĵurnalistoj tute ne estas malamikoj, iuj bezonantaj reklamon kaj la aliaj informojn.

Ni interbabilis kaj mi tuj eksentis grandan simpation al ĉi tiu brava knabego Rultabio. Li havis tiom viglan kaj tiom originalan inteligentecon ! Kaj li havis penskvaliton kiun mi neniam retrovis aliloken.

Post kelka tempo, mi estis komisiita pri la tribunala kroniko ĉe *La Krio de la Bulvardo*. Mia eniro en la ĵurnalismo povis nur plifirmigi la amikajn ligojn kiuj jam plektiĝis inter Rultabio kaj mi. Fine, mia nova amiko havinta la ideon pri malgranda tribunala korespondo kiun oni faris lin subskribi "*La Implikaĵo*" por sia ĵurnalo *La Epoko*, mi kapablis ofte provizi lin per la informojn de juro kiujn li bezonis.

Preskaŭ du jaroj tiel trapasis, kaj ju pli mi lernis koni lin, des pli mi amis lin ĉar, sub liaj ŝajnoj de ĝoja ekstravaganco, mi malkovris lin eksterordinare serioza laŭ lia aĝo.

Finfine, plurfoje, mi kiu kutimis vidi lin tre gaja kaj ofte tro gaja, mi trovis lin droninta en profunda malgajo. Mi volis pridemandi lin pri la kaŭzo de ĉi tiu humorŝanĝo, sed ĉiufoje li denove ridis kaj tute ne respondis. Iam, pridemandante lin pri liaj gepatroj pri kiuj li neniam parolis, li forlasis min, ŝajnigante tiun kiu ne aŭdis min.

Intertempe eksplodis la fama afero de la "*Flava Ĉambro*" kiu devis ne nur taksi lin kiel la unuan el la reporteroj, sed ankaŭ fari lin la unua policano de la mondo, duobla kvalito kiun oni ne povas miri trovi en la sama persono, konsidere ke la ĉiutaga gazetaro jam komencis transformiĝi kaj fariĝi tio kion ĝi proksimume estas hodiaŭ : la gazeto de la krimo. Malgajaj spiritoj povos plendi pri tio; mi ja opinias ke necesas ĝoji pri tio. Neniam oni havos sufiĉe da armiloj, publikaj aŭ privataj, kontraŭ la krimulo. Al kiu tiuj malgajaj spiritoj rebatas ke, pro persiste paroli pri krimoj, la gazetaro fine inspiras ilin. Sed estas homoj, ĉu ne ? kun kiuj oni neniam pravas...

Jen do Rultabio en mia ĉambro, tiun matenon, la 26^{an} de oktobro 1892. Li estis ankoraŭ pli ruĝa ol kutime; la okuloj eliris el lia kapo², kiel oni diras, kaj li ŝajnis turmentata de grava ekzaltiĝo. Li

2 Franca esprimo signifanta ke li elmontras viglan emociion, fortegan koleron,

svingis *La Mateno*ⁿ per febra mano. Li kriis al mi :

- Nu, mia kara Sinklero... Ĉu vi legis ?...
- La krimon de la Glanejo ?
- Jes, pri la "Flava Ĉambro !" Kion vi opinias pri tio ?
- Ha, mi pensas ke estas la "diablo" aŭ la "Dibesteto" kiu krimis.
- Estu serioza.

- Nu, mi diros al vi ke mi ne multe kredas al la murdistoj kiuj fuĝas tra la muroj. La ulĉjo Jakobo, laŭ mi, malpravus lasi malantaŭ si la krimarmilon, kaj ĉar li loĝas super la ĉambro de F^{ino} Stangerson, la arkitektura laboro al kiu la enketjuĝisto devas sin dediĉi hodiaŭ, donos al ni la ŝlosilon al la enigmo, kaj ni ne malfruos scii tra kiu natura klappordo aŭ tra kiu sekreta pordo la ulo sukcesis traŝoviĝi por tuj reveni en la laboratorion, apud S^{ro} Stangerson kiu rimarkis nenion. Kion mi dirus al vi ? Tio estas hipotezo !...

Rultabio sidiĝis en brakseĝon, ekbruligis sian pipon kiu neniam forlasis lin, silente fumis kelkajn momentojn, sendube la tempon por kvietigi tiun febron kiu videble superis lin, kaj poste li mokis min :

- Junulo ! li eligis per ia tono kies mi tute ne provos transdoni la malagrablan ironion, junulo... vi estas advokato, kaj mi ne dubas pri via talento malkondamni la kulpulojn; sed se iam vi estus enketjuĝisto, kiom estus facile al vi kondamni la senkulpulojn ! Vi vere estas talenta, junulo.

Poste, li energie fumis, kaj reparolis :

- Oni trovos nenian klappordon, kaj plie la mistero de la "Flava Ĉambro" fariĝos pli kaj pli mistera. Jen kial ĝi interesas min. La enketjuĝisto pravas : oni neniam vidos ion pli strangan ol ĉi tiun krimon...

- Ĉu vi havas ajnan ideon pri la vojo kiun la murdinto uzis por forfuĝi ? Mi demandis.

- Neniun, respondis al mi Rultabio, neniu nuntempe... Sed mi jam havas mian ideon preta pri la revolvero, ekzemple... La revolvero ne servis al la murdinto...

- Kaj al kiu ĝi utilis, Dio mia ?...
- Nu, sed... "al F^{ino} Stangerson..."
- Mi ne plu komprenas, mi eligis... Aŭ pli bone, mi neniam

komprenis...

Rultabio ŝultrolevis :

- Ĉu nenio aparte okulfrapis vin en la artikolo de *La Mateno* ?
- Vere ne... mi trovis ĉion kion li rakontas same stranga...
- Nu, sed... kaj la pordo fermita per ŝlosilo ?
- Estas la sola natura afero de la rakonto...
- Vere !... Kaj la riglilo ?...
- La riglilo ?
- La riglilo ŝovita de interne ?... Jen multaj antaŭzorgoj

utiligitaj de F^{ino} Stangerson... F^{ino} Stangerson, laŭ mi, sciis ke ŝi devis timi iun; ŝi aranĝis ŝiajn singardecojn; Ŝi eĉ prenis la revolveron de la ulĉjo Jakobo, sen diri tion al li. Sendube ŝi volis timigi nenium; ŝi ĉefe ne volis timigi sian patron... Tio kion F^{ino} Stangerson antaŭtimis okazi... kaj ŝi defendis sin, kaj okazis batalo kaj ŝi sufiĉe lerte uzis sian revolveron por vundi la murdanton ĉe la mano - tiel klariĝas la postsigno de la larĝa sanga mano de viro sur la muro kaj sur la pordo, de la viro, kiu preskaŭ blinde serĉis eskapirejon - sed ŝi ne sufiĉe rapide pafis por eviti la teruran baton kiu trafis ŝin ĉe la dekstra tempio.

- Ĉu do ne estas la revolvero kiu vundis F^{inon} Stangerson^{on} ĉe la tempio ?

- La gazeto ne diras tion, kaj pri mi, mi ne pensas tion; ankoraŭ ĉar ŝajnas al mi logika ke la revolvero servis al F^{ino} Stangerson kontraŭ la murdanto. Nun, kio estis la armilo de la murdanto ? Ĉi tiu bato ĉe la tempio ŝajnus atesti ke la murdanto volis svenbati F^{inon} Stangerson^{on}... Post vane provi stranguli ŝin... La murdanto devis scii ke la mansardo estis okupata de ulĉjo Jakobo, kaj estas unu el la kialoj por kiuj, mi pensas, li volis agi per "silenta armilo", eble klabo aŭ martelo...

- Ĉio tio ne klarigas al ni, mi eligis, kiel nia murdinto eliris el la "Flava Ĉambro" !

- Kompreneble, respondis Rultabio, stariĝante, kaj ĉar necesas

klarigi tion, mi iras al la kastelo de la Glanejo, kaj venas serĉi vin por ke vi venu kun mi...

- Mi !

- Jes, kara amiko, mi bezonas vin. *La Epoko* definitive komisiis al mi ĉi tiun aferon, kaj necesas ke mi plej rapide klarigu ĝin.

- Sed pri kio mi povas servi vin ?

- S^{ro} Roberto Darzak estas en kastelo de la Glanejo.

- Vere... lia senespero devas esti senlima !

- Necesas ke mi parolu kun li...

Rultabio prononcis ĉi tiun frazon per tono kiu surprizis min.

- Ĉu... Ĉu vi kredas pri io interesa tiufланke ? mi demandis.

- Jes.

Kaj li ne volis pli diri. Li pasis al mia salono petante al mi rapidigi mian tualetadon.

Mi konis S^{ron} Robertoⁿ pro esti farinta grandegan juĝan komplezon al li en civila proceso, dum kiam mi estis sekretario de Majstro Barбето-Delaturo. S^{ro} Roberto, kiu en tiu epoko aĝis kvardek da jaroj, estis instruisto pri fiziko ĉe la Sorbono. Li estis intime ligita kun la Stangerson^{oj}, ĉar post sep jaroj de diligenta amindumado, li fine estis edziĝonta kun F^{ino} Stangerson, iomaĝa ulino (ŝi devis aĝi ĉirkaŭ la tridek vin jaroj), sed ankoraŭ rimarkinde bela.

Dum mi vestiĝis, mi kriis al Rultabio kiu senpacienciĝis en mia salono :

- Ĉu vi havas ideon pri la situacio de la murdinto ?

- Jes, li respondis, mi kredas lin se ne mondumanon, almenaŭ el rango sufiĉe alta... Tio ankoraŭ estas nur impresoo...

- Kaj kio donas ĝin al vi, tiun impreson ?

- Nu sed, rebatis la junulo, la malpurega bereto, la vulgara naztuko kaj la spuroj de la kruda ŝuo sur la planko...

- Mi komprenas, mi eligis; oni ne postlasas tiom da spuroj malantaŭ si "kiam ili estas la esprimo de la vereco !"

- Oni faros ion per vi, mia kara Sinklero ! konkludis Rultabio.

<http://www.ipernity.com/blog/58225/243758>

03 – "Viro trapasis kiel ombro tra la ŝutroj".

Duonhoron poste, ni estis, Rultabio kaj mi, sur la kajo de la stacio de Orleano, atendente la ekveturon de la trajno kiu baldaŭ forlasos nin en [Epine-sur-Orŝe](#). Ni vidis alveni la prokuroraron de Korbejo, reprezentita de S^{ro} de Marketo kaj lia registristo. S^{ro} de Marketo tranoktis en Parizo kun sia registristo por spekti, ĉe [La Skalao](#), la lastan provludon de revueto kies li estis la maskita aŭtoro kaj kiun li subskribis simple : "[Castigat Ridendo](#)⁽³⁾".

S^{ro} de Marketo komencis esti nobla maljunulo. Li plejofte estis plena de ĝentileco kaj de galanteco, kaj havis dum sia tuta vivo nur unu pasion : tiun de drama arto. En sia kariero de juĝisto, li vere nur interesiĝis pri la aferoj kapablaj doni al li almenaŭ la naturon de faro. Kvankam dece parenca, li povintus aspiri al plej altaj juĝaj situacioj, li reale ĉiam ajn laboris nur por "alveni" al la romantika [Pordego Sankta-Martino](#) aŭ al la pensema [Odeono](#). Tia idealo kondukis lin, ĉe la vivofino, esti enketjuĝisto en Korbejo, kaj subskribi per "Castigat Ridendo" sengravan nedecan akton ĉe la Skalao.

La afero de la "Flava Ĉambro", pro sia neklarigebla aspekto, devis ĉarmi spiriton tiel... literaturan. Ĝi multege interesis lin; kaj S^{ro} de Marketo ĵetis sin al ĝi malpli kiel juĝisto sciavida pri la vero ol kiel amatoro de dramaj implikaĵoj kies ĉiuj kapabloj estas streĉintaj al la mistero de intrigo, kaj tamen kiu tiom antaŭtimas nenion ol atingi la finon de la lasta akto kie ĉio klariĝas.

Tiel, dum la momento kiam ni renkontis lin, mi aŭdis S^{ron} de Marketoⁿ diri kun suspiro al sia registristo :

- Nur, mia kara sinjoro Maleno, nur ke ĉi tiu entreprenisto, kun sia pioĉo, ne malkonstruu al ni tiom belan misteron !

- Ne timu, respondis S^{ro} Maleno, lia pioĉo eble detruos la pavilonon, sed ĝi lasos nian aferon netuŝita. Mi palpis la murojn kaj esploris plafonon kaj plankon, kaj mi estas sperta. Oni ne

3 Tio ellatine signifus "korekti per la ridado". "[Castigat Ridendo Mores](#) (*korekti la moron per la mokado*)" estas devizo de klasika komedio.

erarigas min. Ni povas esti trankvilaj. Ni scios nenion. Estante tiel trankviligita sian ĉefon, S^{ro} Maleno montris nin per diskreta kapmovado al S^{ro} de Marketo. La vizaĝo de tiu ĉi morozigis, kaj ĉar li vidis venante al li, Rultabioⁿ kiu jam senĉapeligis, li sin ĵetegis al pordo kaj eksaltis en la trajnon, duonvoĉe sendante al sia registristo : "Ĉefe neniuj ĵurnalistoj !"

S^{ro} Maleno rebatis : "Komprenita !", haltis Rultabioⁿ en sia kurado kaj havis pretendon malhelpi lin enveturiĝi en la kupeon de la enketjuĝisto.

- Pardonu, sinjoroj ! Ĉi tiu kupeo estas rezervita...

- Mi estas ĵurnalistoj, sinjoro, redaktoro ĉe *La Epoko*, eligis mia juna amiko, kun multa uzo de salutoj kaj de ĝentilecoj, kaj mi havas vorteton por diri al S^{ro} de Marketo.

- S^{ro} de Marketo estas tre okupata de sia enketo...

- Ho ! Lia enketo estas tute indiferenta por mi, bonvolu kredi tion... Mi ja ne estas redaktoro pri diversajoj, diris la juna Rultabio kies la malsupra lipo tiam esprimis senfinan malestimon por la literaturo de la "diversajoj"; mi estas kronikisto pri teatroj... Kaj ĉar mi devas fari, ĉi-nokte, mallongan recenzon pri la revuo de la Skalao...

- Enveturiĝu, sinjoro, mi petas vin, eligis la registristo, cedante sian lokon.

Rultabio jam estis en la kupeo.

Mi sekvis lin tien. Mi sidiĝis apud li; la registristo grimpis kaj fermis la pordon.

S^{ro} de Marketo rigardis sian registriston.

- Ho ! Sinjoro, komencis Rultabio, ne riproĉu "ĉi tiun bravulon" se mi fortordis la instrukcion; ne estas al S^{ro} de Marketo ke mi volas havi la honoron paroli : estas al S^{ro} "Castigat Ridendo"!... Permesu min gratuli vin, kiel teatra kronikisto ĉe *La Epoko*...

Kaj Rultabio, prezentinte min unue, prezentis sin poste.

S^{ro} de Marketo, kun malkvieta gesto, karesis sian pintan barbon. Li esprimis per kelkaj vortoj al Rultabio, ke li estis tro modesta aŭtoro, por deziri ke la vualo de sia pseŭdonimo estu publike demetita, kaj li tre esperis ke la entuziasmo de la ĵurnalistoj por la

verko de la dramaturgo tute ne iros ĝis sciigi al la loĝantaroj ke S^{ro} "Castigat Ridendo" ne estis alia ol la enketjuĝisto de Korbejo.

- La verko de la drama aŭtoro povus difekti, li aldonis post apenaŭa hezito, al la laboro de la juĝisto... ĉefe en provinco kie oni restis iom rutina...

- Ho ! Fidu al mia diskreteco ! ekkriis Rultabio, levante manojn, kiuj atestigas la Ĉielon.

La trajno tiam ekruliĝis...

- Ni foriras ! eligis la enketjuĝisto, mirigita vidi nin vojaĝi kun li.

- Jes, sinjoro, la vero ekiras... diras afable ridetante la reportero... irado al la kastelo de la Glanejo... Bela afero, sinjoro de Marketo, bela afero !

- Obskura afero ! Nekredebla, nesondebla, neklarigebla afero... kaj mi timas nur unu aferon, sinjoro Rultabio... estas ke la ĵurnalistoj provas voli klarigi ĝin...

Mia amiko sentis la frontan frapon.

- Jes, li simple eligis, necesas timi tion. Ili enmiksiĝas ĉion. Pri mi, mi parolas al vi nur ĉar la hazardo, sinjoro enketjuĝisto, la simpla hazardo metis min sur via vojo kaj preskaŭ en via kupeo.

- Kien vi do iras ? demandis S^{ro} de Marketo.

- Al la Kastelo de la Glanejo, eligis senhezite Rultabio.

S^{ro} de Marketo eksaltis.

- Vi ne eniros tien, sinjoro Rultabio !...

- Ĉu vi kontraŭstaros ? eligis mia amiko, jam preta por batalo.

- Tute ne ! Mi tro ŝatas la gazetaron kaj la ĵurnalistojn por esti malagraba al ili pri io ajn, sed S^{ro} Stangerson konsignis sian pordon al ĉiuj. Kaj ĝi estas bone gardata. Neniu ĵurnalisto sukcesis hieraŭ transpasi la kradon de la Glanejo.

- Des pli bone, rebatis Rultabio, mi bone alvenas.

S^{ro} de Marketo kunpremis siajn lipojn kaj ŝajnis preta subteni obstinan silenton. Li iomete malstreĉiĝis nur kiam Rultabio ne plu lasis lin nescii ke ni iris al la Glanejo por tie premi la manojn de "malnova intima amiko", li asertis, parolante pri Roberto kiun li eble vidis unu fojon en sia vivo.

- Tiu kompatinda Roberto ! daŭrigis la juna reportero... Tiu

kompatinda Roberto ! li kapablas morti pro tio... Li tiom amis F^{inon} Stangerson^{on}...

- La doloro de S^{ro} Roberto vere vekas kompaton... lasis eskapi kiel malplezure S^{ro} de Marketo...

- Sed necesas esperi ke F^{ino} Stangerson estos savita...

- Ni esperas tion... lia patro hieraŭ diris al mi ke se ŝi nepre mortus, li ja tute ne prokrastus iri kuniĝi al ŝi en la tombo... Kia nekalkulebla perdo por la scienco !

- La vundo ĉe la tempio estas serioza, ĉu ne ?...

- Evidente ! Sed estas nekredebla ŝanco ke ĝi ne estis mortiga... La bato estis forte donita !...

- Ne estas do la revolvero kiu vundis F^{inon} Stangerson^{on}, eligis Rultabio... ĵetante al mi triumfan rigardon.

S^{ro} de Marketo ŝajnis tre embarasita.

- Mi diris nenion, mi volas diri nenion, kaj mi diros nenion !

Kaj li turnis sin al sia registristo, kvazaŭ li ne plu konis nin...

Sed oni ne tiel liberiĝis de Rultabio. Ĉi tiu alproksimiĝis al la enketjuĝisto, kaj montrante *La Mateno*ⁿ kiun li eltiris el sia poŝo, li diris al li :

- Estas io, sinjoro enketjuĝisto, kiun mi povas demandi al vi sen riski maldiskretaĵon. Ĉu vi legis la raporton de *La Mateno* ? Ĝi estas absurda, ĉu ne ?

- Tute ne, sinjoro...

- Kaj kio ! La "Flava Ĉambro" havas nur unu kraditan fenestron kies la stangoj ne estis malfiksitaj, kaj unu pordon kiun oni enrompis... kaj oni ne trovas murdinton ene !

- Tiel estas, sinjoro ! Tiel estas !.. Estas tiel ke la demando sin metas !...

Rultabio nenion pli diris kaj eniris en nekonataj pensadoj... Kvaronhoro forfluis.

Kiam li revenis al ni, li diris ankoraŭ alparolante al la enketjuĝisto :

- Kiel estis tiun nokton la hararanĝo de F^{ino} Stangerson ?

- Mi ne komprenas, diris S^{ro} de Marketo.

- Tio ĉi estas el la lasta graveco, rebatis Rultabio. La haroj en

harbendo, ĉu ne ? Mi certas ke ŝi surhavis tiun nokton, la nokton de la dramo, la harojn en harbendo !

- Nu, sinjoro Rultabio, vi eraras, respondis la enketjuĝisto; F^{ino} Stangerson kombis al si tiun vesperon, la harojn tute levitajn en plektaĵo sur la kapo... Tio devas esti ŝia kutima hararanĝo... La frunto tute malkovrita, mi povas aserti tion al vi ĉar ni longe ekzamenis la vundon. Ne estis sango en haroj... kaj oni ne tuŝis la hararon ekde la atenco.

- Vi estas certa ! Ĉu vi certas ke F^{ino} Stangerson, la nokton de la atenco, ne havis "la harojn en harbendo" ?...

- Tute certe, daŭrigis la juĝisto ridetante, ĉar ĝuste mi ankoraŭ aŭdas la kuraciston diri al mi dum mi ekzamenis la vundon : "Estas tre domaĝe ke F^{ino} Stangerson kutimas kombi sin kun la haroj levitaj sur la frunto. Se ŝi estus aranĝinta la hararon per harbendo, la bato kiun ŝi ricevis ĉe la tempio, estintus moderigita". Nun mi diros al vi ke estas strange ke vi taksas kiel gravan...

- Ho ! Se ŝi ne havis la harojn en harbendo ! ĝemis Rultabio, kien ni iras ? Kien ni iras ? Necesos ke mi informiĝas.

Kaj li montris afliktitan geston.

- Kaj ĉu la vundo ĉe la tempio estas terura ? li ankoraŭ demandis.

- Terura.

- Nu, per kiu armilo ĝi estis farita ?

- Tiu ĉi, sinjoro, estas la sekreto de enketo.

- Ĉu vi retrovis ĉi tiun armilon ?

La enketjuĝisto ne respondis.

- Kaj la vundo ĉe la gorĝo ?

Ĉi tie, la enketjuĝisto bonvolis konfidi al ni ke la vundo ĉe la gorĝo estis tia kia oni povis certigi tion, laŭ la opinio mem de la kuracistoj, ke "se la murdanto estus preminta tiun gorĝon kelkajn sekundojn plu, F^{ino} Stangerson mortis strangolita.

- La afero, tia kia ĝin raportas *La Mateno*, obstineme reparolis Rultabio, ŝajnas al mi pli kaj pli neklarigebla. Ĉu vi povas diri al mi, sinjoro juĝisto, kiuj estas la aperturoj de la pavilono, pordoj kaj fenestroj ?

- Estas kvin, respondis S^{ro} de Marketo, post esti tusinta du aŭ tri fojojn, sed ne plu rezistanta al la deziro kiun li havis elmontri la tutan nekredeblan misteron de la afero kiun li esploris. Estas kvin el kiuj la pordo de la vestiblo kiu estas la sola enira pordo de la pavilono, pordo ĉiam aŭtomate fermita kaj kapabla malfermiĝi, aŭ de interne, aŭ de ekstere, nur per du apartaj ŝlosiloj kiuj neniam forlasas la ulĉjon Jakoboⁿ kaj S^{ron} Stangerson^{on}. F^{ino} Stangerson tute ne bezonas ĝin ĉar la ulĉjo Jakobo estas konstante en la pavilono kaj ke, dum la tago, ŝi tute ne forlasas sian patron. Kiam ili sin pelis, ĉiuj kvar, en la "Flavan Ĉambro" kies ili fine frakasis la pordon, la eniran pordon de la vestiblo, ĝi ja estis restinta fermita kiel ĉiam, kaj la du ŝlosiloj de ĉi tiu pordo estis unu en la poŝo de S^{ro} Stangerson, la alia en la poŝo de ulĉjo Jakobo. Pri la fenestroj de la pavilono, ili estas kvar : la sola fenestro de la "Flava Ĉambro", la du fenestroj de la laboratorio kaj la fenestro de la vestiblo. La fenestro de la "Flava Ĉambro" kaj tiuj de la laboratorio rigardas al la kamparo; nur la fenestro de la vestiblo rigardas al la parko.

- Estas tra tiu fenestro ke li forfuĝis el la pavilono ! ekkriis Rultabio.

- Kiel vi scias tion ? diris S^{ro} de Marketo, fiksante sur mia amiko strangan rigardon.

- Ni vidos pli poste kiel la murdinto forfuĝis el la "Flava Ĉambro", rebatis Rultabio, sed li devis forlasi la pavilonon tra la fenestro de la vestiblo...

- Ankoraŭfoje , kiel vi scias tion ?

- Hej ! Dio mia ! Estas tre simple. Ekkiam "li" ne povas eskapi tra la pordo de la pavilono, necesas ja ke li pasas tra la fenestro, kaj necesas ke estu almenaŭ, por ke li trapasas, fenestro kiu ne estas kradita. La fenestro de la "Flava Ĉambro" estas kradita ĉar ĝi rigardas al la kamparo; la du fenestroj de la laboratorio certe devas esti tiel pro la sama kialo. "Ĉar la murdinto forfuĝis", mi imagas ke li trovis fenestron sen stangoj, kaj tio estos tiu de la vestiblo, kiu rigardas al la parko, tio estas al la interno de la bieno. Por tio ne necesas multe da scienco !...

- Jes, diris S^{ro} de Marketo, sed tio kion vi ne povis diveni, estas ke tiu fenestro de vestibulo, kiu fakte estas la sola kiu tute ne havas stangojn, posedas solidajn ŝutrojn el fero. Nu ĉi tiuj feraj ŝutroj restis fermitaj de interne de sia fera klinko, kaj tamen ni havas la pruvon ke la murdinto efektive forfuĝis el la pavilono tra tiu sama fenestro ! Sangaj spuroj sur la muro ĉe la interno kaj sur la ŝutroj kaj paŝoj sur la tero, paŝoj tute similaj al tiuj kies mi mezuris en la "Flava Ĉambro", atestas ja ke la murdinto fuĝis tra tie ! Sed tiam ! Kiel li faris, ĉar la ŝutroj restis fermitaj de interne ? Li trapasis kiel ombro tra la ŝutroj. Kaj, fine, la plej freneziga el ĉiuj, ĉu ne estas la postsigno trovita de la murdinto tuj kiam li fuĝas el la pavilono, kiam ne eblas fari al si la plej malgrandan ideon pri la maniero kiel la murdinto eliris el la "Flava Ĉambro", nek kiel li nepre trairis la laboratorion por atingi la vestiblon ! Ha ! jes, sinjoro Rultabio, ĉi tiu afero estas halucina... Ĝi estas bela afero, hej ! Kaj pri kiu oni ne trovos la ŝlosilon ĝis longtempe, mi bone esperas tion !...

- Kion vi esperas, sinjoro enketjuĝisto ?...

S^{ro} de Marketo reĝustigis :

- ... Mi ne esperas tion... Mi kredas tion...

- Oni do refermus la fenestron, de interne, post la forkuro de la murdinto ? demandis Rultabio...

- Evidente, jen tio kio nun ŝajnas al mi natura kvankam neklarigebla... ĉar tio necesus komplicon aŭ komplicojn... kaj mi ne vidas ilin...

Post silento, li aldonis :

- Ha ! Se F^{ino} Stangerson povus farti sufiĉe bone hodiaŭ por ke oni pridemandu ŝin...

Rultabio daŭriganta sian penson, demandis :

- Kaj la mansardo ? Devas esti aperturo en la mansardo ?

- Jes, mi fakte ne kalkulis ĝin; tio faras ses aperturojn; estas tie supre malgranda fenestro, pli ĝuste lukso, kaj ĉar ĝi rigardas al ekstero de la bieno, S^{ro} Stangerson ankaŭ provizigis ĝin per stangoj. Ĉe tiu lukso, kiel ĉe la fenestroj de la teretaĝo, la stangoj restis nedifektitaj kaj la ŝutroj, kiuj nature malfermiĝis interne,

restis fermitaj interne. Cetere ni malkovris nenion kiu povus nin suspektigi la trairadon de la murdinto en la mansardo.

- Laŭ vi do tute ne estas duba, sinjoro enketjuĝisto, ke la murdinto forfuĝis - sen scii kiel - tra la fenestro de la vestiblo !

- Ĉio pravas tion...

- Mi ankaŭ kredas tion, serioze konsentis Rultabio.

Poste iu silento, kaj li reparolis :

- Se vi ne trovis neniajn spurojn de la murdinto en la mansardo, kiel ekzemple tiujn nigretajn paŝojn kiujn oni konstatis sur la pargeto de la "Flava Ĉambro", vi devas esti kondukita kredi ke tute ne estas li kiu ŝtelis la revolveron de ulĉjo Jakobo...

- Ne estas spuroj en la mansardo, nur tiuj de ulĉjo Jakobo, eligis la juĝisto kun signifa kaplevo...

Kaj li ekdecidis kompletigi sian penson :

- La ulĉjo Jakobo estis kun S^{ro} Stangerson... Feliĉe por li...

- Do kio pri la rolo de la revolvero de la ulĉjo Jakobo en la dramo ? Ŝajnas bone demonstri ke ĉi tiu armilo malpli vundis F^{inon} Stangerson^{on} ol ĝi vundis la murdinton...

Sen respondi ĉi tiun demandon, kiu sendube embarasis lin, S^{ro} de Marketo informis nin ke oni trovis la du kuglojn en la "Flava Ĉambro", unu en muro, la muro kie kuŝas la ruĝa mano - ruĝa mano de viro - la alian en la plafono.

- Ho ! Ho ! En la plafono ! duonvoĉe ripetis Rultabio... vere... en la plafono ! Jen kiu estas tre stranga... en la plafono !...

Li komencis fumi silente, ĉirkaŭigante sin per fumplena medio. Kiam ni alvenis al Epine-sur-Orĝe, mi devis doni al li baton sur la ŝultron por elrevigi lin kaj malsupreniri sur la kajon.

Tie, la juĝisto kaj lia registristo salutis nin, komprenigante nin ke ili sufiĉe vidis nin; poste ili rapide enveturiĝis en kabrioleton kiu atendis ilin.

- Kiom da tempo necesas por piediri de ĉi tie al kastelo de la Glanejo ? demandis Rultabio al iu fervoja oficisto.

- Unu horo kaj duono, unu horo kaj tri kvaronoj sen rapidi, respondis la viro.

Rultabio rigardis la ĉielon, trovis ĝin laŭ sia plaĉo, kaj sendube

laŭ la mia, ĉar li kaptis min sub la brakon kaj diris al mi :

- Ek !... Mi bezonas paŝi.

- Nu ! mi demandis al li, ĉu tio malkonfuziĝas ?

- Ho ! li eligis, Ho ! tute nenio estas malkonfuzita !... Tio estas ankoraŭ pli konfuzita ol antaŭe ! Estas vere ke mi havas ideon...

- Diru ĝin.

- Ho ! Mi nun ne povas diri ion ajn... Mia ideo estas afero pri vivo aŭ morto por almenaŭ du homoj...

- Ĉu vi kredas al komplico ?

- Mi ne kredas tion...

Ni silentis dum momento, poste li reparolis :

- Estas bonŝanco esti renkontintaj tiun enketjuĝiston kaj lian registriston... Eh ! Kion mi diris al vi pri la revolvero ?...

Li havis la frunton klinantan al la vojo, la manojn en la poŝoj, kaj li fajfetis. Post momento, mi aŭdis lin murmuri : "Kompatinda virino !..."

- Ĉu estas F^{ino} Stangerson kiun vi kompatas ?...

- Jes, ŝi estas tre nobla virino, kaj tute kompatinda ! Ŝi estas tre granda, tre granda karaktero... mi imagas... mi imagas...

- Ĉu do vi konas F^{inon} Stangerson^{on} ?

- Mi, tute ne... Mi vidis ŝin nur unu fojon...

- Kial vi diras : ŝi estas tre granda karaktero ?...

- Ĉar ŝi kapablis fronti kontraŭ la murdanto, ĉar ŝi defendis sin kun kuraĝo, kaj ĉefe, ĉefe, pro la kuglo en la plafono.

Mi rigardis Rultabioⁿ, interne demandante al mi, ĉu li tute ne mokis min aŭ ĉu li subite ne freneziĝis. Sed mi bone vidis ke neniam la junulo malpli bezonis ridi, kaj la sagaca brilo de liaj etaj rondaj okuloj trankviligis min pri sia stato de racieco. Kaj plie mi iomete kutimis al siaj senordaj diroj... senordaj por mi kiu ofte trovis en ili nur nekonsekvenceco kaj misteron ĝis kiam, per kelkaj rapidaj kaj klaraj frazoj, li donis al mi la fadenon de sia penso. Tiam ĉio subite lumiĝis; la vortoj kiujn li diris, kaj kiuj ŝajnis al mi sensencaj, konektiĝis kun facileco kaj logiko tiaj ke "mi ne povis kompreni kiel mi ne komprenis pli frue".

04 - "Meze de sovaĝa naturo".

La Kastelo de la Glanejo estas unu el la plej malnovaj kasteloj de ĉi tiu lando **Francilio** kie ankoraŭ staras tiom da famaj ŝtonoj de la feŭda epoko. Konstruita en la koro de la arbaroj, sub **Filipo la Bela**, ĝi aperas je kelkcent metroj de la vojo kiu kondukas de la vilaĝo de **San-Ĝenoveva-de-la-Arbaroj** ĝis **Montleri**. Amaso de diverspecaj konstruaĵoj, ĝi estas superstarata de ĉefturo. Kiam la vizitanto estas grimpinta la malfirmajn ŝtupojn de tiu ĉi antikva ĉefturo kaj ke li finvenas sur la malgrandan platformon kie, dum la XVII^a jarcento, **Georgo-Filiberto de Sekignio**, senjoro de la Glanejo, de Novaj-Domoj kaj aliaj lokoj, starigis la aktualan lanternon el abomena rokoka stilo, oni videtas je tri leŭgojn de tie, super la valo kaj la ebenaĵo, la malmodestan turon de **Montleri**. Ĉefturo kaj turo ankoraŭ rigardas unu la alian, post tiom da jarcentoj, kaj ŝajnas rakonti inter si, super la verdiĝantaj arbaregoj aŭ la mortaj arbaroj, la plej malnovaj legendoj de la historio de Francio. Oni diras ke la ĉefturo de la Glanejo priatentas al iu heroo kaj sankta ombro, tiu de la bonan patronon de Parizo, antaŭ kiu cedis **Atilo**. Sankta Ĝenoveva estas tie dormanta sian lastan dormadon en la malnovaj ĉirkaŭfosaĵoj de la kastelo. En la somero, la geamantoj, balancante per senatenta mano la korbon de pikniko, venas por revii aŭ ligiĝi per reciprokaj amĵuroj antaŭ la tombo de la sanktulino, pie florumita de neforgesuminoj. Ne for de tiu tombo estas puto kiu enhavas, oni diras, miraklan akvon. La dankemo de la patrinoj starigis ĉe tiu ĉi loko statuon por sankta Ĝenoveva kaj pendigis sub ŝiaj piedoj la etajn beboŝuojn aŭ la ĉapetojn de la infanoj savitaj de tiu sankta akvo.

Estas en tiu loko kiu ŝajnis entute aparteni al la pasinteco, ke la profesoro **Stangerson** kaj lia filino venis lokiĝi por prepari la sciencon de la estonteco.

Ĝia izoliteco funde de la arbaro tuj plaĉis al ili. Ili tie havus, kiel atestantojn de siaj laboroj kaj de siaj esperoj, nur malnovajn

ŝtonojn kaj grandajn kverkojn. La Glanejo, antaŭe "Glanloko", tiel nomiĝis pro la granda nombro da glanoj kiujn oni de ĉiam rikoltis en tiu loko. Ĉi tiu lando, hodiaŭ bedaŭrinde famkonata, rekonkeris, dank'al la malzorgo aŭ la forlaso de la proprietuloj, la sovaĝan aspekton de primitiva naturo; nur la konstruaĵoj kiuj sin kaŝis tie, konservis la postsignon de strangaj metamorfozoj. Ĉiu jarcento lasis en ĝi sian spuron : parton de arkitekturo, al kiu sin ligis la memorado de kelka terura okazaĵo, de kelka sangoruĝa aventuro ; kaj tia, ĉi tiu kastelo, en kiu estis rifuĝanta la scienco, ŝajnis tute destinita por servi kiel teatron de teruraj kaj mortaj dramoj.

Tio dirita, mi ne povas malpermesi al mi pensadon. Jen ĝi :

Se mi iom daŭre traktis tiun malĝojan pentradon de la Glanejo, tute ne estas ĉar mi trovis ĉi tie la dramon okazon "krei" la necesan etoson de la dramoj kiuj estas disvolviĝontaj sub la okuloj de la leganto kaj vere, mia unua zorgo en ĉi tiu tuta afero estos resti plej simpla kiel eble. Mi tute ne pretendas esti aŭtoro. Kiu diras aŭtoron, ĉiam iom diras romaniston, kaj dank'al Dio, la mistero de la "Flava Ĉambro" estas sufiĉe plena de tragika reala hororo por sin deteni de literaturo. Mi estas kaj volas esti nur fidinda "raportisto". Mi devas raporti la eventon; mi okazigas ĉi tiun eventon en ĝia kadro, jen ĉio. Estas tute nature ke vi sciu kie la aferoj okazas.

Mi revenas al S^{ro} Stangerson. Kiam li aĉetis la bienon, ĉirkaŭ dek kvin jarojn antaŭ la dramo kiu ĉikanas nin, la Glanejo ne estis loĝata de longe. Alia malnova kastelo en la ĉirkaŭaĵoj, konstruita dum la XIV^a jarcento de Johano de Belmonto, estis ankaŭ forlasita, tiel ke la lando estis preskaŭ neloĝata. Kelkaj dometoj rande de la vojo kiu alkondukas al Korbejo, iu gastejo, la gastejo de la "Ĉefturo", kiu proponis portempan gastadon al la varĉaristoj; tio estis proksimume ĉio kio rememorigis la civilizacion en tiu forlasita loko kiun oni apenaŭ imagis renkonti je kelkaj leŭgoj de la ĉefurbo. Sed tiu ĉi perfekta forlaso estis la decida kialo de la elekto de S^{ro} Stangerson kaj lia filino. S^{ro} Stangerson jam estis fama; li revenis el Usono kie siaj laboroj estis havantaj konsiderindan efikon. La libro kiun li eldonis en Filadelfio pri la

"Disocio de la Materio per la Elektraĵoj", aŭdigis la protestadon de la tuta sciencularo. S^{ro} Stangerson estis franco, sed de usona origino. Tre gravaj heredaj aferoj retenis lin dum pluraj jaroj en Usono. Li tie daŭrigis iun laboraĵon komencitan en Francio, kaj li revenis kompletigi ĝin en Francio, post esti realiginta grandan kapitalon, ĉiuj liaj procesoj feliĉe finiĝantaj aŭ per juĝadoj kiuj donis al li praviĝon, aŭ per kompromisoj. Ĉi tiu riĉaĵo estis bonvena. S^{ro} Stangerson kiu povis, se li volis, perlabori milionojn da dolaroj ekspluatante aŭ ekspluatigante du aŭ tri el siaj kemiaj eltrovoj rilate al novaj tinkturadaj procedoj, ĉiam malinklinis uzi por sia propra intereso, la mirindan talenton "inventi" kiun li ricevis de la naturo; sed li tute ne pensis ke lia genio apartenis al li.

Li ŝuldis tion al homoj, kaj ĉio kion lia genio naskigis, malprivatiĝis pro tiu filantropia volo. Se li tute ne provis kaŝi la kontentiĝon kiun kaŭzis al li la posedigon de ĉi tiu neatendita monsumo, kiu ebligis al li lin dediĉi ĝis lia lasta horo al lia pasio por pura scienco, la profesoro devis ankaŭ ĝoji pro tio, "ŝajnis", pro alia kaŭzo. F^{ino} Stangerson aĝis, en tiu momento kiam ŝia patro revenis de Ameriko kaj aĉetis la *Glanejo*ⁿ, dudek jarojn. Ŝi estis pli bela ol oni kapablas imagi tion, samtempe ĝuanta de la tuta pariza gracieco de sia patrino, mortinta naskante ŝin, kaj de la tuta gloro, la tuta fekundeco de la juna usona sango de sia patra avo, Vilhelmo Stangerson. Tiu ĉi, civitano de Filadelfio, devis naciianiĝi franco por obei al postuloj de familio okaze de lia edziĝo kun franca virino, tiu kiu devis esti la patrino de la famkonata Stangerson. Tiel klariĝas la franca nacieco de la profesoro Stangerson.

Dudekjara, ĉarme blonda, kun bluaj okuloj kaj lakta vizaĝkoloro, radiantanta, kun sublima sano, Matilda Stangerson estis unu el la plej belaj knabinoj por edzinigi de la malnova kaj nova kontinento. Estis la devo de ŝia patro, malgraŭ la antaŭvidita doloro de neevitebla disiĝo, pripensi pri ĉi tiu geedziĝo, kaj li ne devis ĉagreni vidi alveni la doto. Ĉiaokaze, spite al tio, li izoliĝis kun sia infano ĉe la *Glanejo* en la momento kiam siaj amikoj opiniis ke li prezentu F^{ino} Matildaⁿ en la mondo. Kelkaj venis vidi lin kaj

esprimis sian miron. Al la demandoj kiuj estis metitaj al li, la profesoro respondis : "Estas la volo de mia filino. Mi nenion povas rifuzi al ŝi. Estas ŝi kiu elektis la Glanejoⁿ". Siavice pridemandita, la fraŭlino trankvile replikis : "Kie ni pli bone laborus ol en ĉi tiu izoleco ?" Ĉar F^{ino} Matilda Stangerson jam kunlaboris al la laboraĵo de sia patro, sed oni tiam ne povis imagi ke ŝia pasio por la scienco iris ĝis forpuŝi ĉiujn partiojn kiuj kandidatus al ŝi, dum pli ol dek kvin jaroj. Tiel solecaj kiel ili vivis, la patro kaj la filino devis montri sin en kelkaj oficialaj kunvenoj kaj, ĉe kelkaj jarperiodoj, en du aŭ tri amikaj salonoj kie la prestiĝo de la profesoro kaj la beleco de Matilda kaŭzis senton. La ekstrema malvarmeco de la fraŭlino unue ne senkuraĝigis la svatiĝantojn; sed post kelkaj jaroj, ili laciĝis. Nur unu persistis kun milda tenaceco kaj meritis tiun nomon de "eterna fianĉo" kiun li akceptis kun melankolio; estis Roberto Darzak. Nun F^{ino} Stangerson ne plu estis juna, kaj bone ŝajnis ke, tute ne trovinta kialojn por edziniĝi, ĝis la aĝo de tridek kvin jaroj, ŝi neniam malkovros ilin. Tia argumento kompreneble ŝajnis sen valoro al S^{ro} Roberto Darzak, ĉar tiu ĉi tute ne ĉesis sian flirtadon, supozante ke oni ankoraŭ povas nomi "flirton" la delikatajn kaj tenerajn zorgadon kies oni ne ĉesas involvi virinon de tridek kvin jaroj, restintan fraŭlinon, kaj kiu deklaris ke ŝi tute ne edziniĝos.

Subite, kelkajn semajnojn antaŭ la eventoj kiuj okupas nin, onidiro kiun oni unue ne taksis kiel gravan - tiel multaj oni trovis ĝin nekredeblan - disvastiĝis tra Parizo; F^{ino} Stangerson fine konsentis kroni la neestingeban flamon de S^{ro} Roberto Darzak !" Necesis ke S^{ro} Roberto Darzak mem tute ne kontraŭdiru ĉi tiujn geedzajn dirojn, por ke finfine oni diris al si ke eblis esti iom da vero en tiel nekredebla famo. Fine, S^{ro} Stangerson bonvolis anonci, iam elirante el la Akademio de Sciencoj, ke la geedziĝo de sia filino kaj de S^{ro} Roberto Darzak estus private celebrotita en la kastelo de la Glanejo, tuj kiam lia filino kaj li estus plenperfektigintaj la raporton kiu estis resumonta siajn tutajn laboraĵojn pri la "Disocio de la Materio", tio estas pri la reveno de materio al la etero. La nova familio loĝiĝus en la Glanejo kaj la

bofilo alportus sian kunlaboradon al la laborado al kiu la patro kaj la filino dediĉis sian vivon.

La scienca mondo havis ne ankoraŭ la tempon retrankviliĝi pro tiu novaĵoj ke oni sciigis pri la murdo de F^{ino} Stangerson laŭ la neverŝajnaj kondiĉoj kiujn ni raportis, kaj ke nia vizito en la kastelo baldaŭ permesos al ni ankoraŭ pli precizigi.

Mi tute ne hezitis provizi la leganton per ĉiuj ĉi retrospektaj detaloj kiujn mi konis sekve de miaj aferraportoj kun S^{ro} Roberto Darzak, por ke, transpasante la sojlon de la "Flava Ĉambro", li estu tiom dokumentita kiom mi.

05 - En kiu Jozefo Rultabio direktas al S^{ro} Roberto Darzak frazon kiu produktas sian efiketon.

Ni paŝis de kelkaj minutoj, Rultabio kaj mi, laŭlonge de muro kiu limigis la vastan proprietaĵon de S^{ro} Stangerson, kaj ni jam videtis la enirejan kradon kiam nia atento estis altirita de iu ulo kiu, duonklininta al la grundo, ŝajnis tiel absorbita ke li ne vidis nin veni. Jen li kliniĝis, preskaŭ kuŝiĝis sur la grundo, jen li restariĝis kaj zorge ekzamenis la muron; jen li rigardis en la kavo de sia mano, poste faris grandajn paŝojn, poste ekkuris kaj denove rigardis en la kavo de sia dekstra mano. Rultabio per gesto haltigis min :

- ŜŜ ! Frederiko Larsano kiu laboras !... Ni ne ĝenu lin !

Jozefo Rultabio havis grandan admiron pri la fama policisto. Mi ja neniam vidis Frederikoⁿ Larsanoⁿ sed mi aŭdis multe pri li.

La afero de la orbrikoj de la [hotelo de la Mono](#) kiun li malimplikis kiam ĉiuj rezignis solvi la enigmon, kaj la aresto de la rompistoj de kiraskestoj de la Universala Kreditejo faris lian nomon preskaŭ populara. Li estis tiam, en tiu epoko kiam Jozefo Rultabio ne ankoraŭ vidigis la admirindajn pruvojn de senkompara talento, rigardata kiel la plej kapablan spiriton por klarigi la konfuzitan implikaĵon el la plej misteraj kaj plej malhelaj krimoj. Lia reputacio disvastiĝis tra la tuta mondo, kaj ofte la policoj de Londono aŭ de Berlino aŭ eĉ de Usono helpetis lin kiam la naciaj inspektoroj kaj detektivoj sin deklaris ĉe la limo de sia imagpovo kaj siaj kompetentecoj. Oni do tute ne miros ke, ekde la komenco de la mistero de la "Flava Ĉambro", la estro de la Ŝtata Sekureco pensis telegrafi al sia karega subulo en Londono, kie Frederiko Larsano estis sendita por iu grava afero de valorpaperoj ŝtelitaj : "Rapide revenu".

Frederiko, kiun oni nomis en la Sekureco la granda Freĉjo, rapidis, sendube sciante proprasparte ke, se oni ĝenis lin, tio estis ĉar oni vere bezonis liajn servojn, kaj tiel estas ke Rultabio kaj mi, tiun matenon, ni trovis lin jam laborantan. Ni baldaŭ komprenis en

kio ĝi konsistas.

Tio kion li ne ĉesis rigardi en la kavo de sia dekstra mano estis nenio alia krom lia brakhorloĝo kaj li ŝajnis tre okupanta kalkuli minutojn. Poste li returnen iris, ankoraŭfoje rekomencis sian kuron, haltis ĝin nur ĉe la krado de la parko, rekonsultis sian brakhorloĝon, metis ĝin en sian poŝon, ŝultrumis kun senkuraĝa gesto, puŝis la kradon, eniris la parkon, reŝlosis la kradon, levis la kapon kaj, tra la stangoj, ekvidis nin. Rultabio kuris kaj mi sekvis lin. Frederiko Larsano atendis nin.

- Sinjoro Freĉjo, diris Rultabio malkovrante al si la kapon kaj montrante la signojn de profunda respekto bazita sur la vera admiro kiun la juna reportero havis pri la fama policano, ĉu vi povus diri al ni, ĉu S^{ro} Roberto Darzak estas ĉimomente en la kastelo ? Jen unu el liaj amikoj el la Pariza advokataro, kiu dezirus paroli kun li.

- Mi ne scias, sinjoro Rultabio, replikis Freĉjo skuante la manon de mia amiko, ĉar li jam okaze renkontis lin plurfoje dum siaj plej malfacilaj enketoj... Mi ne vidis lin.

- La gepordistoj sendube informos nin ? eligis Rultabio montrante dometo el brikoj kies pordo kaj fenestroj estis fermitaj, kaj kiu devis nepre loĝigis tiujn fidelajn gardistojn de la bieno.

- La gepordistoj tute ne informos vin, sinjoro Rultabio.

- Kaj kial do ?

- Ĉar de duonhoru, ili estas arestitaj !...

- Arestitaj ! ekkriis Rultabio... Ili estas la murdintoj !

Frederiko Larsano ŝultrumis.

- Kiam oni ne sukcesas, li diris kun mieno de supera ironio, aresti la murdinton, oni ĉiam povas permesi sin malkovri la komplicojn !

- Ĉu estas vi kiu arestigis ilin, sinjoro Freĉjo ?

- Ha! Ne ! Nekredinde ! Mi ne arestigis ilin, unue ĉar mi estas preskaŭ certa ke ili ne estas implikitaj en la afero, kaj poste ĉar...

- Ĉar kio ? streĉe demandis Rultabio.

- Ĉar... nenio..., eligis Larsano skuante la kapon.

- Ĉar ne estas komplikojn ! flustris Rultabio.

Frederiko Larsano ekhaltis rigardante la reporteron kun intereso.

"Ha ! Ha ! Vi do havas ideon pri la afero... Tamen vi nenion vidis, junulo..., vi ne ankoraŭ penetris ĉi tien...

- Mi penetros tien.

- Mi dubas tion... la instrukcio estas nekontestebla.

- Mi penetros tien se vi vidigas al mi S^{ron} Robertoⁿ Darzakoⁿ...

Faru tion por mi... Vi scias ke ni estas malnovaj amikoj... Sinjoro Freĉjo... mi petegas vin... Rememoru la belan artikolon kiun mi faris al vi pri la "Orbrikoj". Vorteton al S^{ro} Roberto Darzak, bonvolu ?

La vizaĝo de Rultabio vere estis nuntempe amuza por vidi. Ĝi esprimis deziron tiel konvinkan por transiri ĉi tiun sojlon trans kiu okazis kelka eksterordinara mistero; ĝi tiel elokvente petegis ne nur per la buŝo kaj la okuloj, sed ankoraŭ per ĉiuj trajtoj, ke mi ne sukcesis deteni min eksplodi per rido. Frederiko Larsano, ne pli ol mi, tenis sian seriozecon.

Tamen, malantaŭ la krado, Frederiko Larsano trankvile remetis la ŝlosilon en sian poŝon. Mi observis lin.

Li estis viro kiu povis aĝi kvindek jarojn. Lia kapo estis bela, kun griziĝantaj haroj, kun senbrila vizaĝkoloro, kun kruda profilo ; la frunto estis elstara; la mentono kaj la vangoj estis zorge razitaj; la lipo, sen lipharo, estis delikate desegnita; la okuloj, iom malgrandaj kaj rondaj, rigide rigardis la homojn tute vidalvide per esplora rigardo kiu mirigis kaj maltrankviligis. Li havis mezan kaj belaspektan staturon; la ĝenerala aspekto estis eleganta kaj simpatia. Nenio de la ajna policano. Li estis estiminda artisto en sia speco, kaj li sciis tion, kaj oni sentis ke li mem alte taksis sin. La tono de lia konversacio estis skeptika kaj seniluziigita. Lia stranga profesio alproksimigis lin al tiom da krimoj kaj da hontindaĵoj ke estus neklarigebla ke ĝi tute ne iom "rigidigus siajn pensmanierojn", laŭ la stranga esprimo de Rultabio.

Larsano turnis la kapon al la bruo de iu aŭto kiu alvenis malantaŭ li. Ni rekonis la kabrioletan kiu, en la stacio de Epine, kunportis la

enketjuĝiston kaj lian registriston.

- Nu vidu ! eligis Frederiko Larsano, vi volis paroli kun S^{ro} Roberto Darzak; jen li !

La kabrioleteto jam estis ĉe la krado kaj Roberto Darzak petis Frederikoⁿ Larsanoⁿ malfermi al li la enirejon de la parko, dirante al li ke li estis tre urĝata kaj ke li havis nur tempon por alveni al Epine por kapti la sekvontan trajnon por Parizo, kiam li rekonis min. Dum Larsano malfermis la kradon, S^{ro} Darzak demandis al mi, tion kio povus konduki min al Glanejo en tia tragika momento.

Mi tiam rimarkis ke li estas timige pala kaj ke senfina doloro estis pentrita sur lia vizaĝo.

- Ĉu F^{ino} Stangerson pli bone fartas ? mi tuj demandis al li.

- Jes, li eligis. oni eble savos ŝin. Necesas ke oni savu ŝin.

Li ne aldonis "aŭ mi pro tio mortos", sed oni sentis tremi la fino de la frazo rande de liaj sangomankaj lipoj.

Rultabio tiam intermetis sin :

- Sinjoro, vi estas urĝata. Necesas tamen ke mi parolu kun vi. Mi havas ion el la plej alta graveco por diri al vi.

Frederiko Larsano interrompis :

- Ĉu mi povas lasi vin ? li demandis al Roberto Darzak. Ĉu vi havas ŝlosilon aŭ ĉu vi volas ke mi donu al vi ĉi tiun ?

- Jes, dankon, mi havas ŝlosilon. Mi fermos la kradon.

Larsano rapide malproksimiĝis direkte al la kastelo kies oni videtis, je kelkaj centoj da metroj, la imponan amason.

Roberto Darzak, kun brovo kuntirita, jam montris senpaciencon. Mi prezentis Rultabioⁿ kiel bonegan amikon; sed tuj kiam li sciiĝis ke ĉi tiu junulo estis ĵurnalisto, S^{ro} Darzak rigardis min kun riproĉega mieno, ekskuzis sin pro la neceso por li atingi Epine^{on} en dudek minutoj, salutis kaj vipis sian ĉevalon. Sed Rultabio jam ekkaptis la bridon, je mia profunda konsterniĝo, haltigis la malgrandan jungaĵon per vigla pugno, dume li elparolis tiun frazon, sen ia ajn signifo por mi : "La prepostejo nenion perdis pri sia ĉarmo, nek la ĝardeno pri sia brilo".

Ĉi tiuj vortoj estis apenaŭ elirintaj el la buŝo de Rultabio ke mi vidis Robertoⁿ Darzak^{on} ŝanceliĝi; tiel pala kiel li estis, li plie

paliĝis; liaj okuloj fikse rigardis la junulon kun teruro kaj li tuj elveturiĝis kun neesprimebla taŭzita sprito.

- Nu ! Nu ! li diris balbutante.

Kaj poste, subite, li rediris kun ia speco de furiozo :

- Nu ! Sinjoro ! Nu !

Kaj li reiris laŭ la vojo kiu kondukis al la kastelo, sen plie diri vorton, dume Rultabio sekvis, ankoraŭ tenante la ĉevalon. Mi direktis kelkajn parolojn al S^{ro} Darzak... sed li ne respondis al mi. Mi pridemandis per la okulo Rultebioⁿ kiu ne vidis min.

Ni alvenis al la kastelo. La malnova ĉefturo komunikiĝis kun la parto de la konstruaĵo tute restaŭrita sub Ludoviko la XIV^a per alia korpo de moderna konstruo, stilo **Viole-la-Duko**, kie troviĝis la ĉefa enirejo. Mi ne jam vidis ion tiel originalan, nek eble tiel malbelan, nek ĉefe tiel strangan en arkitekturo kiel ĉi tiun strangan kunaĵon de malsimilaj stiloj. Estis monstra kaj interesega. Alproksimiĝinte, ni vidis du ĝendarmojn kiuj paŝis kaj repaŝis antaŭ eta pordo rigardanta al la teretaĝo de la ĉefturo. Ni baldaŭ eksciis ke, en ĉi tiu teretaĝo kiu antaŭe estis malliberejo kaj kiu nun servis kiel formetejon, oni enŝlosis la gepordistojn, S^{ron} kaj S^{inon} Bernieroⁿ.

S^{ro} Roberto Darzak enirigis nin en la modernan parton de la kastelo tra vasta pordo kiun ŝirmis "markezo". Rultabio kiu forlasis la ĉevalon kaj la kabrioleton zorge de servisto, daŭre rigardis S^{ron} Darzak^{on}; mi sekvis lian rigardon, kaj ekrimarkis ke tiu ĉi estas nur direktita al la gantitaj manoj de la instruisto de la Sorbono. Kiam ni estis en malgranda saloneto provizita per eksmodaj mebloj, S^{ro} Darzak turnis sin al Rultabio, kaj sufiĉe abrupte demandis al li :

- Parolu ! Kion vi volas de mi ?

La reportero respondis kun la sama abrupteco :

- Premi al vi la manon !

Darzak retropaŝis :

- Kion tio signifas ?

Kompreneble, li komprenis tion kion mi tiam ekkomprenis : ke mia amiko suspektis lin pri la abomena atenco. La spuro de la sanga mano sur la muroj de la "Flava Ĉambro" aperis antaŭ li... Mi rigardis tiun viron kun tiel fierfa fizionomio, kun ordinare tiel rekta rigardo, kiu nuntempe malkvietiĝis tiel strange.

Li etendis sian dekstran manon kaj montrante min :

- Vi estas la amiko de S^{ro} Sinklero kiu faris al mi neesperitan komplezon en justa kaŭzo, sinjoro, kaj mi ne vidas kial mi rifuzus

al vi la manon...

Rultabio ne prenis ĉi tiun manon. Li diris, mensogante per senegala aŭdaco :

- Sinjoro, mi vivis dum kelkaj jaroj en Rusio de kie mi kunportis tiun kutimon de neniam premi la manon de kiu ajn ne sengantigas sin.

Mi kredis ke la instruisto de la Sorbono estis ellasonta la furiozon kiu komencis agiti lin, sed kontraŭe, per videbla fortega strebo, li trankviliĝis, sengantigis sin kaj prezentis siajn manojn. Ili malkovris nenian cikatron.

- Ĉu vi estas kontenta ?

- Ne ! rebatis Rultabio. Mia kara amiko, li eligis turnante sin al mi, mi devas peti vin lasi nin solaj dum momento.

Mi salutis kaj eksteriĝis, konsternita pro tio kion mi ĵus vidis kaj aŭdis, kaj ne komprenante ke S^{ro} Roberto Darzak tute ne jam forpelis eksteren mian impertinentan, mian insultan, mian stultan amikon... Ĉar ĉiminute, mi havis venĝemon kontraŭ Rultabio pri liaj suspektoj kiuj finvenigis tiun nekredeblan scenon de la gantoj...

Mi promenis dum ĉirkaŭ dudek minutoj antaŭ la kastelo, provante rilatigi inter ili la diferencajn eventojn de ĉi tiu mateno kaj ne sukcesante. Kio estis la ideo de Rultabio ? Ĉu eblis ke S^{ro} Roberto Darzak ŝajnis al li kiel murdinto ? Kiel pensi ke tiu viro, kiu devis edziĝi post kelkaj tagoj kun F^{ino} Stangerson, trudeniris en la "Flavan Ĉambron" por mortigi sian fianĉinon ?

Nu nenio venis por sciigi al mi kiel la murdinto sukcesis eliri el la "Flava Ĉambro"; kaj ĝis tiu ĉi mistero, kiu ŝajnis al mi ne komprenebla, estu al mi ne klarigita, mi ja opiniis ke estis la devo de ĉiuj ne suspekti iun ajn. Fine, kio signifis tiun sensencan frazon kiu ankoraŭ sonoris en miaj oreloj : "La prepostejo nenion perdis pri sia ĉarmo, nek la ĝardeno pri sia brilo !" Mi malpacience deziris reesti sola kun Rultabio por tion demandi al li.

En tiu momento, la junulo eliris el la kastelo kun S^{ro} Roberto Darzak. Strangege afero, mi unuavide ekrimakis ke ili estis la plej bonaj amikoj de la mondo.

- Ni iras al la "Flava Ĉambro", diris al mi Rultabio, venu kun ni.

Diru do, kara amiko, ĉu vi scias ke mi retenas vin la tutan tagon.
Ni kune tagmanĝos en la lando...

- Vi tagmanĝos kun mi, ĉi tie, sinjoroj...

- Ne, dankon, respondis la junulo. Ni tagmanĝos ĉe la gastejo de la "Ĉefturo"...

- Vi tie sentos vin tre malbonaj... Vi tie trovos nenion.

- Ĉu vi kredas ?... Mi esperas tie trovi ion, rebatis Rultabio.

Post la tagmanĝo, ni relaboros, mi faros mian artikolon, vi estos sufiĉe afabla por ĝin alporti al la redakciejo...

- Kaj vi ? Ĉu vi ne revenas kun mi ?

- Ne, mi tranoktos ĉi tie...

Mi turnis min al Rultabio. Li serioze parolis, kaj S^{ro} Roberto Darzak tute ne ŝajnis surprizata...

Ni tiam preterpasis antaŭ la ĉefturo kaj ni aŭdis ĝemadojn.
Rultabio demandis :

- Kial oni arestis tiujn homojn ?

- Tio estas iom pro mia kulpo, diris S^{ro} Darzak. Mi atentigis hieraŭ al la enketjuĝisto ke estas neklarigeble ke la gepordistoj havis la tempon aŭdi la revolverajn pafadojn, "vesti sin", trairi la sufiĉe grandan spacon kiu apartigas ilian pordistejon de la pavilono, tiun tuton en du minutoj; ĉar ne elfluis pli ol du minutojn inter la revolveraj pafoj kaj la momento kiam ili estis renkontitaj de la ulĉjo Jakobo.

- Evidente, estas dubinde, konsentis Rultabio... Kaj ili estis vestintaj... ?

- Jen tio kio estas nekredebla... ili estis vestintaj... "komplete", serioze kaj varme... Mankis neniuj partoj en ilia kostumo. La virino estis en lignoŝuoj, sed la viro havis "siajn ŝuojn laĉitajn". Nu ili deklaris esti enlitiĝintaj kiel ĉiuvespere je la naŭa. Alveninte ĉimatene, la enketjuĝisto, kiu provizis sin en Parizo per revolvero el la sama kalibro kiel tiu de la krimo (ĉar li ne volas tuŝi la revolveron - pruvobjekton), pafis du revolverajn pafojn de sia registristo en la "Flava Ĉambro", kun fenestro kaj pordo fermitaj. Ni estis kun li en la loĝejo de la gepordistoj; ni aŭdis nenion... oni ne povas aŭdi ion. La gepordistoj do mensogis, tio tute ne estas

duba... Ili estis pretaj; ili jam estis ekstere, ne for de la pavilono ; ili atendis ion. Certe ja, oni tute ne akuzas ilin esti la farintoj de la atenco, sed ilia kompileco ne estas neprobabla... S^{ro} De Marketo tuj arestis ilin.

- Se ili estus kunkulpuloj, diris Rultabio, ili estus alvenintaj senorde vestitaj, aŭ pli ĝuste ili tute ne estus alvenintaj. Kiam oni sin deĵetas en la brakojn de justico, kun sur si tiom da evidentaĵoj de kompileco, estas ĉar oni ne estas kulpa. Mi ne kredas al komplicoj en ĉi tiu afero.

- Do kial ili estis ekstere je noktomezo ? Ke ili klarigu tion !...

- Ili certe havas intereson silenti. Necesas scii kiun... Eĉ se ili ne estas komplicoj, tio povas esti signifoplena. Ĉio gravas pri tio kio okazas en tia nokto...


Ni ĵus transpasis malnovan ponton metitan super la ĉirkaŭfosaĵo kaj ni eniris en tiun parton de la parko nomata "La Kverkaro". Estis tie centjaraj kverkoj. La aŭtuno jam ŝrumpigis iliajn foliojn flaviĝintajn, kaj iliaj altaj, nigraj kaj serpentaj branĉoj ŝajnis malbelegaj hararoj, plektaĵoj de gigantaj reptilioj intervolvita kiel la antikva skulptisto tordis ilin sur la kapo de Meduzo. Tiu loko, kie F^{ino} Stangerson loĝis dum la somero ĉar ŝi trovis ĝin gajan, aperis al ni en tiu sezono malgaja kaj funebra. La grundo estis nigra, tute kota pro la freŝaj pluvoj kaj la ŝlimo de la mortaj folioj, la trunkoj de la arboj estis nigraj, la ĉielo mem super niaj kapoj funebriis, kuntrenis pezajn nubegojn. Kaj en ĉi tiu malluma kaj dezerta izolejo, ni ekvidis la blankajn murojn de la pavilono. Stranga konstruaĵo, sen iu videbla fenestro de la loko kie ĝi aperis al ni. Nur malgranda pordo indikis la enirejon. Ĝi ŝajnis kiel tombo, vasta maŭzoleo funde de forlasita arbarego... Laŭmezure kiam ni alproksimiĝis, ni konjektis sian dispozicion. Tiu konstruaĵo kaptis la tutan lumon kiun ĝi bezonis, sude, tio estas aliflanke de la proprietaĵo, ĉe la flanko de la kamparo. La pordeto refermita al la parko, S^{ro} kaj F^{ino} Stangerson devis trovi tie idealan malliberejon por tie vivi kun siaj laboroj kaj sia revado.

Mi cetere tuj donos la planon de ĉi tiu pavilono.

Estis nur iu teretaĝo kie oni aliris per kelkaj ŝtupoj, kaj sufiĉe

alta subtegmento kiu neniel okupos nin. Estas do la plano de la teretaĝo en ĝia tuta simpleco kiun mi prezentas al la leganto.

Ĝi estis desegnita de Rultabio mem, kaj mi konstatis ke ne mankis linion, taŭgan indikon por helpi la solvado de la problemo kiu tiam stariĝis antaŭ la justeco. Per la subskribaĵo kaj la plano, gla elegantaj scios pri tio tiom same, por atingi la veron, kiom Rultabio sciis kiam li unuafoje eniris en la pavilonon kaj kiam ĉiuj demandis sin : Tra kie la murdinto sukcesis forfuĝis el la "Flava Ĉambro" ?



1. Flava Ĉambro, kun sia ununura kradita fenestro kaj sia ununura pordo rigardanta al la laboratorio.
2. Laboratorio, kun siaj du grandaj kraditaj fenestroj kaj siaj pordoj; rigardanta unu al la vestiblo, la alia al la Flava Ĉambro.
3. Vestiblo, kun sia ne kradita fenestro kaj sia enira pordo rigardanta al la parko.
4. Akvoĉambro.
5. Ŝtuparo kondukanta al la subtegmento.
6. Vasta kaj ununura kameno de la pavilono uzita por laboratoriaj eksperimentoj.

Antaŭ ol grimpri la tri ŝtupojn de la pavilona enirejo, Rultabio haltigis nin kaj sen ajna preparo demandis al S^{ro} Darzak :

- Nu ! Kaj la motivo de la krimo ?

- Laŭ mi, sinjoro, estas neniu dubo pri tio, eligis la fianĉo de F^{ino} Stangerson kun granda malĝojo. La fingraj spuroj, la profundaj skrapvundoj sur la brusto kaj la kolo de F^{ino} Stangerson, atestas ke la malŝatindulo kiu estis tie, provis teruran atencon. La ekspertizisto-kuracistoj, kiuj hieraŭ ekzamenis ĉi tiujn spurojn, asertas ke ili estis faritaj de la sama mano kies la sanga bildo restis sur la muro; grandega mano, sinjoro, kaj kiu tute ne entenus en mia ganto, li aldonis kun amara kaj nedifinebla rideto...

- Ĉu ĉi tiu ruĝa mano, mi interrompis, ne do povus esti la spuro de la sangaj fingroj de F^{ino} Stangerson kiu, ĉe la momento falegi, renkontintus la muron kaj tie glitante lasintus plivastigitan bildon de sia sangoplena mano ?

- Ne estis guto de sango sur la manoj de F^{ino} Stangerson kiam oni restarigis ŝin, respondis S^{ro} Darzak.

- Nun oni do certas, mi eligis, ke fakte estas F^{ino} Stangerson kiu armis sin per la revolvero de la ulĉjo Jakobo ĉar ŝi vundis la manon de la murdinto. Ŝi do timis ion aŭ iun ?

- Estas probable...

- Ĉu vi suspektas neniun ?

- Ne..., respondis S^{ro} Darzak, rigardante Rultabioⁿ.

Rultabio tiam diris al mi :

- Necesas ke vi sciu, mia amiko, ke la enketo progresis iom pli ol bonvolis konfidi al ni tiu eta kaŝemulo de S^{ro} Marketo. Ne nur la enketo nun scias ke la revolvero estis la armilo kies uzis F^{ino} Stangerson por sin defendi, sed ĝi konas, sed ĝi tuj konis la armilon kiu servis por ataki, por frapi F^{inon} Stangerson^{on}. Estas, diris al mi S^{ro} Darzak, "ŝafosto"⁴. Kial S^{ro} de Marketo envolvas ĉi tiun ŝafoston⁴ per tiom da mistero ? Kun la intenco faciligi la esploron de la Sekurecaj oficistoj ? Sendube. Li eble imagas ke oni estas trovonta sian posedanton inter tiuj kiuj estas bone konataj, en la aĉa friponaro de Parizo, por uzi tiun kriman instrumenton, la plej teruran kiun la naturo elpensis... Kaj plie, ĉu oni iam scias tion kio povas okazi en cerbo de enketjuĝisto ? aldonis Rultabio kun malestima ironio.

⁴ Osto uzata en tiu epoko kiel armilo laŭ la maniero de pugnararmilo.

Mi pridemandis :

- Oni do trovis "ŝafoston" en la "Flava Ĉambro" ?

- Jes, sinjoro, eligis Roberto Darzak, ĉe la piedo de la lito; sed mi petegas vin, tute ne parolu pri tio. S^{ro} de Marketo petis al ni la sekreton. (Mi faris protestan geston). Estas grandega ŝafosto kies la kapo, aŭ por plibone diri, kies artiklo ankoraŭ estis tute ruĝa per la sango de la terura vundo kiun ĝi faris al F^{ino} Stangerson. Estas malnova ŝafosto kiu jam devis esti utila por kelkaj krimoj, laŭ la aspektoj. Tiel pensas S^{ro} de Marketo, kiu kunportigis ĝin al Parizo, al la urba laboratorio, por ke ĝi estu analizita. Li fakte kredas ke li observis sur ĉi tiu osto ne nur la freŝan sangon de la lasta viktimo, sed ankaŭ rufetajn spurojn kiuj ne estus aliaj krom makuloj da seka sango, signoj de antaŭaj krimoj.

- Ŝafosto, en la mano de "sperta murdinto", estas terura armilo, diras Rultabio, armilo "pli utila" kaj pli fidinda ol peza martelo.

- Cetere "la malŝatindulo" pruvis tion, eligis dolore S^{ro} Roberto Darzak. La ŝafosto terure frapis F^{inon} Stangerson^{on} ĉe la frunto. La artiklo de la ŝafosto perfekte adaptiĝas al la vundo. Laŭ mi, ĉi tiu vundo estus mortiga se la murdinto ne estus duonhaltigita, dum la bato kiun li donis, per la revolvero de F^{ino} Stangerson. Vundita al la mano, li maltenis sian ŝafoston kaj forkuris. Bedaŭrinde, la bato de la ŝafosto estis jam irinta kaj jam alvenanta... kaj F^{ino} Stangerson preskaŭ svenbatata, post esti preskaŭ strangolita. Se F^{ino} Stangerson sukcesintus vundi la viron per sia unua revolvera pafo, ŝi sendube evitintus la ŝafoston... Sed ŝi certe kaptis sian revolveron tro malfrue; poste la unua pafo, dum la lukto, deviis kaj la kuglo iris lokiĝi en la plafonon; estas nur la dua pafo kiu trafis...

Tiel parolinte, S^{ro} Darzak frapis sur la pordo de la pavilono. Ĉu mi konfesos al vi mian senpaciencon eniri en la lokon mem de la krimo ? Mi tremis pro tio, kaj malgraŭ la tute grandega intereso kiun enhavis la historio de la ŝafosto, mi bolis pro vidi ke nia konversacio daŭris kaj ke la pordo de la pavilono ne malfermiĝis.

Finfine ĝi malfermiĝis.

Viro kiun mi rekonis kiel estanta ulĉjo Jakobo, estis sur la sojlo. Li ŝajnis al mi aĝi pli ol la plenan sesdekon. Kun longa blanka barbo, blankaj haroj sur kiuj li metis vaskan bereton, eluzita kompleto el maronkolora kordurojo, lignoŝuoj; la grumblema mieno, sufiĉe severaspekta vizaĝo kiu tamen lumiĝis tuj kiam li ekvidis S^{ron} Robertoⁿ Darzak^{on}.

- Amikoj, simple eligis nia gvidanto. Ĉu estas neniu en la pavilono, ulĉjo Jakobo ?

- Mi devas lasi eniri neniun, sinjoro Roberto, sed kompreneble la instrukcio ne estas pri vi... Kaj kial ? Ili vidis ĉion kio estis por vidi, ĉi tiuj sinjoroj de justico. Ili faris pri tio sufiĉe da desegnoj kaj da protokoloj...

- Pardonu, sinjoro Jakobo, iun demandon antaŭ tute alia afero, diris Rultabio.

- Diru, junulo, kaj, se mi povos respondi al tio...

- Ĉu via mastrino havis tiun vesperon, la hararon en harbendo, vi bone scias, la harojn en harbendo sur la frunto ?

- Ne, mia sinjoreto. Mia mastrino neniam havis la harojn en harbendo kiel vi diras, nek tiun vesperon, nek la aliajn tagojn. Ŝi havis, kiel ĉiam, la harojn levitajn tiel ke oni povis vidi ŝian belan frunton, pura kiel tiu de la infano kiu ĵus naskiĝis !...

Rultabio grumblis, kaj tuj ekegzamenis la pordon. Li ekkonsciis pri la aŭtomata fermado. Li konstatis ke ĉi tiu pordo povis neniam resti malfermita kaj ke necesis ŝlosilo por malfermi ĝin. Poste ni eniris en la vestiblon, malgrandan sufiĉe helan ĉambron pavimitan per ruĝaj kaheloj.

- Ha ! jen la fenestro, diras Rultabio, tra kiu la murdinto elfuĝis...

- Ke ili diras ! sinjoro, ke ili diras ! Sed se li elfuĝus tra tie, ni bone vidintus lin, tutcerte ! Ni ne estas blindaj ! Nek S^{ro} Stangerson, nek mi, nek la gepordistoj kiujn ili metis en malliberejon ! Kial ili ne metis min ankaŭ en malliberejon, pro mia revolvero ?

Rultabio estis jam malferminta la fenestron kaj ekzameninta la ŝutrojn.

- Ĉu ili estis fermitaj je la krimhoru ?
- Per la fera klinko, interne, eligis ulĉjo Jakobo... kaj mi ja tre certas ke la murdinto trapasis tra...
- Ĉu estas sangaj makuloj ?...
- Jes, vidu, tien, sur la ŝtono, ekstere... Sed sango de kio ?...
- Ha ! eligis Rultabio, oni vidas la paŝojn... tien, survoje... la tero estis tre sorbigita... ni ekzamenos tion post momento...
- Stultaĵoj ! interrompis ulĉjo Jakobo... La murdinto ne pasis tra tie !...
- Nu, tra kie ?...
- Ĉu mi scias !...

Rultabio rigardis ĉion, flaris ĉion. Li genuiĝis kaj pririgardis rapide la makulitajn kahelojn de la vestiblo. La ulĉjo Jakobo daŭrigis :

- Ha ! Vi nenion trovos, mia sinjoreto. Ili nenion trovis... Kaj plie, nun ĝi estas tro malpura... Eniris tro da homoj ! Ili ne volas ke mi lavas la kahelaron... sed, je la tago de la krimo, mi estis tralavinta ĉion, mi ja, ulĉjo Jakobo... kaj, se la murdinto estus trapasinta tra tio kun siaj "piedaĉoj", oni bone estus vidinta tion; li sufiĉe lasis la spuron de siaj ŝuaĉoj en la ĉambro de fraŭlino !...

Rultabio restariĝis kaj demandis :

- Kiam vi lastfoje lavis ĉi tiujn slabojn ?

Kaj li rigide rigardis ulĉjon Jakobo" per okulo el kiu nenio eskapas.

- Sed en la tago mem de la krimo, mi diras tion al vi ! Ĉirkaŭ la kvina kaj duono... dum fraŭlino kaj ŝia patro iris promenadeti antaŭ ol vespermanĝi ĉi tie mem, ĉar ili vespermanĝis en la laboratorio. La morgaŭon, kiam la juĝisto venis, li povis vidi ĉiujn paŝajn spurojn sur la planko, kiel kiu dirus, inkon sur blanka papero... Nu, nek en la laboratorio, nek en la vestiblo, kiuj estis puraj kiel nova monero⁵, oni ne trovis liajn paŝojn... de la viro !... Ĉar oni trovis ilin apud la fenestro, eksteren, necesus do ke li tratruu la plafonon de la "Flava Ĉambro", ke li trairu la mansardon, ke li tratruu la tegmenton, kaj ke li estu ĝuste remalsuprenirinta al fenestro de la

5 Franca esprimo signifanta "perfekte purega".

vestiblo, lasante sin fali... Nu, sed ne estas truo en la plafono de la "Flava Ĉambro"... nek en mia mansardo, kompreneble! Tiam vi bone komprenas ke oni scias nenion... sed tute nenion!... kaj ke oni ja neniam scios ion ajn!... Estas mistero de la diablo!

Rultabio subite sin ekgenuis, preskaŭ antaŭ la pordo de eta akvoĉambro kiu malfermiĝis funde de la vestiblo. Li restis en ĉi tiu pozicio dum almenaŭ minuto.

- Nu? mi demandis al li kiam li releviĝis.

- Ho! nenio tre grava; iu sanga guto.

La junulo returnis sin al la ulĉjo Jakobo.

- Kiam vi komencis lavadi la laboratorion kaj la vestiblon, ĉu la vestibla fenestro estis malfermita?

- Mi ĵus malfermis ĝin ĉar mi ekbruligis lignokarbon por sinjoro sur la fornelo de la laboratorio; kaj ĉar mi ekbruligis ĝin per gazetoj, estis fumo; mi malfermis la fenestrojn de la laboratorio kaj de la vestiblo por okazigi trablovon; poste mi refermis tiujn de la laboratorio kaj lasis malfermita tiun de la vestiblo, kaj poste mi eliris dum momento por iri serĉi lavotukon en la kastelon kaj estas revenante, kiel mi diris al vi, ĉirkaŭ la kvina kaj duono ke mi komencis lavi la slabojn; post esti puriginta, mi reiris, ankoraŭ lasante la fenestron de la vestiblo malfermita. Fine, lastfoje, kiam mi reeniris en la pavilonon, la fenestro estis fermita kaj sinjoro kaj fraŭlino jam laboris en la laboratorio.

- S^{ro} aŭ F^{ino} Stangerson enirante sendube fermis la fenestron?

- Sendube.

- Ĉu vi ne demandis al ili?

- Ne!...

Post zorgema ekrigardo al la eta akvoĉambro kaj al la ŝtuparŝakto kiu kondukis al la subtegmento, Rultabio, por kiu ni ŝajnis ne plu ekzisti, eniris en la laboratorion. Estas, mi konfesas, kun forta emocio ke mi tien sekvis lin. Roberto Darzak ne perdis geston de mia amiko... Pri mi, miaj okuloj tuj iris al la pordo de la "Flava Ĉambro". Ĝi estis refermita aŭ pli ĝuste pelita al la laboratorio, ĉar mi tuj konstatis ke ĝi estis duonrompita kaj ekster uzo... la baraktoj de tiuj kiuj impetegis kontraŭ ĝi, dum la

drammomento, derompis ĝin...

Mia juna amiko kiu metode kondukis sian laboron, konsideris sen diri vorton, la ĉambron en kiu ni troviĝis. Ĝi estis vasta kaj bone lumigita. Du grandaj fenestroj, preskaŭ fenestropordoj, provizitaj de stangoj, kaptis la taglumon ĉe la grandega kamparo. Iu breĉo en la arbarego; iu mirinda vido sur la tuta valo, de la ebenaĵo ĝis la granda urbo kiu devis aperi dum la sunaj tagoj, tie for, ĉe la finfino. Sed hodiaŭ, estas nur koto sur la tero, fulgo en la ĉielo... kaj sango en ĉi tiu ĉambro...

Iu tuta flanko de la laboratorio estis okupita de vasta kameno, de fanduoj, de fornoj propraj al ĉiuj eksperimentoj de kemio. Retortoj, fizikaj instrumentoj iom ĉie; tabloj superŝarĝitaj de fioloj, de paperoj, de dosieroj, de iu elektra maŝino... pilo... aparato, diris al mi S^{ro} Roberto Darzak, uzita de la profesoro Stangerson por "pruvi la disocion de la materio sub la ago de sunlumo", ktp.

Kaj tute laŭlonge de la muroj, ŝrankoj, plenaj ŝrankoj aŭ vitraj ŝrankoj lasantaj videti mikroskopojn, specialajn fotilojn, nekredeblan kvanton da kristaloj...

Rultabio havis la nazon enŝovitan en la kameno. Per la pinto de la fingro, li priserĉis en la fanduoj... Subite li ekrektiĝis, tenante malgrandan paperpecon duone forbrulita... Li venis al ni kiuj babilis apud iu fenestro, kaj li diris :

- Konservu tion al ni, sinjoro Darzak.

Mi klinis min al la paperpecon brunbrulitan kiun S^{ro} Darzak ĵus prenis el la manoj de Rultabio. Kaj mi distingiĝe legis tiujn ĉi solajn vortojn kiuj restis legeblaj :

*prepostejo nenio perdita ĉarmo,
nek la ĝar de sia brilo.*

Kaj sube : *23^a de oktobro.*

Dufoje ekde tiu mateno, tiuj ĉi samaj sensencaj vortoj venis bati min, kaj duafoje mi vidis ke ili vekis en la instruisto de la Sorbono la saman fulman efikon. La unua zorgo de S^{ro} Darzak estis rigardi direkte al ulĉjo Jakobo. Sed tiu ĉi ne vidis nin, okupata ke li estis ĉe la alia fenestro... tiam, la fianĉo de F^{ino}

Stangerson tremante malfermis sian monpaperujon, enlokis la paperon en ĝi, kaj suspiris : "Dio mia !"

Dum tiu tempo, Rultabio grimpis en la kameno; tio estas ke staranta sur la brikoj de fornelo, li atente ekzamenis tiun kamentubon kiu iris reduktiĝante, kaj kiu, je kvindek centimetroj super lia kapo, tute fermiĝis per feraj platoj enmasonigitaj en la briko, lasante trapasi tri tubojn, ĉiun de kelkdekkvin centimetroj en la diametro.

- Neeblas trapasi tra tie, vortigis la junulo saltante en la laboratorion. Cetere, se "li" eĉ provis ĝin, tiu tuta feraĵo estus sur la planko. Ne ! Ne ! Ne estas tiuflanke ke necesas serĉi...

Rultabio poste ekzamenis la meblojn kaj malfermis pordojn de ŝrankoj. Poste estis la vico de la fenestroj kiujn li deklaris netranspaseblaj kaj "netranspasitaj". Ĉe la dua fenestro, li trovis la ulĉjon Jakoboⁿ en kontemplado.

- Nu, ulĉjo Jakobo, kion vi rigardas tra tie ?

- Mi rigardas la viron de la polico kiu tute ne ĉesas ĉirkaŭpaŝi ĉirkaŭ la lageto... Ankoraŭ ia ruzulo kiu ne vidos pli ol la aliaj !

- Vi ne konas Frederikoⁿ Larsanoⁿ, ulĉjo Jakobo ! diris Rultabio, skuante melankolie la kapon, sen tio, vi ne tiel parolus... Se estas unu ĉi tie kiu trovos la murdinton, estos li, necesas kredi !

Kaj Rultabio eligis suspiron.

- Antaŭ ol oni trovos lin, necesus scii kiel oni perdis lin !... rebatis ulĉjon Jakobo, obstina.

Fine ni alvenis al la pordo de la "Flava Ĉambro".

- Jen la pordo malantaŭ kiu io okazis ! diris Rultabio kun soleneco kiu, en ĉiu alia cirkonstanco, estus komika.

07 - En Kiu Rultabio entreprenas ekspedicion sub la lito.

Rultabio post esti forpelinta la pordon de la "Flava Ĉambro" haltis sur la sojlo, dirante kun emocio kiun mi devis kompreni nur pli poste : "Ho ! La parfumo de la Sinjorino en Nigro !" La ĉambro estis malhela; la ulĉjo Jakobo volis malfermi la ŝutrojn, sed Rultabio haltigis lin :

- Ĉu, li diras, la dramo okazis en plena mallumo ?

- Ne, junulo, mi tute ne pensas. F^{ino} tre ŝatis havi noktolumeton sur sia tablo, kaj estas mi kiu lumigis ĝin por ŝi ĉiun vesperon antaŭ ol ŝi enlitiĝu... Mi preskaŭ estis ŝia servistino, jen ! Kiam alvenis la vespero ! La vera servistino venis preskaŭ nur dum la mateno. F^{ino} laboras tiom malfrue... nokte !

- Kie estis tiu tablo kiu subportis la noktolampeton ? Ĉu for de la lito ?

- For de la lito.

- Ĉu vi nun povas eklumigi la noktolampeton ?

- La noktolampeto estas rompita, kaj la oleo disverŝis el ĝi kiam la tablo falis. Cetere, ĉio restis en la sama stato. Mi devas nur malfermi la ŝutrojn kaj vi baldaŭ vidos...

- Atendu !

Rultabio reirante en la laboratorion, iris fermis la ŝutrojn de la du fenestroj kaj la pordon de la vestiblo. Kiam ni estis en la nigra mallumo, li ekbruligis vaksalumeton, donis ĝin al ulĉjo Jakobo, diris al tiu ĉi sin direkti kun sia alumeto al la mezo de la "Flava Ĉambro", ĉe la lokon kie brulis, tiunokte, la noktolampeto. Ulĉjo Jakobo kiu estis en feltoŝuoj (li kutime lasis siajn lignoŝuojn en la vestiblo), eniris en la "Flavan Ĉambron" kun sia peco de alumeto, kaj ni malklare distingis, malbone lumigita de la mortanta flameto, objektojn renversitajn sur la kahelaro, liton en la angulo, kaj antaŭ ni maldekstre, la rebrilon de spegulo pendigita sur la muro apud la lito. Estis rapide.

Rultabio diras : "Sufiĉas ! Vi povas malfermi la ŝutrojn.

- Antaŭ ĉio, ne antaŭeniru, petegis ulĉjo Jakobo; vi kapablas

postlasi signojn per viaj ŝuoj... kaj necesas nenion malordigi... Estas ideo de la juĝisto, ideo tiel sen kialo, kvankam lia afero jam estas finita...

Kaj li elpelis la ŝutrojn. La ekstera livida taglumo eniris, lumigante malĝojan malordon, inter safranaj muroj. La planko - ĉar se la vestiblo kaj la laboratorio estis kahelitaj, la "Flava Ĉambro" estis plankita - estis kovrita de unupecca flava mato kiu okupis preskaŭ la tutan ĉambron, iranta sub la lito kaj sub la lavtablon, sola meblo kiu, kun la lito, daŭre estis sur la piedoj. La meza ronda tablo, la noktotablo kaj du seĝoj estis renversitaj. Ili tute ne malebligis nin vidi sur la mato, larĝan makulon de sango kiu devenis, diris al ni ulĉjo Jakobo, de la frunta vundo de F^{ino} Stangerson. Krome, gutetoj de sango estis disĵetitaj iom ĉie kaj sekvis kvazaŭ la tre videblan spuron de paŝoj, larĝajn nigrajn paŝadojn de la murdinto. Ĉio sugestis ke tiuj ĉi sangogutoj venis el la vundo de la viro kiu, dum momento, markis la muron per sia ruĝa mano. Estis aliaj spuroj de tiu mano sur la muro, sed multe malpli distingeblaj. Estas fakte la postsigno de forta sanga mano de viro.

Mi ne sukcesis deteni min ekkrii :

- Vidu ! Vidu tiun sangon sur la muro... La viro kiu tiom firme surmetis sian manon ĉi tie, estis tiam en la mallumo kaj certe kredis trafi pordon. Li kredis puŝi ĝin ! Tial li forte premis, lasante sur la flava papero terure akuzan desegnon, ĉar mi tute ne scias ĉu estas en la mondo multe da tiaj manoj. Ĝi estas granda kaj forta, kaj la fingroj estas preskaŭ tiel longaj la unuj kiel la aliaj ! Koncerne la dikfingron, ĝi mankas ! Ni havas nur la spuron de la manplato. Kaj se ni sekvas la "spuron" de tiu mano, mi daŭrigis, ni vidas ĝin kiu, post esti apoginta sin sur la muro, palpas ĝin, serĉas la pordon, trovas ĝin, serĉas la seruron...

- Sendube, interrompis Rultabio rikanante, sed ne estas sango sur la seruro, nek sur la riglilo !...

- Kion tio pravas ? mi rebatis kun saĝo kies mi fieris, "li" malfermis seruron kaj riglilon per la maldekstra mano, tio kio estas tute natura ĉar la dekstra mano estas vundita...

- Li tute ne malfermis ion ! denove ekkriis la ulĉjo Jakobo. Ni ne frenezas, eble ! Kaj ni estis kvar kiam ni dissaltigis la pordon !

Mi reparolis :

- Kia stranga mano ! Rigardu ĉi tiun strangan manon !

- Estas tre natura mano, rebatis Rultabio, kies la desegno estis misformita de la glitado sur la muro. La viro frotis sian vunditan manon sur la muro ! Ĉi tiu viro verŝajne estas unu metro okdek alta.

- Per kio vi vidas tion ?

- Per la alteco de la mano sur la muro...

Mia amiko poste okupiĝis pri la spuro de la kuglo en la muro. Ĉi tiu spuro estis ronda truo.

- La kuglo, diris Rultabio, alvenis fronte : sekve nek de supre, nek de sube.

Kaj li ankoraŭ observigis al ni ke ĝi estis kelkaj centimetroj pli malsupre sur la muro ol la stampaĵo lasita de la mano.

Rultabio, reirante al la pordo, havis nun la nazon sur la seruro kaj la riglilo. Li rimarkis "ke oni fakte dissaltigis la pordon, de ekstere, seruro kaj riglilo ankoraŭ restantaj sur ĉi tiu frakasita pordo, unu fermita, la alia enŝovita, kaj sur la muro, la du serurbuŝoj estantaj preskaŭ derompitaj, pendantaj, ankoraŭ retenita de iu ŝtraŭbo".

La juna redaktoro de *La Epoko* atente ekzamenis ilin, reprenis la pordon, rigardis ĝin ambaŭflanke, certiĝis ke estis nenia ebleco de fermo aŭ malfermo de la riglilo "de ekstere", kaj certiĝis ke oni retrovis la ŝlosilon en la seruro, "internne". Li ankoraŭ certiĝis ke post kiam la ŝlosilo estas en la seruro de interne, oni ne kapablis malfermi tiun ĉi seruron de ekstere per alia ŝlosilo. Fine, konstatinta ke estis ĉe ĉi tiu pordo "nenia aŭtomata fermilo, resume, ke ĝi estis la plej natura el ĉiuj pordoj, provizita de tre solidaj seruro kaj riglilo kiuj restis fermitaj, li lasis fali ĉi tiujn vortojn : "Estas pli bone !" Poste, sidiĝante sur la planko, li rapide demetis siajn ŝuojn.

Kaj sur liaj ŝtrumpetoj, li antaŭeniris en la ĉambro. La unua afero kiun li faris, estis sin klini super la renversitaj mebloj kaj

ekzameni ilin per ekstrema zorgo. Ni silente rigardis lin. Ulĉjo Jakobo diris al li, pli kaj pli ironie :

- Ho ! mia infano ! Ho ! mia infano ! Vi rompas al vi la kapon !...

Sed Rultabio rektigis al si la kapon :

- Vi diris la puran veron, ulĉjo Jakobo, via mastrino ne havis tiuvespere ŝian hararon en harbendo; estas mi kiu estis malnova stulto por kredi tion !...

Kaj, fleksebla kiel serpento, li ŝovis sin sub la liton.

Kaj ulĉjo Jakobo reparolis :

- Kaj diri, sinjoro, kaj diri ke la murdinto estis kaŝinta tie sube ! Li estis tie kiam mi eniris je la deka por fermi la ŝutrojn kaj lumigi la noktolampeton, ĉar nek S^{ro} Stangerson, nek F^{ino} Matilda, nek mi forlasis la laboratorion ĝis la momento de la krimo.

Oni aŭdis la voĉon de Rultabio sub la lito :

- Je kiu horo, sinjoro Jakobo, S^{ro} kaj F^{ino} Stangerson alvenis en la laboratorion por ne plu forlasi ĝin ?

- Je la sesa !

La voĉo de Rultabio daŭrigis :

- Jes, li venis ĉi sube... estas certe... Cetere estas nur tie ke li povis sin kaŝi... Kiam vi eniris, ĉiuj kvar, ĉu vi rigardis sub la lito ?

- Tujtuj... Ni eĉ tute puŝpelis la liton antaŭ ol remeti ĝin en sia loko.

- Kaj inter la matracojn ?

- Ĉi tiu lito havis nur unu matracon sur kiu oni metis F^{inon} Matildaⁿ. Kaj la pordisto kaj S^{ro} Stangerson tuj transportis ĉi tiun matracon en la laboratorion. Sub la matraco, estis nur la metala somiero kiu kapablus kaŝi nek ion, nek iun. Finfine, sinjoro, pensu ke ni estis kvar kaj ke nenio kapablis eskapi al ni, la ĉambro estanta tiom malgranda, senprovizita de mebloj, kaj ĉio estanta fermata malantaŭ ni, en la pavilono.

Mi riskis hipotezon :

- Li eble eliris kun la matraco ! en la matraco, eble... Ĉio eblas antaŭ tia mistero ! En sia konfuzo, S^{ro} Stangerson kaj la pordisto ne rimarkis ke ili transportis duoblan pezon... kaj plie se la pordisto estas komplica !... Mi donas al vi ĉi tiun hipotezon laŭ tio

kio ĝi valoras, sed jen tio kio klarigus multajn. aferojn... kaj ĉefe, la fakton ke la laboratorio kaj la vestiblo restis netuŝitaj de spuroj de paŝadoj kiuj troviĝas en la ĉambro. Kiam oni transportis fraŭlinon de la laboratorio al la kastelo, la matraco, haltigita dum momento apud la fenestro, povintus permesi al la viro forkuri...

- Kaj poste kion pli ? Kaj poste kion pli ? Kaj poste kion pli ?
Ĵetis al mi Rultabio, senhezite ridante sub la lito...

Mi estis iom ofendita :

- Vere oni ne plu scias... Ĉio ŝajnas ebla...

Ulĉjo Jakobo faris :

- Estas ideo kiun havis la enketjuĝisto, sinjoro, kaj li serioze ekzamenigis la matrakon. Li estis devigita ridi pri sia ideo, sinjoro, kiel via amiko ridas nun, ĉar evidente ĝi ne estis matraco kun duobla fundo !... Kaj plie, kio ! se estus homo en la matraco, ni estus vidintaj lin !...

Mi devis mem ridi, kaj efektive mi ricevis pruvon ekde tiam ke mi diris ion absurda. Sed kie komencis, kie finis la absurdo en tia afero ?

Sole mia amiko kapablis diri ĝin, kaj eĉ !...

- Diru do ! ekkriis la reportero, ankoraŭ sub la lito, ĝi estis tre skuita, tiu ĉi tapiŝeto ?

- De ni, sinjoro, klarigis ulĉjo Jakobo. Kiam ni ne trovis la murdinton, ni demandis al ni ĉu ne estis truo en la planko...

- Tio ne estas, respondis Rultabio. Ĉu vi havas kelon ?

- Ne, ne ekzistas kelo... Sed tio ne haltigis niajn esploradojn kaj ne malhelpis S^{ron} enketjuĝiston, kaj ĉefe sian registriston, esplori la plankon tabulon post tabulo kvazaŭ estis kelo malsupre...

La reportero tiam reaperis.

Liaj okuloj brilis, liaj naztruoj tremetis; oni dirintus junan beston revenantan de feliĉa embusko. Li restis kvarpiede. Vere, mi povis pli bone kompari lin en mia menso ol kun belega rabobesto sur la spuraro de kelka neatendita ĉasaĵo... Kaj li flaris la spurojn de la viro, de la viro kiun li ĵuris revenigi al sia mastro, S^{ro} direktoro de *La Epoko*, ĉar necesas ne forgesi ke nia Jozefo Rultabio estis ĵurnalisto !

Tiel kvarpiede, li iris al la kvar anguloj de la ĉambro, snufante ĉion, ekzamenante ĉion, ĉion kion ni vidis - tio estis malmulte da aĵoj - kaj ĉion kion ni ne vidis kaj kiu estis, ŝajnas, vastega.

La lavtablo estis simpla tabulo sur kvar piedoj; neeble transformi ĝin al portempa kaŝejo... Neniu ŝranko... F^{ino} Stangerson havis sian vestoŝrankon en la kastelo.

La nazo, la manoj de Rultabio supreniris laŭlonge de la muroj, kiuj ĉie estis el dikaj brikoj. Kiam li finiĝis kun la muroj kaj pasigis siajn lertajn fingrojn sur la tuta surfaco de la flava papero, tiel atingante la plafonon al kiu li povis tuŝi grimpante sur seĝon kiun li metis sur la lavtablon kaj glitigante ĉirkaŭ la ĉambro ĉi tiun inĝenian skabelon; kiam li finis kun la plafono kie li zorgeme esploris la trafpunkton de la alia kuglo, li alproksimiĝis al la fenestro kaj aldonis ankoraŭ al vico la stangojn kaj la ŝutrojn, ĉiujn ja solidajn kaj bonstatajn. Fine li ellasis uf "pro kontentiĝo" kaj deklaris ke "nun, li estis trankvila !"

- Nu, ĉu vi kredas ke ŝi estas enŝlosita, la kompatinda kara fraŭlino, kiam oni murdis ŝin ! Kiam ŝi alvokis nin al sia savado !... ĝemis ulĉjo Jakobo.

- Jes, eligis la juna reportero, viŝante al si la frunton. La Flava Ĉambro certe estis fermita kiel kiraskesto...

- Fakte, mi observis, jen ja kial tiu mistero estas la plej nekredebla kiun mi konas, eĉ en la kampo de la imago. En la Duobla Murdo de la strato Kadavrejo, [Edgaro Poe](#) inventis nenion similan. La loko de la krimo estis sufiĉe fermita por ne lasi eskapi homon, sed estis ankoraŭ tiu fenestro tra kiu povis elŝoviĝi la farinto de la murdoj, kiu estis simio !... Sed ĉi tie la afero tute ne povus solviĝi per iu aperturo de ajna speco. La pordo fermita kaj la ŝutroj fermitaj kiel ili estis, kaj la fenestro fermita kiel ĝi estis, muŝo povis nek eniri nek eliri !

- Vere ! Vere ! konsentis Rultabio, kiu ankoraŭ viŝis al si la frunton, ŝajnante ŝviti malpli pro sia ĵusa korpa penado ol pro la ekscitiĝo de siaj pensoj. Vere ! Ĝi estas tre granda kaj tre bela kaj tre stranga mistero !

- La "Dibesteto", grumblis ulĉjo Jakobo, la "Dibesteto" mem, se

ĝi farintus la krimon, ne kapablintus eskapi... Aŭskultu !... Ĉu vi aŭdas ĝin... Silentu !...

Ulĉjo Jakobo signis al ni silentiĝi kaj kun la brako etendita al la muro de la proksima arbarego, aŭskultis ion kiun ni tute ne aŭdis.

- Ĝi foriris, li fine diris. Necesos ke mi mortigu ĝin... Ĝi estas tro sinistra, tiu besto... sed ĝi estas la "Dibesteto"; ĝi iras preĝi ĉiunokte sur la tombo de sankta Ĝenoveva, kaj neniuj aŭdacaj tuŝoj ĝin pro timo ke ulnjo Genuo ĵetas malbonan sorĉon...

- Kiel dika ĝi estas, la "Dibesteto" ?

- Preskaŭ kiel dika melhundo... ĝi estas monstro ke mi diras al vi. Ha ! Mi pli ol unufoje demandis al mi ĉu ne estis ĝi kiu kaptis ĉe la gorĝo, per siaj ungegojn, nian kompatindan fraŭlinon... Sed "la Dibesteto" ne surhavas ŝuaĉojn, ne pafas revolverajn pafojn, ne havas tian manon !... ekkriis ulĉjo Jakobo denove montrante la ruĝan manon sur la muro. Kaj plie oni vidintus ĝin tiel same kiel homon, kaj ĝi estus enŝlosita en la ĉambro kaj en la pavilono, tiel same kiel homo !...

- Kompreneble, mi eligis. De for, antaŭ esti vidinta la "Flavan Ĉambron", ankaŭ mi ja demandis al mi ĉu la kato de patrino Genuo...

- Ankaŭ vi ! ekkriis Rultabio.

- Kaj vi ? mi demandis.

- Mi ne, ne iun minuton... ekde kiam mi legis la artikolon de *La Mateno*, mi scias ke ne temas pri besto ! Nun mi ĵuras ke okazis tie terura tragedio... Sed vi ne parolas pri la trovita bereto, nek pri la naktuko, ulĉjo Jakobo ?

- La juĝisto prenis ilin, kompreneble, diris hezite la alia.

La reportero tre serioze diris al li :

- Mi ja vidis nek la naktukon nek la bereton, sed tamen mi povas diri al vi kiel ili estas faritaj.

- Ha ! Vi estas tre vigla..., kaj ulĉjo Jakobo embarasita tuis.

- La naktuko estas granda blua naktuko kun ruĝaj strioj, kaj la bereto estas malnova vaska bereto kiel tiu, aldonis Rultabio, montrante la kapveston de la viro.

- Tio tamen estas vera... vi estas sorĉisto...

Kaj ulĉjo Jakobo provis ridi, sed ne sukcesis.

- Kiel vi scias ke la naztuko estas blua kun ruĝaj strioj ?
- Ĉar se ĝi ne estus blua kun ruĝaj strioj, oni tute ne trovus la naztukon !

Sen pli zorgi pri ulĉjo Jakobo, mia amiko elpreni el sia poŝo pecon da blanka papero, malfermis paron da tondiloj, klinis sin super la piedspuroj, surmetis sian paperon sur unu el la spuroj, kaj komencis ĉirkaŭtondi. Li tiel havis la plandumon el papero de tre klara konturo, kaj donis ĝin al mi petegante min ne perdi ĝin.

Li poste turnis sin al la fenestro kaj, montrante al ulĉjo Jakobo, Frederikoⁿ Larsanoⁿ, kiu ne forlasis la randojn de la laĝeto, li zorgis scii ĉu la policano tute ne venis, li ankaŭ, "por labori en la Flava Domo".

- Ne ! respondis S^{ro} Roberto Darzak kiu, de kiam Rultabio transdonis al li la peceton da brunbrulita papero, ne elparolis vorton. Li asertas ke li tute ne bezonas vidi la "Flavan Ĉambron", ke la murdinto eliris el la "Flava Ĉambro" laŭ tre natura maniero, kaj ke li klarigos tion ĉivespere !

Aŭdanta S^{on} Robertoⁿ Darzak^{on} tiel paroli, Rultabio - nekutimaĵo - paliĝis.

- Ĉu Frederiko Larsano posedus la veron kiun mi nur antaŭsentas ! li murmuris. Frederiko Larsano estas tre forta... fortega... kaj mi admiras lin... Sed hodiaŭ, necesas pli bone fari ol faro de policano... pli bone ol tio kion la sperto instruas !... necesas esti logika, sed logika, bone komprenu min, tiel kiel la bona Dio estis logika kiam li diris : $2 + 2 = 4$...! NECESAS KAPTI LA RACION PER LA BONA FLANKO !

Kaj la reportero kuregis eksteren, freneza pro tiu ideo ke la granda, la fama Freĉjo povis alporti antaŭ li la solvon de la problemo de la "Flava Ĉambro !"

Mi sukcesis reatingi lin ĉe la sojlo de la pavilono.

- Nu ! mi diris al li, kvietiĝu... ĉu vi do ne estas kontenta ?
- Jes, li konfesis kun granda suspiro. Mi estas tre kontenta.
Mi malkovris multajn aferojn...

- El morala ordo aŭ materiala ordo ?

- Kelkaj el la morala ordo kaj unu el la materiala ordo. Jen, tiu

ĉi, ekzemple.

Kaj rapide, li elprenis el la poŝo de sia veŝto, paperfolion kiun li devis enpoŝigi dum sia ekspedicio sub la lito, kaj en la faldo de kiu li metis blondan haron de virino.

Kvin minutojn pli poste, Jozefo Rultabio sin klinis super la spuroj de paŝadojn trovitajn en la parko, sub la fenestro mem de la vestiblo, kiam viro, kiu devis esti iu servisto de la kastelo, venis al ni per grandaj paŝolongoj kaj kriis al S^{ro} Roberto Darzak kiu malsupreniris de la pavilono :

- Vi scias, sinjoro Roberto, ke la enketjuĝisto estas pridemandanta fraŭlinon.

S^{ro} Roberto Darzak tuj ĵetis al ni malprecizan ekskuzon kaj komencis kuri direkte al la kastelo; la viro kuris malantaŭ li.

- Se la kadavro parolas, mi eligis, tio baldaŭ fariĝos interesa.

- Necesas scii, diris mia amiko. Ni iru al la kastelo.

Kaj li kuntiris min. Sed en la kastelo, ĝendarmo lokinta en la vestiblo malpermesis al ni la aliron al la ŝtuparo de la unua etaĝo. Ni devis atendi.

Dum tiu tempo, jen tio kio okazis en la ĉambro de la viktimo. La familia kuracisto, juĝanta ke F^{ino} Stangerson fartis multe pli bone, sed timanta fatalan remalsaniĝon kiu ne plu ebligis pridemandi ŝin, kredis sian devon informi la enketjuĝiston... kaj tiu ĉi decidis tuj ekplenumi nelongan pridemandadon. En ĉi tiu pridemandado ĉeestis S^{ro} de Marketo, la registristo, S^{ro} Stangerson, la kuracisto. Mi pli poste havigis al mi, dum la proceso, la tekston de ĉi tiu pridemandado. Jen ĝi, en ĝia tuta jura sekeco :

Demando : Sen tro lacigi vin, ĉu vi kapablas, fraŭlino, doni al ni kelkajn necesajn detalojn pri la terura atenco kies vi estis la viktimo ?

Respondo : Mi sentas min multe pli bone, sinjoro, kaj mi tuj diros al vi tion kion mi scias. Kiam mi eniris en mia ĉambro, mi rimarkis nenion eksterkutima.

Demando : Pardonu, fraŭlino, se vi permesas tion al mi, mi tuj metos demandojn al vi kaj vi respondos al ili. Tio lacigos vin malpli ol longa raporto.

Respondo : Faru, sinjoro.

Demando : Kio estis tiun tagon, la horplano de via tago ?

Mi dezirus ĝin tiel preciza, tiel detalema kiel eble plej bone. Mi ŝatus, fraŭlino, sekvi ĉiujn viajn agojn en tiu tago, se tio tute ne estas tro peti al vi.

Respondo : Mi malfrue ellitiĝis, je la deka, ĉar mia patro kaj mi revenis malfrue en la nokto, ĉeestintaj en la vespermanĝo kaj la kunveno prezentitaj de la prezidento de la Respubliko, honore al la delegitoj de la scienca akademio de Filadelfio. Kiam mi eliris el mia ĉambro, je la deka kaj duono, mia patro jam laboris en la laboratorio. Ni kune laboris ĝis tagmezo; ni promenis dum duonhoro en la parko; ni tagmanĝis en la kastelo. Duonhoro da promeno, ĝis unu horo kaj duono, kiel ĉiutage. Poste, mia patro kaj mi reiras al la laboratorio. Tie ni trovas mian servistinon kiu ĵus aranĝis mian ĉambron. Mi eniras en la "Flavan Ĉambron" por doni kelkajn malgravajn ordonojn al ĉi tiu servistino kiu tuj forlasas la pavilonon kaj mi denove relaboras kun mia patro. Je la kvina, ni forlasas la pavilonon por nova promeno kaj la teo.

Demando : Ĉe la momento eliri, je la kvina, ĉu vi eniris en vian ĉambron ?

Respondo : Ne, sinjoro, estas mia patro kiu eniris en mian ĉambron por tie serĉi, laŭ mia peto, mian ĉapelon.

Demando : Kaj li vidis nenion suspektindan ?

S^{ro} Stangerson : Evidente ne, sinjoro.

Demando : Cetere, estas preskaŭ certe ke la murdinto ne estis jam tiumomente sub la lito. Kiam vi foriris, ĉu la pordo de la ĉambro ne estis ŝlosita ?

Respondo : Ne. Ni ne havis kialon por tio...

Demando : Kiom da tempo vi foriris tiumomente el la pavilono, S^{ro} Stangerson kaj vi ?

Respondo : Ĉirkaŭ unu horo.

Demando : Estas sendube dum tiu horo ke la murdinto

enŝoviĝis en la pavilonon. Sed kiel ? Ni ne scias tion. Oni fakte trovas, en la parko, spurojn de paŝadoj kiuj foriras de la fenestro de la vestiblo, oni tute ne trovas iun kiu venas al ĝi. Ĉu vi rimarkis ke la fenestro de la vestiblo estis malfermita kiam vi eliris kun via patro ?

Respondo : Mi ne memoras tion.

S^{ro} Stangerson : Ĝi estis fermita.

Demando : Kaj kiam vi reeniris ?

Respondo : Mi ne atentis.

S^{ro} Stangerson : Ĝi estis ankoraŭ fermita... Mi tre bone memoras ĉar, enirante, mi laŭte diris : "Vere, dum nia foresto, ulĉjo Jakobo povintus malfermi !..."

Demando : Strange ! Strange ! Rememoru, sinjoro Stangerson, ke ulĉjo Jakobo, dum via foresto kaj antaŭ ol eliri, malfermis ĝin. Vi do eniris je la sesa en la laboratorio kaj relaboris ?

Respondo : Jes, sinjoro.

Demando : Kaj vi ne plu forlasis la laboratorion de tiu horo ĝis la momento kiam vi reeniris en vian ĉambron ?

S^{ro} Stangerson : Nek mia filino, nek mi, sinjoro. Ni havis tiom urĝan laboron ke ni ne perdis minuton. Estis tiagrade ke ni neglektis ĉian alian aferon.

Demando : Ĉu vi vespermanĝis en la laboratorio ?

Respondo : Jes, pro la sama kialo.

Demando : Ĉu vi kutimas vespermanĝi en la laboratorio ?

Respondo : Ni malofte vespermanĝas tie.

Demando : Ĉu la murdinto ne povis scii ke vi vespermanĝus tiuvespere, en la laboratorio ?

S^{ro} Stangerson : Dio mia, sinjoro, mi ne pensas... Estas dum la tempo kiam ni revenis al la pavilono, ĉirkaŭ la sesa, ke mi metis tiun decidon vespermanĝi en la laboratorio, mia filino kaj mi. En ĉi tiu momento, mi estis alpaŝita de mia gardisto kiu dummomente tenis min por peti al mi akompani lin en urĝa rondvizitado ĉe la rando de la arbaroj kies mi decidis la dishakadon. Mi

tute ne povis tion kaj prokrastis ĝis la morgaŭo tiun taskon, kaj tiam petegis la gardiston, ĉar li pasis tra la kastelon, informi la ĉefserviston ke ni vespermanĝos en la laboratorio. La gardisto forlasis min, irante fari mian komision, kaj mi rekuniĝis al mia filino al kiu mi transdonis la ŝlosilon de la pavilono kaj kiu lasis ĝin ekstere sur la pordo. Mia filino jam laboris.

Demando : Je kioma horo, fraŭlino, vi eniris en vian ĉambron dum via patro daŭrigis labori ?

Respondo : Je noktomezo.

Demando : Ulĉjo Jakobo eniris dum tiu vespero en la "Flavan Ĉambron" ?

Respondo : Por fermi la ŝutrojn kaj lumigi la noktolampeton, kiel ĉiun vesperon...

Demando : Ĉu li rimarkis nenion suspektindan ?

Respondo : Li dirus tion al ni. Ulĉjo Jakobo estas bravulo kiu tre amas min.

Demando : Vi asertas, sinjoro Stangerson, ke poste ulĉjo Jakobo ne forlasis la laboratorion ? Ke li restis kun vi dum la tuta tempo ?

S^{ro} Stangerson : Mi certas pri tio. Mi tiuflanke havas neniun suspekton.

Demando : Fraŭlino, kiam vi eniris en vian ĉambron, vi tuj fermis vian pordon per seruro kaj per riglilo. Jen multaj singardoj, sciante ke via patro kaj via servisto ĉeestas. Ĉu do vi timis ion ?

Respondo : Mia patro ne malfruigis reiri al la kastelo, kaj ulĉjo Jakobo enlitiĝi. Kaj plie, fakte, mi timis ion.

Demando : Vi tiom timis ion ke vi prunte prenis la revolveron de ulĉjo Jakobo sen diri tion al li ?

Respondo : Estas vere, mi volis timigi neniun, des pli ke miaj timoj povis esti entute infanaj.

Demando : Kaj kion do vi timis ?

Respondo : Mi ne kapablas precize diri tion al vi; ekde pluraj noktoj, ŝajnis al mi aŭdi en la parko kaj ekster la

parko, ĉirkaŭ la pavilono, eksterkutimaj bruojn, kelkfoje paŝojn, krakojn de branĉoj. La nokton kiu antaŭis la atencon, nokton kiam mi ne enlitiĝis antaŭ ol la tria matene, tuj post nia reveno de **Elizeo**, mi restis dum momento ĉe mia fenestro kaj mi vere kredis vidi ombrojn...

Demando : Kiom da ombroj ?

Respondo : Du ombroj kiuj rondiris ĉirkaŭ la lageto...

poste la luno sin kaŝis kaj mi ne plu vidis ion. En ĉi tiu periodo de la sezono, ĉiujare, mi jam revenis al mia apartamento en la kastelo kie mi reakiras miajn vintrajn kutimojn; sed ĉiujare mi diris al mi ke mi forlasos la pavilonon nur kiam mia patro finos, por la akademio de sciencoj, la kompendion de siaj laboroj pri "Disocio de la Materio". Mi ne volis ke ĉi tiu grava faro kiu estis finiĝanta post kelkaj tagoj, estu ĝenata de ia ajn ŝanĝo en niaj tutaj kutimoj. Vi komprenas ke mi tute ne volis paroli al mia patro pri miaj infanaj timoj, kaj ke mi prisilentis ilin al ulĉjo Jakobo kiu ne sukcesus kateni sian langon. Ĉiaokaze, ĉar mi sciis ke ulĉjo Jakobo havis revolveron en la tirkesto de sia noktotablo, mi profitis de momento kiam la bonulo forestiĝis dum la tago por rapide supreniri en lian mansardon kaj forpreni lian armilon kiun mi enŝovis en la tirkeston ja de mia noktotablo.

Demando : Ĉu vi ne konas malamikojn al vi ?

Respondo : Neniu.

Demando : Vi komprenos, fraŭlino, ke ĉi tiuj esceptaj singardemoj estas taŭgaj por mirigi.

S^{ro} Stangerson : Evidente, mia infano, jen tre mirindaj singardoj.

Respondo : Ne, mi diris al vi ke ekde du noktoj, mi ne estis trankvila, sed tute ne trankvila.

S^{ro} Stangerson : Vi devintus paroli al mi pri tio. Vi estas nepardonebla. Ni evitintus tiun malfeliĉon !

Demando : La pordon de la "Flava Ĉambro" fermitan,
fraŭlino, ĉu vi enlitiĝas ?

Respondo : Jes, kaj, tre laca, mi tuj dormas.

Demando : Ĉu la noktolampeto restis lumigita ?

Respondo : Jes, sed ĝi dissendas tre mildan lumon...

Demando : Tiam, fraŭlino, diru tion kio okazis ?

Respondo : Mi ne scias ĉu estis longtempe ke mi dormis,
sed subite mi ekvekiĝas... Mi eligis laŭtan krion...

S^{ro} Stangerson : Jes, teruran krion... Murdanto !... Mi
ankoraŭ havas ĝin en la oreloj...

Demando : Ĉu vi laŭte kriis ?

Respondo : Iu viro estis en mia ĉambro. Li sin ĵetegis al
mi, metis sian manon al mia gorĝo, provis strangoli min.
Mi jam sufokis; subite, mia mano, en la duone
malfermita tirkesto de mia noktotablo, sukcesis kapti
la revolveron kiun mi enŝovis tie kaj kiu estis preta
pafi. Tiumomente, la viro ruligis min malsupren de mia
lito kaj svingis super mia kapo specon de klabo. Sed mi
pafis. Tuj poste, mi sentis min frapita de forta bato,
terura bato al la kapo. Ĉio ĉi, sinjoro juĝisto, estis pli
rapide ol mi povus diri, kaj mi scias nenion pli.

Demando : Nenion !... Ĉu vi ne havas ideon pri la maniero
laŭ kiu la murdinto eskapis el via ĉambro ?

Respondo : Neniun ideon... Mi scias nenion pli. Oni ne
scias tion kio okazas ĉirkaŭ si, kiam oni estas morta !

Demando : Ĉu ĉi tiu viro estis granda aŭ malgranda ?

Respondo : Mi vidis nur ombron kiu ŝajnis al mi giganta...

Demando : Ĉu vi povas doni al ni nenan indikaĵon ?

Respondo : Sinjoro, mi scias nenion pli; iu viro impetegis al
mi, mi pafis al li... Mi scias nenion pli...

Ĉi tie finiĝas la pridemandado de F^{ino} Stangerson. Jozefo
Rultabio pacience atendis S^{ron} Robertoⁿ Darzak^{on}. Tiu ĉi ne
malfruis aperis.

En ĉambro proksima al la ĉambro de F^{ino} Stangerson, li aŭskultis
la pridemandadon kaj venis raporti tion al nia amiko kun granda

precizeco, granda memoro, kaj obeemo kiu ankoraŭ surprizis min. Danke al la hastaj notoj kiujn li prenis per krajono, li povis reprodukti preskaŭ laŭtekste la demandojn kaj la respondojn.

Vere, S^{ro} Darzak ŝajnas esti la sekretario de mia juna amiko, kaj agis tute kiel iu kiu havas nenion por rifuzi al li; pli bone eĉ, iu kiu "estus laborinta por li".

La fakto de la "fermita fenestro" tre frapis la reporteron kiel ĝi frapis la enketjuĝiston. Krome, Rultabio demandis al S^{ro} Darzak denove ripeti al li la horplanon de S^{ro} kaj F^{ino} Stangerson dum la tago de la dramo, tiel kiel F^{ino} Stangerson kaj S^{ro} Stangerson estigis ĝin antaŭ la juĝisto.

La cirkonstanco de la vespermanĝo en la laboratorio ŝajnis interesi lin ĉe la plej alta grado, kaj li redirigis dufoje al li, por esti pli certa, ke nur la gardisto sciis ke la instruisto kaj lia filino vespermanĝis en la laboratorio, kaj per kiu maniero la gardisto sciis tion.

Kiam S^{ro} Darzak silentis, mi diris :

- Jen pridemando kiu ne multe progresigas la problemon.
- Ĝi regresigas ĝin, konsentis S^{ro} Darzak.
- Ĝi lumigas ĝin, eligis Rultabio penseme.

Ni ĉiuj tri revenis direkte al la pavilono. Je centkelke da metroj de la konstruaĵo, la reportero haltigis nin kaj, montrante al ni malgrandan boskon ĉe nia dekstro, li diris al ni :

- Jen de kie la murdonto foriris por eniri en la pavilonon.

Ĉar estis tiaj aliaj boskoj inter la grandaj kverkoj, mi demandis kial la murdonto elektis ĉi tiun prefere ol la aliajn; Rultabio respondis al mi, signante al mi la padon kiu preterpasis tute proksime de ĉi tiu bosko kaj kondukis al la pordo de la pavilono.

- Tiu pado estas kovrita de gruzo, kiel vi vidas, li diris. Necesas ke la viro pasis tien por iri al la pavilono ĉar oni ne trovas spuron de siaj paŝadoj de la irvojaĝo sur la mola tero. Tiu viro tute ne havasflugilojn. Li paŝadis; sed li paŝis sur la gruzo kiu ruliĝis sub sia ŝuo sen konservi la spuron : ĉi tiu gruzo fakte estis ruligita de multaj aliaj piedoj ĉar la pado estas la plej rekta kiu iras de la pavilono al la kastelo. Koncerne al la bosko, konsistigita de tiuj ĉi specoj de plantoj kiuj ne mortiĝas dum la malbona sezono - laŭroj kaj evonimoj - ĝi provizis la murdonton per sufiĉa ŝirmejo ĝis kiam la momento venos al tiu ĉi direkti sin al la pavilono. Estas kaŝinta en tiu bosko ke la viro vidis eliri S^{ro} kaj F^{ino} Stangerson, poste ulĉjo Jakobo. Oni disŝutis gruzon ĝis la fenestro - preskaŭ - de la vestiblo. Iu spuro de paŝoj de la viro, paralela al la muro, spuro kiun ni rimarkis antaŭ momento, kaj kiun mi jam vidis, pravas ke li bezonis nur unu paŝolongon por sin trovi antaŭ la fenestro de la vestiblo, lasita malfermita de ulĉjo Jakobo. La viro tiam sin tiris per brakforto kaj eniris en la vestiblon.

- Fakte, tio vere eblas ! mi eligis...

- Fakte, kio ? Fakte, kio ? ekkriis Rultabio subite kaptita de kolero kiun mi senmalice liberigis... Kial vi diras : fakte, tio vere eblas !...

Mi petegis lin tute ne koleri, sed li jam estis tiel tro multe por aŭskulti min, kaj li deklaris ke li admiris la singardan dubon per kiu ia homoj (mi) alpaŝis de malproksime al la plej simplaj problemoj,

neniam sin riskante diri : "tio estas" aŭ "tio ne estas", tiel ke ilia inteligenteco precize finvenus al sama rezulto kiu estintus atingita se la naturo estis forgesinta provizi ilian cerbujon per iom da griza substanco. Ĉar mi ŝajnis ŝokata, mia juna amiko kaptis min ĉe la brako kaj konsentis ke "li ne diris tion por mi, konsidere ke li havis altan estimon por mi".

"Sed fine ! li daŭrigis, kelkfoje estas krimo de ne laŭdeve rezoni kiam oni tion kapablas ! Se mi tute ne rezonas, kiel mi tion faras pri tiu gruzo, necesos al mi rezoni pri balono ! Mia kara, la scienco de la direktebla balono estas tute ne ankoraŭ sufiĉe ellaborita por ke mi povu enirigi, en la ludo de miaj cerbumadoj, la murdonton kiu falas de la ĉielo ! Tute ne diru do ke io eblas kiam neeblas ke ĝi estu alie. Ni nun scias kiel la viro eniris tra la fenestro, kaj ni ankaŭ scias dum kiu momento li eniris. Li eniris dum promenado de la kvina. La fakto de la ĉeesto de la ĉambristino kiu ĵus faris la Flavan Ĉambron, en la laboratorio ĉe la momento de la reveno de la profesoro kaj de lia filino je la unua kaj duono, permesas al ni aserti ke je la unua kaj duono, la murdo ne estis en la ĉambro, sub la lito, krom se estas kompileco de la ĉambristino. Kion vi diras pri tio, sinjoro Roberto Darzak ?

S^{ro} Darzak skuis la kapon, deklaris ke li estis certa pri la fideleco de la ĉambristino de F^{ino} Stangerson, kaj ke ŝi estis tre honesta kaj tre sindonema servistino.

Kaj plie, je la kvina, S^{ro} Stangerson eniris en la ĉambron por serĉi la ĉapelon de sia filino ! li aldonis...

- Estas ankoraŭ tio ! diris Rultabio.

- La viro eniris do, en la momento kiun vi diras, tra tiu fenestro, mi eligis, mi konsentas tion, sed kial li refermis la fenestron, tio kiu nepre devis altiri la atenton de tiuj kiuj malfermis ĝin ?

- Eblas ke la fenestro tute ne estis "tuj" refermita, respondis al mi la juna reportero. Sed se li refermis la fenestron, li fermis ĝin pro la kurbaĵo kiun faras la pado provizita de gruzo, je dudek kvin metroj de la pavilono, kaj kaŭze de la tri kverkoj kiuj stariĝas ĉe tiu loko.

- Kion vi volas diri ? demandis Roberto Darzak kiu sekvis nin, kaj kiu aŭskultis Rultebioⁿ kun preskaŭ avida atento.

- Mi pli poste klarigos tion al vi, sinjoro, kiam mi juĝos la momenton konvena; sed mi ne kredas esti eldiranta pli gravajn parolojn pri tiu afero, se mia hipotezo praviĝas.

- Kaj kio estas via hipotezo ?

- Vi neniam scios ĝin, se ĝi tute ne montriĝas kiel la vero. Estas hipotezo multe tro grava, sciu tion, por ke mi fordonu ĝin tiel longe kiel ĝi estas nur hipotezo.

- Ĉu vi havas, almenaŭ, kelkan ideon pri la murdinto ?

- Ne, sinjoro, mi ne scias kiu estas la murdinto, sed nenion timu, sinjoro Roberto Darzak, mi scios tion.

Mi devis konstati ke S^{ro} Roberto Darzak estis tre kortuŝita; kaj mi suspektis ke la aserto de Rultabio tute ne estis por plaĉi al li. Do kial, se li vere timis ke oni malkovru la murdinton (mi ĉi tie pridemandis mian propran pensadon), kial li helpis la reporteron por trovi lin ? Mia juna amiko ŝajnis esti ricevanta la saman impreson kiel mi, kaj li abrupte diris :

- Ĉu tio ne malplaĉas al vi, sinjoro Roberto Darzak, ke mi malkovras la murdinton ?

- Ha ! Mi ŝatus mortigi lin per mia mano ! ekkriis la fianĉo de F^{ino} Stangerson kun impulso kiu mirigis min.

- Mi kredas vin ! diris serioze Rultabio, sed vi ne respondis al mia demando.

Ni preterpasis apud la bosko kies la juna reportero ĵus parolis al ni; mi eniris en ĝi kaj montris al li la evidentajn spurojn de la trairado de viro kiu kaŝis sin tie. Rultabio, unufoje pli, pravis.

- Sed jes ! li eligis, sed jes !... Ni traktas individuon kun karno kaj ostoj, kiu ne disponas aliajn rimedojn ol niajn, kaj necesos ke ĉio sin aranĝu !

Dirante tion, li petis al mi la paperan plandumon kiun li konfidis al mi kaj surmetis ĝin sur tre klaran spuron, malantaŭ la bosko. Poste li restariĝis dirante : "Evidente !"

Mi kredis ke li nun tuj spure ĉassekvus "la paŝojn de la forkuro de la murdinto", de la fenestro de la vestiblo, sed li kuntiris nin

sufiĉe for, al maldekstro, deklarante al ni ke estis neutila ŝovi sian nazon en tiu koto, kaj ke li nun certis pri la tuta fuĝovojo de la murdinto.

- Li iris al la fino de la muro, je kvindek metroj de tie, kaj poste li saltis la heĝon kaj la fosaĵon; vidu, ĝuste antaŭe ĉi tiun etan padon kiu kondukas al la lageto. Estas la plej rapida vojo por eliri el la bieno kaj iri al la lageto.

- Kiel vi scias ke li iris al la lageto ?

- Ĉar Frederiko Larsano ne forlasis la randojn ekde ĉi tiu mateno. Devas esti tie tre kuriozaj postsignoj.

Kelkajn minutojn pli poste, ni estis apud la lageto.

Ĝi estis malgranda tavolo da marĉa akvo, ĉirkaŭita de kanoj, kaj sur kiu ankoraŭ floris kelkajn mizerajn mortajn foliojn de nimfeo. Eble la granda Freĉjo vidis nin veni, sed verŝajnas ke ni malmulte interesis lin, ĉar li apenaŭ atentis pri ni kaj daŭrigis movigi, per la pinto de sia irbastono, ion kiun ni ne vidis...

- Vidu, diris Rultabio, jen denove la paŝoj de la forkuro de la viro; ili turniras la lageton ĉi tie, revenas kaj fine malaperas, apud la lageto, ĝuste antaŭ tiu pado kiu kondukas al la grava vojo de Epine. La viro daŭrigis sian fuĝon al Parizo...

- Kio kredigas tion al vi, mi interrompis, ĉar ne pli estas la paŝadoj de la viro sur la pado ?...

- Tio kio kredigas tion al mi ? Sed ĉi tiuj paŝoj, tiuj paŝoj kiujn mi atendis ! li ekkriis, montrante la tre klaran spuron de "eleganta ŝuo"... Vidu !...

Kaj li alparolis al Frederiko Larsano.

- Sinjoro Freĉjo, li kriis... ĉi tiuj elegantaj paŝoj sur la vojo fakte estas tie ekde la malkovro de la krimo ?

- Jes junulo; jes, ili estis zorgeme mezuritaj, respondis Freĉjo sen levi la kapon. Vi vidas, estas paŝoj kiuj venas kaj paŝoj kiuj reiras...

- Kaj tiu viro havis biciklon ! ekkriis la reportero...

Nun, post esti rigardinta la spurojn de la biciklo kiu sekvis, dum iro kaj reiro, la elegantajn paŝojn, mi kredis povi interveni.

- La biciklo klarigas la malaperon de la krudaj paŝoj de la

murdinto, mi eligis. La murdinto, kun krudaj paŝoj, ekrajdis sur biciklo... Lia komplico, "la viro kun elegantaj paŝoj", venis atendi lin rande de la lageto, kun la biciklo. Ĉu oni povas supozi, ke la murdinto agis en la nomo de la viro kun elegantaj paŝoj ?

- Ne ! Ne ! respondis Rultabio kun stranga rideto... Mi atendis tiujn paŝadojn ekde la komenco de la afero. Mi havas ilin, mi ne forlasas ilin al vi. Jen la paŝadoj de la murdinto !

- Kaj la aliaj paŝoj, la krudaj paŝoj, kion vi faras kun ili ?

- Estas ankoraŭ la paŝadoj de la murdinto.

- Do ili estas du ?

- Ne ! Estas nur unu, kaj li ne havis komplicon...

- Tre lerta ! Lertega ! kriis Frederiko Larsano de sia loko.

- Vidu, daŭrigis la juna reportero, montrante al ni la teron surpaŝitan de krudaj kalkanumoj; la viro sidiĝis tie kaj demetis la ŝuaĉojn kiujn li surmetis por trompi justicon, kaj poste, sendube kunportante ilin kun li, li restariĝis sur siaj piedoj al li kaj, trankvile, reatingis paŝe la ĉefan vojon, tenante sian biciklon per la mano. Li ne povis riski sin bicikle rapidi sur tiu tre malbona pado. Cetere, tio kio pravas tion, estas la malpeza kaj hezita spuro de la biciklo sur la pado, malgraŭ la moleco de la grundo. Se estus viro sur ĉi tiu biciklo, la radoj estus profunde enpremitaj en la grundo... Ne, ne, estis tie nur unu viro : La murdinto, piede !

- Brave ! Brave ! denove eligis la granda Freĉjo...

Kaj subite, tiu ĉi ekvenis al ni, plantis sin antaŭ S^{ro} Roberto Darzak kaj diris al li :

- Se ni havus biciklon ĉi tie... ni povus pruvi la ĝustecon de la rezonado de ĉi tiu junulo, sinjoro Roberto Darzak... Ĉu vi ne scias ĉu iu troviĝas en la kastelo ?

- Ne ! respondis S^{ro} Darzak, ne estas; mi forprenis la mian antaŭ kvar tagoj al Parizo, la lastan fojon kiam mi venis al la kastelo antaŭ la krimo.

- Domaĝe ! rebatis Freĉjo per tono el ekstrema malvarmeco.

Kaj, turnante sin al Rultabio :

- Se tio daŭras, li diris, vi vidos ke ni ambaŭ finatingos la samajn konkludojn. Ĉu vi havas ideon pri la maniero kies la

murdinto eliris el la "Flava Ĉambro" ?

- Jes, eligis mia amiko, iun ideon...

- Ankaŭ mi, daŭrigis Freĉjo, kaj ĝi devas esti la sama. Ne estas du manieroj rezoni en ĉi tiu afero. Mi atendas por klarigi min antaŭ la juĝisto, la alvenon de mia estro.

- Ha ! La estro de la ŝtata sekureco baldaŭ venos ?

- Jes, tiun ĉi posttagmezon, por la konfronto en la laboratorio, antaŭ la enketjuĝisto, de ĉiuj kiuj ludis aŭ povis ludi rolon en la dramo. Estos tre interesa. Estas bedaŭrinda ke vi ne povu ĉeesti.

- Mi ĉeestos, asertis Rultabio.

- Vere... vi estas eksterordinara... rilate al via aĝo ! rebatis la policano ne sen ia ironia tono... "Vi fariĝus mirinda policano... se vi havus iom pli da metodo... Se vi malpli obeus al via impulso kaj al la mensaj talentoj. Estas io kion mi jam observis plurajn fojojn, sinjoro Rultabio : vi tro rezonadas... Vi ne sufiĉe lasas vin gvidi per via observado... Kion vi diras pri la naztuko plena de sango kaj pri la ruĝa mano sur la muro ? Vi ja vidis la ruĝan manon sur la muro; mi ja vidis nur la naztukon... Diru...

- Pa ! eligis Rultabio, iom konsternita, la murdinto estis vundita ĉe la mano de la revolvero de F^{ino} Stangerson !

- Ha ! Kruda instinkta observado... Gardu vin, vi estas tro "rekte" logika, sinjoro Rultabio; la logiko ludos al vi trompaĵon se tiel brutale vi traktas ĝin. Ekzistas multaj cirkonstancoj en kiuj necesas kviete trakti ĝin, "prudente trakti ĝin"... Sinjoro Rultabio, vi pravas kiam vi mencias la revolveron de F^{ino} Stangerson. Estas certa ke "la viktimo" pafis. Sed vi malpravas kiam vi diras ke ŝi vundis la murdanton ĉe la mano...

- Mi certas ! ekkris Rultabio...

Freĉjo, nekonsternebla, interrompis lin :

- Difekto de observado !... Difekto de observado !... La ekzameno de la naztuko, la multegaj rondaj skarlataj makuletoj, la premsignoj de gutoj kiujn mi trovas sur la spuroj de paŝoj, en la momento mem kiam la piedo kuŝas sur la tero, pravas al mi ke la murdinto ne estis vundita. La murdisto, sinjoro Rultabio, sangis de la nazo !...

La granda Freĉjo estis serioza. Tamen mi ne sukcesis bremsi ekkriion.

La reportero rigardis Freĉjo kiu serioze rigardis la reporteron. Kaj Freĉjo tuj tiris konkludon :

- La viro kiu sangis de la nazo en sia mano kaj sia naztuko, viŝis sian manon sur la muro. La afero estas tre grava, li aldonis, ĉar la murdinto ne bezonas esti vundita ĉe la mano por esti la murdinto !

Rultabio ŝajnis profunde pripensi, kaj diris :

- Estas io, sinjoro Frederiko Larsano, kiu estas multe pli grava ol la fakto mistrakti la logikon, estas ja tiu spirita dispozicio propra al kelkaj policianoj kiu igas ilin, tute sincerece, "dolĉe submeti tiun logikon al la bezonoj de iliaj konceptoj". Vi jam havas vian ideon pri la murdinto, sinjoro Freĉjo, ne neu tion... kaj ne necesas ke via murdinto estu vundita ĉe la mano, sen kio via ideo falus per si mem... Kaj vi serĉis , kaj vi trovis ion alian. Estas tre danĝera sistemo, sinjoro Freĉjo, tre danĝera, tiu kiu limiĝas komenci per la ideo kiun oni faras al si pri la murdinto por finatingi la pruvojn kies oni bezonas ! Tio kapablus vin konduki for... Gardu vin kontraŭ la juĝeraro, sinjoro Freĉjo; ĝi minacas vin !...

Kaj, iomete rikanante, manojn en la poŝoj, iomete spite, Rultabio, per siaj malgrandaj petolaj okuloj fikse rigardis la grandan Freĉjoⁿ.

Frederiko Larsano silente konsideris ĉi tiun knabon kiu asertis esti pli kapabla ol li; li ŝultrumis, salutis nin kaj forkuris per grandaj paŝolongoj, frapante la ŝtonon de la vojon per sia granda irbastono.

Rultabio rigardis lin malproksimiĝi; poste la juna reportero sin turnis al ni, kun la vizaĝo gajema kaj jam triumfanta :

- Mi venkos lin ! li ĵetis al ni... Mi venkos la grandan Freĉjoⁿ, tiom forta kiom li estas; mi venkos ilin ĉiujn... Rultabio estas pli forta ol ili ĉiuj !... Kaj la granda Freĉjo, la sprita , la fama, la sensacia Freĉjo... la unika Freĉjo rezonas kiel trivita pantoflo⁶ !... kiel trivita pantoflo !... kiel trivita pantoflo !

Kaj li komencis dancosalton; sed li subite haltis dum sia

⁶ Franca esprimo signifanta "kiel mallertulo".

dancarto. Miaj okuloj iris tien kien liaj okuloj iris; ili estis kroĉintaj sur S^{ro} Roberto Darzak kiu, kun konsternita vizaĝo, rigardis sur la pado, la spuron de siaj paŝoj, apud la spuro de "la eleganta paŝo". NE ESTIS MALSIMILECO !

Ni kredis ke li tuj svenetus; liaj okuloj, pligrandigitaj de teruro, momente fuĝis nin dum lia dekstra mano taŭzis per spasma movado la laŭmakzelan barbon kiu ĉirkaŭis lian honestan kaj dolĉan kaj senesperan vizaĝon. Fine li sin remastris, salutis nin, diris al ni per ŝanĝita voĉo ke li nepre bezonis reiri al la kastelo kaj foriris.

- Diable ! eligis Rultabio.

La reportero, ankaŭ li, ŝajnis konsternita. Li eltiris el sia monpaperujo pecon de blanka papero, kiel mi antaŭe vidis lin fari, kaj ĉirkaŭtondis per siaj tondiloj laŭ la konturojn de la "elegantaj paŝoj" de la murdinto kies modelo estis tie en la tero. Kaj poste li transmetis ĉi tiun novan plandumon el papero sur la spurojn de la boteto de S^{ro} Darzak. La adaptado estis perfekta kaj Rultabio restariĝis ripetante : "Diable" !

Mi ne kuraĝis eldiri vorton, tiom mi imagis ke tio kio okazis en tiu momento en la cerbo de Rultabio estis serioza.

Li diris :

- Mi tamen kredas ke S^{ro} Roberto Darzak estas honesta viro...

Kaj li kuntiris min al la gastejo de la "ĉefturo", kiun ni videtis je unu kilometro for, sur la vojo, apud malgranda aro da arboj.

10 - "Nun necesos manĝi ⁷sangan bifestekon".

La gastejo de la "ĉefturo" ne estis belaspekta; sed mi ŝatas tiujn domaĉojn kun la traboj nigriĝintaj de la tempo kaj de la fumo de la fajrejo, tiujn gastejojn de la epoko de la diliĝencoj, falemajn konstruaĵojn kiuj baldaŭ estos nur memoraĵo. Ili algluiĝas al la pasinteco, ili sin ligas al la historio, ili daŭrigas ion kaj ili pensigas pri la malnovaj fabeloj de la vojo, kiam estis aventuroj sur la vojo.

Mi tuj vidis ke la gastejo de la "ĉefturo" certe havis siajn du jarcentojn kaj eĉ eble pli. Rokaĵoj kaj gipsoruboj disiĝis tie kaj ĉi tie de la fortika ligna truso kies la X kaj la V ankoraŭ vigle subtenis la kadukan tegmenton. Tiu ĉi iomete glitis sur siaj subteniloj, kiel glitas la kaskedo sur la frunto de ebrulo. Supre la enireja pordo, fera ŝildo ĝemis sub la aŭtuno vento. Artisto de la loko pentris specon de turo superelstarita de pinta tegmento kaj de lanterno kiel oni vidis ĝin ĉe la ĉefturo de Kastelo de la Glanejo. Sub tiu ŝildo, sur la sojlo, iu viro kun sufiĉe malafabla mieno ŝajnis enprofundiĝinta en sufiĉe malgajajn pensojn, se necesis kredi la faltojn de lia frunto kaj la malbonan kuntiriĝon de liaj densaj brovoj.

Kiam ni estis tute proksime de li, li deĝnis vidi nin kaj malmulte simpatie demandis al ni ĉu ni bezonas ion. Estis sendube la malmute afabla mastro de ĉi tiu ĉarma loĝejo. Ĉar ni manifestis la esperon ke li bonvolu servi al ni tagmanĝon, li konfesis ke li havas nenian provianton kaj ke li estu tre embarasita por kontentigi nin; kaj dirante tion, li rigardis nin per okulo kies mi ne sukcesis klarigi al mi la malkonfidon.

- Vi povas fari akcepton al ni, diris Rultabio, ni ne estas de la polico.

- Mi ne timas la policon, respondis la viro; mi neniun timas.

Jam mi komprenigis per signo al mia amiko ke ni estus bone inspiritaj ne persisti, sed mia amiko, kiu evidente volegis eniri en tiun gastejon, enŝoviĝis sub la ŝultro de la viro kaj ekestis en la

⁷ Tiu vorto, france, povas pensigi al malfacilaĵo, kruelaĵo.

ĉambro.

- Venu, li diris, estas tre bone ĉi tie.

Fakte, granda fajro de ligno flamis en la kameno. Ni alproksimiĝis al ĝi kaj etendis niajn manojn al la varmo de la fajrujo ĉar tiun matenon oni jam sentis veni la vintro. La ĉambro estis sufiĉe granda; du dikaj tabloj el ligno, kelkaj taburetoj, iu verŝtablo kie viciĝis boteloj da siropo kaj da alkoholo, meblis ĝin. Tri fenestroj rigardis al vojo. Kolora reklamaĉo sur la muro laŭdis, sub la trajtoj de pariza junulino senhonte levante sian glason, la apetitvekajn efikojn de nova vermo. Sur la kamenbreto de la alta kameno, la gastiganto estis aranĝinta multe da potoj kaj da kruĉoj el grejso kaj el fajenco.

- Jen bela kameno por rostigi kokidaĵon⁸, diris Rultabio.

- Ni tute ne havas kokidaĵon, eligis la gastiganto; ne eĉ malbonan kuniklaĵon.

- Mi scias, rebatis mia amiko per mokema voĉo kiu surprizis min, mi scias ke nun necesos manĝi sangan⁷ bifstekon.

Mi konfesas ke mi komprenis nenion de la frazo de Rultabio. Kial li diris al tiu viro: "Nun necesos manĝi sangan bifstekon... ? Kaj kial la gastiganto, tuj kiam li aŭdis tiun frazon, ellasis sakraĵon kiun li tuj sufokis kaj metis sin sub nia dispono kiel obeeme kiel S^{ro} Roberto Darzak mem kiam li aŭdis ĉi tiujn fatalajn vortojn: "La prepostejo nenion perdis pri sia ĉarmo, nek la ĝardeno pri sia brilo... ?" Efektive, mia amiko kapablis sin komprenigi de homoj per tute nekompreneblaj frazoj.

Mi faris al li la rimarkon pri tio kaj li bonvolis rideti. Mi preferintus ke li bonvolu doni al mi kelkan klarigon, sed li metis fingron sur sia buŝo, tio kio evidente signifis ke ne nur li malpermesis sin paroli, sed plie ke li rekomendis al mi silenton. Intertempe, la viro puŝante pordeton kriis ke oni alportu duondekduon da ovoj kaj "la pecon de falsa fileo". La komisiono estis baldaŭ farita de tre afabla junulino kun admirindaj blondaj haroj kaj kies la belaj grandaj mildaj okuloj rigardis nin kun scivolemo.

La gastejestro diris al ŝi per akra voĉo:

8 En franca, kokido estas komuniza moknomo de policano.

- Foriru ! Kaj se la verda viro venus, mi ne vidu vin !

Kaj ŝi malaperis, Rultabio ekprenis la ovojn kiujn oni alportis al li en bovlo kaj la viandon kiun oni servis al li sur plado, zorgeme metis la tuton apud li, en la kameno, malpendigis paton kaj rostokradon pendigitaj en la fajrejo kaj komencis batmiksi nian omleton atendante ke li rostigis nian bifstekon. Li ankoraŭ mendis al la viro du bonajn botelojn da cidro kaj ŝajnis zorgi tiel malmulte pri sia gastiganto kiel lia gastiganto zorgis pri li. La viro jen komplezeme rigardis lin kaj jen rigardis min kun angora mieno kiun li vane provis maski. Li lasis nin fari nian kuiradon kaj surmetis nian manĝilaron apud fenestro.

Subite mi aŭdis lin kiu murmuris :

- Ha ! jen li !

Kaj, kun la vizaĝo ŝanĝita, esprimanta nur krueleagan malamon, li iris glui sin kontraŭ la fenestron, rigardante la vojon. Mi tute ne bezonis informi Rultabio".

La junulo jam forlasis sian omleton kaj kuniĝis al la gastiganto ĉe la fenestro. Mi estis tie kun li.

Iu viro, tute vestita de verda veluro, la kapo kaptita en ronda kaskedo el sama koloro, antaŭeniris per trankvilaj paŝoj sur la vojo, fumante sian pipon. Li traŝultre portis fusilon kaj montris en siaj movadoj preskaŭ aristokratan senĝenecon. Tiu viro povis aĝi kvardek kvin jarojn. La haroj kaj la lipharoj estis salgriza. Li estis rimarkinde bela. Li surportis nazumon. Kiam li preterpasis apud la gastejo, li ŝajnis heziti, demandante al si ĉu li enirus, ekĵetis rigardon al nia flanko, ellasis kelkajn elspiraĵojn de sia pipo, kaj per la sama malrapidema paŝo daŭrigis sian promenadon.

Rultabio kaj mi, ni rigardis la gastiganton. Liaj fulmaj okuloj, liaj fermitaj pugnoj, lia tremetanta buŝo, informis nin pri la malkvietaj sentoj kiuj turmentis lin.

- Li bonfaris ne eniri hodiaŭ ! li sibliĝis.

- Kiu estas tiu viro ? Rultabio demandis revenante al sia omleto.

- "La verda viro !" muĝis la gastejestro... Vi ne konas lin ? Des pli bone por vi. Ne estas kono por fari... Nu, li estas la gardisto

de S^{ro} Stangerson.

- Vi ne ŝajnas tre ami lin, ĉu ne ? demandis la reportero elverŝante sian omleton en la paton.

- Neniu amas lin en la lando, sinjoro; kaj plie li estas fierulo kiu iam devis havi riĉaĵon; kaj li pardonas al neniu **esti devigita por vivi**, fariĝi servisto. Ĉar gardisto, tio estas lakeo kiel alia ! Ĉu ne ? Vere ! Oni kredus ke estas li kiu estas la mastro de la Glanejo, ke la tuta bieno kaj la tuta arbaro apartenas al li. Li ne permesus al malriĉulo matenmanĝi pecon da pano sur la herbejo, "sur sia herbejo" !

- Ĉu li kelkfoje venas ĉi tien ?

- Li tro venas. Sed mi bone komprenigos al li ke lia vizaĝo malplaĉas al mi. Antaŭ nur unu monato, li ne ĝenis min ! La gastejo de la "Ĉefturo" neniam ekzistis por li !... Li ne havis tempon ! Ĉu necesis ke li ne amindumus kun la gastigantino de la "Tri Lilioj" en Sankta-Mikaelo. Nun kiam estas diskordo en la amoj, li provas pasigi la tempon aliloke... Flirtemulo, ĵupĉasisto, malbona knabo... Ne estas honesta viro kiu povas toleri lin, tiun viron... Jen ! la gepordistoj de la kastelo tute ne povis lin elteni, "la verdan viron ! ..."

- Ĉu la gepordistoj de la kastelo estas do honestaj homoj, sinjoro gastiganto ?

- Nomu do min, ulĉjo Mateo; estas mia nomo... Nu, tiel vere kiel mi nomiĝas Mateo, jes s' nĵoro, mi kredas ilin honestajn.

- Tamen oni arestis ilin.

- Kion tio pravas ? Sed mi ne volas ŝovi mian nazon en la vazon de la proksimulo...

- Kaj kion vi opinias pri la murdo ?

- Pri la murdo de tiu kompatinda fraŭlino ? Bravan knabinon, nu, kaj kiun oni bone amis en la lando. Tio kion mi opinias pri tio ?

- Jes, tio kion vi opinias pri tio ?

- Nenion... kaj multajn aferojn... Sed tio koncernas neniun.

- Ne eĉ min ? Rultabio insistis.

La gastejestro strabe rigardis lin, grumblis, kaj diris :

- Ne eĉ vin...

La omleto estis preta; ni altabligis kaj silente manĝis kiam la enireja pordo estis ekpuŝita, kaj maljunulino, vestinta per vestaĉoj, apoganta sur bastono, kun la kapo malfirma, la haroj blankaj kiuj pendis per senbridaj tufetoj sur la malpura frunto, sin montris sur la sojlo.

- Ha ! Estas vi, ulnjo Genué ! Antaŭ longe ni ne vidis vin, eligis nia gastiganto.

- Mi estis tre malsana, tute preta morti, diris la maljunulino. Ĉu iufoje vi havus restaĵojn por la "Dibesteto" ... ?

Kaj ŝi eniris en la gastejo, sekvata de kato tiom grandega ke mi ne suspektis ke ĝi povu ekzisti el tiu grandeco. La besto rigardis nin kaj aŭdigis miaŭon tiel senespera ke mi sentis min tremeti. Mi neniam aŭdis krion tiel malĝoja.

Kvazaŭ li estus altirita de ĉi tiu bleko, viro eniris malantaŭ la maljunulino. Li estis la "verda viro". Li salutis nin per mangesto al sia kaskedo kaj sidiĝis ĉe la tablo najbara al la nia.

- Donu al mi glason da cidro, ulĉjo Mateo.

Kiam la "verda viro" eniris, ulĉjo Mateo spertis brutalan reagon de sia tuta persono kontraŭ la ĵusveninto; sed, videble, li regis sin kaj respondis :

- Ne plu estas da cidro, mi donis la lastajn botelojn al ĉi tiuj sinjoroj.

- Tiam donu al mi glason da blanka vino, eligis la "verda viro" sen vidigi la plej malgrandan miron.

- Ne plu estas da blanka vino, ne plu estas da io ajn !

La ulĉjo Mateo ripetis per obtuza voĉo :

- Ne plu estas da io ajn !

- Kiel fartas S^{ino} Mateo ?

La gastigestro, ĉe ĉi tiu demando de "la verda viro", kunpremis la pugnojn, turnis sin al li kun la vizaĝo tiel malbona ke mi kredis ke li tuj frapos, kaj poste li diris :

- Ŝi bone fartas, dankon.

Tiel la juna virino kun la grandaj, mildaj okuloj, kiun ni vidis antaŭ momento, estis la edzino de tiu naŭza kaj brutala krudulo, kaj kies ĉiuj fizikaj difektoj ŝajnis regataj de ĉi tiu morala

malvirto : La ĵaluzo.

Frapfermante la pordon, la gastigestro forlasis la ĉambron. Ulnjo Genua ankoraŭ staris, sin apoganta sur sia bastono kaj la kato malsupre de siaj jupoj.

La "verda viro" demandis al ŝi :

- Vi malsaniĝis, ulnjo Genua, ke oni ne vidis vin ekde baldaŭ ok tagoj ?

- Jes, s'njoro gardisto. Mi ellitiĝis nur tri fojojn por iri preĝi Sanktan Ĝenoveva", nian bonan patroninon, kaj la cetero de la tempo, mi kuŝis sur mia litaĉo. Estis por flegi min nur la "Dibesteto !"

- Ĉu ĝi ne forlasis vin ?

- Nek tage, nek nokte.

- Ĉu vi certas pri tio ?

- Kiel pri la paradizo.

- Do, kiel tio okazas, ulnjo Genua, ke oni aŭdis nur la blekon de la "Dibesteto" dum la tuta nokto de la krimo ?

La ulnjo Genua iris planti sin fronte al la gardisto, kaj frapis la plankon per sia bastono :

- Mi scias nenion pri io ajn. Sed ĉu vi volas ke mi diru al vi ? Ne estas du bestoj en la mondo kiuj havas tiun blekon... Nu, ankaŭ mi, dum la nokto de la krimo, mi ekstere aŭdis la blekon de la "Dibesteto"; kaj tamen ĝi kuŝis sur miaj genuoj, s'njoro gardisto, kaj ĝi ne unufoje miaŭis, mi asertas tion al vi. Mi krucosignis min kiam mi aŭdis tion, kvazaŭ mi aŭdis la diablon !

Mi rigardis la gardiston dum li metis ĉi tiun lastan demandon, kaj mi tre eraras se mi ne surprizis sur liajn lipojn mokeman ridetaĉon.

Tiumomente, la bruo de akra kverelo trafis nin. Ni eĉ kredis percepti obtuzajn batojn, kvazaŭ oni batus, kvazaŭ oni svenigus iun. "La verda viro" stariĝis kaj senhezite kuris al la pordo flanke de la fajrejo, sed tiu ĉi malfermiĝis kaj la gastejestro, aperante, diris al la gardisto :

- Ne timiĝu, s'njoro gardisto; estas mia edzino kiu suferas je la dentoj !

Kaj li rikanis.

- Jen, ulnjo Genuë, jen pulmaĵo por via kato.

Li transdonis al la maljunulino pakon; la maljunulino avide ekkaptis ĝin kaj eliris, ankoraŭ sekvata de sia kato.

"La verda viro" demandis :

- Ĉu vi volas nenion servi al mi ?

La ulĉjo Mateo ne plu bremsis la esprimon de sia malamo :

- Estas nenio por vi ! Estas nenio por vi ! Foriru !...

"La verda viro" trankvile, plenŝtopis sian pipon, bruligis ĝin, salutis nin kaj eliris. Li apenaŭ estis sur la sojlo kiam Mateo frapfermis la pordon malantaŭe kaj sin turnante al ni kun la okuloj sangoplenaj, la buŝo ŝaŭmanta, ni siblis al ni, kun la pugno etendita al la pordo kiu ĵus refermiĝis post la viro kiun li malamis :

- Mi ne scias kiuj vi estas, vi kiuj venas diri al mi : "Nun necesos manĝi sangan bifstekon". Sed se tio interesas vin : la murdinto, jen li !

Tuj kiam li tiel parolis, ulĉjo Mateo forlasis nin. Rultabio reiris al la fajrejo, kaj diris :

- Nun ni tuj rostos nian bifstekon. Kiel vi ŝatas la cidron ? Iom akra, kiel mi ŝatas tion.

En tiu tago, ni ne plu revidis Mateo", kaj granda silento regis en la gastejo kiam ni forlasis ĝin, post lasi kvin frankojn sur nia tablo, page de nia festeno.

Rultabio tuj farigis al mi preskaŭ unu leŭgon ĉirkaŭ la bieno de la profesoro Stangerson. Li haltis dum dek minutoj, ĉe la angulo de iu vojeto tute nigra de fulgo, proksime de la kabanoj de la karbistoj kiuj troviĝas en la parto de la arbarego de Sankta Ĝenoveva, kiu tuŝas la vojon irantan de Epine al Korbejo, kaj konfidis al mi ke la murdonto certe trapasis tie, "pro la stato de la krudaj ŝuoj" antaŭ ol eniri la bienon kaj ol kaŝi sin en la bosketon.

- Ĉu vi do ne kredas ke la gardisto estis en la afero ? mi interrompis.

- Ni vidos tion pli poste, li respondis al mi. Nun, tio kion la gastejestro diris pri ĉi tiu viro, ne maltrankviligas min. Li parolis pri li laŭ sia malamo. Ne estis por la "verda viro" ke mi

kunkondukis vin tagmanĝi ĉe la "Ĉefturo".

Tiel parolinte, Rultabio, kun grandaj singardemoj, enŝoviĝis - kaj mi enŝoviĝis malantaŭ li - ĝis la konstruo kiu, apud la krado, servis kiel loĝejo por la gepordistoj arestitaj tiun matenon mem. Li trudeniris per akrobataĵo kiun mi admiris, en la dometon tra malantaŭa lukso restita malfermita, kaj eliris el ĝi dek minutojn pli poste dirante tiun vorton kiu signifis en sia buŝo tiom da aferoj : "Evidente !"

Ĉe la momento kiam ni estis revojirantaj al la kastelo, okazis granda movado de la krado.

Iu veturilo alvenis kaj el la kastelo, oni venis renkonte al ĝi. Rultabio montris al mi viron kiu elveturiĝis el ĝi :

- Jen la estro de la sekureco; ni tuj vidos tion kion Frederiko Larsano havas kiel kapablecoj, kaj se li estas pli inteligenta ol alia...

Malantaŭ la veturilo de la estro de la Sekureco, tri aliaj veturiloj sekvis, plenplenaj de reporteroj kiuj ankaŭ ili, volis eniri en la parkon. Sed oni starigis garde ĉe la krado du ĝendarmojn, kun malpermeso lasi trairi. La estro de la Sekureco kvietigis ilian senpaciencon ligante sin per promeso doni al la gazetaro, en la vespero mem, la plej multe da informoj kiujn li povus, sen malhelpi la sinsekvon de la instrukcio.

11 - En kiu Frederiko Larsano klarigas kiel la murdinto sukcesis eliri el la Flava Ĉambro.

En la amaso da paperoj, dokumentoj, raportoj, ekstraktoj de ĵurnaloj, justecaj atestoj kiujn mi disponas relative al la "Mistero de la Flava Ĉambro", troviĝas detalo el la plej interesaj. Estis la rakonto de la memorinda pridemandado de la koncernatoj kiu okazis dum tiu posttagmezo, en la laboratorio de la profesoro Stangerson, antaŭ la estro de la Sekureco. Ĉi tiu rakonto estas ŝuldata de la plumo de S^{ro} Maleno, la registristo, kiu, tute kiel la enketjuĝisto, faris dum siaj libertempoj literaturon. Ĉi tiu detalo devis partopreni en libro kiu neniam aperis kaj kiu devis titoliĝi : Miaj pridemandadoj. Ĝi estis donita al mi de la registristo mem, kelkan tempon post la "nekredebla elnodiĝo" de ĉi tiu unika proceso en la juraj analoj.

Jen ĝi. Ne plu estas seka transskribo de demandoj kaj respondoj. La registristo ofte notas siajn personajn impresojn.

La rakonto de la registristo :

Ekde unu horo, rakontas la registristo, la enketjuĝisto kaj mi, ni troviĝis en la "Flava Ĉambro", kun la entreprenisto kiu konstruis laŭ la planoj de la profesoro Stangerson, la pavilonon. La entreprenisto venis kun laboristo. S^{ro} de Marketo tute purigis la murojn, tio estas ke li forprenigis per la laboristo la tutan paperon kiu ornamis ilin. Batoj de pioĉoj kaj de pikpioĉoj, ĉi tie kaj tie, pruvis al ni la neekzistecon de ajna aperturo. La planko kaj la plafono estis longdaŭre sonditaj. Ni nenion malkovris. Estis nenio por malkovri. S^{ro} de Marketo ŝajnis kontentega kaj senĉese ripetis :

- Kia afero ! sinjoro entreprenisto, kia afero ! Vi vidos ke neniam ni scios kiel la murdinto sukcesis eliris el tiu ĉambro !

Subite S^{ro} de Marketo, kun radianta mieno, ĉar li ne komprenis, bonvolis rememori ke lia devo estis provi kompreni, kaj li alvokis la ĝendarman brigadiston.

- Brigadisto, li eligis, iru do al la kastelo, kaj petu al S^{ro}

Stangerson kaj S^{ro} Roberto Darzak veni kuniĝi al mi en la laboratorio, tiel kiel ulĉjo Jakobo, kaj ankaŭ alkondukigu al mi per viaj knabegoj, la du geportistojn.

Kvin minutojn pli poste, ĉiuj kunsidis en la laboratorio. La estro de la Sekureco, kiu ĵus alvenis al la Glanejo, ankaŭ kuniĝis al ni en tiu momento. Mi sidis ĉe la skribtablo de S^{ro} Stangerson, preta por la laboro, kiam S^{ro} de Marketo eldiris al ni ĉi tiun mallongan paroladon, tiel originala kiel neatendita :

- Se vi volas, sinjoroj, li diris, ĉar la pridemandadoj donas nenion, ni escepte forlasos la malnovan sistemon de pridemandadoj. Mi tute ne laŭvice venigos vin antaŭ mi; ne. Ni ĉiuj restos ĉi tie : S^{ro} Stangerson, S^{ro} Roberto Darzak, Ulĉjo Jakobo, la du geportistoj, S^{ro} la Estro de la Sekureco, S^{ro} la registristo kaj mi ! Kaj ni estos ĉi tie, ĉiuj, "samkiale"; la geportistoj bonvolos momente forgesi ke ili estas arestitaj. "Ni babilos !" Mi venigis vin por "babili". Ni estas en la loko de la krimo; nu, pri kio ni babilus se ni ne babilus pri la krimo ? Pri tion ni do parolu ! Ni parolu pri tio ! Abunde, kun inteligente , aŭ stulte. Ni diru ĉion kio traflugos tra la kapo ! Ni parolu sen metodo ĉar la metodo tute ne sukcesas al ni. Mi adresas fervoran preĝon al la dio hazardo, la hazardo de niaj konceptadoj ! Ni komencu !...

Post tio, preterpasante antaŭ min, li diris al mi, mallaŭte :

- Ĉu ne ! Ĉu vi kredas, kia sceno ! Ĉu vi ja imagus tion ? Mi faros el ĝi malgrandan akton por la Vodevilo.

Kaj li ĝojege frotis al si la manojn.

Mi turnis la okulojn al S^{ro} Stangerson. La espero kiun devis estigi en li la lasta bulteno de la kuracistoj kiuj deklaris ke F^{ino} Stangerson kapablas postvivi siajn vundojn, ne forviŝis el ĉi tiu nobla vizaĝo la signojn de la plej granda doloro.

Tiu viro opiniis sian filinon mortantan, kaj li ankoraŭ estis pro tio tute difektita. Liaj bluaj okuloj tiel dolĉaj kaj tiel helaj estis tiam de senfina malgajo. Mi plurfoje havis la okazon, en publikaj ceremonioj, vidi S^{ron} Stangerson^{on}. Mi estis, tuj de la proksimiĝo, trafita de lia rigardo, tiom pura ke ĝi ŝajnis tiu de infano : reva

rigardo, sublima kaj nemateria rigardo de inventisto aŭ de frenezulo.

En tiuj ceremonioj, malantaŭ li aŭ apud lia flanko, ĉiam oni vidis lian filinon, ĉar ili neniam sin forlasis unu la alian, oni diris, dividante la samajn laborojn de tre longe. Tiu virgulino, kiu tiam aĝis tridek kvin jarojn, kaj kiu ŝajnis apenaŭ tridek jaraĝa, tute dediĉita al scienco, ankoraŭ vekis la admiron per sia majesta beleco restinta sendifekta, sen falto, venkanta kontraŭ la tempo kaj la amo. Kiu tiam dirintus al mi ke mi iam troviĝus ĉe ŝia litkapo kun miaj paperaĉoj, kaj ke mi vidus ŝin, preskaŭ mortontan, pene rakonti al ni la plej monstran kaj la plej misteran atencon kiun mi aŭdis dum mia kariero ? Kiu dirintus al mi ke mi troviĝus, kiel tiu posttagmezo, antaŭ iu senespera patro vane serĉante klarigi al si, kiel la murdinto de sia filino sukcesis eskapi al li ? Por kio do utilas la silenta laboro, funde de la malluma izolejo en la arbaroj, se ĝi tute ne garantias vin kontraŭ tiuj grandaj katastrofoj de la vivo kaj de la morto ordinare destinitaj por tiuj inter homoj kiuj proksimiĝas al la pasioj de la urbo ?

- Nu ! Sinjoro Stangerson, eligis S^{ro} de Marketo kun iom da graveco, lokiĝu ĝuste ĉe la lokon kie vi estis kiam F^{ino} Stangerson forlasis vin por eniri en ŝian ĉambron.

S^{ro} Stangerson stariĝis kaj metante sin je kvindek centimetroj de la pordo de la "Flava Ĉambro", li diris per senakcenta, senkolora voĉo, per voĉo kiun mi kvalifikus morta :

- Mi troviĝis ĉi tie. Ĉirkaŭ la dekunua, post esti plenuminta mallongan kemian eksperimenton sur la fornoj de la laboratorio, mi glitigis mian skribotablon ĝis ĉi tie ĉar la ulĉjo Jakobo, kiu pasigis la vesperon por purigi kelkajn el miaj aparatoj, bezonis la tutan spacon kiu troviĝis malantaŭ mi. Mia filino laboris ĉe la sama skribotablo kun mi. Kiam ŝi leviĝis, post esti kisinta min kaj dezirinta bonan vesperon al ulĉjo Jakobo, ŝi devis por eniri en sian ĉambron iom malfacile traŝoviĝi inter mia skribotablo kaj la pordo. Tio estas por diri al vi ke mi estis tre proksima de la loko kie la krimo estis okazonta.

- Kaj tiu skribotablo..., mi interrompis, obeante, miksante min

en ĉi tiu "konversacio", al la esprimataj deziroj de mia ĉefo, ...kaj ĉi tiu skribotablo, tuj kiam vi aŭdis, S^{ro} Stangerson, krei "Murdanto !" kaj kiam eksplodis la revolveraj pafoj... ĉi tiu skribotablo, kion ĝi fariĝis ?

La ulĉjo Jakobo respondis :

- Ni forpuŝis ĝin kontraŭ la muro, ĉi tien, proksimume tie kie ĝi nune estas, por kapabli oportune sin deĵeti al la pordo, s'njoro registristo...

Mi sekvis mian rezonadon, al kiu, cetere, mi alligis nur gravecon de malforta hipotezo :

- La skribotablo estis tiel proksima de la dormĉambro ke iu viro, elirante kurbiĝanta, el la ĉambro kaj enŝovante sin sub la skribotablon, povintus resti nerimarkita ?

- Vi ĉiam forgesas, lacece interrompis S^{ro} Stangerson, ke mia filino fermis sian pordon per ŝlosilo kaj riglilo, ke la pordo restis ŝlosita, ke ni restis por lukti kontraŭ ĉi tiu pordo ekde la momento kiam la murdado komencis, ke ni jam estis ĉe la pordo dum la lukto de la murdanto kaj mia kompatinda infano daŭris, ke la bruoj de ĉi tiu lukto ankoraŭ atingis nin kaj ke ni aŭdis stertori mia kompatinda filino sub la stringo de la fingroj kies ŝia kolo gardis la sangon spuron. Tiom rapida kiom estis la atako, ni estis egale rapidaj kiel ĝi kaj ni tuj troviĝis malantaŭ tiu pordo kiu apartigis nin de la dramo.

Mi stariĝis kaj iris al la pordo kiun denove mi plej zorgege ekzamenis. Poste mi restariĝis kaj gestis senkuraĝiĝon.

- Imagu, mi diris, ke la malsupra panelo de ĉi tiu pordo povus esti malfermita sen ke la pordo estu en la neceseco malfermiĝi, kaj la problemo estus solvita ! Sed bedaŭrinde ĉi tiu lasta hipotezo estas neakceptebla post la ekzameno de la pordo. Ĝi estas solida kaj dika pordo el kverko tiel konsistigita ke ĝi formas nedisigebla bloko... Estas tre videbla, malgraŭ la damaĝoj kiuj estis kaŭzita de tiuj kiuj frakasis ĝin...

- Ho ! diris ulĉjo Jakobo... ĝi estas malnova, solida pordo de la kastelo kiun oni transportis ĉi tien - pordo kiel oni ne plu faras nun. Necesis al ni tiu fera stango por fine mastri ĝin, kvarope...

Ĉar ankaŭ la pordistino kunagis kiel brava virino kiun ŝi estas, s'njoro juĝisto ! Estas tamen malfeliĉe vidi ilin en malliberejo, ĉimomente !

Ulĉjo Jakobo apenaŭ formulis ĉi tiun frazon de kompato kaj protesto ke la ploroj kaj la lamentadoj de la du gepordistoj rekomencis.

Mi neniam vidis tiom larmantajn akuzitojn. Mi estis profunde naŭzita pri ili. Eĉ supozante ilian senkulpecon, mi ne komprenis ke du estuloj povu tiagrade manki da karaktero antaŭ malfeliĉo. Klara sinteno, en tiaj momentoj, pli bone valoras ol ĉiujn larmojn kaj ol ĉiujn malesperojn, kiuj plejofte estas ŝajnigaj kaj hipokritaj.

- He ! ekkriis S^{ro} de Marketo, ankoraŭfoje sufiĉas por tiel plorpepi, kaj diru al ni, por via intereso, tion kion vi faris ĉe la horo kiam oni murdis vian mastrinon, sub la fenestroj de la pavilono ! Ĉar vi estis tute proksime de la pavilono kiam ulĉjo Jakobo renkontis vin...

- Ni ekvenis helpi ! ili ĝemis.

Kaj la virino, inter du singultoj, jelpis :

- Ha ! se ni tenus lin, la murdinto, ni elpelus lin el la mondo de la vivuloj !

Kaj ni ne povis, iun fojon pli, eltiri el ili du laŭcelajn sinsekvajn frazojn. Ili daŭrigis obstine nei, atestigi la bonan Dion kaj ĉiujn sanktulojn ke ili estis en sia lito kiam ili aŭdis pafon de revolvero.

- Ne estas unu, sed du pafoj kiuj estis pafitaj. Vi bone vidas ke vi mensogas. Se vi aŭdis unu, vi devas esti aŭdintaj la alian !

- Dio mia ! S'njoro Juĝisto, ni aŭdis nur la duan. Ni certe ankoraŭ dormis kiam oni pafis la unuan...

- Pri tio, oni pafis du fojojn ! diris ulĉjo Jakobo. Mi ja certas ke ĉiuj kartoĉoj de mia revolvero estis netuŝitaj; ni retrovis du bruligitajn kartoĉojn, du kuglojn, kaj ni aŭdis du pafojn de revolvero malantaŭ la pordo. Ĉu ne, sinjoro Stangerson ?

- Jes, eligis la profesoro, du pafojn de revolvero, unue iun obtuzan pafon, poste laŭtegan pafon.

- Kial vi daŭrigas mensogi ? ekkriis S^{ro} de Marketo, turnante

sin al la gepordistoj. Ĉu vi kredas la polico tiel stulta kiel vi ? Ĉio pruvas ke vi estis ekstere, apud la pavilono, dum la momento de la dramo. Kion vi faris tie ? Ĉu vi ne volas diri tion ? Via silento atestas vian komplacecon ! Kaj, pri mi, li eligis, turnante sin al S^{ro} Stangerson... pri mi, mi kapablas klarigi al mi la fuĝon de la murdinto nur per helpo havigita de ĉi tiuj du komplicoj. Tuj kiam la pordo estis frakasita, dum vi, S^{ro} Stangerson, vi zorgis pri via kompatindan infanon, la pordisto kaj sia edzino faciligis la fuĝon de la fripono kiu ŝovis sin malantaŭ ili, alvenis ĝis la fenestron de la vestiblo kaj saltis en la parkon. La pordisto refermis la fenestron kaj la ŝutrojn malantaŭ li. Ĉar finfine, tiuj ŝutroj ne fermiĝis tute solaj ! Jen tio kion mi trovis... Se iu imagis ion alian, ke li diru tion !...

S^{ro} Stangerson intervenis :

- Ne eblas ! Mi ne kredas nek al kulpeco nek al komplaceco de miaj gepordistoj, kvankam mi ne komprenas tion kion ili faris en la parko dum tiu ĉi malfrua horo de la nokto. Mi diras : tio ne eblas ! ĉar la pordistino tenis la lampon kaj ne moviĝis el la sojlo de la ĉambro; ĉar mi, tuj la pordo derompita, mi genuis apud la korpo de mia infano, kaj ke neeblis ke oni el- aŭ en-iru tiun ĉambron tra ĉi tiu pordo sen transpaŝi super la korpo de mia filino kaj sen puŝegi min ! Neeblas, ĉar ulĉjo Jakobo kaj la pordisto bezonis nur ekrigardi en ĉi tiun ĉambron kaj sub la liton, kiel mi faris tion enirante, por vidi ke neniu plu estis en la ĉambro, nur mia agonianta filino.

- Kion vi pensas, vi, sinjoro Darzak, kiu ankoraŭ nenion diris ? demandis la juĝisto.

S^{ro} Darzak respondis ke li nenion pensis.

- Kaj vi, sinjoro estro de la Sekureco ?

S^{ro} Daks, la estro de la Sekureco, nur aŭskultis kaj ekzamenis ĝis tiam la lokojn. Li fine konsentis malsigeli la lipojn :

- Necesus, atendente ke oni trovu la krimulon, malkovri la motiven de la krimo. Tio iom progresigus nin, li eligis.

- Sinjoro estro de la Sekureco, la krimo aperas malnoble pasieca, replikis S^{ro} de Marketo. La spuroj lasitaj de la murdinto,

la vulgara naztuko kaj la malpurega bereto kondukis nin kredi ke la murdinto tute ne apartenis al tre alta klaso de socio. La gepordistoj eble povus informi nin pri tio...

La estro de la Sekureco daŭrigis, turnante sin al S^{ro} Stangerson, kaj per tiu senama tono kiu estas la signo, laŭ mi, de elprovitaj inteligentecoj kaj de tre harditaj karakteroj.

- Ĉu F^{ino} Stangerson ne devis baldaŭe edziniĝi ?

La profesoro malgaje rigardis S^{ron} Robertoⁿ Darzak^{on}.

- Kun mia amiko kiun mi estintus feliĉa nomi mian filon... kun S^{ro} Roberto Darzak...

- F^{ino} Stangerson fartas multe pli bone kaj rapide resaniĝos de ŝiaj vundoj. Estas geedziĝo nur prokrastita, ĉu ne, sinjoro ? insistis la estro de la Sekureco.

- Mi esperas tion.

- Kiel ! Ĉu vi ne certas ?

S^{ro} Stangerson silentis. S^{ro} Roberto Darzak ŝajnis malkvieta, tio kiun mi vidis per tremado de lia mano sur sia ĉenon de poŝhorloĝo, ĉar nenio eskapas al mi. S^{ro} Daks tusetis kiel faris S^{ro} de Marketo kiam li estis embarasita.

- Vi komprenos, sinjoro Stangerson, li diris, ke en tiel implika afero, ni povas nenion neglekti; ke ni devas ĉion scii, eĉ la plej malgrandan, la plej bagatelan aferon rilatantan al la viktimo... la ŝajne plej sensignifan informon... Kio do kredigis al vi ke, en preskaŭ certeco kie ni nun estas ke F^{ino} Stangerson vivos, ĉi tiu geedziĝo povus ne okazi ? Vi diris : "Mi esperas". Tiu espero aperas al mi kiel dubo. Kial vi dubas ?

S^{ro} Stangerson videble baraktis kontraŭ si mem :

- Jes, sinjoro, li fine diris. Vi pravas. Pli bone estas ke vi sciu ion kiu ŝajnus signifoplena se mi kaŝus ĝin al vi. S^{ro} Roberto Darzak cetere opinios kiel mi.

S^{ro} Darzak, kies la paleco en tiu momento ŝajnis al mi tute nenormala, signis ke li samopiniis kiel la profesoron. Laŭ mi, se S^{ro} Darzak respondis nur per signo, estis ĉar li ne kapablis elfluigi vorton.

- Sciu do, sinjoro estro de la Sekureco, daŭrigis S^{ro} Stangerson,

ke mia filino ĵuris neniam forlasi min kaj tenis sian ĵuron malgraŭ ĉiuj miaj petoj, ĉar mi plurfoje provis decidigi ŝin al geedziĝo, kiel estis mia devo. Ni konis S^{ron} Robertoⁿ Darzak^{on} dum multaj jaroj. S^{ro} Roberto Darzak amas mian filinon. Mi povis momente kredi ke li estis amata, ĉar mi ekhavis la freŝdatan ĝojon sciiĝi per la buŝo mem de mia filino, ke ŝi fine konsentis geedziĝon kiun mi tute deziregis. Mi havas grandan aĝon, sinjoro, kaj estis benita horo, tiu kiam mi finfine sciis ke post mi, F^{ino} Stangerson siaflanke havus por ami ŝin kaj daŭrigi niajn komunajn laboraĵojn, iun estulon kiun mi amas kaj kiun mi estimas pro lia granda koro kaj pro lia sciado. Nu, sinjoro estro de la Sekureco, du tagojn antaŭ la krimo, pro mine-scias kia renversiĝo de sia volo, mia filino sciigis min ke ŝi ne edziniĝu kun S^{ron} Robertoⁿ Darzak^{on}.

Estis nun peza silento. La minuto estis grava. S^{ro} Daks reparolis :

- Kaj F^{ino} Stangerson donis al vi nenian klarigon, ŝi tute ne diris al vi pro kiu motivo ?...

- Ŝi diris al mi ke ŝi estas nun tro maljuna por edziniĝi... ke ŝi tro longe atendis... ke ŝi bone pripensis... ke ŝi estimis kaj eĉ ke ŝi amis S^{ron} Robertoⁿ Darzak^{on}... sed ke estis pli bone ke la aferoj restu tiel... ke oni daŭrigu la pasintecon... ke ŝi eĉ estu feliĉa vidi la ligojn de pura amikeco kiuj ligis nin al S^{ro} Roberto Darzak, kunigi nin ankoraŭ pli firme, sed ke estu komprenita ke oni ne plu iam parolu al ŝi pri geedziĝo.

- Jen kiu estas stranga ! murmuris S^{ro} Daks.

- Strange, ripetis S^{ro} de Marketo.

S^{ro} Stangerson, kun pala kaj frosta rideto, diris :

- Tute ne estas ĉe tiu flanko, sinjoro, ke vi trovos la motiven de la krimo.

S^{ro} Daks :

Ĉiaokaze, li eligis per senpacienca voĉo, la motivo ne estas ŝtelo !

- Ho ! Ni estas certaj pri tio ! ekkriis la enketjuĝisto.

En ĉi momento, la pordo de la laboratorio malfermiĝis kaj la ĝendarma brigadisto alportis karton al la enketjuĝisto.

S^{ro} de Marketo legis kaj eligis obtuzan ekkcion; poste :

- Ha ! Jen kiu estas tro impresa !

- Kio tio estas ? demandis la estro de la Sekureco.

- La karto de modesta reportero de *La Epoko*, S^{ro} Jozefo Rultabio, kaj ĉi tiuj vortoj : "Unu el la motivoj de la krimo estis ŝtelo !"

La estro de la Sekureco ridetas :

- Ha ! Ha ! La juna Rultabio... Mi jam aŭdis paroli pri li... Li estas rigardata kiel sagaca... Enirigu do lin, sinjoro enketjuĝisto.

Kaj oni enirigis S^{ron} Jozefoⁿ Rultabioⁿ. Mi konatiĝis kun li en la trajno kiu alkondukis nin tiun matenon al Epine-sur-Orĝe. Li enŝoviĝis, preskaŭ kontraŭ mia volo, en nia kupeo kaj mi preferas tuj diri ke liaj manieroj kaj lia memcerteco, kaj la pretendo kiun li ŝajnis havi por kompreni ion en afero en kiu la justico komprenis nenion, faris min ekabomeni lin. Mi tute ne ŝatas la ĵurnalistojn. Ili estas malklaraj kaj entuziasmaj mensoj kaj kiuj necesas foreviti kiel plago. Tiaj homoj sin rigardas kiel rajtantaj ĉion kaj nenion respektas. Kiam oni havas la malbonŝancon permesi al ili kion ajn kaj lasi sin alproksimiĝi de ili, oni estas tuj taŭzita kaj tute ne estas kontraŭaĵo kiun oni ne devas timi. Tiu ĉi ŝajnis apenaŭ dudeko da jaroj, kaj la aplombo per kiu li aŭdacis pridemandi kaj diskuti kun ni, aparte naŭzigis lin al mi. Cetere li havis manieron esprimi sin kiu atestis ke li ekscese mokis nin. Mi bone scias ke la ĵurnalo *La Epoko* estas influa organo kun kiu necesas scii "kompromisi", sed ankoraŭ tiu ĵurnalo bone farus ne dungi siajn redaktorojn ĉe la mamu.

S^{ro} Jozefo Rultabio do eniris en la laboratorion, salutis nin kaj atendis ke S^{ro} de Marketo peti lin klarigi sin.

- Vi asertas, sinjoro, diris tiu ĉi, ke vi konas la motivon de la krimo, kaj ke tiu motivo, kontraŭ ĉiu evidento, estus la ŝtelo ?

- Ne, sinjoro enketjuĝisto, mi tute ne asertis tion. Mi ne diras ke la motivo de la krimo estis la ŝtelo kaj mi ne kredas tion.

- Do, kion signifas ĉi tiun karton ?

- Ĝi signifas ke unu el la motivoj de la krimo estis la ŝtelo.

- Kio informis vin ?

- Ĉi tio ! Se vi bonvolas akompani min.

Kaj la junulo petegis nin sekvi lin en la vestiblon, tio kio ni faris. Tie li direktis sin al la akvoĉambro, kaj petegis sinjoron enketjuĝiston genuiĝi apud li. Ĉi tiu akvoĉambro ricevis taglumon tra sia vitrita pordo, kaj kiam la pordo estis malfermita, la lumo kiu tie penetris, sufiĉis por perfekte lumigi ĝin. S^{ro} de Marketo kaj S^{ro} Jozefo Rultabio genuiĝis sur la sojlon. La junulo montris lokon de la slabo.

- La slaboj de la akvoĉambro tute ne estis lavitaj de ulĉjo Jakobo, li eligis, ekde kelka tempo; tio vidiĝas dank' al la tavolo de polvo kiu kovras ilin. Nu, vidu ĉe ĉi tiu loko, la spuron de du larĝaj plandumoj kaj tiun ĉi nigran cindron kiu ĉie akompanas la paŝojn de la murdinto. Tiu cindro ne estas aliaĵo krom la karba polvo kiu kovras la padon kiun oni devas trairi por rekte veni tra la arbarego, de Epine ĝis la Glanejo. Vi scias ke ĉe tiu loko estas malgranda vilaĝeto de karbistoj kaj ke oni grandkvante produktas tie lignokarbon. Jen tio kion la murdinto devis fari : li eniris ĉi tie posttagmeze kiam neniuj estis en la pavilono, kaj li plenumis sian ŝtelon.

- Sed kian ŝtelon ? Kie vi vidas ŝtelon ? Kiu pruvas al vi la ŝtelon ? ni ĉiuj ekkriis samtempe.

- Tio kio gvidis min al la spuroj de ŝtelo, daŭrigis la ĵurnalisto...

- Estas tio ĉi ! interrompis S^{ro} de Marketo, ankoraŭ surgenue.

- Evidente, eligis S^{ro} Rultabio.

Kaj S^{ro} de Marketo eksplikis ke efektive estis sur la polvo de la slaboj, apud la spuro de la du plandumoj, la freŝa postsigno de peza ortangula pakaĵo, kaj ke estis facile distingi la stampo de la ŝnuroj kiuj ĉirkaŭis ĝin...

- Sed vi do venis ĉi tie, sinjoro Rultabio; mi tamen ordonis al ulĉjo Jakobo lasi neniujn eniri; li estis gardanto de la pavilono.

- Ne riproĉu ulĉjon Jakoboⁿ, mi venis ĉi tie kun S^{ro} Roberto Darzak.

- Ha ! Vere... ekkriis S^{ro} de Marketo, malkontenta, kaj ekrigardante flanken al S^{ro} Darzak kiu restis ankoraŭ silenta.

- Kiam mi vidis la spuron de la pakaĵo apud la postsigno de la

plandumoj, mi ne plu dubis pri ŝtelo, reparolis S^{ro} Rultabio. La ŝtelisto ne venis kun pakaĵo... Li faris tiun pakaĵon ĉi tie, sendube kun la ŝtelitaj objektoj, kaj li metis ĝin en tiu angulo, kun la intenco repreni ĝin ĉe la momento de sia forfuĝo; li ankaŭ demetis apud sia pakaĵo, siajn pezajn ŝuojn; ĉar, rigardu, neniuj piedsignoj kondukas al tiuj ŝuoj, kaj la plandumoj apudestas unu de la alia, kiel plandumoj senmovaj kaj malplenaj de iliaj piedoj. Tiel oni komprenus ke la murdinto, kiam li forkuris el la "Flava Ĉambro", lasis neniun spuron de siaj paŝadoj nek en la laboratorio nek en la vestiblo. Post esti enirinta kun siaj ŝuoj en la "Flava Ĉambro", li demetis ilin, verŝajne ĉar ili ĝenis lin aŭ ĉar li volis fari kiel eble malplej da bruoj. La spuro de lia intrapaso tra la vestiblo kaj la laboratorio estis forviŝita de la sekvanta lavado de ulĉjo Jakobo, tio kio kondukas nin enirigi la murdonton en la pavilonon tra la malfermita fenestro de la vestiblo dum la unua foresto de ulĉjo Jakobo, antaŭ la lavado kiu okazis je la kvina kaj duono !

La murdonto, post kiam li demetis siajn ŝuojn, kiuj certe ĝenis lin, mane alportis ilin en la akvoĉambron kaj demetis ilin enen de la sojlo, ĉar sur la polvo de la akvoĉambro, ne estas spuro de piedoj nudaj aŭ entenitaj en ŝtrumpetoj, aŭ eĉ en aliaj ŝuoj. Li do demetis siajn ŝuojn apud sia pakaĵo. La ŝtelo jam estis tiumomente plenumita. Poste, la viro reiras al la "Flava Ĉambro" kaj tiam enŝoviĝas sub la liton kie la spuro de sia korpo estas perfekte videbla sur la planko kaj eĉ sur la mato kiu estis, ĉe tiu loko, iomete amasiĝinta kaj tre ĉifita. Eĉ pajleroj freŝdate elŝiritaj, ankaŭ atestas pri la pasadon de la murdonto sub la lito...

- Jes, jes, ni scias tion, diris S^{ro} de Marketo.

- Ĉi tiu reveno sub la lito pruvas ke la ŝtelo, daŭrigis ĉi tiu mirinda knabo ĵurnalisto, ne estis la sola motivo de la veno de la viro. Tute ne diru al mi ke li tuj rifuĝus ekvidante, tra la fenestro de la vestiblo, aŭ la ulĉjon Jakoboⁿ, aŭ S^{ron} kaj F^{inon} Stangerson sin pretigante eniri en la pavilonon. Estis multe pli facile por li grimpi en la subtegmenton, kaj kaŝinta, atendi oportunon forkuri, se lia intenco estis nur fuĝi. Ne ! Ne ! Necesis ke la murdonto estu en la "Flava Ĉambro"...

Nun, la estro de la Sekureco intervenis :

- Tute ne estas malbone, tio, junulo ! Miajn gratulojn... kaj se ni ne ankoraŭ scias kiel la murdinto foriris, ni jam sekvas, paŝon post paŝo, sian eniron ĉi tie, kaj ni vidas tion kion li faris : li ŝtelis. Sed kion li ŝtelis ?

- Ekstreme multvaloraj aferoj, respondis la reportero.

Ĉe tiu momento, ni ekaŭdis krion kiu devenis de la laboratorio. Ni rapidis tien, kaj ni trovis tie S^{on} Stangerson^{on} kiu, kun terurigitaj okuloj kaj agititaj membroj, montris al ni specon de libromebla kiun li ĵus malfermis kaj kiu aperis al ni malplenaj.

Sammomente, li lasis sin fali en la grandan brakseĝon kiu estis puŝita antaŭ la skribotablo kaj ĝemis :

- Ankoraŭfoje, mi estas ŝtelita...

Kaj poste larmo, peza larmego, ekfluis sur lia vango :

- Ĉefe, li diris, ke oni ne diru vorton pri tio al mia filino..., ŝi estus ankoraŭ pli afliktita ol mi.

Li eligis profundan vespiron, kaj kun la tono de doloro kiun mi neniam forgesos :

- Ne gravas, finfine... nur ke ŝi vivu !...

- Ŝi vivos ! diris per strange kortuŝa voĉo, Roberto Darzak.

- Kaj ni retrovos al vi la ŝtelitajn aferojn, eligis Daks. Sed kio estis en ĉi tiu meblo ?

- Dudek jarojn de mia vivo, obtuze respondis la famkonata profesoro, aŭ pli ĝuste de nia vivo, de mia filino kaj mi. Jes, niaj plej karegaj dokumentoj, la plej sekretaj raportoj pri niaj eksperimentoj kaj niaj laboroj, de dudek jaroj, estis enfermitaj tie. Ĝi estis vera selektitaro inter tiom da dokumentoj kies ĉi tiu ĉambro estas plena. Estas nekompensebla domaĝo por ni, kaj mi maltimas diri, por scienco. Ĉiuj etapoj tra kiuj mi devis pasi por atingi la decidigan pruvon pri la neniigo de la materio, estis de ni zorgeme formulitaj, etikeditaj, prinititaj, ilustritaj per fotografioj kaj desegnoj. Tio ĉio estis ordigita tie. La plano de tri novaj aparatoj, unu por studi la disperdiĝon, sub la efikado de ultraviola lumo, de antaŭelektritaj korpoj; la alia kiu devis videbligi la elektran disperdiĝon sub la efiko de la partikloj de materio

diserigita en la gasoj de flamoj; iu tria, tre inĝenia, nova diferenĉala elektroskopo kondensanta; la tuta kolekto de niaj kurboj esprimantaj la fundamentajn proprecojn de la intera substanco inter la pesebla materio kaj la nepesebla etero; dudek jaroj da eksperimentoj pri interna atoma kemio kaj la nekonataj ekvilibroj de la materio; iu manuskripto kiun mi volis eldoni sub ĉi tiu titolo : La Metaloj kiuj Suferas. Ĉu mi scias ? Ĉu mi scias ? La viro kiu venis ĉi tie, prenis ĉion al mi... Mia filino kaj mia verko... mia koro kaj mia animo...

Kaj la fama Stangerson ekploris kiel infano.

Ni silente ĉirkaŭis lin, emociitaj de tiu grandega suferego.

S^{ro} Roberto Darzak, kubutapogita sur la fotelo, kie la profesoro faligis sin, vane provis maski siajn larmojn, tio kio dum momento preskaŭ simpatiigis lin al mi, malgraŭ la instinkta mallogo kiun lia stranga sinteno kaj lia ofte neklara emocio inspiris al mi por lia enigma persono.

S^{ro} Jozefo Rultabio, sola, kvazaŭ sia mezurita tempo kaj sia misio sur la tero tute ne permesis al li malfruiĝi pro homa mizero, alproksimiĝis, tre kvieta, al la malplena meblo kaj montrante ĝin al la estro de la Sekureco, baldaŭ rompis la religian silenton per kiu ni honoris la malesperon de la fama Stangerson. Li donis al ni kelkajn klarigojn, kies ni tute ne bezonis, pri la maniero laŭ kiu li estis kondukita kredi ŝtelon, per la samtempa malkovro kiun li faris pri la spuroj kies mi parolis ĉi supren en la akvoĉambro, kaj la vakueco de ĉi tiu karega meblo en la laboratorio. Li nur pasis en la laboratorion, li diris al ni; sed la unua afero kiu okulfrapis lin, estis la stranga formo de la meblo, ĝia solideco, ĝia fera konstruo kiu ŝirmis ĝin kontraŭ akcidento per la flamo, kaj la fakto ke meblo kiel ĉi tiu, destinita por konservi objektojn kies oni devis nepre gardi, havis sur sia fera pordo "sian ŝlosilon". "Oni kutime tute ne havas kiraskesto por lasi ĝin malferma...". Fine, ĉi tiu malgranda ŝlosilo, kun kupra kapo, el la plej malsimplaj, altiris, ŝajnas, la atenton de S^{ro} Jozefo Rultabio, dum ĝi endormigis la nian. Por ni, kiuj tute ne estas infanoj, la ĉeesto de ŝlosilo sur meblo plivole vekas ideon de sekureco, sed por S^{ro} Jozefo Rultabio, kiu evidente

estas genio - kiel diras Joseo Dupui en *La kvincent milionoj da Gladiatoroj*, "Kia genio ! Kia dentisto !" - la ĉeesto de ŝlosilo sur seruro vekas la ideon de ŝtelo. Ni baldaŭ sciis la kialon.

Sed antaŭ ol konatigi tion al vi, mi devas raporti ke S^{ro} de Marketo ŝajnis al mi tre senkonsila, ne scianta ĉu li devis ĝoji pro la nova paŝo kiun la malgranda reportero farigis al la enketo aŭ ĉu li devis afliktiĝi ĉar tiu paŝo ne estis farita de li. Nia profesio implicas ĉi tiujn malagrablaĵojn, sed ni tute ne rajtas esti malnoblaj, kaj ni devas treti nian memamon kiam temas pri la ĝenerala bono. Tial S^{ro} de Marketo triumfis super si mem kaj trovis bona fine miksi siajn komplimentojn kun tiuj de S^{ro} Daks kiu, li, ne domaĝi ilin al S^{ro} Rultabio. La knabo ŝultrumis, dirante : "Tio ne meritas komplimentojn !"

Mi kontentiĝe vangofrapus lin, ĉefe en la momento kiam li aldonis : "Vi bone farus, sinjoro, demandi al sinjoro Stangerson kiu ordinare gardis tiun ŝlosilon ?"

- Mia filino, respondis S^{ro} Stangerson. Kaj tiu ŝlosilo neniam forlasis ŝin.

- Ha ! Sed jen kiu ŝanĝas la aspekton de la aferoj, kaj ne plu kongruas kun la koncepto de S^{ro} Rultabio, ekkriis S^{ro} de Marketo. Se tiu ŝlosilo neniam forlasis F^{inon} Stangerson^{on}, la murdonto atendintus F^{inon} Stangerson^{on} tiun nokton, en ŝia ĉambro, por ŝteli tiun ŝlosilon al ŝi, kaj la ŝtelo okazintus nur post la murdo ! Sed post la murdo, estis kvar homoj en la laboratorio !... Fine, mi ne plu komprenas ion !...

Kaj S^{ro} de Marketo ripetis, kun senespera kolerego, kiu devas esti por li la kulmino de ebrieco, ĉar mi ne scias ĉu mi jam diris ke li neniam estis tiel feliĉa kiel kiam li ne plu komprenis ion !

- La ŝtelo, rebatis la reportero, povis esti okazinta nur antaŭ la murdado. Tio estas nedubbla pro la kialo kiun vi kredas kaj pro aliaj kialoj kiujn mi kredas. Kaj kiam la murdonto eniris en la pavilonon, li jam posedis la ŝlosilon kun kupra kapo.

- Ne eblas ! eligis milde S^{ro} Stangerson.

- Tio eblas tiel bone, sinjoro, ke jen la pruvo.

Tiu diabla eta bonulo tiam elpoŝigis iun ekzempleron de *La*

Epoko datitan je la 21^a de oktobro (mi memorigas ke la krimo okazis en la nokto de la 24^a ĝis la 25^a) kaj, montrante al ni anoncon, legis :

- *"Estis hieraŭ perdita retikulon el nigra sateno en la ĉiovendejo de la Lupino. Tiu retikulo enhavis diversajn objektojn inter kiuj malgrandan ŝlosilon kun kupra kapo. Estos donanta fortan rekompenco al la persono kiu trovos ĝin. Tiu persono devos skribi poŝtrestante al poŝtoficejo 40, ĉe ĉi tiu adreso : M.A. T.S.N".* Ĉu tiuj literoj tute ne indikas, daŭrigis la reportero, F^{ino} Stangerson ? Ĉu tiu ŝlosilo kun kupra kapo tute ne estas ĉi tiu ŝlosilo ?... Mi ĉiam legas la anoncojn. En mia profesio, kiel en la via, sinjoro enketjuĝisto, necesas ĉiam legi la personajn anoncetojn... Tio kiun oni malkovras kiel implikaĵojn ! ... kaj kiel ŝlosilojn de implikaĵoj ! Kiuj ne ĉiam estas kun kupra kapo, kaj kiuj ne estas malpli interesaj. Ĉi tiu anonco, aparte, pro la speco de mistero kies la virino kiu perdis ŝlosilon, malmute kompromitan objekton, envolvis sin, mirigis min. Kiel ŝi volegis ĉi tiun ŝlosilon ! Kiel ŝi promesis fortan rekompenco ! Kaj mi ŝpinis pri ĉi tiuj kvin literoj : M.A.T.S.N.

La tri unuaj tuj sciigis al mi iun baptonomon. "Kompreneble" mi eligis, "Mat, Matilda...", la persono kiu perdis la ŝlosilon kun kupra kapo en retikulo, nomiĝas Matilda !... Sed mi ne povis fari ion pri la du lastaj literoj. Tial, forpuŝante la ĵurnalon, mi okupiĝis pri aliaĵo... Kiam, kvar tagojn pli poste, la vesperaj ĵurnaloj aperis kun grandegaj ĉeftitoloj anoncantaj la murdon de F^{ino} Matilda STANGERSON, tiu nomo de Matilda memorigis min, sen tio ke mi klopodu por tio, senkonscie, la literojn de la anonco. Iom scivola, mi petis la ekzempleron de tiu tago al la administristaro. Mi forgesis la du lastajn literojn : S N. Kiam mi revidis ilin, mi ne sukcesis reteni krion "Stangerson !" Mi saltis en fiakron kaj rapidegis al poŝtoficejo 40. Mi demandis : "Ĉu vi havas leteron kun ĉi tiu adreso : M.A.T.S.N. ! La oficisto respondis al mi : "Ne ! Kaj ĉar mi insistis, petante lin, petegante lin denove serĉi, li diris al mi : "Ha ! Tio, sinjoro, ĝi estas ŝerco !... Jes, mi havis leteron kun la inicialoj M.A.T.S.N.; sed mi donis ilin antaŭ tri tagoj al iu virino kiu postulis tion. Vi hodiaŭ venas viaŭvice pretendi tiun leteron. Nu, antaŭhieras, iu viro, per la sama malafabla insisto,

ankaŭ petis ĝin al mi !... Mi laciĝas pri ĉi tiu blago..." Mi volis pridemandi la oficiston pri la du personoj kiuj jam postulis la leteron, sed aŭ li volis ŝirmi sin malantaŭ profesia sekreto - li sendube opiniis, intime, jam esti tro dirinta - aŭ li estis vere trotedita per ebla ŝerco, li ne plu respondis al mi...

Rultabio silentis. Ni ĉiuj silentis. Ĉiu tiris la konkludojn kiujn li kapablis el tiu stranga rakonto de la poŝtrestanta letero. Fakte, ŝajnis nun ke oni tenis solidan fadenon per kiu oni estis povonta sekvi ĉi tiun "enigman" aferon.

S^{ro} Stangerson diris :

- Estas preskaŭ certa ke mia filino perdis ĉi tiun ŝlosilon, ke ŝi ne volis paroli al mi pri tio por eviti ĉiun maltrankvilon, kaj ke ŝi petis al tiu kiu povintus esti trovanta ĝin, skribi poŝtrestante. Ŝi evidente timis ke, donante nian adreson, tiu fakto okazu klopodojn kiuj sciigu al mi la perdon de la ŝlosilo. Tio estas tre logika kaj tre natura. Ĉar mi jam estis ŝtelita, sinjoro !

- Kie tio ? Kaj kiam ? demandis la direktoro de la Sekureco.

- Ho ! Antaŭ multaj jaroj, en Usono, en Filadelfio. Oni ŝtelis al mi en mia laboratorio, la sekreton de du eltrovoj kiuj povintus fari la riĉaĵon de popolo... Ne nur mi neniam sciis kiu estis la ŝtelisto, sed mi neniam aŭdis paroli pri la "ŝtelaĵo" probable ĉar, por vanigi la planojn de tiu kiu tiel rabis min, mi mem lanĉis en la publika proprieto ĉi tiujn du inventojn, senutiligante la ŝtelon. Esta ekde tiu tempo ke mi estas tre suspektema, ke mi hermetike enfermiĝas kiam mi laboras. Ĉiuj stangoj de tiuj fenestroj, la izolado de ĉi tiu pavilono, ĉi tiu meblo kiun mi mem konstruigis, ĉi tiu speciala seruro, ĉi tiu ununura ŝlosilo, ĉio, kio estas la rezulto de miaj timoj inspiritaj de malĝoja sperto.

S^{ro} Daks diris : "Tre interesa !" Kaj S^{ro} Jozefo Rultabio demandis novaĵojn pri la retikulo.

Nek S^{ro} Stangerson, nek ulĉjo Jakobo vidis ekde kelkaj tagoj, la retikulon de F^{ino} Stangerson. Ni devis ekscii kelkajn horojn pli poste, per la buŝo mem de F^{ino} Stangerson, ke ĉi tiu retikulo estis ŝtelita de ŝi aŭ ke ŝi perdis ĝin, kaj ke la aferoj okazis tiel kiel ŝia patro klarigis tion al ni; ke ŝi iris je la 23^a de oktobro al la

poŝtoŝtancelo 40, kaj ke oni transdonis al ŝi leteron kiu estis, ŝi asertis, nur tiu de ŝerculaĉo. Ŝi tuj bruligis ĝin.

Por reveni al nia pridemandado, aŭ pli ĝuste al nia "konversacio", mi devas atentigi ke la estro de la Sekureco, demandinte al S^{ro} Stangerson, en kiuj kondiĉoj lia filino iris al Parizo je la 20^a de oktobro, tagon de la perdo de la retikulo, ni tiel sciiĝis "ke ŝi iris al la ĉefurbo, akompanita de S^{ro} Roberto Darzak kiun ni ne revidis en la kastelo ekde tiu momento ĝis la morgaŭo de la krimo". La fakto ke S^{ro} Roberto Darzak estis ĉe la flankoj de F^{ino} Stangerson, en la ĉiovendejoj de *Lupino* kiam la retikulo malaperis, ne povis resti nerimarkita kaj, necesas diri tion, kaptis sufiĉe forte nian atenton.

Tiu konversacio inter juĝistoj, akuzitoj, viktimo, atestantoj kaj ĵurnalisto estis finiĝonta kiam okazis vera teatrofrapo; tio kio neniam malplaĉas al S^{ro} de Marketo. La ĝendarma brigadisto venis informi nin ke Frederiko Larsano petis esti enkondukita, tio kio estis tuj akceptita. Li tenis en la mano kruda paro da ŝlimaj ŝuoj kiujn li ĵetis en la laboratorio.

- Jen, li diris, la ŝuoj kiujn surmetis la murdinto ! Ĉu vi rekonas ilin, ulĉjo Jakobo ?

Ulĉjo Jakobo klinis sin super tiu haladza ledso kaj tute konsternita, rekonis malnovajn ŝuojn de li, kiujn li forĵetis por la rubejo, antaŭ kelka tempo, en angulon de la mansardo; li estis tiom konfuzita ke li devis nazpurigi por kaŝi sian emociion.

Tiam, montrante la naztukon kies uzis ulĉjo Jakobo, Frederiko Larsano diris :

Jen naztuko kiu mirige aspektas kiel tiu kiun oni trovis en la "Flava Ĉambro".

- Ha ! Mi bone scias tion, diris ulĉjo Jakobo tremanta; ili estas preskaŭ samaj.

- Fine, daŭrigis Frederiko Larsano, la malnova vaska bereto ankaŭ trovita en la "Flava Ĉambro" povintus antaŭe kapvesti la kapon de ulĉjo Jakobo. Ĉio ĉi, sinjoro estro de la Sekureco kaj sinjoro enketjuĝisto, pravas laŭ mi - retranskiviligu, bonulo !, li eligis al ulĉjo Jakobo kiu malfortiĝis - ĉio ĉi pravas laŭ mi ke la murdinto

volis maski sian veran personecon. Li faris tion per sufiĉe kruda maniero, aŭ almenaŭ kiu tiel aperas al ni, ĉar ni certas ke la murdinto ne estas la ulĉjo Jakobo, kiu ne forlasis S^{ro} Stangerson. Sed imagu ke S^{ro} Stangerson, tiun vesperon, ne plilongigus sian vekitecon; ke post esti forlasita de sia filino, li reirus al la kastelo; ke F^{ino} Stangerson estintus murdata kiam ne plu restis iun en la laboratorio kaj ke ulĉjo Jakobo dormus en sia mansardo : estus dubo por neniu ke ulĉjo Jakobo estis la murdinto ! Ĉi tiu ŝuldas sian savon nur pro tio ke la dramo tro frue eksplodis, la murdinto kredinte, sendube pro la silento kiu apude regis, ke la laboratorio estis malplena kaj ke la momento por agi estis venita. La viro kiu sukcesis tiel mistere englitiĝi ĉi tien kaj preni tiajn singardemojn kontraŭ ulĉjo Jakobo estis, sen dubi pri tio, kutimanto de la domo. Ĝuste je la kioma horo li enŝoviĝis ĉi tie ? Ĉu posttagmeze ? Ĉu vespere ? Mi ne povas diri... Iu knabo tiel kutima de la aĵoj kaj homoj de ĉi tiu pavilono povis eniri en la "Flavan Ĉambron" laŭ sia oportuno.

- Li tamen ne povis eniri tien kiam estis homoj en la laboratorio ! ekkriis S^{ro} de Marketo.

- Kion ni scias, mi petas vin ! respondis Larsano... Estis la vespermanĝo en la laboratorio, la iro-reiro de la servistaro..., estis kemia eksperimento kiu povis reteni, inter la deka kaj la dek-unua, S^{ro} Stangerson, lia filino kaj ulĉjo Jakobo ĉirkaŭ la fornojn... en tiu angulo de la alta kameno... Kiu diras al mi ke la murdonto..., iu kutimanto ! iu konato !... ne profitis de tiu momento por enŝteliĝi en la "Flavan Ĉambron", post esti, en la akvoĉambro, demetinta siajn ŝuojn ?

- Estas tre neprobable ! eligis S^{ro} Stangerson.

- Sendube, sed ne estas neeble... Tial, mi asertas nenion. Koncerne lian eliron, estas alia afero ! Kiel li sukcesis forfuĝi ? Tute nature, kiel en la mondo !

Dum momento Frederiko Larsano silentis. Ĉi tiu momento ŝajnis al ni tre longa. Ni atendis ke li parolu kun tre komprenebla febro.

- Mi ne eniris en la "Flavan Ĉambron", diris Frederiko Larsano, sed mi imagas ke vi akiris pruvon ke oni povas eliri el tie nur tra la

pordo. Estas tra la pordo ke la murdinto eliris. Nu, ĉar neblas ke estu alie, estas ke tio estas ! Li plenumis la krimon kaj eliris tra la pordo ! En kiu momento ? En la momento kiam tio estis pli facila por li, en la momento kiam tio fariĝas la plej klarigebla, tiom klarigebla ke ne povus esti alia klarigo. Ni ekzamenu do la "momentojn" kiuj sekvis la krimo. Estas la unua momento dum kiam troviĝas antaŭ la pordo, pretaj por bari lian vojon, S^{ro} Stangerson kaj ulĉjo Jakobo. Estas la dua momento dum kiam ulĉjo Jakobo pormomente forestinta, S^{ro} Stangerson troviĝas tute sola antaŭ la pordo. Estas la tria momento dum kiam S^{ro} Stangerson estas kuniĝinta al la pordisto. Estas la kvara momento dum kiam staras antaŭ la pordo S^{ro} Stangerson, la pordisto, lia edzino kaj ulĉjo Jakobo. Estas la kvina momento dum kiam la pordo estas disrumpita kaj la "Flava Ĉambro" invadita. La momento kiam la fuĝo estas la plej klarigebla estas la momento mem kiam estas la plej malgrandaj homoj antaŭ la pordo. Estas momento kiam estas nur unu tie : estas tiu kiam S^{ro} Stangerson restas sola antaŭ la pordo. Krom akcepti la komplacecon de silento de ulĉjo Jakobo, kaj mi ne kredas tio ĉar ulĉjo Jakobo ne estus elirinta el la pavilonon por iri ekzameni la fenestron de la "Flava Ĉambro" se li estus vidinta malfermi la pordon kaj eliri la murdinton. La pordo do malfermiĝis nur antaŭ S^{ro} Stangerson sola, kaj la viro eliris. Tiam ni devas konsenti ke S^{ro} Stangerson havis potencajn kialojn por ne haltigi aŭ por ne haltigigi la murdinton, ĉar li lasis lin atingi la fenestron de la vestiblo kaj ke li refermis tiun fenestron malantaŭ li ! ... Tio farita, ĉar ulĉjo Jakobo estis revenonta kaj ke necesis ke li retrovu la aferojn kiel ili estis, F^{ino} Stangerson, terure vundita, ankoraŭ trovis la forton, probable pro la admonoj de sia patro, por denove refermi la pordon de la "Flava Ĉambro" per ŝlosilo kaj riglilo antaŭ ol kolapsi, mortiĝanta, sur la planko... Ni ne scias kiu plenumis la krimon; ni ne scias de kia fripono, S^{ro} kaj F^{ino} Stangerson estas la viktimoj; sed tute ne estas dubo ke ili scias tion, ili ! Ĉi tiu sekreto devas esti terura por ke la patro ne hezitis lasi sian agoniantan filinon malantaŭ tiu pordo kiun ŝi refermis malantaŭ si, terura por ke li lasis eskapi la

murdinton... Sed ne estas alia maniero en la mondo por klarigi la fuĝon de la murdinto de la "Flava Ĉambro !"

La silento kiu sekvis ĉi tiun dramon kaj luman klarigon, estis timindaĵo. Ni ĉiuj suferis por la fama profesoro, tiel alpremita de la senkompata logiko de Frederiko Larsano, por konfesi al ni la veron pri lia martireco aŭ por silenti, konfeso eĉ pli terura. Ni vidis lin stariĝi, tiu viro, vera statuo de doloro, kaj etendi la manon per gesto tiel solena ke ni klinis la kapon kvazaŭ ekvidante sakralan aĵon. Li tiam eldiris tiujn ĉi vortojn per laŭta voĉo kiu ŝajnis elĉerpi siajn tutajn fortojn :

- Mi ĵuras, sur la kapo de mia filino ĉe la agonio, ke mi tute ne forlasis tiun pardonon, de la momento kiam mi aŭdis la senesperan vokon de mia infano, ke tiu pordo tute ne malfermiĝis dum mi estis sola en mia laboratorio, kaj ke fine, kiam ni eniris en la "Flavan Ĉambron", miaj tri servistoj kaj mi, la murdinto ne plu estis tie ! Mi ĵuras ke mi ne konas la murdinton !

Ĉu necesas ke mi diras ke, malgraŭ la soleneco de tia ĵuro, ni ne multe kredis la paroladon de S^{ro} Stangerson ? Frederiko Larsano ĵus antaŭflarigis al ni la veron : tute ne estis por tuj perdi ĝin.

Kiam S^{ro} de Marketo sciigis al ni ke la "konversacio" estis fininta kaj ke ni pretiĝis forlasi la laboratorion, la juna reportero, tiu knabo Jozefo Rultabio, alproksimiĝis al S^{ro} Stangerson, premis al li la manon kun la plej alta respekto kaj mi aŭdis lin kiu diris : "Mi ja kredas vin, sinjoro !"

Mi ĉesas ĉi tie la citaĵon kiun mi opiniis devi fari pri la rakonto de S^{ro} Maleno, registristo en la juĝejo de Korbejo. Mi tute ne bezonas diri al la leganto ke ĉio kio ĵus okazis en la laboratorio, estis fidele kaj tuje transdirita al mi de Rultabio mem.

12 - La irbastono de Frederiko Larsano.

Mi pretiĝis por forlasis la kastelon nur ĉirkaŭ la sesa vespere, kunportante la artikolon kiun mia amiko rapide skribis en la saloneto kiun S^{ro} Roberto Darzak metigis sub nia dispoŝo. La reportero devis dormi en la kastelo, utiligante tiun neklarigeblan gastigon kiun proponis al li S^{ro} Roberto Darzak, al kiu S^{ro} Stangerson, en ĉi tiuj malgajaj momentoj, konfidis ĉiujn hejmajn zorgojn. Tamen li volis akompani min ĝis la stacidomo de Epine. Trairante la parkon, li diris al mi :

- Frederiko Larsano vere estas tre forta kaj ne ŝtelis sian reputacion. Vi scias kiel li sukcesis retrovi la ŝuojn de ulĉjo Jakobo ! Proksime de la loko kie ni rimarkis la spuron de "elegantaj paŝoj" kaj la malaperon de la premsignoj de la dikaj ŝuoj, ortangula kavo en la malseka tero atestis ke tie estis ŝtono antaŭnelonge. Larsano priserĉis ĉi tiun ŝtonon sen trovi ĝin, kaj tuj imagis ke ĝi servis al la murdinto por teni funde de la lageto la ŝuojn kies la viro volis forĵeti. La kalkulo de Freĉjo estis bonega kaj la sukceso de liaj esploradoj pruvis ĝin. Ĉi tio eskapis min; sed estas juste diri ke mia menso cetere jam foriris, ĉar pro la tro multa da mensogaj atestoj pri sia pasado postlasita de la murdinto kaj pro la mezuro de la nigraj paŝoj kongruanta kun la mezuro de la paŝoj de ulĉjo Jakobo, kiun mi konstatis sen ke li suspektis ĝin sur la planko de la "Flava Ĉambro", la pruvo jam estis farita laŭ mia opinio, ke la murdinto volis fordirekti la suspekton al flanko de ĉi tiu maljuna servisto. Estas tio kio permesis al mi diri al tiu ĉi, se vi memoras tion, ke, ĉar oni trovis bereton en tiu ĉi fatala ĉambro, ĝi devis ŝajni al la lia, kaj doni al li priskribon de naztuko absolute simila al tiu kiun mi vidis lin uzi. Larsano kaj mi, ni estis en akordo ĝis tiam, sed ni ne plu estas de tiam, KAJ TIO BALDAŬ ESTOS TERURA, ĉar li tre sincere aliras al eraro kiun necesos al mi batali per nenio !

Mi miris pri la tre kaj tre serioza tono kiun mia juna amiko eldiris ĉi tiujn lastajn parolojn.

Li denove ripetis :

"JES, TERURA, TERURA !... Sed ĉu vere estas batali per nenio ke batali "per la ideo"!

En tiu momento ni pasis malantaŭ la kastelon. Jam noktiĝis. Fenestro de la unua etaĝo estis duonfermita. Malforta lumeto venis de tie, same kiel kelkaj bruoj kiuj kaptis nian atenton. Ni antaŭeniris ĝis ni atingis la embrazon de pordo kiu troviĝis sub la fenestro. Rultabio komprenigis min per vorto mallaŭte eldirita ke ĉi tiu fenestro rigardis al la ĉambro de F^{ino} Stangerson. La bruoj kiuj haltigis nin silentiĝis, poste rekomencis dum momento. Ili estis obtuzigitaj ĝemadoj... Ni povis kapti nur tri vortojn kiuj alvenis distingeble al ni : "Kompatinda Roberto mia !" Rultabio metis la manon sur mian ŝultron kaj sin klinis al mia orelo :

- Se ni povus scii, li diris al mi, tion kio estas dirata en tiu ĉambro, mia enketo rapide finiĝus...

Li rigardis ĉirkaŭ si; la vespera ombro envolvis nin; ni vidis apenaŭ pli for ol la mallarĝan gazonon borderita de arboj, kiu etendiĝis malantaŭ la kastelo. La ĝemadoj denove silentis.

- Ĉar oni ne povas aŭdi, daŭrigis Rultabio, oni almenaŭ tuj provos vidi...

Kaj li kuntiris min, signante al mi mallaŭtigi la bruon de miaj paŝoj, transe de la gazono ĝis la pala trunko de iu fortika betulo, kies oni videtis la blankan linion en la mallumo.

Ĉi tiu betulo stariĝis ĝuste antaŭ la fenestro kiu interesis nin kaj ĝiaj unuaj branĉoj estis preskaŭ ĉe la nivelo de la unua etaĝo de la kastelo. Supre sur tiuj branĉoj, oni certe povus vidi tion kio okazis en la ĉambro de F^{ino} Stangerson; kaj tia fakte estis la penso de Rultabio ĉar, ordoninte min resti muta, li brakumis la trunkon per siaj junaj viglaj brakoj kaj ekgrimpis. Li baldaŭ perdiĝis en la branĉoj, poste estis granda silento.

Tie, antaŭ mi, la duonfermita fenestro estis ankoraŭ lumita. Mi vidis neniun ombron pasi en tiu lumeto. La arbo super mi restis silenta; mi atendis; subite mia orelo sensis en la arbo ĉi tiujn vortojn :

- Post vi !...

- Post vi, mi petegas vin !

Oni interparolis, tie supre, super mia kapo... oni faris unu post la alia ĝentilaĵojn, kaj kia ne estis mia mirego vidi aperi sur la glata kolono de la arbo, du homaj formoj kiuj baldaŭ tuŝis la grundon ! Rultabio supreniris tute sola kaj malsupreniris "po du".

- Saluton, sinjoro Sinklero !

Li estis Frederiko Larsano... La policano jam okupis la observejon kiam mia juna amiko kredis alveni sola tien... Nek unu nek la alia cetere zorgis pri mia miro. Mi kredis kompreni ke ili spektis supre ĉe ilia observejo scenon plenan de tenereco kaj de malespero inter F^{ino} Stangerson, kuŝanta en ŝia lito, kaj S^{ro} Darzak ginue ĉe ŝia litkapo. Kaj jam ĉiu ŝajnis tre singarde tiri el tio malsamajn konkludojn.

Estis facile diveni ke tiu sceno kaŭzis grandan efekton en la menso de Rultabio favore al S^{ro} Roberto Darzak, dum en tiu de Larsano, ĝi atestis nur perfektan hipokritecon servita de supera arto de la fianĉo de F^{ino} Stangerson...

Kiam ni alvenis al la krado de la parko, Larsano haltigis nin :

- Mia irbastono ! li ekkriis...

- Ĉu vi forgesis vian irbastonon ? demandis Rultabio.

- Jes, respondis la policano... Mi lasis ĝin tie, apud la arbo...

Kaj li forlasis nin, dirante, ke li estis tuj kuniĝonta al ni...

- Ĉu vi rimarkis la irbastonon de Frederiko Larsano ? demandis la reportero kiam ni estis solaj. Ĝi estas tute nova bastono... kiun mi neniam vidis kun li... Li ŝajnas multe ŝati ĝin... li ne forlasas ĝin... Oni pensus ke li timas ke ĝi trafus en fremdajn manojn... Antaŭ tiu tago, mi neniam vidis irbastonon ĉe Frederiko Larsano... Kie li trovis tiun bastonon ? Ne estas nature ke viro kiu neniam kunportas irbastonon, ne plu faras paŝon sen irbastono, ĉe la morgaŭo de la krimo de la Glanejo... La tagon de nia alveno en la kastelo, kiam li ekvidis nin, li remetis sian horloĝon en sian poŝon kaj levprenis sian bastonon de la grundo, gesto al kiu mi eble malpravus taksi nenian gravecon !

Ni nun estis ekster la parko; Rultabio diris nenion... Lia penso, certe, ne forlasis la irbastonon de Frederiko Larsano. Mi ricevis

la pruvon kiam, malsuprenirante la deklivon de Epine, li diris al mi :

- Frederiko Larsano alvenis al la Glanejo antaŭ mi; li komencis sian enketon antaŭ mi; li havis tempon scii aferojn kiujn mi ne scias kaj povis trovi aferojn kiujn mi ne scias... Kie li trovis tiun irbastonon ?...

kaj li aldonis :

- Estas probable ke lia suspekto - pli ol lia suspekto, lia rezonado - kiu iras tiel rekte al Roberto Darzak, devas rilati de io palpebla kiun li palpas, "li", kaj kiun mi ne palpas, "mi"... Ĉu tio estus tiu bastono ?... Kie diable li sukcesis trovi tiun irbastonon ?

En Epine, necesis atendi la trajnon dum dudek minutoj; ni eniris en drinkejon. Preskaŭ tuj, malantaŭ ni, la pordo remalfermiĝis kaj Frederiko Larsano aperis svingante la nomitan irbastonon...

- Mi retrovis ĝin ! Li eligis ridante.

Ĉiuj tri, ni sidiĝis ĉe tablo. Rultabio ne deturnis la okulojn de la irbastono; li estis tiel enpena, ke li ne vidis interkonsentan signon kiun Larsano direktis al fervoja dungito, tre juna viro kies la mentono ornamigis per malgranda, malbone kombita, blonda kaprobarbo. La dungito stariĝis, pagis sian trinkaĵon, salutis kaj eliris. Mi mem taksintus nenian gravecan al ĉi tiu signo se ĝi ne estus revokita en mian memoron kelkajn monatojn pli poste, okaze de la reapero de la blonda kaprobarbulo dum unu el la plej tragikaj minutoj de ĉi tiu rakonto. Mi tiam sciigis ke la blonda kaprobarbulo estis agento de Larsano, komisiita de li por priatenti la venojn kaj revenojn de la vojaĝantoj en la stacidomo de Epine-sur-Orŝe, ĉar Larsano neglektis nenion pri tio kion li kredis utila por li.

Mi redirektis la okulojn al Rultabio.

- Ha tio ! sinjoro Freĉjo ! li diris, de kiam vi do havas irbastonon ?... Mi ĉiam vidis vin promenadi kun manoj en la poŝoj !

- Estas donaco kiun oni faris al mi, respondis la policano...

- Estas de nelonge, insistis Rultabio.

- Ne, oni donacis ĝin al mi en Londono...

- Estas vere, vi revenis el Londono, sinjoro Freĉjo... Ĉu oni povas vidi ĝin, vian irbastonon ?...

- Evidente...

Freĉjo transdonis la bastonon al Rultabio. Ĝi estis granda bambuflava irbastono kun bekforma tenilo, ornamita de orringo.

Rultabio atente esploris ĝin.

- Nu, li eligis, relevante ŝerceman kapon, oni donacis al vi en Londono irbastonon de Francio !

- Eblas, eligis Freĉjo, netimigebla...

- Legu la markon ĉi tie en minusklaj literoj : "Skatoleto, 6b, Operejo..."

- Oni fakte lavigas sian tolaĵon en Londono⁹, diris Freĉjo... la angloj povas same aĉeti siajn irbastonojn en Parizo...

Rultabio redonis la bastonon. Kiam li trovis mian kupeon, li diris al mi :

- Ĉu vi retenis la adreson ?

- Jes, "Skatoleto, 6b, Operejo... Fidu al mi, vi ricevos noton morgaŭ matene.

Dum la vespero mem, fakte, en Parizo, mi vidis S^{ron} Skatoletoⁿ, komerciston de irbastonoj kaj de pluvombreloj, kaj mi skribis al mia amiko :

"Iu viro kiu erarige respondanta al la priskribo de S^{ro} Roberto Darzak, saman staturon, iomete kurbiĝantan, saman laŭmakzelan barbon, mastikkoloran surtuton, bulĉapelon, venis aĉeti similan irbastonon, kiel tiu kiu interesas nin dum la vespero mem de la krimo, ĉirkaŭ la oka".

Sro Skatoleto tute ne vendis similan ekde du jaroj. La irbastono de Freĉjo estas nova. Temas do fakte pri tiu kiun li havas inter la manoj. Ne estas li kiu aĉetis ĝin ĉar li tiam troviĝis en Londono. Kiel vi, mi pensas ke li trovis ĝin ie ĉirkaŭ S^{ro} Roberto Darzak... Sed tiam, se kiel vi asertas tion, la murdinto estis en la "Flava Ĉambro" de la kvina, aŭ eĉ la sesa, ĉar la dramo okazis nur ĉirkaŭ noktomezo, la aĉetado de ĉi tiu bastono certigas nerefuteblan alibion al S^{ro} Roberto Darzak".

⁹ Tio estas franca esprimo de la XIX^a jarcento ŝajne parolante pri la riĉuloj.

13 - "La prepostejo nenion perdis pri sia ĉarmo, nek la ĝardeno pri sia brilo".

Ok tagojn post la okazaĵoj kiujn mi ĵus rakontis, ekzakte la 2^{an} de novembro, mi ricevis en mia hejmo en Parizo telegramon tiel vortigita : "Venu al la Glanejo per la unua trajno. Kunportu revolverojn. Amikaĵojn. Rultabio".

Mi jam diris al vi, mi kredas, ke en tiu epoko, juna advokato staĝanto kaj preskaŭ sen kazoj, mi vizitadis la Palacon, plivole por familiariĝi kun miaj profesiaj devoj, ol por defendi la vidvinon kaj la orfon¹⁰. Mi do ne povis miri ke Rultabio tiel disponis pri mia tempo; kaj li cetere sciis kiom mi ĝenerale interesiĝis pri liaj ĵurnalistikaj aventuroj, kaj ĉefe pri la afero de la Glanejo. Mi ricevis novaĵojn pri tio ĉi ekde ok tagoj nur per la sennombraj klaĉoj de la gazetoj kaj per kelkaj tre mallongaj notoj de Rultabio en *La Epoko*. Tiuj notoj diskonigis la baton de la "ŝafosto" kaj sciigis nin ke, post analizo, la spuroj lasitaj sur la ŝafosto riveliĝis "el homa sango"; estis sur ĝi freŝaj spuroj "el la sango de F^{ino} Stangerson"; la malnovaj spuroj devenis de aliaj krimoj povantaj datiĝi de pluraj jaroj...

Vi pensas ĉu la afero nutris la gazetaro de la tutmondo. Neniam fama krimo pli maltrankviligis la mensojn. Tamen vere ŝajnis al mi ke la enketo apenaŭ progresis; tial mi estus tre feliĉa pro la invito kiun mia amiko faris al mi por veni kunigi kun li al la Glanejo, se la depeŝo ne enhavis ĉi tiujn vortojn : "Kunportu revolverojn".

Jen kiu tre ĝenis min. Se Rultabio telegrafis al mi kunporti revolverojn, estis ĉar li antaŭvidis ke oni havus okazon uzi ilin.

Nu, mi konfesas ĝin sen honto : mi tute ne estas heroo. Sed kio ! Temis, tiun tagon, pri amiko, certe en embaraso, kiu sendube vokis min al lia helpo; mi apenaŭ hezitis; kaj post esti konstatinta ke la sola revolvero kiun mi posedis, estis bone pafpreta, mi direktiĝis al la stacidomo de Orleano. Dumvoje, mi pensis ke unu

10 Franca kutimdiro por esprimi la defendo de la kompatinduloj kaj la prematoj.

revolvero estis nur unu armilo kaj ke la depeŝo de Rultabio plurale postulis revolverojn; mi eniris ĉe armilvendisto kaj aĉetis bonegan etan armilon kiun mi jam antaŭĝojis donaci al mia amiko.

Mi esperis trovi Rultabioⁿ ĉe la stacidomo de Epine, sed li tute ne estis tie. Tamen kabrioleteto atendis min kaj mi baldaŭ estis en Glanejo. Neniu ĉe la krado. Estis nur sur la sojlo mem de la kastelo ke mi ekvidis la junulon. Li salutis min per amika gesto kaj tuj akceptis min en siaj brakoj, senbride demandante al mi novaĵojn pri mia sano.

Kiam ni estis en la malnova saloneto kiun mi parolis, Rultabio sidigis min kaj tuj diris al mi :

- Estas malbone !
- Kio estas malbone ?
- Ĉio !

Li alproksimiĝis al mi kaj konfidis en mia orelo :

"Frederiko Larsano ĝisfunde kulpigas S^{ro}n Robertoⁿ Darzak^{on}.

Tio tute ne estis por mirigi min, ekde kiam mi vidis la fianĉon de F^{ino} Stangerson paliĝi antaŭ la stupoj de siaj paŝoj.

Tamen, mi tuj observis :

- Nu ! Kaj pri la irbastono ?
- La irbastono ! Ĝi estas ankoraŭ inter la manoj de Frederiko

Larsano kiu ne forlasas ĝin...

- Sed... ĉu ĝi ne certigas alibion al S^{ro} Roberto Darzak ?

- Tute ne. S^{ro} Darzak, kviete pridemandita de mi, neas esti aĉetanta dum tiu vespero aŭ iu alia vespero, irbastonon ĉe Skatoleteto... Ĉiel ajn, eligis Rultabio, "mi ĵurus pri nenio" ĉar S^{ro} Darzak havas tiel strangajn silentojn ke oni ne precize scias tio kion necesas pensi pri tio kion li diras !

- En la spirito de Frederiko Larsano, tiu irbastono devas esti tre valora bastono, iu konvikta bastono... Sed per kiu aniero ? Ĉar, ĉiam pro la aĉeta horo, ĝi ne povis troviĝi inter la manoj de la murdanto...

- La horo ne malhelpas Larsanoⁿ... Li ne devas adopti mian sistemon kiu komencas per enirigi la murdonton en la "Flavan Ĉambron", inter la kvina kaj la sesa; kio malpermesas lin ja enirigi

lin tien inter la deka kaj la dekunua vespere ? Ĵus en tiu momento, S^{ro} kaj F^{ino} Stangerson helpitaj de ulĉjo Jakobo, realigis interesan kemian eksperimenton en tiu parto de la laboratorio okupita de la fornoj. Larsano diros ke la murdonto enŝteliĝis malantaŭ ili, tute neverŝajna kiel tio aspektas... Li jam aŭdigis tion al la enketjuĝisto... Kiam oni atente konsideras ĝin, ĉi tiu rezonado estas absurda, konsidere ke la kutimanto - se kutimanto estis - devis scii ke la profesoro estis baldaŭ forlasonta la pavilonon; kaj temis lia sekureco al li, kutimanto, prokrasti liajn agadojn post tiu foriro... Kial li riskintus trairi la laboratorion dum la profesoro troviĝis tie ? Kaj plie, kiam la kutimanto enirintus en la pavilonon ? ... Tiom da punktoj por klarigi antaŭ ol ili akcepti la imagon de Larsano. Mi ne perdos mian tempon, koncerne mi, ĉar mi havas nerefuteblan sistemon kiu tute ne permesas zorgi pri tiu imagaĵo !

Sed, ĉar mi momente devas silenti kaj ĉar Larsano kelkfoje parolas... eblus ke ĉio fine klariĝus kontraŭ S^{ro} Darzak... se mi ne estus tie ĉi ! aldonis la junulon kun orgojlo. Ĉar estas kontraŭ tiu S^{ro} Darzak aliaj "eksteraj signoj" alie teruraj ol tiu afero de irbastono kiu restas al mi nekomprenebla, des pli nekomprenebla ke Larsano ne ĝenas sin por aperi antaŭ S^{ro} Darzak kun tiu irbastono kiu estus apartenanta al S^{ro} Darzak mem ! Mi komprenas multajn aferojn en la sistemo Larsano, sed mi ankoraŭ ne komprenas la bastonon.

- Ĉu Frederiko Larsano estas ankoraŭ en la kastelo ?

- Jes; li apenaŭ forlasis ĝin ! Li dormas ĉi tie, laŭ la petego de S^{ro} Stangerson. S^{ro} Stangerson faris por li, tion kion S^{ro} Roberto Darzak faris por mi. Akuzita de Frederiko Larsano ke li konis la murdinton kaj permesis lian eskapon, S^{ro} Stangerson volis faciligi sian akuzanton ĉiujn rimedojn por atingi al la malkovro de la vero. Tiel S^{ro} Roberto Darzak agas kun mi.

- Sed ĉu vi ja estas konvinkita pri la senkulpeco de S^{ro} Roberto Darzak ?

- Mi momente kredis al la ebleco de sia kulpeco. Estis ĉe la horo mem kiam ni alvenis ĉi tie por la unua fojo. La momento alvenis por rakonti al vi tion kio okazis inter S^{ro} Darzak kaj mi.

Nune Rultabio sin interrompis kaj demandis al mi ĉu mi alportis la armilojn. Mi montris al li la du revolverojn. Li ekzamenis ilin, diris "Perfekte !" kaj redonis ilin al mi.

- Ĉu ni bezonas ilin ? mi demandis.

- Sendube ĉi-nokte; ni tranoktos ĉi tie; ĉu tio ne ĝenas vin ?

- Kontraŭe, mi eligis kun grimaco kiu kaŭzis la ridadon de

Rultebion.

- Nu ! Nu ! li rekomencis, ne estas la momento por ridi. Ni parolu serioze. Ĉu vi rememoras tiun frazon kiu estis la "Sezamo, malfermiĝu !" de ĉi tiu kastelo plena de mistero ?

- Jes, mi diris, perfekte, "La prepostejo nenion perdis pri sia ĉarmo, nek la ĝardeno pri sia brilo". Estas ankoraŭ tiu frazo duone brunbrulita, kiun vi trovis sur papero en la karboj de la laboratorio.

- Jes, kaj malsupre de tiu papero, la flamo ne difektis tiun daton : "23^a de oktobro". Memoru ĉi tiun daton kiu estas tre grava. Mi nun tuj diros al vi pri tion kio estas pri ĉi tiu stranga frazo. Mi ne scias ĉu vi scias ke antaŭhieraŭ tago de la krimo, tio estas la 23^a, S^{ro} kaj F^{ino} Stangerson iris al kunveno en la Elizeo. Ili eĉ ĉeestis ĉe la vespermanĝo, mi vere kredas. Ĉiaokaze ili restis ĉe la kunveno, "ĉar mi tie vidis ilin". Mi ja ĉeestis tie pro profesia devo. Mi devis intervjui unu el tiuj scienculoj de la Akademio de Filadelfio kiun oni festis tiun tagon. Ĝis tiu tago, mi neniam vidis nek S^{ron} nek F^{inon} Stangerson^{on}. Mi sidis en la salono kiu antaŭas la salono de la Ambasadoroj, kaj laca pro esti puŝpelita de tiom da noblaj eminentuloj, mi min allasis al svaga revado kiam mi sentis la parfumon de la Sinjorino en Nigro". Vi demandas al mi: "Kio estas la parfumo de la Sinjorino en Nigro ?" Sufiĉu al vi scii ke estas parfumo kiun mi multe ŝatis, ĉar ĝi estis tiu de sinjorino ĉiam nigre vestita, kiu manifestis al mi kelkan patrinan bonecon en mia unua junaĝo. La sinjorino, kiu tiu tago, estis diskrete sorbita de la "parfumo de la Sinjorino en Nigro", estis blanke vestinta. Ŝi estis mirinde bela. Mi ne sukcesis retenigi min stariĝi kaj sekvi ŝin, ŝin kaj ŝian parfumon. Viro, iu maljunulo, donis la brakon al ĉi tiu belulino. Ĉiu deturnis sin laŭ ilia irado, kaj mi aŭdis ke oni

murmuris : "Estas la profesoro Stangerson kaj lia filino !" Tiel mi sciigis kiu mi sekvis. Ili renkontis S^{ron} Robertoⁿ Darzak^{on} kiun mi laŭvide konis. La profesoro Stangerson, algluiĝinta de unu el la usonaj scienculoj, Arturo-Vilhelmo Ranco, sidiĝis en fotelon de la granda galerio, kaj S^{ro} Roberto Darzak kuntiris F^{inon} Stangerson en la forcejojn. Mi ankoraŭ sekvis. Estis tiun vesperon tre milda vetero; la pordoj al la ĝardeno estis malfermitaj. F^{ino} Stangerson surmetis delikatan ŝaeton sur ŝiajn ŝultrojn, kaj mi bone vidis ke estas ŝi kiu petis S^{ron} Darzak^{on} eniri kun ŝi en la preskaŭ soleco de la ĝardeno. Mi ankoraŭ sekvis, interesita pro la ekscitiĝo kiun tiam vidigis S^{ro} Roberto Darzak. Ili nun iris per malrapidaj paŝoj laŭlonge de la muro kiu laŭiras la avenuo Marigni. Mi iris tra la centra aleo. Mi paŝis paralele kun miaj du personoj. Kaj poste, mi "trairis" tra la gazono por renkontpasi ilin. La nokto estis malluma, la herbo sufokis miajn paŝojn. Ili estis haltitaj en la flagranta lumeco de gaslampo kaj ŝajnis, ambaŭ klinantaj al papero kiun tenis F^{ino} Stangerson, legi ion kiu tre interesis ilin. Mi haltis, ankaŭ mi. Mi estis ĉirkaŭita de ombro kaj silento. Ili tute ne rimarkis min, kaj mi klare aŭdis F^{inon} Stangerson kiu ripetis refaldante la paperon : "La prepostejo nenion perdis pri sia ĉarmo, nek la ĝardeno pri sia brilo !" Kaj tio estis dirita kun tono samtempe tiel pikema kaj tiel senespera, kaj estis sekvita de ekrido tiel nervoza ke mi vere kredas ke tiu frazo ĉiam restos en mia orelo. Sed ankoraŭ alia frazo estis eldirita, tiu ĉi de S^{ro} Roberto Darzak : "Ĉu necesos do al mi, por meriti vin, fari krimon ? S^{ro} Roberto Darzak estis en eksterordinara ekscitiĝo; li prenis la manon de F^{ino} Stangerson, longdaŭre alportis ĝin al siaj lipoj, kaj mi pensis, per la movado de liaj ŝultroj, ke li ploris. Poste, ili foriris.

Kiam mi alvenis en la grandan galerion, daŭrigis Rultabio, mi ne plu vidis S^{ron} Robertoⁿ Darzak^{on}, kaj mi devi nur revidi lin en la Glanejo, post la krimo, sed mi ekvidis F^{inon} Stangerson, S^{ron} Stangers^{on} kaj la delegitojn de Filadelfio. F^{ino} Stangerson estis apud Arturo Ranco. Tiu ĉi vigle parolis al ŝi kaj la okuloj de la usonanino, dum tiu konversacio, brilis per aparta brilo. Mi vere kredas ke F^{ino}

Stangerson eĉ ne aŭskultis tion kion diris al ŝi Arturo Ranco kaj ŝia vizaĝo esprimis perfektan indiferentecon. Arturo-Vilhelmo Ranco estas sangvina viro, kun kuperoza vizaĝo; li verŝajne ŝatas ĝinon. Kiam S^{ro} kaj F^{ino} Stangerson estis foririntaj, li direktis sin al la bufedo kaj ne plu forlasis ĝin. Mi kuniĝis al li kaj faris al li kelkajn servojn en tiu svarmo. Li dankis min kaj sciigis min ke li reforiris al Usono tri tagojn pli poste, tio estas la 26^a (la morgaŭo de la krimo). Mi parolis al li pri Filadelfio; li diris al mi ke li loĝis en ĉi tiu urbo de dudek kvin jaroj, kaj ke estis tie kie li konatiĝis kun la fama profesoro Stangerson kaj lian filinon. Post tio li reprenis ĉampanon kaj mi kredis ke li neniam haltus drinki. Mi forlasis lin kiam li estis preskaŭ ebria.

Tiel estis mia vespero, kara amiko mia. Mi ne scias per kia precizeco la duoblan bildon de S^{ro} Roberto Darzak kaj de F^{ino} Stangerson tute ne forlasis min nokte, kaj mi lasas vin pensi pri la efiko kiun kaŭzis al mi la novaĵo pri la murdo de F^{ino} Stangerson. Kiel ne rememori al mi tiujn vortojn : "Ĉu necesos al mi, por meriti vin, fari krimon ?" Tamen, ne estas tiu frazo kiun mi diras al la S^{ro} Roberto Darzak kiam ni renkontis lin en la Glanejo. Tiu en kiu temas pri prepostejo kaj pri la brila ĝardeno, kiun F^{ino} Stangerson ŝajnis esti leganta sur la papero kiun ŝi tenis en mano, sufiĉis por larĝe malfermi la pordojn de la kastelo. Ĉu mi kredis en tiu momento, ke S^{ro} Roberto Darzak estis la murdinto ? Ne ! Mi ne pensas esti tute kredanta tio. Ĉe tiu momento, mi serioze pensis pri "nenio". Mi estis tiom malmulte dokumentita. "Sed mi bezonis" ke li tuj pruvu al mi ke li ne estis vundita ĉe la mano. Kiam ni ambaŭ estis solaj, mi rakontis al li tio kion la hazardo surprizigis al mi pri lia konversacio en la ĝardenoj de la Elizeo kun F^{ino} Stangerson; kaj kiam mi estis dirinta al li ke mi aŭdis tiujn vortojn : "Ĉu necesos al mi, por meriti vin, fari krimon ?" li ekestis tute konsternita, sed certe multe malpli ol li estis per la frazo de la "prepostejo". Tio kio ĵetis lin en vera konsterniĝo estis sciigi el mia buŝo, ke la tago kiam li estis renkontiĝonta en la Elizeo kun F^{ino} Stangerson, ĉi tiu posttagmeze iris al poŝtoficejo 40, serĉi leteron kiu eble estis tiu kiun ili ambaŭ legis en la ĝardenoj de la

Elizeo, kaj kiu finiĝis per tiuj vortoj : "La prepostejo nenion perdis pri sia ĉarmo, nek la ĝardeno pri sia brilo". Ĉi tiu hipotezo cetere konfirmiĝis de tiam al mi per la malkovro kiun mi faris, vi memoras, en la karboj de la laboratorio, de peco de tiu letero kiu surhavis la daton de la 23^a de oktobro. La letero estis skribita kaj deprenita de la oficejo la saman tagon. Tute ne estas dubo ke revenante de la Elizeo, tiun saman nokton, F^{ino} Stangerson volis bruligi ĉi tiun kompromitan paperon. Estas vane ke S^{ro} Roberto Darzak neis ke ĉi tiu letero havis ian ajn rilaton al la krimo. Mi diris al li ke en iu tiel mistera afero, li ne rajtas kaŝi al justico la incidenton de la letero; ke mi ja estis konvinkita ke tiu ĉi havis gravan signifon; ke la senespera tono per kiu F^{ino} Stangerson eligis la fatalan frazon, ke liaj ploroj, al li, Roberto Darzak, kaj ke ĉi tiu minaco de krimo kiun li elkraĉis sekve de la legado de la letero, ne permesis al mi dubi pri tio. Roberto Darzak estis pli kaj pli ekscitita. Mi decidis profiti de mia avantaĝo.

Vi devis edziĝi, sinjoro, mi diris kvazaŭneglekte, sen pli rigardi mian interparolanton, kaj subite tiu ĉi edziĝo fariĝas neebla pro la aŭtoro de tiu letero, ĉar tuj post la legado de la letero, vi parolas pri necesa krimo por meriti F^{inon} Stangerson. ESTAS DO IU INTER VI KAJ F^{INO} STANGERSON, IU KIU MALPERMESAS ŜIN EDZINIĜI, IU KIU MORTIGAS ŜIN ANTAŬ OL ŜI EDZINIĜU !

Kaj mi finis ĉi tiun etan paroladon per ĉi tiuj vortoj : "Nun, sinjoro, vi devas nur konfidi al mi la nomon de la murdinto !"

Mi verŝajne, sen suspekti tion, diri timigajn aferojn. Kiam mi relevis la okulojn direkte al Roberto Darzak, mi vidis konsternitan vizaĝon, ŝvitan frunton, timegajn okulojn.

Sinjoro, li diris al mi, mi tuj demandos al vi ion kio eble ŝajnos al vi sensenca, sed kontraŭ kio mi donus mian vivon : necesas ne paroli antaŭ la juĝistoj pri tio kion vi vidis kaj aŭdis en la ĝardenoj de la Elizeo... nek antaŭ la juĝistoj, nek antaŭ iu ajn en la mondo. Mi ĵuras al vi ke mi estas senkulpa kaj mi scias, kaj mi sentas, ke vi kredas min, sed mi pli bone preferus esti rigardata kiel kulpa ol vidi la suspektojn de justico erarvagi pro tiu frazo : "La prepostejo nenion perdis pri sia ĉarmo, nek la ĝardeno pri sia

brilo". Necesas ke la justico nesciu ĉi tiun frazon. Tiu ĉi tutan afero apartenas al vi, sinjoro, mi donas ĝin al vi, sed forgesu la vesperon de la Elizeo. Estos por vi cent aliaj vojoj ol tiu, kiuj kondukos vin al la malkovro de la krimulo; mi malfermos ilin al vi, mi helpos vin. Ĉu vi volas lokiĝi ĉi tie ? Paroli ĉi tie kiel mastro ? Manĝi, dormi ĉi tie ? Spioni miajn agojn kaj la agojn de ĉiuj ? Vi estos en la Glanejo kvazaŭ vi estus la mastro, sinjoro, sed forgesu la vesperfeston de la Elizeo.

Rultabio, ĉi tie, ĉesis por iomete spiri. Mi nun komprenis la neklarigeblan konduton de S^{ro} Roberto Darzak rilate al mia amiko, kaj la facilecon per kiu tiu ĉi sukcesis loĝiĝi sur la loko de la krimo. Ĉio kion mi ĵus sciigis, povis nur eksciti mian scivolemon. Mi petis Rultabion ankoraŭ kontentigi ĝin. Kio okazis en la Glanejo ekde ok tagoj ? Ĉu mia amiko ne diris al mi ke estis nun kontraŭ S^{ro} Darzak eksteraj signoj, alie teruraj ol tiu de la irbastono trovita de Larsano ?

- Ĉio ŝajnas sin direkti malfavore al li, respondis al mi mia amiko, kaj la situacio fariĝas ekstreme serioza. S^{ro} Roberto Darzak ŝajnas tute ne supermezure zorgi pri tio; li malpravas; sed nenio interesas lin krom la sano de F^{ino} Stangerson kiu ĉiutage pliboniĝis kiam ekaperis okazaĵo ankoraŭ pli mistera ol la mistero de la "Flava Ĉambro" !

- Ne eblas ! mi ekkriis, kaj kia evento povas esti pli mistera ol la mistero de la "Flava Ĉambro" ?

- Ni unue reiru al S^{ro} Roberto Darzak, eligis Rultabio, kvietigante min. Mi diris al vi ke ĉio sin direktas malfavore al li. "La elegantaj paŝoj" mezuritaj de Frederiko Larsano vere ŝajnas esti "la paŝoj de fianĉo de F^{ino} Stangerson". La postsigno de la biciklo povas esti la spuro de "lia" biciklo; la afero estis kontrolita. Ekde kiam li havis ĉi tiun biciklon, li ĉiam lasis ĝin en la kastelo. Kial esti kunpreninta ĝin al Parizo ĝuste en tiu momento ? Ĉu li ne plu devis reveni al la kastelo ? Ĉu la rompiĝo de lia geedziĝo devis kaŭzi la rompo de liaj rilatoj kun la Stangerson ? Ĉiu el la koncernatoj asertas ke ĉi tiuj rilatoj devis daŭri. Tiam ? Frederiko Larsano, li, kredas ke "ĉio estis rompita". De la tago

kiam Roberto Darzak akompanis F^{ion} Stangerson ĉe la ĉiovendejoj de Lupino, ĝis la morgaŭo de la krimo, la ekfianĉo tute ne revenis en la Glanejon. Memori ke F^{ino} Stangerson perdis sian retikulon kaj la ŝlosilon kun kupra kapo kiam ŝi estis kun S^{ro} Roberto Darzak. De tiu tago ĝis la vesperfestoj de la Elizeo, la profesoro al la Sorbono kaj F^{ion} Stangerson tute ne vidis unu la alian. Sed ili eble skribis unu al la alia. F^{ion} Stangerson iris serĉi poŝtrestantan leteron ĉe la poŝtoŭicejo 40, leteron kiun Frederiko Larsano kredas de Roberto Darzak, ĉar Frederiko Larsano kiu evidente scias nenion pri tio kio okazis en la Elizeo, estas instigita pensi ke estas Roberto Darzak mem kiu ŝtelis la retikulon kaj la ŝlosilon, kun la intenco cedi la volon de F^{ion} Stangerson akaparante la plej valorajn paperojn de la patro, paperojn kiujn li estus redonantaj sub kondiĉo de geedziĝo. Ĉio tio estus el tre duba kaj preskaŭ absurda hipotezo, kiel diri al mi la fama Freĉjo mem, se ne estis ankoraŭ aliaĵo, kaj aliaĵo multe pli serioza.

Unue, stranga afero, kaj kiun mi ne sukcesas klarigi al mi : estus S^{ro} Darzak mem kiu, la 24^a, irintus peti la leteron al la poŝtoŭicejo, leteron kiu estis jam antaŭtagon deprenita de F^{ino} Stangerson; la priskribo de la viro kiu prezentiĝis ĉe la giĉeto, respondas, punkton post punkto, al la priskribo de S^{ro} Roberto Darzak. Ĉi-tiu, al la demandoj kiuj estis metitaj al li de la enketjuĝisto, nur kiel simpla informo, neas ke li iris al la poŝtoŭicejo; kaj mi ja kredas al S^{ro} Roberto Darzak, ĉar eĉ akceptante ke la letero estis skribita de li - tio kion mi ne pensas - li sciis ke F^{ino} Stangerson deprenis ĝin, ĉar li vidis ĝin, tiun leteron, inter ŝiaj manoj, en la ĝardenoj de la Elizeo. Ne do estas li kiu prezentiĝis, la morgaŭon 24^{an}, al la oficejo 40 por peti leteron kiun li sciis ne esti tie. Laŭ mi, estas iu kiu strange similis lin, kaj fakte estas la ŝtelisto de la retikulo kiu en tiu letero devis peti ion al la posedanto de la retikulo, F^{ino} Stangerson - "ion kiun li ne vidis veni". Li devis miregi, kaj estis instigita demandi al si ĉu la letero kiun li ekspedis kun ĉi tiu surskribo sur la koverto : M.A.T.S.N. estis deprenita. Tial lia klopodo al la poŝtoŭicejo kaj la insistado per kiu li postulis la leteron. Poste li foriras, furioza. La letero estis deprenita, kaj tamen tio

kion li petis, ne estis konsentita al li ! Kion li petis ? Neniu scias tion, krom F^{ino} Stangerson. Ĉiaokaze, la morgaŭon, oni eksciis ke F^{ino} Stangerson estis preskaŭ murdita dum la nokto, kaj mi ja malkovris, la postmorgaŭon, ke la profesoro estis samokaze ŝtelita, dank'al ĉi tiu ŝlosilo, objekto de la poŝtrestanta letero. Tiel, vere ŝajnas, ke la viro kiu venis al la poŝtoŭficejo, devas esti la murdinto; kaj tiu tuta rezonado, entute el la plej logikaj, pri la kialoj de la klopodo de la viro al la poŝtoŭficejo, Frederiko Larsano konceptis ĝin, sed aplikante ĝin al Roberto Darzak. Vi bone opinias ke la enketjuĝisto, kaj ke Larsano, kaj ke mi mem faris ĉion havi ĉe la poŝtoŭficejo, precizajn detalojn pri la strangulo de la 24^a de oktobro. Sed oni ne sukcesis scii de kie li venis, nek kien li foriris ! Ekster tiu priskribo kiu similigis lin al S^{ro} Roberto Darzak, nenio ! Mi anoncigis en la plej ĉefaj ĵurnaloj : "Forta rekompenco estas promesita al la koĉero kiu kondukis klienton al la poŝtoŭficejo 40, en la mateno de la 24^a de oktobro, ĉirkaŭ la deka. Sin direkti al la redakciejon de *La Epoko*, kaj peti S^{ron} R". Tio rezultigis nenion. Fine, tiu viro eble venis piede; sed ĉar li urĝiĝis, estis ŝanco por provi ke li venis per veturilo. En mia noto al la ĵurnaloj, mi ne enmetis la priskribon de la viro por ke ĉiuj koĉeroj kiuj povis, ĉirkaŭ tiu horo, esti veturiginta klienton al la oficejo 40, venu al mi. Ne unu venis al mi. Kaj mi demandis al mi nokte kaj tage : "Kiu do estas tiu viro kiu aspektas tiel strange kiel S^{ro} Roberto Darzak kaj kiun mi retrovas aĉetanta la bastonon falinta inter la manoj de Frederiko Larsano ? Lin plej grava el ĉio estas ke S^{ro} Darzak, kiu devis fari, samtempe je la horo kiam sia socio prezentiĝis ĉe la poŝtoŭficejo, kurson al la Sorbono, ne faris tion. Unu el liaj amikoj anstataŭis lin. Kaj kiam oni pridemandas lin pri la uzado de lia tempo, li respondas ke li promenis en la bosko de Bulonjo.

Kion vi opinias pri ĉi tiu instruisto kiu anstataŭigas sin je sia kurso por iri promeni en la bosko de Bulonjo ? Fine, necesas ke vi sciu ke se S^{ro} Roberto Darzak konfesas esti irinta promeni en la bosko de Bulonjo dum la mateno de la 24^{an}, li tute ne plu kapablas doni la uzadon de sia tempo dum la nokto de la 24^{an} ĝis la 25^{an} !... Li tre

kvierte respondis al Frederiko Larsano kiu pridemandis al li ĉi tiun informon, ke tio kion li faris dum sia tempo, en Parizo, koncernas nur lin... Post tio, Frederiko Larsano ĵuris tute laŭte ke li certe malkovrus, li sen helpo de iu ajn, la uzadon de tiu tempo. Ĉio tio ŝajnas doni iom da konsisto al la hipotezoj de la granda Freĉjo; des pli ke la fakto de Roberto Darzak troviĝanta en la "Flava Ĉambro", povus veni konfirmi la klarigon de la policano pri la maniero laŭ kiu la murdinto eskapintus : S^{ro} Stangerson lasintus lin pasi por eviti teruran skandalon ! Estas cetere ĉi tiu hipotezo, kiun mi kredas falsa, kiu foreraras Frederikoⁿ Larsanoⁿ, kaj tio ne estus por malkontenti min, se ne koncernus senkulpulo. Nu, ĉu ĉi tiu hipotezo vere foreraras Frederikoⁿ Larsanoⁿ ? Jen ! Jen ! Jen !

- He ! Frederiko Larsano eble pravas ! mi ekkriis interrompante Rultabioⁿ... Ĉu vi certas ke S^{ro} Darzak estas senkulpa ? Ŝajnas al mi ke jen multaj embarasaj koincidoj...

- La koincidoj, respondis mia amiko, estas la plej malbonaj malamikoj de la vero.

- Kion hodiaŭ pensas la enketjuĝisto ?

- S^{ro} de Marketo, la enketjuĝisto, hezitas senmaskigi S^{ron} Robertoⁿ Darzak^{on} sen ia ajn certa pruvo. Ne nur li havus kontraŭ li la tutan publikan opinion, sen enkalkuli la Sorbonon, sed plie S^{ro} Stangerson kaj F^{ino} Stangerson. Tiu ĉi amegas S^{ron} Robertoⁿ Darzak^{on}. kiom ajn malmulte ŝi vidis la murdanton, oni malfacile kredigus al la publiko ke ŝi tute ne rekonis S^{ron} Robertoⁿ Darzak^{on}, se la S^{ro} Roberto Darzak estis la agresanto. La "Flava Ĉambro" estis malluma, sendube, sed noktolampeto tamen lumigis lin, ne forgesu tion. Jen, mia amiko, kie estis la aferoj kiam, antaŭ tri tagoj, aŭ pli ĝuste tri noktoj, ekaperis tiun nekredeblan okazaĵon pri kiu mi antaŭ momento parolis al vi ?

14 - "Mi atendas la murdinton tiun ĉi vesperon".

- Necesas, diris al mi Rultabio, ke mi konduku vin en la lokon, por ke vi povu kompreni aŭ pli ĝuste por ke vi estu persvadita ke ne eblas kompreni. Mi kredas, laŭ mi, esti trovinta tion kion ĉiuj ankoraŭ serĉas : la maniero laŭ kiu la murdinto eliris el la "Flava Ĉambro"... sen ia ajn komplikeco kaj sen ke S^{ro} Stangerson estu en la afero por io ajn. Tiel longe kiel mi tute ne certas pri la personeco de la murdinto, mi ne kapablas diri kiu estas mia hipotezo, sed mi kredas tiun hipotezon ĝustan kaj, ĉiaokaze, ĝi estas tute natura, mi volas diri tute simpla. Koncerne tion kiu okazis antaŭ tri noktoj, ĉi tie, en la kastelo mem, tio ŝajnis al mi dum dudek kvar horoj superi ĉian imagpovon. Kaj eĉ, la hipotezo kiu nun leviĝas el la fundo de mia mio, estas tiel absurda ke mi preskaŭ preferas la tenebron de la neklarigeblaĵo.

Post tio, la juna reportero invitis min eliri; li ĉirkaŭirigis min ĉirkaŭ la kastelon. Sub niaj piedoj kraketis la mortajn foliojn; estis la sola bruo kiun mi aŭdis. Oni estis diranta ke la kastelo estis forlasita. Tiuj malnovaj ŝtonoj, tiu akvo stagnanta en la fosaĵoj kiuj ĉirkaŭis la ĉefturon, tiu neloĝata tero kovrita de la restaĵoj de la lasta somero, la nigra skeleto de la arboj, ĉio kunagis por doni al ĉi tiu malĝoja loko, hantita de sovaĝa mistero, la aspekto la plej funebra. Dum ni ĉirkaŭiris la ĉefturon, ni renkontis la "verdan viron", la gardiston, kiu tute ne salutis nin kaj kiu pasis apud ni kvazaŭ ni ne ekzistus. Li estis tiel kiel mi vidis lin ĉe la unua fojo, tra la fenestraj vitroj de la gastejo de Ulĝo Mateo; li ankoraŭ portis sian fusilon traŝultre, sian pipon en la buŝo kaj sian nazumon sur la nazo.

- Stranga birdo ! mallaŭte diris al mi Rultabio.

- Ĉu vi parolis al li ? mi demandis.

- Jes, sed estas nenio por eltiri de li... Li respondas per grumbladoj, ŝultrumas kaj foriras. Li kutime loĝas ĉe la unua etaĝo de la ĉefturo, granda ĉambro kiu antaŭe servis kiel oratorio. Li vivas tie kiel krudulo, eliras nur kun sia fusilo. Li estas afabla

nur kun la knabinoj. Sub la preteksto postkuri post ŝtelĉasistoj, li ofte ellitiĝas nokte; sed mi suspektas lin aranĝi amorajn rendezvuojn. La ĉambristino de F^{ino} Stangerson, Silvia, estas lia amorantino. Nuntempe li tre amsopiras pri la edzino de ulĉjo Mateo, la gastejestro; sed la ulĉjo Mateo zorge priatentas sian edzinon, kaj mi vere kredas ke estas la preskaŭ neebleco en kiu la "verda viro" troviĝas por proksimiĝi al S^{ino} Mateo, kiu faras lin ankoraŭ pli malgaja kaj silentema. Li estas bela knabo, bone zorgema pri si mem, preskaŭ eleganta... la virinoj, je kvar leŭgoj ĉirkaŭe, ŝategas tion.


Post esti preterpasinta la ĉefturon kiu trovigas ĉe la ekstremo de la maldekstra alo, ni pasis sur la malantaŭon de la kastelo. Rultabio diris al mi, montrante al mi fenestron kiun mi rekonis kiel estanta unu el tiuj kiuj rigardas al apartamentoj de F^{ino} Stangerson.

- Se vi pasintus ĉi tie antaŭ du noktoj, je la unua matene, vi vidintus min mem ĉe la supro de ŝtupetaro sin pretigantan eniri en la kastelon tra ĉi tiu fenestro !

Ĉar mi esprimis kelkan konsternon pri tiu nokta gimnastiko, li petegis min esti pli observema pri la ekstera dispozicio de la kastelo, post kiam ni revenis en la konstruaĵo.

- Necesas nun, diris mia amiko, ke mi vizitigu al vi la unuan etaĝon, dekstran alon. Estas tie kie mi loĝas.

Por bone komprenigi la aranĝon de la lokoj, mi metas sub la okuloj de la legantoj planon de la unua etaĝo de tiu dekstra alo, planon desegnita de Rultabio ĉe la morgaŭo de la eksterordinara fenomeno kiun vi tuj konos laŭ ĉiuj ĝiaj detaloj :



1a Etaĝo de la kastelo

1. Loko kie Rultabio metis Frederikoⁿ Larsanoⁿ.

2. Loko kie Rultabio metis ulĉjon Jakoboⁿ.

3. Loko kie Rultabio metis S^{ron} Stangerson.

4. Fenestro tra kiu Rultabio eniris.

5. Fenestro trovita malfermita de Rultabio kiam li eliras el sia ĉambro. Li refermas ĝin. Ĉiuj aliaj fenestroj kaj pordoj estas fermitaj.

6. Teraso superelstaranta korbelaĉambro ĉe la teretaĝo.

Rultabio signis min por supreniri malantaŭ li, la duobla monumenta ŝtuparo, kiu, ĉe la alteco de la unua etaĝo, formis interŝtuparon. De tiu interŝtuparo, oni rekte iris al dekstra alo aŭ la maldekstra alo de la kastelo tra galerio kiu tie enbuŝiĝis. La galerio, alta kaj larĝa, kuŝiĝis laŭlonge de la tuta konstruaĵo kaj kaptis la taglumo ĉe la norde orientita fasado de la kastelo. La ĉambroj kies fenestroj rigardis suden havis siajn pordojn al ĉi tiu galerio. La profesoro Stangerson loĝis en la maldekstra alo de la kastelo. F^{ino} Stangerson havis sian apartamenton en la dekstra alo. Ni eniris en la galerion, dekstran alon. Mallarĝa tapiŝo, ĵetita sur la vaksita pargeto kiu brilis kiel spegulo, mallaŭtigis la bruon de niaj paŝadoj. Rultabio mallaŭte diris al mi, diskrete paŝadi ĉar ni preterpasis antaŭ la ĉambro de F^{ino} Stangerson. Li klarigis al mi ke la apartamento de F^{ino} Stangerson konsistis el ŝia dormoĉambro, iu antaŭĉambro, iu malgranda banĉambro, iu buduaro kaj iu salono. Oni povis, kompreneble, pasi de unu el tiuj ĉambroj al la alia sen nepre pasi pere de la galerio. La salono kaj la antaŭĉambro estis la solaj ĉambroj de la apartamento kiuj havis pordon al la galerio. La galerio daŭris tute rekte ĝis la orienta ekstremo de la konstruaĵo, kie ĝi kaptis la eksteran taglumon tra alta fenestro (fenestro 2 de la plano). Ĉirkaŭ la du trionoj de ĝia longeco, tiu ĉi galerio renkontis laŭ orto kun alia galerio kiu turnis kun la dekstra alo de la kastelo.

Por la klareco de ĉi tiu rakonto ni nomos la galerion kiu iras de la ŝtuparo al la orienta fenestro, "la rekta galerio" kaj la parto de galerio kiu turnas kun la dekstra alo kaj kiu finiĝas ĉe la rekta galerio laŭ orto, "la turnanta galerio". Estis ĉe la vojkruciĝo de ĉi

tiuj du galerioj ke troviĝis la ĉambro de Rultabio, tuŝante tiun de Frederiko Larsano. La pordoj de tiuj du ĉambroj rigardis al la turnanta galerio, dum la pordoj de la apartamento de F^{ino} Stangerson rigardis al la rekta galerio (vidu la planon).

Rultabio puŝis la pordon de sia ĉambro, enirigis min kaj refermis la pordon malantaŭ nin, ŝovante la riglilon. Mi ne eĉ havis tempon ekrigardi al lia instalaĵo, ke li eligis krion de surprizo montrante al mi, sur ronda tableto, nazumo.

- Kio tio estas ? li demandis al si; kion tiu nazumo venis fari sur mia ronda tableto ?

Mi estintus tre ĝenita por respondi al li.

- Krom se, li eligis, krom se... krom se... krom se tiu ĉi nazumo estu "tio kion mi serĉas"... kaj ke... kaj ke... kaj ke tio estas nazumo de presbiopulo !...

Li proprasence ĵetis sin sur la nazumon; liaj fingroj karesis la konveksecon de la vitroj... kaj tiam li timige rigardis min.

- Ho !... Ho !

Kaj li ripetis : Ho !... Ho ! kvazaŭ lia penso subite frenezigis lin...

Li stariĝis, metis al mi la manon sur la ŝultron, rikanis kiel frenezulo kaj diris al mi :

- Ĉi tiu nazumo frenezigos min ! ĉar la afero eblas, komprenu, "matematike parolanta"; sed "home parolanta" ĝi ne eblas... aŭ tiam... aŭ tiam... aŭ tiam...

oni frapis du batetojn ĉe la pordo de la ĉambro, Rultabio malfermetis la pordon; vizaĝo trapasis. Mi rekonis la pordistinton kiun mi vidis pasi antaŭ mi kiam oni alkondukis ŝin al la pavilono por la pridemandado, kaj mi estis mirigita pri tio ĉar mi ankoraŭ kredis tiun virinon en karcero. Ĉi tiu virino diris tre mallaŭte :

- En la sulko de la pargeto !

Rultabio respondis "Dankon !", kaj la vizaĝo foriris. Li returnis sin al mi post esti zorge refermanta la pordon. Kaj li eldiris nekompreneblajn vortojn kun delira mieno.

- Ĉar la afero "matematike" eblas, kial ĝi ne eblas "home" !... Sed se la afero eblas "home", la afero estas bonega !

Mi interrompis Rultabio" en lia monologo :

- La gepordistoj do estas liberaj, nun ? mi demandis.

- Jes, respondis al mi Rultabio, mi reliberigis ilin. Mi bezonas lojalajn homojn. La virino estas tute sindona al mi kaj la pordisto mortigus sin por mi... Kaj ĉar la nazumo havas vitrojn por presbiopulo, mi certe bezonos sindonajn homojn kiuj mortigus sin por mi !

- Ho ! Ho ! Ho ! Ho ! mi diris, vi ne ridetas, mia amiko... Kaj kiam necesos mortigi sin ?

- Sed ĉi tiun vesperon ! ĉar necesas ke mi diru al vi, mia kara, mi atendas la murdinton tiun ĉi vesperon !

- Ho ! Ho ! Ho ! Ho !... Vi atendas la murdinton tiun ĉi vesperon... Vere, vere, vi atendas la murdinton ĉi-vesperon... sed vi do konas la murdinton ?

- Ho ! Ho ! Ho ! Nun eblas ke mi konas lin. Mi estus freneza firme aserti ke mi konas lin, ĉar la matematika ideo kiun mi havas pri la murdinto, estigas rezultojn tiel timigajn, tiel monstrajn ke mi esperas ke ankoraŭ eblas ke mi eraras ! Ho ! Mi esperas tion per mia tuta forto...

- Kiel, ĉar vi ne konis, antaŭ kvin minutoj, la murdinton, vi povas diri ke vi atendas la murdinton ĉi-vesperon ?

- Ĉar mi scias ke li devas veni.

Rultabio malrapide, malrapide plenŝtopis pipon kaj bruligis ĝin.

Tio aŭguris al mi rakonton el la plej interesegaj. En tiu momento, iu paŝis en la koridoro, pasanta antaŭ nia pordo. Rultabio aŭskultis. La paŝadoj malproksimiĝis.

- Ĉu Frederiko Larsano estas en sia ĉambro ? mi diris, montrante la septon.

- Ne, respondis mia amiko, li ne estas tie; li devis foriri tiun ĉi matenon al Parizo; Li ankoraŭ estas sur la spuraro de Darzak !... S^{ro} Darzak foriris, ankaŭ li, ĉi-matenon, al Parizo. Ĉio ĉi finiĝos tre malbone... Mi konjektas la areston de S^{ro} Darzak antaŭ ok tagoj. La plej malbona estas ke ĉio ŝajnas interligiĝi kontraŭ la malfeliĉulo : la okazaĵoj, la aferoj, la homoj... Ne estas iu horo kiu fluas, kiu ne alportas kontraŭ S^{ro} Darzak novan akuzon... La enketjuĝisto estas superŝutita kaj blindigita per tio... Cetere, mi

komprende ke oni estu blindigita !... Oni estus tia per malpli...

- Frederiko Larsano tamen ne estas novico.

- Mi kredis, eligis Rultabio kun iomete disdegnata mieno, ke Freĉjo estis multe pli forta ol tio... Evidente, li ne estas la unua renkontito... Mi eĉ havis multan admiron pri li, kiam mi ne konis lian labormetodon. Ĝi estas abomena... Li ŝuldas sian reputacion nur al sia lerteco; sed li mankas de filozofio; La matematiko de liaj konceptadoj estas tre magra...

Mi rigardis Rultabioⁿ kaj ne sukcesis retenigi min rideti aŭdante ĉi tiun dekokjaran knabon konsideri kiel infanon, kvindekkelkjaran knabon kiu montris siajn kapablojn kiel la plej subtila spurohundo de la eŭropa polico...

- Vi ridetas, eligis al mi Rultabio... Vi malpravas !... Mi ĵuras al vi ke mi superruzos lin... kaj laŭ sensacia maniero, sed necesas ke mi urĝu, ĉar li havas gigantan longon rilate al mi, longon kiun donis al li S^{ro} Roberto Darzak kaj kiun S^{ro} Roberto Darzak ankoraŭ pliigos tiun ĉi vesperon... Pensu do : ĉiufoje kiam la murdinto venas al la kastelo, S^{ro} Roberto Darzak pro stranga fatalaĵo, forestas kaj rifuzas doni la uzon de sia tempo !

- Ĉiufoje kiam la murdinto venas al la kastelo ! mi ekkriis... Li do revenis ĉi tie...

- Jes, dum ĉi tiu terura nokto kiam okazis la fenomeno...

Mi do baldaŭ sciis tiun teruran fenomenon al kiu Rultabio aludis ekde duonhoro sen klarigi ĝin al mi. Sed mi lernis neniam urĝi Rultabioⁿ en liaj rakontoj... Li parolis kiam la fantazio kaptis lin aŭ kiam li juĝis tion utilan kaj multe malpli zorgis pri mia scivolemo ol fari kompletan resumon por si mem de gravega okazaĵo kiu interesis lin.

Fine, per rapidaj mallongaj frazoj, li sciigis al mi aferojn kiuj ĵetis min en proksima ŝtato al stultiĝo, ĉar vere la fenomenoj de tiu ankoraŭ nekonata scienco kiu ekzemple estas la hipnotismo, tute ne estas pli neklarigeblaj ol ĉi tiu malapero de la materialo de la murdinto ĉe la momento kiam ili estis kvar por tuŝi lin. Mi parolas pri la hipnotismo kiel mi parolus pri elektro kies oni nekonas la naturon, kaj kies ni tiom malmulte scias ĝiajn leĝojn, ĉar

en la momento, la afero ŝajnis al mi esti klarigebla nur per neklarigeblaĵo, tio estas per okazaĵo ekster la konataj naturaj leĝoj. Kaj tamen, se mi havus la cerbon de Rultabio, mi havus, kiel li, "la antaŭsenton de la natura klarigo" : ĉar la plej stranga en ĉiuj misteroj de la Glanejo estis ja "la natura maniero per kiu Rultabio klarigis ilin". Sed kiu do povis kaj ankoraŭ povus fanfaroni pri havi la cerbon de Rultabio ? La originalaj kaj malbelaspektaj ŝvelaĵoj de lia frunto, mi neniam vidis ilin sur neniu alia frunto, krom - sed multe malpli videblaj - sur la frunto de Frederiko Larsano, kaj eĉ necesis zorge rigardi la fronton de la fama policano por diveni la desegnon de ili, dum la ŝvelaĵoj de Rultabio frapis - se mi aŭdacas uzi ĉi tiun iom fortan esprimon - frapis la okulojn.

mi havas inter la paperoj kiujn estis transdonitaj al mi de la junulo post la afero, notlibreton kie mi trovis kompletan raporton pri la "fenomeno de la malapero de la materialo de la murdinto" kaj la rimarkojn kiujn ĝi inspiris al mia amiko. Preferinde estas, mi opinias, submeti al vi tiun raporton ol daŭrigi reprodukti mian konversacion kun Rultabio ĉar mi timus, en tia rakonto, aldoni vorton kiu tute ne estis la esprimo de la plej strikta vero.

Eltiraĵo de la notlibro de Jozefo Rultabio.

la lastan nokton, nokton de la 29^a ĝis la 30^a de oktobro, skribas Jozefo Rultabio, mi vekiĝas ĉirkaŭ unua matene. Ĉu sendormeco aŭ bruo eksteren ? La bleko de la "Dibesteto" tondras kun malbonaŭgura efekto ĉe la fundo de la parko. Mi ellitiĝas; malfermas mian fenestron. Malvarma vento kaj pluvo; opaka mallumo, silento. Mi refermas mian fenestron. La nokto estas ankoraŭ ŝirita de la stranga ŝriko. Mi rapide surmetas pantalonon, jakon. Estas tia vetero ke eĉ katon oni ne elpelus; kiu do, ĉi-nokte, imitas, tiom proksime de la kastelo, la miaŭon de la kato de la Ulnjo-Genue ? Mi kunprenas dikan klabon, la solan armilon kiun mi disponas, kaj sen ia ajn bruo, mi malfermas mian pordon.

Jen mi en la galerio; lampo kun reflektilo perfekte lumigas ĝin; la flamo de ĉi tiu lampo flagretas kvazaŭ sub la efiko de aerblovo. Mi sentas la aerblovon. Mi turnas min. Malantaŭ mi, iu fenestro estas malferma, tiu kiu troviĝas ĉe la ekstremo de tiu parto de galerio, sur kiu rigardas niaj ĉambroj, de Frederiko Larsano kaj de mi, galerio kiun mi nomos "turnantan galerion" por distingi ĝin de la "rekta galerio", sur kiu rigardas la apartamento de F^{ino} Stangerson. Ĉi tiuj du galerioj sin orte intersekcas. Kiu do lasis tiun fenestron malfermitan, aŭ kiu ĵus malfermis ĝin ? Mi iras al la fenestro; kliniĝas eksteren. Je ĉirkaŭ unu metro sub tiu fenestro, estas teraso kiu servas kiel tegmento de malgranda korbela ĉambro kiu troviĝas ĉe la teretaĝo. Oni povas, se necese, salti de la fenestro sur la terason, kaj de tie, lasi sin gliti en la honorkorton de la kastelo. Tiu kiu sekvintus tiun vojon devus, evidente, ne havi kun li la ŝlosilon de la pordo de la vestiblo.

Sed kial imagi al mi tiun ĉi scenon de nokta gimnastiko ? Ĉu pro iu malferma fenestro ? Eble estas nur en tio neglektado de servisto. Mi refermas la fenestron ridetante pro la facileco per kiu mi konstruas dramojn pro malfermita fenestro. Nova bleko de la "Dibesteto" en la nokto. Kaj poste, silento; la pluvo ĉesis bati la

fenestrajn vitrojn. Ĉio dormas en la kastelo. Mi paŝas kun senfinaj singardemoj sur la tapiŝo de la galerio. Alveninte ĉe la angulo de la rekta galerio, mi antaŭenmetas mian kapon kaj ĵetas singardan ekrigardon al ĝi. En tiu galerio, alia lampo kun reflektilo donas lumon perfekte lumiganta la kelkajn objektojn kiuj troviĝas tie, tri brakseĝojn kaj kelkajn pentraĵojn pendigitaj sur la muroj. Kion mi faras tie ? Neniam la kastelo estis tiel kvieta. Ĉio ripozas. Kio estas tiu instinkto kiu pelas min al la ĉambro de F^{ino} Stangerson ? Kio kondukas min al la ĉambro de F^{ino} Stangerson ? Kial tiu voĉo kiu krias funde de mia koro : "Iru ĝis la ĉambro de F^{ino} Stangerson !" Mi mallevas la okulojn al la tapiŝo kiun mi surpaŝas kaj "vidas ke miaj paŝoj al la ĉambro de F^{ino} Stangerson estas direktitaj de paŝoj kiuj jam iris tien". Jes, sur ĉi tiu tapiŝo, spuroj de paŝado alportis koton de ekstere kaj mi sekvas tiujn paŝojn kiuj kondukas min al la ĉambro de F^{ino} Stangerson. Hororo ! Hororo ! Estas la "elegantaj paŝoj" kiujn mi rekonas, "la paŝoj de la murdinto ! Li venis de ekstere, dum ĉi tiu abomena nokto. Se oni povas malsupreniri el la galerio tra la fenestro dank' al la teraso, oni povas ankaŭ supreniri en ĝin.

La murdinto estas tie en la kastelo, ĉar la paŝoj ne estas revenantaj. Li eniris en la kastelo tra tiu malfermita fenestro ĉe la ekstremo de la turnanta galerio; li preterpasis antaŭ la ĉambro de Frederiko Larsano, antaŭ la mia, turnis dekstren en la rektan galerion, kaj eniris en la ĉambron de F^{ino} Stangerson.

Mi estas antaŭ la pordo de la apartamento de F^{ino} Stangerson, antaŭ la pordo de la antaŭĉambro : ĝi estas duonfermita, mi puŝas ĝin sen aŭdigi la plej mallaŭtan bruon. Mi estas en la antaŭĉambro kaj tie, sub la pordo de la ĉambro mem, mi vidas strion de lumo. Mi aŭskultas. Nenion ! Nenian bruon, ne eĉ tiun de spirado. Ha ! Scii tion kio okazas en la silento kiu troviĝas malantaŭ tiu pordo ! Miaj okuloj sur la seruro informas min ke ĉi tiu seruro estas ŝlosita, kaj la ŝlosilo estas interne. Kaj diri ke la murdinto eble estas tie ! Ke li devas esti tie ! Ĉu li denove eskapos ĉi tiun fojon ? Ĉio dependas de mi ! Memregado kaj, ĉefe, nenia mismanovro ! "Necesas vidi en ĉi tiun ĉambron". Ĉu mi eniros en ĝi

tra la salono de F^{ino} Stangerson ? Poste necesus al mi transiri la buduaron, kaj la murdinto tiam eskapus tra la pordo de la galerio, pordo antaŭ kiu mi nuntempe estas.

Laŭ mi, ĉi-vespere, ankoraŭ ne estas krimo, ĉar nenio klarigus la silenton de la buduaro ! En la buduaro, du flegistinoj estas loĝigitaj por tranokti ĝis la kompleta resaniĝo de F^{ino} Stangerson. Ĉar mi estas preskaŭ certa ke la murdinto estas tie, kial ne tuj alarmi ? La murdinto eble forfuĝus, sed eble mi savus F^{inon} Stangerson ? Kaj se hazarde, la murdinto ĉi-vespere ne estis murdonto ? La pordo estis malfermita por permesi al li la pasadon : per kiu ? - kaj estis refermita : per kiu ? Li eniris ĉi tiun nokton en ĉ tiun ĉambron kies la pordo certe estis ŝlosita de interne, ĉar F^{ino} Stangerson, ĉiuj vesperoj, enfermiĝas kun siaj gardistinoj en sia apartamento.

Kiu turnis tiun ŝlosilon de la ĉambro por lasi eniri la murdinton ? La gardistinoj ? Du fidelaj servistinoj, la maljuna ĉambristino kaj ŝia filino Silvia ? Estas tre neprobable. Cetere, ili kuŝas en la buduaro kaj F^{ino} Stangerson, tre malkvieta, tre singardema, diris al mi Roberto Darzak zorgas mem pri sia sekureco de kiam ŝi estas sufiĉe bonfarta por fari kelkajn paŝojn en sia apartamento - kies mi ankoraŭ ne vidis ŝin eliri. Tiu subitaj malkviato kaj singardo de F^{ino} Stangerson, kiuj mirigis S^{ron} Darzak^{on}, ankaŭ pripensis min. Dum la krimo de "Flava Ĉambro", tute ne estas dubo ke la kompatindulino atendis la murdonto. Ĉu ŝi ankoraŭ atendis lin ĉi-vespere ? Sed kiu do turnis tiun ŝlosilon por malfermi "al la murdinto kiu estas tie" ? Ĉu estus F^{ino} Stangerson "mem" ? Ĉar fine ŝi povas timi, ŝi devas timi la alvenon de la murdinto kaj havi kialojn por malfermi la pordon al li, "por esti devigita malfermi la pordon al li !" Kia terura rendezuo estas do ĉi tiu ? Rendezuo de krimo ? Certe, ne rendezuo de amo, ĉar F^{ino} Stangerson amegas S^{ron} Darzak^{on}, mi scias tion. Ĉiuj ĉi pripensadoj trairas mian cerbon kiel fulmo kiu lumigus nur mallumoj. Ha ! Scii...

Se estas tiom da silento, malantaŭ ĉi tiu pordo, estas sendube ĉar oni bezonas silenton ! Mia interveno povas kaŭzi pli da damaĝo ol da bono ? Ĉu mi scias ? Kiu diras al mi ke mia interveno ne

okazigus, en minuto mem, krimon ? Ha ! Vidi kaj scii, sen perturbi la silenton !

Mi eliras el la antaŭĉambro. Mi iras al la centra ŝtuparo, malsupreniras ĝin; jen mi en la vestiblo; mi kuras kiel eble plej silente al la malgranda ĉambro ĉe la teretaĝo kie kuŝas, ekde la atenco de la pavilono, ulĉjo Jakobo.

"Mi trovas lin vestita," kun la okuloj larĝe malfermitaj, preskaŭ konsternitaj. Li tute ne ŝajnas surprizita vidi min; li diras al mi ke li ellitiĝis ĉar li aŭdis la blekon de "la Dibesteto", kaj ke li aŭdis paŝojn en la parko, paŝojn kiuj ŝteliris antaŭ lia fenestro. Do li rigardis tra la fenestron "kaj li vidis antaŭ momento preterpasi nigran fantomon". Mi demandas al li ĉu li havas armilon. Ne, li ne plu havas armilon de kiam la enketjuĝisto prenis de li sian revolveron. Mi kuntiras lin. Ni eliras en la parkon tra malantaŭa pordeto. Ni ŝteliras laŭlonge de la kastelo ĝis la punkto kiu estas ĝuste sub la ĉambro de F^{ino} Stangerson. Tie, mi lokas ulĉjon Jakoboⁿ kontraŭ la muro, malpermesas lin movi, kaj mi, profitante de nubo kiu ĉimomente kovras la lunon, mi antaŭeniras antaŭ la fenestron, sed ekster la lumkvadrato kiu venas de ĝi; "ĉar la fenestro estas duonfermita". Ĉu pro singardeco ? Ĉu por povi pli rapide eliri tra la fenestro, se iu ekeniris tra iu pordo ? Ho ! Ho ! Tiu kiu elsaltos tra tiu fenestro havus multe da ŝancoj rompi al si kolon ! Kiu diras al mi ke la murdinto ne havas ŝnuregon ? Li devis antaŭkalkuli ĉion... Ha ! Scii tion kio okazas en tiu ĉambro !... Koni la silenton de tiu ĉambro !... Mi revenas al ulĉjo Jakobo kaj flustras vorton al lia orelo : "ŝtupetaro". Jam de la komenco, mi fakte pensis pri la arbo kiu, antaŭ ok tagoj, jam servis al mi kiel observejon, sed mi tuj rimarkis ke la fenestro estis duonfermita, tiel ke mi povis nenion vidi, ĉi-foje, grimpante en la arbon, pri tio kio okazas en la ĉambro. Kaj plie, ne mi volas nur vidi, sed kapabli aŭdi kaj... agi...

Ulĉjo Jakobo, tre malserena, preskaŭ tremanta, malaperas dum momento kaj revenas, sen ŝtupetaro, farante de malproksime al mi grandajn signojn per siaj brakoj, por ke mi kuniĝu al li kiel eble plej baldaŭ.

Kiam mi estas apud li, "Venu !", li flustras al mi.

Li ĉirkaŭirigas min ĉirkaŭ la kastelo flanke de la ĉefturo.

Alveninta tie, li diris al mi :

"Mi iris serĉi mian ŝtupetaron en la malsupra ĉambro de la ĉefturo kiu servas al ni kiel formetejon por la ĝardenisto kaj mi; la pordo de la ĉefturo estis malfermita kaj la ŝtupetaro ne plu estis tie. Forirante, sub la lunlumo, jen kie mi ekvidis ĝin !

Kaj li montris al mi, ĉe la alia ekstremo de la kastelo, ŝtupetaron apogitan kontraŭ la "konzoloj" kiuj subportis la terason, sub la fenestro kiun mi trovis malfermita. La teraso malhelpis min por vidi la ŝtupetaron... dank'al ĉi tiun ŝtupetaron, estis trege facile eniri en la turnantan galerion de la unua etaĝo, kaj mi ne plu dubis ke estas la vojo sekvita de la nekonato.

Ni kuras al la ŝtupetaro; sed, ĝuste kiam ni ekkaptas ĝin, ulĉjo Jakobo montras al mi la duonfermitan pordon de la malgranda ĉambro de la teretaĝo, kiu estas korbele lokita ĉe la ekstremo de tiu dekstra alo de la kastelo, kaj kiu havas kiel plafonon ĉi tiun terason pri kiu mi parolis. Ulĉjo Jakobo iom puŝas la pordon, rigardas internen kaj diras al mi, elspirante.

- Li ne estas tie !

- Kiu ?

- La gardisto !

La buŝo ankoraŭfoje al mia orelo : "Vi bone scias ke la gardisto dormas en ĉi tiu ĉambro, de kiam oni faras riparojn en la ĉefturo ! ..." kaj per la sama signifa gesto, li montras al mi la duonfermitan pordon, la ŝtupetaron, la terason kaj la fenestron kiun mi antaŭ momento refermis, de la turnanta galerio.

Kiuj estis miaj pensoj tiam ? Ĉu mi havas tempon por havi pensojn ? Mi "sentis" pli ol mi pensis...

Evidente, mi sentis, "se la gardisto estas tie supre en la ĉambro" (mi diras "se" ĉar mi havas, en ĉi tiu momento, krom ĉi tiu ŝtupetaro, kaj ĉi tiu neloĝata ĉambro de la gardisto, nenian indicon kiu eĉ ebligas min suspekti la gardiston), se li estas tie, li devis transiri tiun ŝtupetaron kaj tiun fenestron, ĉar la ĉambroj kiuj troviĝas malantaŭ sia nova ĉambro, estantaj okupitaj de la geedzoj

de la ĉefkelnero kaj la kuiristino, kaj de la kuirejoj, fermas al li la vojon al la vestiblo kaj al la ŝtuparo, ene de la kastelo... "se estas la gardisto kiu transpasis tien", estis facile hieraŭ vespere por li, je ia ajn preteksto, iri en la galerion kaj atenti ke ĉi tiu fenestro estu simple puŝita de interne, la klapoj kunmetitaj tiel ke li devos de ekstere nur premi sur ĝi por ke la fenestro malfermiĝu kaj ke li povu salti en la galerion. Ĉi tiu necesajo de nefermita fenestro de interne ege restriktas la kampon de la esploradoj pri la personeco de la murdinto. Necesas ke la murdinto "estu de la domo"; krom se li havas komplikon, pri kiu mi ne kredas...; krom... krom se... F^{ino} Stangerson "mem" zorgis ke tiu fenestro tute ne estu fermita de interne...

Sed kiu do estus tiu terura sekreto kiu farus ke F^{ino} Stangerson bezonus forigi la barojn, kiuj apartigas ŝin de ŝia murdinto ?

Mi ekkaptas la ŝtupetaron kaj jen ni reforirintaj al la malantaŭo de la kastelo. La fenestro de la ĉambro estas ankoraŭ duonfermita; la kurtenoj estas kuntiritaj, sed tute ne kuniĝas; ili lasas trapasi grandan strion da lumo kiu venas kuŝiĝi sur la gazonon ĉe miaj piedoj. Sub la fenestro de la ĉambro, mi apogas mian ŝtupetaron. Mi preskaŭ certas esti faranta nenion bruon.

Kaj dum ulĉjo Jakobo restas piede de la ŝtupetaro, mi ja grimpas la ŝtupetaron, malrapidege, malrapidege, kun mia klabo. Mi retenas mian spiradon; levas kaj relokas la piedojn kun senfinaj singardecoj. Subite, dika nubo kaj nova ekpluvego. Ŝanco. Sed la sinistra bleko de la "Dibesteto" abrupte haltigas min meze de mia grimrado. Ŝajnas al mi ke ĉi tiu kriado estis ĵus eligita malantaŭ mi, je kelkaj metroj. Se ĉi tiu krio estis signalo ! Se iu komplico de la viro vidis min sur mia ŝtupetaro. Tiu blekado eble alvokas la viron ĉe la fenestro ! Eble!... Ve ! "La viro estas ĉe la fenestro ! Mi sentas lian kapon super mi; mi aŭdas lian spiradon. Kaj mi ja ne povas rigardi lin; la plej malgrava movado de mia kapo, kaj mi estas kondamnita ! Ĉu li vidos min ? Ĉu li en la nokto malevos la kapon ? Ne !... Li foriras... Li vidis nenion... Mi sentas lin, pli ol mi aŭdas lin, ŝtelpaŝe iri en la ĉambro; kaj mi ankoraŭ grimpas kelkajn ŝtupetojn. Mia kapo estas ĉe la alteco de la ŝtona fenestrosojlo;

mia frunto transpasas tiun ŝtonon; miaj okuloj vidas inter la kurtenoj.

La viro estas tie, sidanta ĉe la malgranda skribtablo de F^{ino} Stangerson, kaj li skribas. Li montras al mi sian dorson. Li havas kandelon antaŭ li; sed, ĉar li kliniĝas al la flamon de tiu kandelilo, la lumo ĵetas ombrojn kiuj misformas lin al mi. Mi vidas nur monstran ĝibiĝantanorson.

Konsterna afero : F^{ino} Stangerson ne ĉeestas ! Ŝia lito ne estas malaranĝita. Kien do ŝi dormas ĉi-nokte ? Sendube en la apuda ĉambro, kun siaj virinoj. Hipotezo. Ĝojo trovi la viron sola. Anima trankvilo por prepari la embuskon.

Sed kiu do estas ĉi tiu viro kiu skribas tie sub miaj okuloj, sidanta ĉe tiu skribotablo kvazaŭ li estus hejme ?

Se ne estis "la paŝoj de la murdinto" sur la tapiŝo de la galerio, se ne estis la malfermita fenestro, se ne estis, sub ĉi tiu fenestro, la ŝtupetaro, mi povus esti pelita pensi ke tiu viro rajtas esti tie kaj ke li normale troviĝas tie sekve de normalaj kaŭzoj kiujn mi ne ankoraŭ konas. Sed tute ne estas dubo ke tiu mistera nekonato estas la viro de la "Flava Ĉambro", tiu kies F^{ino} Stangerson devigas, sen denunci lin, suferi la murdajn batojn. Ha ! Vidi lian vizaĝon ! Konfuzi lin ! Kapti lin !

Se mi saltus en la ĉambron ĉi-momente, "li" fuĝus aŭ tra la antaŭĉambro aŭ tra la dekstra pordo kiu rigardas al la buduaro. Poste, transirante la salonon, li alvenus al la galerio kaj mi perdus lin. Nu, mi tenas lin; ankoraŭ kvin minutojn, kaj mi tenos lin pli bone ol se mi havus lin en kaŝo... Kion li faras tie, sola, en la ĉambro de F^{ino} Stangerson ? Kion li skribas ? Al kiu li skribas ?... Malsuprenirado. La ŝtupetaro surgrunden. Ulĉjo Jakobo sekvas min. Ni reiru al la kastelo. Mi sendas ulĉjon Jakoboⁿ veki S^{ron} Stangerson. Li devas atendi min ĉe S^{ro} Stangerson, kaj precize nenion diri al li antaŭ mia alveno. Mi tuj iros veki Frederikoⁿ Larsanoⁿ. Granda embaraso por mi. Mi voluntus labori sole kaj ricevi la tutan fortunon de la afero, tuj antaŭ la nazo de Larsano dormanta. Sed la ulĉjo Jakobo kaj S^{ro} Stangerson estas maljunuloj, kaj mi, mi eble ne estas sufiĉe forta. Mi eble malhavos

sufiĉe da forto... Larsano, li, kutimiĝas al la homo kiun oni superfortas, kiun oni faligas teren, kiun oni restaras kun pojnoj mankatenitaj. Larsano malfermas al mi kun la okuloj ŝvelantaj pro dormo, preta sendi min diablen, tute ne kredanta al miaj imagoj de malgranda reportero. Necesas ke mi asertas al li ke "la viro ĉeestas !"

- Estas stranga, li diris, mi kredis esti forlasanta lin ĉi tiun posttagmezon, en Parizo !

Li haste vestas sin kaj armas sin per revolvero.

Ni enŝteliĝas en la galerion.

Larsano demandas al mi : "Kie li estas ?"

- En la ĉambro de F^{ino} Stangerson.

- Kaj F^{ino} Stangerson ?

- Ŝi ne estas en sia ĉambro !

- Ni iru tien !

- Ne iru tien ! La viro, ĉe la unua alarmo, forkuros... li havas tri vojojn por tio... la pordon, la fenestron, la buduaron kie troviĝas la virinoj...

- Mi pafos al li...

- Kaj se vi maltrafus lin ? Se vi nur vundus lin ? Li denove eskapus... Sen kalkuli ke ankaŭ li certe estas armita... Ne, lasu min regi la provon, kaj mi respondas pri ĉio...

- Kiel vi volos, li diris al mi kun sufiĉa bonvolo.

Tiam, post certigi min ke ĉiuj fenestroj de la du galerioj estas hermetike fermitaj, mi lokas Frederikoⁿ Larsanoⁿ ĉe la ekstremo de la turnanta galerio, antaŭ tiu fenestro kiun mi trovis malfermita kaj ke mi refermis. Mi diras al Freĉjo :

- Neniapreze, vi devas forlasi ĉi tiun postenon, ĝis la momento kiam mi vokos vin... Estas cent ŝancoj el cent por ke la viro revenu al ĉi tiu fenestro kaj provu eskapi tra ĝi, kiam li estos persekutata ĉar estas tra ĝi ke li venis kaj tra ĝi ke li preparis sian forfuĝon. Vi havas danĝeran postenon...

- Kiu estos la via ? demandis Freĉjo.

- Mi ensaltos en la ĉambron, kaj alpelos la viron al vi !

- Prenu mian revolveron, diris Freĉjo, mi prenos vian bastonon.

- Dankon, mi eligis, vi estas brava homo.

Kaj mi prenis la revolveron de Freĉjo.

Mi baldaŭ estos sola kun la viro, tien, kiu skribis en la ĉambro, kaj vere tiu ĉi revolvero plaĉis al mi.

Mi do forlasis Freĉjo, estante posteniginta lin ĉe la fenestro 5 de la plano, kaj direktis min, ankoraŭ kun la plej granda singardemo, al la apartamento de S^{ro} Stangerson, en la maldekstra alo de la kastelo. Mi trovis S^{ron} Stangerson kun la ulĉjo Jakobo, kiu observis la ordonon, sin kontentigante nur diri al sia mastro ke li devis plej rapide vestiĝi. Mi do priinformis S^{ron} Stangerson, per kelkaj vortoj, pri tio kio okazis. Li armis sin, li ankaŭ, per revolvero, sekvis min, kaj ni tuj estis en la galerio ĉiuj tri. Ĉio kio ĵus okazis de kiam mi vidis la murdinton sidantan antaŭ la skribotablo, apenaŭ daŭris dum dek minutoj. S^{ro} Stangerson volis tuj sin ĵeti al la murdinto kaj mortigi lin : estis tre simple. Mi lin komprenigis ke ĉefe necesis ne riski, "volante mortigi lin, maltrafi lin vivanta."

Kiam mi ĵuris al li ke lia filino ne estis en la ĉambro kaj ke ŝi riskis nenian danĝeron, li akceptis kvietigi sian senpaciencon kaj lasi al mi la regadon de la okazontaĵo. Mi ankoraŭ diras al ulĉjo Jakobo kaj al S^{ro} Stangerson, ke ili devas veni al mi nur kiam mi alvokos ilin aŭ kiam mi pafos per revolvero kaj mi sendis ulĉjon Jakoboⁿ lokiĝi antaŭ la fenestro lokita ĉe la ekstremo de la rekta galerio (La fenestro estas markita per la cifero 2 sur mia plano). Mi elektis ĉi tiun postenon por ulĉjo Jakobo ĉar mi imagis ke la murdinto, ĉaspelita de sia eliro el la ĉambro, fuĝanta tra la galerio por atingi la fenestron kiun li lasis malfermita, kaj subite vidanta, alvenante al la vojkruciĝo de la galerioj, antaŭ ĉi tiu lasta fenestro, Larsanoⁿ gardantan la turnantan galerion, daŭrigus sian vojon en la rekta galerio.

Tie, li renkontus ulĉjon Jakoboⁿ kiu malhelpus lin elsalti en la parkon tra la fenestro kiu malfermiĝis ĉe la ekstremo de la rekta galerio. Certe estas tiel kiel, en tia cirkonstanco, devus agi la murdinto, se li konis la lokon (kaj tiu hipotezo tute ne estis dubo laŭ mi). Sub tiu fenestro, fakte, troviĝis speco de apogpilastro

ekstere. Ĉiuj aliaj fenestroj de la galerioj rigardis je tia alteco al fosaĵoj kiujn preskaŭ neebulis elsalti sen rompi al si la kolon. Pordoj kaj fenestroj estis bone kaj firme fermitaj, inkluzive de la pordo de la formetejo, ĉe la ekstremo de la rekta galerio : mi rapide certigis min pri tio.

Do, post esti indikanta kiel mi diris tion, lian postenon al ulĉjo Jakobo "kaj esti vidinte lin tie", mi lokis S^{ron} Stangerson antaŭ la interŝtuparo de la ŝtuparo, ne for de la pordo de la antaŭĉambro de lia filino. Ĉio sugestis ke tuj kiam mi ĉaspelus la murdinton en la ĉambron, tiu ĉi eskapus tra la antaŭĉambro plivole ol tra la buduaro kie troviĝis la virinoj kaj kies la pordo devis esti fermita de F^{ino} Stangerson mem, se kiel mi pensis, ŝi rifuĝis en tiu buduaro "por ne vidi la murdinton kiu estis venanta ĉe ŝin !" Ĉiel ajn, li ĉiam retroviĝis en la galerio "kie miaj homoj atendis lin ĉe ĉiuj eblaj elirejoj".

Alvenante tie, li vidas maldekstren, preskaŭ sur li, S^{ron} Stangerson; li tiam forkuras dekstren, al la turnanta galerio, "tio kio cetere estas la vojo de lia preparita fuĝo". Ĉe la kruciĝo de la du galerioj, li samtempe ekvidas, kiel mi klarigas supren, maldekstren, Frederikoⁿ Larsanoⁿ ĉe la fino de la turnanta galerio, kaj antaŭen, ulĉjon Jakoboⁿ, ĉe la fino de la rekta galerio.

S^{ro} Stangerson kaj mi venas de malantaŭe. Li estas por ni ! Li ne plu povas eskapi el ni !... Ĉi tiu plano ŝajnis al mi la plej saĝa, la plej certa "kaj la plej simpla". Se ni kapablus loki iun el ni malantaŭ la pordo de la buduaro de F^{ino} Stangerson, kiu malfermiĝis al la dormĉambro, eble ŝajnintus pli simpla "al kelkaj kiuj ne pripensas" rekte sieĝi ambaŭ pordojn de la ĉambro kie la viro troviĝis, tiu de la buduaro kaj tiu de la antaŭĉambro; sed ni povis eniri en la buduaron nur tra la salono kies la pordo estis fermita interne de la malkvieta zorgo de la F^{ino} Stangerson. Kaj tiel, tiu plano kiu estus veninta al la menso de iu ajn urba serĝento, estus neefektivebla. Sed mi kiu devas pripensi, diras ke, eĉ se mi havintus la liberan disponon de la buduaro, mi konservintus mian planon tiel kiel mi ĵus klarigis ĝin; ĉar ĉiu alia plano de rekta atako tra ĉiu el la pordoj de la ĉambro "disigis nin unu de la aliaj ĉe la

momento de la lukto kontraŭ la viro", dum mia plano "kunigis ĉiuj por la atako" ĉe iu loko kiun mi determinis kun preskaŭ matematika precizeco. Tiu loko estis la kruciĝo de la du galerioj.

Estanta tiel lokinta miajn homojn, mi reeliris el la kastelo, kuris al mia ŝtupetaro, reapogis ĝin kontraŭ la muro, kaj kun la revolvero en la mano, mi grimpis.

Se kelkaj ridetas pro tiom da antaŭaj singardoj, mi sendos ilin al la mistero de la "Flava Ĉambro" kaj al ĉiuj pruvoj kiujn ni havis pri la nekredebla lertaĵo de la murdinto; kaj ankaŭ, se kelkaj trovos ĉiujn miajn observojn tre zorgoplenajn dum momento kiam oni devas esti tute forprenita de la rapideco de la aktiveco, de la decido kaj de la ago, mi rebatos al ili ke mi volis longe kaj komplete raporti ĉi tie ĉiujn aranĝojn de atakoplano elpensita kaj realigita tiel rapide kiel ĝi estas malrapida disvolviĝi sub mia plumo.

Mi deziris ĉi tiun malrapidecon kaj ĉi tiun precizecon por esti certa nenion preterlasi pri la kondiĉojn en kiuj okazis la stranga fenomeno kiu, ĝis ordonŝanĝo kaj natura klarigo, ŝajnas al mi nepre pruvi pli bone ol ĉiuj teorioj de la profesoro Stangerson, "La disocio de la materio", mi eĉ dirus la "subitan" disocion de la materio.

16 - Stranga fenomeno de disocio de la materio.

Eltiraĵo de la notlibro de Jozefo Rultabio (daŭrigo).

Jen mi denove ĉe la ŝtono de la fenestro, daŭrigas Rultabio, kaj denove mia kapo transpasas ĉi tiun ŝtonon; inter la kurtenoj kies dispozicio ne ŝanĝis, mi pretiĝas rigardi, malserena scii en kiu sinteno mi tuj trovos la murdinton. Se li povus turni al mi la dorson! Se li ankoraŭ povus esti ĉe tiu tablo, skribante... Sed eble... eble li ne plu estas tie!... Kaj kiel li eskapus... Ĉu mi ne havas lian ŝtupetaron?..." Mi kolektas mian tutan sentimecon. Mi ankoraŭ antaŭas mian kapon. Mi rigardas: li estas tie; mi revidas lian monstran dorson, distorditan per la ombroj ĵetitaj de la kandelo. Sed, "li" ne plu skribas kaj la kandelo ne plu estas sur la malgranda skribtablo. La kandelo estas sur la pargeto antaŭ la viro klinita super ĝi. Stranga pozicio, sed kiu servas al mi. Mi reakiras mian spiradon. Mi denove supreniras. Mi estas ĉe la lastaj ŝtupetoj; mia maldekstra mano kaptas la fenestrobreton; ĉe la momento sukcesi, mi sentas mian koron haste batadi. Mi metas mian revolveron inter miajn dentojn. Ankaŭ mia dekstra mano nun tenas la fenestrobreton. Movado nepre iom seka, restarigo sur la pojno kaj mi estos sur la fenestron... Nur ke la ŝtupetaro!... Estas tio kio okazas... mi estas antaŭ la neceso iom forte apogi min sur la ŝtupetaro, kaj mia piedo ne tute forlasis tiun ĉi ke mi sentas ke ĝi ŝanceliĝas. Ĝi skrapas la muron kaj falegas... Sed jam miaj genuoj tuŝas la ŝtonon... Kun rapideco kiun mi kredas senegala, mi stariĝas sur la ŝtono... Sed pli rapida ol mi estis la murdinto... Li aŭdis la skrapadon de la ŝtupetaro kontraŭ la muro kaj mi ekvidis subite la monstran dorson leviĝi, la viro stariĝi, turniĝi... Mi vidis lian kapon... Ĉu mi bone vidis lian kapon?... La kandelo estis sur la pargeto kaj sufiĉe lumigis nur liajn krurojn.

De la alteco de la tablo estis en la ĉambro nur ombroj, nur nokto... Mi vidis longharan, barban kapon... okulojn de frenezulo; palan vizaĝon kiun enkadrigis du larĝaj vangharoj; la koloro, tiel kiel mi kapablis, dum tiu malhela sekundo, distingi, la koloro... estis

rufa... laŭ tio kio aperis al mi... aŭ tio kion mi pensis... Mi tute ne konis tiun vizaĝon. Estis entute, la ĉefa impresio kiun mi ricevis pri tiu bildo videtita en tremeta mallumo... Mi ne konis tiun vizaĝon "aŭ almenaŭ, mi ne rekonis ĝin" !

Ha ! Nun necesis rapide agi !... necesis esti la vento ! la ŝtormo !... la fulmo ! Sed bedaŭrinde... Ve ! "Estis nepraj movadoj..." Dum mi faris la neprajn movadojn de la restariĝo sur la pojnjoj, de la genuoj sur la ŝtono, de miaj piedoj sur la ŝtono... la viro, kiu ekvidis min ĉe la fenestro, eksaltis, ĵetis sin kiel mi planis al la pordo de la antaŭĉambro, havis la tempon por malfermi ĝin kaj fuĝis. Sed jam mi estis malantaŭ li, revolveron en la mano. Mi kriegis : "helpon !"

Kiel sagon, mi transiris la ĉambron kaj tamen mi sukcesis vidi ke "estis letero sur la tablo". Mi preskaŭ atingis la viron en la antaŭĉambro ĉar la tempo kiun necesis al li por malfermi la pordon, petis al li almenaŭ sekundon. Mi preskaŭ tuŝis lin; li ĵetfermis la pordon kiu iras de la antaŭĉambro al la galerio, antaŭ mia nazo... Sed mi havis flugilojn, mi estis en la galerio je tri metroj de li... S^{ro} Stangerson kaj mi samnivele persekutis lin. La viro prenis, ankoraŭ kiel mi antaŭvidis, la galerion je sia dekstro, tio estas la preparita vojo de lia fuĝo... "Help", Jakobo ! Help", Larsano !" mi ekkriis.

Li ne plu povis eskapi al ni ! Mi eligis ekkriion de ĝojo, de sovaĝa venko... La viro atingis la kruciĝon de la du galerioj apenaŭ du sekundojn antaŭ ni, kaj la renkonto kiun mi decidis, la fatala kolizio kiu nepre estiĝis, okazis. Ni ĉiuj albatigis al tiu vojkruciĝo : S^{ro} Stangerson kaj mi venantaj de iu fino de la rekta galerio, ulĉjo Jakobo venanta de la alia fino de tiu sama galerio kaj Frederiko Larsano venanta de la turnanta galerio. Ni albatigis ĝis fali... "Sed la viro ne estis tie !"

Ni rigardis nin reciproke kun stuporaj okuloj, teruritaj okuloj, antaŭ ĉi tiu "nerealajo" : "la viro ne estis tie !"

Kie li estas ? Kie li estas ? Kie li estas ?... Nia tuta animo demandis : "Kie li estas ?"

- Ne eblas ke li forfuĝis ! mi ekkriis en ia kolero pli granda ol

mia teruro !

- Mi tuŝis lin, miris Frederiko Larsano.

- Li estis ĉi tie, mi sentis sian spiron en la vizaĝo ! eligis ulĉjo Jakobo.

- Ni tuŝis lin ! ni ripetis, S^{ro} Stangerson kaj mi.

Kie li estas ? Kie li estas ? Kie li estas ?...

Ni freneze kuris en la du galerioj; ni ekzamenis pordojn kaj fenestrojn; ili estis fermitaj, hermetike fermitaj... Oni ne povis malfermi ilin ĉar ni trovis ilin fermitaj... Kaj plie, ĉu tiu malfermo de pordo aŭ fenestro de ĉi tiu viro, tiel ĉassekvita, tiel ke ni ne povu ekrimarki lian geston, ne estus ankoraŭ pli nekclarigebla ol la malapero de la viro mem ?

Kie li estas ? Kie li estas ?... Li ne povis trairi nek tra pordo, nek tra fenestro, nek tra io ajn. Li ne povis trapasi tra niaj korpoj !...

Mi konfesas, ke en la momento, mi estis senkuraĝa. Ĉar, finfine, estis luma en la galerio, kaj en tiu galerio estis nek klappordo, nek sekreta pordo en la muroj, nek io ajn kie oni povus sin kaŝi. Ni movis la brakseĝojn kaj levis la pentraĵojn. Nenio ! Nenio ! Ni rigardintus en vazon, se estintus vazo !

F^{ino} Matilda Stangerson aperis sur la sojlo de sia antaŭĉambro, ankoraŭ daŭrigas la notlibro de Rultabio. Ni estis preskaŭ ĉe ŝia pordo, en tiu galerio kie la nekredebla fenomeno ĵus okazis. Estas momentoj dum kiu oni sentas sian cerbon tralasi ĉiufanken. Kuglon en la kapo, kranio kiu eksplodas, logiksidejo murdita, racio disrompita... ĉio ĉi sendube estis komparebla kun la sento kiu elĉerpis min, "kiu malplenigis min", de la malekvilibro de ĉio, de la fino de mia pensokapabla egoo, rezonanta per mia pensmaniero de homo ! La morala ruiniĝo de racia sistemo, kunigita de vera ruiniĝo de la fiziologia vidopovo, dum la okuloj ankoraŭ klare vidas, kia terura bato sur la kranio !

Feliĉe, F^{ino} Matilda Stangerson aperis sur la sojlo de sia antaŭĉambro. Mi vidis ŝin; kaj tio estis distro por mia kaosa penso... Mi spiris ŝin... "Mi spiris ŝian parfumon de la Sinjorino en Nigro... Kara Sinjorino en Nigro, kara Sinjorino en Nigro" kiun mi neniam plu revidos ! Dio mia ! Dek jarojn de mia vivo, la duonon de mia vivo por revidi la Sinjorino en Nigro ! Sed, ve ! Mi renkontas, de tempo al tempo, kaj eĉ !... kaj eĉ !... nur la parfumon, preskaŭ la parfumon kies mi venis spiri la spuron, impresebla por mi sola, en la vizitejo de mia juneco !... estas tiu akra rememoro de via kara parfumo, Sinjorino en Nigro kiu irigis min al tiu ĉi kiun estas tute en blanko, kaj tiel pala, tiel pala, kaj tiel bela sur la sojlo de la "neklarigebla galerio" ! Ŝia bela ora hararo bukita sur la nuko lasas vidi la ruĝan stelon de sia tempio, la vundon kies ŝi preskaŭ mortis... Kiam mi nur komencis akiri mian klarigon per la bona flanko, en ĉi tiu afero, mi imagis ke la nokton de mistero de la "Flava Ĉambro", F^{ino} Stangerson havis la hararon en harbendo... "Sed antaŭ mia eniro en la 'Flavan Ĉambron', kiel mi rezonintus sen la hararo en harbendoj" ?

Kaj nun mi tute ne plu rezonas, ekde la fakto de la "neklarigebla galerio"; mi estas ĉi tie, idiota, antaŭ la apero de F^{ino} Stangerson, pala kaj tiel bela. Ŝi estas vestinta per tualetrobo el perfekta

blankeco. Oni kredus vizion, dolĉan fantomon. Ŝia patro brakumas ŝin, pasie kisas ŝin, ŝajnas unufoje pli retrovi ŝin, ĉar unufoje pli ŝi povintus esti perdita ! Li ne kuraĝas pridemandi ŝin... Li kuntiras ŝin en ŝian ĉambron kie ni sekvas ilin... ĉar fine necesas scii !... La pordo de la buduaro estas malferma... La du timigitaj vizaĝoj de la flegistinoj estas klinitaj al ni... "F^{ino} Stangerson demandas kion signifas ĉi tiu tuta bruo". "Jen, ŝi diris, estas tre simple !..." - Kiel tio estas simpla ! Kiel tio estas simpla ! - ...Ŝi havis la ideon ne dormi tiun nokton en ŝia ĉambro, kuŝi sin en la sama ĉambro kiel la flegistinoj, en la buduaro... Kaj ŝi fermis, por ili tri, la pordon de la buduaro... Ŝi havas, ekde la krima nokto, timojn, subitajn timojn tre kompreneblaj, ĉu ne ?... Kiu komprenos kial, ĉi-nokte precize "kiam li estis revenonta", ŝi enŝlosis sin laŭ tre feliĉa "hazardo" kun siaj virinoj ? Kiu komprenos kial ŝi rifuzas la volon de S^{ro} Stangerson tranokti en la salono de sia filino, ĉar lia filino timas ? Kiu komprenos kial la letero kiu estis antaŭ momento sur la tablo de la ĉambro, "ne plu estas tie" !... Tiu kiu komprenos tion, diros : F^{ino} Stangerson sciis ke la murdinto devis reveni... ŝi ne kapablis malebligi lin reveni... ŝi sciigis neniun ĉar necesas ke la murdinto restu nekonata... nekonata de ŝia patro, nekonata de ĉiuj... krom de Roberto Darzak.

Ĉar S^{ro} Darzak nun devas koni lin... Li eble konis lin antaŭe ! Rememoru la frazon de la ĝardeno de la Elizeo : "Ĉu necesas al mi, por meriti vin, fari krimon ? Kontraŭ kiu, la krimo, krom "kontraŭ la obstaklo", kontraŭ la murdinto ? Rememoru ankoraŭ ĉi tiun frazon de S^{ro} Darzak por respondo al mia demando : "Ĉu tio tuite ne malplaĉus al vi ke mi malkovras la murdinton ? - Ha ! Mi ŝatus mortigi lin per mia mano !" Kaj mi rebatis al li : "vi ne respondis al mia demando !" Tio kio estis vera. Vere, vere, S^{ro} Darzak tiel bone konas la murdinton ke li timas ke mi lin malkovras, "volante eĉ mortigi lin". Li faciligis mian enketon nur pro du kialoj : unue ĉar mi devigis lin pri tio; poste, por pli bone atenti al ŝi...

Mi estas en la ĉambro... en ŝia ĉambro... Mi rigardas ŝin, ŝin... kaj mi ankaŭ rigardas la lokon kie estis la letero antaŭ momento... F^{ino} Stangerson ekprenis la leteron; ĉi tiu letero estis por ŝi,

evidente... evidente... Ha ! kiel la kompatindulino tremas... Ŝi tremas dum la fantasta rakonto kiun ŝia patro faras al ŝi pri la ĉeesto de la murdinto en sia ĉambro kaj pri la postkuro kies li estis la celo... Sed estas videbla... estas videbla ke ŝi estas tute kvietigita nur kiam oni asertas al ŝi ke la murdinto, per nekredebla sorĉaĵo, sukcesis eskapi de ni.

Kaj poste, estas silento... Kia silento !... Ni ĉiuj estas tie, rigardante "ŝin"... Ŝia patro, Larsano, ulĉjo Jakobo kaj mi... Kiaj pensoj ĝermas en tiu silento ĉirkaŭ ŝi ?... Post la okazaĵo de tiu ĉi nokto, post la mistero de la "neklarigebla galerio", post tiu ĉi mirindega realaĵo pri la loĝigado de la murdinto en ŝia ĉambro, de ŝi, ŝajnas al mi ke ĉiuj pensoj, ĉiuj, de tiuj kiuj treniĝas sub la kranio de ulĉjo Jakobo, ĝis tiuj kiuj "naskiĝas" sub la kranio de S^{ro} Stangerson, ĉiuj povus esti tradukitaj per ĉi tiuj vortoj kiujn oni direktus al ŝi : "Ho ! Vi kiu konas la misteron, klarigu ĝin al ni, kaj ni eble savos vin !" Ha ! Kiel mi ŝatus savi ŝin... de ŝi mem kaj de la alia !... Mi ploras pro tio... Jes, mi sentas miajn okulojn pleniĝi per larmoj antaŭ tiom da mizero tiel kruelege kaŝita.

Ŝi estas tie, tiu kiu havas la parfumon de la "Sinjorino en Nigro"... Mi finfine vidas, hejme, en ŝia ĉambro, en tiu ĉambro kie ŝi ne volis akcepti min... en tiu ĉambro "kie ŝi silentas", kie ŝi daŭrigas silenti. Ekde la fatala horo de la "Flava Ĉambro", ni gravitas ĉirkaŭ tiu nevidebla kaj muta virino por scii tion kion ŝi scias. Nia deziro, nia volo scii devas esti plia turmento por ŝi. Kiu diras al ni ke se "ni sciiĝus", la kono de "ŝia" mistero ne estos la signalo de pli terura dramo ol tiuj kiuj jam disvolviĝis ĉi tie ? Kiu diras al ni ke ŝi ne mortos pro tio ? Kaj tamen ŝi preskaŭ mortis... kaj ni nenion scias... Aŭ pli ĝuste, estas tiuj kiuj nenion scias... Sed mi... se mi scius "kiun", mi scius ĉion... Kiu ? Kiu ? Kiu ?... kaj ne sciante kiun, mi devas silenti, pro kompato al ŝi, ĉar tute ne estas dubo ke ŝi ja scias kiel "li" ja fuĝis el la "Flava Ĉambro" kaj tamen ŝi silentas. Kial mi parolus ? Kiam mi scios kiun, "mi parolos al li !

Ŝi nun rigardas nin... sed de malproksime... kvazaŭ ni ne estus en ŝia ĉambro... S^{ro} Stangerson rompas la silenton. S^{ro} Stangerson deklaras ke ekde nun, li ne plu forlasos la apartamenton de sia

filino. Estas vane ke tiu ĉi volas malpermesi ĉi tiun formalan volon, S^{ro} Stangerson firme eltenas.

Li tie ekloĝiĝos ĉi-nokte mem, li diras. Post tio, nur okupata pri la sano de sia filino, li riproĉas al ŝi esti ellitiĝinta... poste li subite diras al ŝi malgrandajn infanajn parolojn... Li ridetas al ŝi... Li ne plu tro scias nek tion kion li diras, nek tion kion li faras... La famkonata profesoro perdas la saĝon... Li ripetas senkoherajn vortojn kiuj atestas la konfuzon de sia menso... tiu de la nia ne estas multe pli bona. F^{ino} Stangerson tiam diris per tiom dolora voĉo, ĉi tiujn simplajn vortojn "Patro mia ! Patro mia !" ke tiu ĉi ekploregas. Ulĉjo Jakobo mungiĝas kaj Frederiko Larsano, li mem, devigas deturni sin por kaŝi sian emocion. Mi ja ne plu eltenas... mi ne plu pensas, ne plu sentas, mi estas malpli ol vegetalo. Mi naŭzas min.

Estas la unua fojo ke Frederiko Larsano troviĝas, kiel mi, antaŭ F^{ino} Stangerson, de post la atenco de la "Flava Ĉambro". Kiel mi, li insistis por povi pridemandi la kompatindulon; sed ne pli ol mi, li estis akceptita. Al li kiel al mi, oni ĉiam faris la saman respondon : F^{ino} Stangerson estis tro malforta por akcepti nin, la pridemandadoj de la enketjuĝisto sufiĉe lacigis ŝin, ktp... Tie estis evidenta malvolonteco por helpi nin en niaj esploradoj kiu ja ne surprizis min, sed kiu ankoraŭ mirigis Frederikoⁿ Larsanoⁿ. Estas vere ke Frederiko Larsano kaj mi havas tute malsaman koncepton pri la krimo...

...Ili ploras... Kaj mi ankoraŭ surpriziĝas ripeti funde de mi : Savi ŝin !... savi ŝin kontraŭ ŝi ! savi ŝin sen kompromiti ŝin ! savi ŝin sen tio ke "li" parolu ! Kiu : "li" ? - "Li", la murdinto... Kapti lin kaj fermi la buŝon al li !... Sed S^{ro} Darzak aŭdigis tion : "por fermi al li la buŝon, necesas mortigi lin !

Logika konkludo de la eskapitaj frazoj de S^{ro} Darzak. Ĉu mi rajtas mortigi la murdinton de F^{ino} Stangerson ? Ne !... Sed ke li nur donu al mi la okazon. Por vidi ĉu li estas, ververe, el karno kaj ostoj ! Por vidi lian kadavron, ĉar oni ne sukcesas kapti sian vivantan korpon !

Ha ! Kiel komprenigi al tiu ĉi virino, kiu eĉ ne rigardas nin, kiu

estas tute en sia timego kaj en la doloro de sia patro, ke mi kapablas ĉion por savi ŝin... Jes... jes... mi rekomencos reakiri mian racion per la bona flanko kaj mi realigos mirindaĵojn...

Mi antaŭeniras al ŝi... Mi volas paroli, mi deziras petegi ŝin fidi al mi... Mi ŝatus aŭdigi ŝin per kelkaj vortoj, nur komprenitaj de ŝi kaj de mi, ke mi scias kiel ŝia murdinto eliris el la "Flava Ĉambro", ke mi divenis la duonon de ŝia sekreto... kaj ke mi kompatas ŝin ja, el mia tuta koro... Sed jam ŝia gesto instigas nin lasi ŝin sola, esprimas lacecon, la bezonon de tuja ripozo... S^{ro} Stangerson petas nin iri al niaj ĉambroj, dankas nin, reen sendas nin... Frederiko Larsano kaj mi salutas, kaj sekvata de ulĉjo Jakobo, ni revenas al la galerio. Mi aŭdas Frederiko" Larsano" kiu flustras : "Stranga ! Stranga !..." Li signas al mi eniri en sian ĉambron. Ĉe la sojlo, li turnas sin al ulĉjo Jakobo. Li demandas al li :

- Ĉu vi ja bone vidis lin ?

- Kiu ?

- La viron !

- Se mi vidis lin !... Li havis larĝan rufan barbon, rufajn harojn...

- Estas tiel kiel li aperis al mi, mi eligis.

- Kaj ankaŭ al mi, diras Frederiko Larsano.

La granda Freĉjo kaj mi, ni nun estas solaj, parolante pri la afero en lia ĉambro.

Ni parolas pri tio dum horo, zorge analizante la aferon laŭ ĉiuj direktoj. Estas klare ke Freĉjo, pro la demandoj kiujn li metas al mi, pro la klarigoj kiujn li donas al mi, estas konvinkita - malgraŭ liaj okuloj, malgraŭ miaj okuloj, malgraŭ ĉiuj okuloj - ke la homo malaperis tra ia sekreta pasejo de ĉi tiu kastelo kiun li konis.

- Ĉar li konas la kastelon, li diris al mi; li bone konas ĝin...

- Li estas viro kun prefere granda staturo, tre beltalia...

- Li havas la talion kiu estas necesa... flustras Freĉjo...

- Mi komprenas vin, mi diras... sed kiel vi klarigas la rufan barbon, la rufajn harojn ?

- Tro da barbo, tro da haroj... Postiĉoj, diras Frederiko Larsano.

- Estas haste dirita... Vi estas ankoraŭ okupita de la penso de

Roberto Darzak... Vi do neniam sukcesos formeti tion ?... Mi ja certas ke li estas senkrima...

- Des pli bone ! Mi deziras tion... sed vere ĉio kondamnas lin...

Ĉu vi rimarkis la paŝojn sur la tapiŝo ?... Venu vidi ilin...

- Mi vidis ilin... Ili estas "la elegantaj paŝoj" rande de la lageto.

- Ili estas la paŝoj de Roberto Darzak, ĉu vi neos tion ?

- Evidente, oni povas erari pri ili...

- Ĉu vi rimarkis ke la spuro de ĉi tiuj paŝoj "ne revenas" ? Kiam la viro eliris el la ĉambro, persekutata de ni ĉiuj, liaj paŝoj tute ne lasis spurojn...

- La viro eble estis en la ĉambro "ekde horoj". La koto de liaj botetoj sekiĝis kaj li moviĝis laŭ tiel rapideco sur la pintoj de liaj botetoj... Oni vidis lin forkuri, la viron... oni ne aŭdis lin...

Subite mi interrompas ĉi tiujn dirojn sen sekvo, sen logiko, malindajn de ni.

Mi signas al Larsano por aŭskulti :

"Tie, malsupre... oni fermas pordon..."

Mi leviĝas; Larsano sekvas min; ni malsupreniras al la teretaĝo de la kastelo; ni eliras el la kastelo. Mi kondukas Larsano" al la malgranda korbela ĉambro kies la teraso rigardas sub la fenestro de la turnanta galerio. Mia fingro indikas tiun nune fermitan pordon, malfermitan antaŭ momento, sub kiu filtras lumo.

- La gardisto ! diris Freĉjo.

- Ni iru tien ! mi flustris al li...

Kaj, decidita, sed decidita pri kio, ĉu mi sciis ? decidita kredi ke la gardisto kulpas ? Ĉu mi asertus tion ? Mi antaŭeniras kontraŭ la pordon, kaj mi frapas subitan baton.

Kelkaj pensos ke ĉi tiu reveno al la pordo de la gardisto estas tre malfrua... kaj ke nia unua tasko de ĉiuj, post esti konstatantaj ke la murdinto eskapis de ni en la galerio, estis serĉi lin ĉien aliloken, ĉirkaŭ la kastelo, en la parko... ĉien...

Se oni faras al ni tian kontraŭdiron, ni havas por respondi nur tion : Estis ke la murdinto malaperis de la galerio tiel "ke ni reale pensis ke li ne plu estis ie ajn" ! Li eskapis de ni kiam ni ĉiuj havis la manon sur li, kiam ni preskaŭ tuŝis lin... ni ne plu havis ian

viglecon por imagi ke ni povus nun malkovri lin en la mistero de la nokto kaj de la parko. Fine, mi diris al vi per kiu ŝoko ĉi tiu malapero skuis al mi la kranion !

...Tuj kiam mi frapis, la pordo malfermiĝis; la gardisto demandis al ni, per kvieta voĉo, tion kion ni deziris.

Li estis en noktoĉemizo "kaj estis enlitiĝonta"; La lito ne estis jam malaranĝita...

Ni eniris; mi miris.

- Nu ! vi ne estas jam enlitiĝanta ?...

- Ne ! li respondis per kruda voĉo... Mi iris rondviziti la parkon kaj la arbaron... Mi ĵus revenis... Nun mi havas dormemon... Bonan vesperon !...

- Aŭskultu, mi eligis... Estis antaŭ momento, apud via fenestro, ŝtupetaro...

- Kiu ŝtupetaro ? Mi ne vidis ŝtupetaron ! Bonan vesperon !...

Kaj li tutsimple foririgis nin.

Ekstere, mi rigardis Larsanoⁿ. Li estis senesprima.

- Nu ? mi eligis...

- Nu ? ripetis Larsano...

- Ĉu tio tute ne malfermas al vi horizontojn ?

Lia malbona humoro estis certa. Revenante en la kastelon, mi aŭdis lin kiu grumblis :

- Estus tute, sed tute strange, ke mi tiagrade erarus...

Kaj tiun frazon, ŝajnis al mi ke li prefere prononcis ĝin celanta al mi ol li diris ĝin al si mem.

Li aldonis :

- Ĉiaokaze, ni baldaŭ estos informitaj... Ĉi-mateno ĵetos plenan lumon.

18 - Rultabio desegnis cirklon inter la du ŝvelaĵoj de sia frunto.

Eltiraĵo de la notlibro de Jozefo Rultabio (daŭrigo).

Ni forlasis unu la alian ĉe la sojlo de niaj ĉambroj post tristema manpremo. Mi estis feliĉa estigi kelkan suspekton pri lia eraro en tiu originala cerbo, ekstreme inteligenta, sed antimetoda. Mi tute ne enlitigis. Mi atendis la tagiĝon kaj malsupreniris antaŭ la kastelon. Mi ĉirkaŭiris ekzamenante ĉiujn spurojn kiuj povis veni aŭ iri al ĝi. Sed ili estis tiel intermiksitaĵoj kaj tiel konfuzaj ke mi ne sukcesis akiri ion el ili. Cetere, mi volegas ĉi tie rimarkigi ke mi tute ne kutimas taksu kiel tro gravajn la eksterajn signojn kiujn lasas la trapaso de iu krimo. Tiu metodo kiu konsistas konkludi al krimulo laŭ la piedsignoj de paŝoj, estas tute primitiva. Estas multaj spuroj de paŝoj kiuj estas identaj, kaj estas apenaŭ se necesas peti de ili unuan indicon kiun oni nenialoke kapablas konsideri kiel pruvon.

Ĉiel ajn, en la granda konfuzo de mia menso, mi do iris en la honorkorton kaj klinis min al la spuroj, al ĉiuj spuroj kiuj tie estis, petante de ili tiun unuan indicon kies mi tiom bezonis por kroĉi min al "raciaĵo", al io kiu ebligus min "rezoni" pri la okazaĵoj de la "neklarigebla galerio". Kiel rezoni ?... Kiel rezoni ?

...Ha ! Rezoni per la bona flanko ! Mi sidiĝas, senespera, sur ŝtono de la senhoma honorkorto... Kion mi faris, ekde pli ol unu horo, se ne la plej malalta laboro de la plej ordinara policano... Mi iras serĉi la eraron kiel la iu ajn inspektoro, sur la spuro de kelkaj paŝoj "kiuj faros diri al mi tion kion ili volas" !

Mi sentas min pli malnobla, pli malalta en la skalo de la inteligentecoj ol tiuj agentoj de la Sekureco imagitaĵoj de modernaj romanistoj, agentoj kiuj akiris sian metodon per la legado de la romanojn de [Edgaro Poe](#) aŭ [Konano Dojlo](#). Ha ! Literaturaĵoj agentoj... kiuj konstruas montojn da azenaĵoj pro paŝo sur la sablo, pro desegno de mano sur la muro ! "Al vi, Frederiko Larsano, al vi, la literatura agento !... Vi tro legis Konano" Dojlo", maljunulo mia !

Ŝerloko Holms'o farigos al vi stultaĵojn, rezonadajn stultaĵojn pli grandegajn ol tiujn kiujn oni legas en libroj... Ili farigos al vi aresti senkulpulon... Per via metodo laŭ Konano Dojlo, vi sukcesis konvinki la enketjuĝiston, la estron de la Sekureco... ĉiujn... Vi atendas lastan pruvon... iun lastan ! Diru do iun unuan, malfeliĉulo ! ... "Ĉio kion la sentoj proponas al vi ne povus esti pruvo..." Ankaŭ mi ja klinis min al "okulvideblajn spurojn", sed nur por peti ilin eniri en la ringon kiun desegnis mian racion. Ha ! Multfoje, la ringo estis tiel mallarĝa, tiel mallarĝa... Sed tiom mallarĝa ĝi estis, ĝi estis grandega, ĉar ĝi enhavis nur veron !... Jes, jes, mi ĵuras tion, la okulvideblaj spuroj ĉiam estis nur miaj helpantoj... ili tute ne estis miaj mastroj... Ili tute ne faris min tiun monstran aĵon, pli teruran ol viron sen okuloj : viro kiu malbone vidas ! Kaj jen kial mi triumfos vian eraron kaj vian bestan cerbumadon, Ho, Frederiko Larsano !"

He kio ! He kio ! Ĉar, unuafoje ĉi-nokte, en la neklarigebla galerio, okazis subitaĵo kiu "ŝajnas" tute ne eniri la ringon desegnititan de mia racio, jen mi kiu deliras, jen mi kiu kliniĝas, la nazon al grundo, kiel porko kiu hazarde serĉas en la koto, la putraĵon kiu nutros ĝin... Nu ! Rultabio, mia amiko, relevu la kapon... ne eblas ke la okazaĵo de la neklarigebla galerio estu elirinta el la ringo desegnita de via racio... Vi scias tion ! Vi scias tion ! Do, relevu la kapon... premu per ambaŭ manoj la ŝvelaĵojn de via frunto, kaj memoru ke, kiam vi desegnis la ringon, vi prenis por tiri ĝin en via cerbo, kiel oni tiras sur la papero geometran figuron, vi utiligis vian racion per la bona flanko !

Nu, agu nun... kaj resupreniru en la "neklarigeblan galerion apogante vin sur la bona flanko de via racio", kiel Frederiko Larsano apogas sin sur sia irbastono, kaj vi rapide pruvos ke la granda Freĉjo estas nur farsulo.

Jozefo Rultabio

La 30a de oktobro, tagmeze.

Tiel mi pensis... tiel mi agis... la kapo fajranta, mi resupreniris en la galerion kaj jen ke, sen esti trovanta ion pli ol tion kion mi

vidis ĉi-nokte, la taŭga fundo de mia racio montris al mi aferon
tiom eksterordinaran, ke mi bezonas "alkroĉi min al ĝi" por ne fali.

Ha ! Tamen necesos al mi forton por nun malkovri la
okulvideblajn spurojn kiuj eniros, kiuj devas eniri en la pli larĝan
ringon kiun mi desegnis tie, inter la du ŝvelaĵoj de mia frunto !

Jozefo Rultabio

La 30a de oktobro, noktomeze.

19 - Rultabio regalias min per tagmanĝo ĉe la gastejo de la "Ĉefturo".

Estas nur pli poste ke Rultabio transdonis al mi tiun notlibron, kie la historio de la fenomeno de la "neklarigebla galerio" estis detale raportita de li, la matenon mem kiu sekvis tiun enigman nokton. La tago kiam mi kuniĝis al li en sia ĉambro de la Glanejo, li detalege rakontis al mi ĉion kion vi nun konas, inkluzive la uzon de sia tempo dum la kelkaj horoj kiujn li pasigis dum tiu semajno en Parizo kie, cetere, li devis nenion sciigi kiu utilis al li.

La evento de la "neklarigebla galerio" okazis dum la nokto de la 29^a ĝis la 30^a de oktobro, tio estas tri tagoj antaŭ mia reveno al la kastelo, ĉar ni estis la 2^{an} de novembro. "Estas do la 2^{an} de novembro" ke mi revenas al la Glanejo, alvokita de la depeŝo de mia amiko kaj alportante la revolverojn.

Mi estas en la ĉambro de Rultabio; li ĵus finis sian raporton.

Dum li parolis, li ne ĉesis karesi la konveksecon de la vitroj de la nazumo kiun li trovis sur la ronda tableto, kaj mi komprenis, pro la ĝojo kiun li sentis fingrumante ĉi tiujn vitrojn de presbiopulo, ke tiuj ĉi devis prezenti unu el tiuj "okulvideblaj spuroj destinitaj por eniri en la ringo tiritita de la bona flanko de lia racio". Tiu stranga, unika maniero kiun li uzis por sin esprimi utiligante terminojn mirinde taŭgajn por lia penso, ne plu surprizis min; sed ofte necesis koni lian penson por kompreni la terminojn kaj tute ne estis ĉiam facile penetri la pensadon de Jozefo Rultabio. La pensmaniero de tiu infano estis unu el la plej strangaj aferoj kiun mi iam ajn observis. Rultabio promenis tra la vivo kun tiu pensmaniero, sen suspekti la miregon - ni diru la vorton - la konsternon kiun li renkontis sur sia vojo.

La homoj turnis la kapon al tiu penso, rigardis ĝin preterpasi, malproksimiĝi, kiel oni haltas por pli longe rigardadi originalan silueton kiun oni renkontis sur sia vojo. Kaj kiel oni diras al si : "De kie li, tiu ĉi ! Kien li iras ?", oni diris al si : "De kie venas la penso de Jozefo Rultabio kaj kien ĝi iras ?" Mi konfesis ke li tute

ne suspektis pri la originala koloro de sia penso; tial ĝi tute ne ĝenis lin por promeni, kiel ĉiuj, en la vivo. Same, ulo kiu tute ne suspektas pri sia ekstravaganca vestomaniero, estas tute laŭ sia plaĉo, kia ajn estu la medio kiun li trapasas. Estas do, kun natura simpleco, ke tiu infano, nerespondeca pri sia supernatura cerbo, esprimis grandegajn aferojn "pro ilia konciza logiko", tiel konciza ke ni kapablis, ni, kompreni la konturon de tio nur tiom kiom antaŭniaj mirigitaj okuloj, li bonvolis malstreĉi ĝin kaj prezenti ĝin fronte laŭ ĝia normala pozicio.

Jozefo Rultabio demandis al mi tion kion mi pensis pri la raporto kiun li ĵus faris al mi. Mi respondis al li ke lia demando multe embarasis min, al kiu li rebatis al mi provi miavice uzi mian racion per la bona flanko.

- Nu, mi eligis, ŝajnas al mi ke la deirpunkto de mia rezonado devas esti ĉi tiu : tute ne estas dubo ke la murdinto kiun vi persekutis, estis dum iu momento de tiu postkuro en la galerio.

Kaj mi haltis...

- Komencante tiel bone, li ekkriis, vi tute ne devus halti tiom frue. Nu, malgranda strebado.

- Mi tuj provos. Ekde la momento kiam li estis en la galerio kaj kiam li malaperis, dum li ne povis trairi aŭ tra pordo aŭ tra fenestro, necesas ke li eskapu tra alia aperturo.

Jozefo Rultabio kompate konsideris min, senzorge ridetis, kaj ne hezitis pli longe konfidi al mi ke mi ĉiam rezoni "kiel pantoflo"¹¹.

- Kion mi diras ? Kiel pantoflo ! Vi rezonas kiel Frederiko Larsano !

Ĉar Jozefo Rultabio pasis tra alternaj periodoj de admiro kaj disdegno por Frederiko Larsano; jen li ekkriis : "Li vere estas lerta !"; jen li ĝemis : "Kia krudulo ! laŭ ke - kaj mi bone rimarkis tion - laŭ ke la malkovroj de Frederiko Larsano venis konfirmi sian rezonadon de li aŭ ke ili obĵetis ĝin. Tio estis unu el la malnoblaj flankoj de la nobla karaktero de tiu stranga infano.

Ni metis nin staraj kaj li kuntiris min en la parkon. Kiam ni troviĝis en la honorkorto, direktante nin al la elirejo, bruo de

11 Franca esprimo : Fari ion "kiel pantoflo" = tre malbone, tre mallerte.

ŝutroj ĵetitaj kontraŭ la muro faris al ni turni la kapon, kaj ni vidis sur la unua etaĝo de la maldekstra alo de la kastelo, ĉe la fenestro, skarlatan kaj tute razitan vizaĝon kiun mi tute ne konis.

- Jen vidu ! murmuris Rultabio, Arturo Ranco !

Li mallevis la kapon, rapidigis sian paŝadon, kaj mi aŭdis lin diri inter siaj dentoj :

- Ĉu li do estis ĉi-nokte en la kastelo ?... Kion li venis fari ĉi tie ?

Kiam ni estis sufiĉe for de la kastelo, mi demandis al li kiu estis ĉi tiu Arturo Ranco kaj kiel li konatiĝis kun li.

Tiam li memorigis al mi sian raporton tiun de la mateno mem, rememorigante al mi ke S^{ro} Arturo V. Ranco estis tiu usonano el Filadelfio kun kiu li tiom abunde tintigis la glasojn dum la vesperfesto de la Elizeo.

- Sed ĉu li ne devis forlasi Francion preskaŭ tuj ? mi demandis.

- Sendube; tial vi vidas min tute mirigita ankoraŭ trovi lin, ne nur en Francio, sed plie, sed ĉefe en la Glanejo. Li tute ne alvenis ĉi-matene; li tute ne alvenis ĉi-nokte; li do alvenis antaŭ la vespermanĝo, kaj mi tute ne vidis lin. Kiel okazis ke la gepordistoj tute ne informis min ?

Mi rimarkigis al mia amiko, ke pri la gepordistoj, li tute ne ankoraŭ diris al mi kiel li elturniĝis reliberigi ilin.

Ni ĵus alproksimiĝis al la pordistejo; la gepatroj Berniero^j rigardis nin veni. Bona rideto lumigis ilian sanegan vizaĝon. Ili ŝajnis esti gardantaj neniun malbonan memoron pri sia antaŭjuĝa malliberigo. Mia juna amiko demandis al ili je la kioma horo alvenis Arturo Ranco. Ili respondis al li ke ili nesciis ke S^{ro} Arturo Ranco estis en la kastelo. Li devis sin prezenti tie dum la vespero de la antaŭtago, sed ili ne estis devintaj malfermi al li la kradon, konsidere ke S^{ro} Arturo Ranco, kiu estis, ŝajnas, sperta piediranto kaj kiu tute ne volis ke oni iru serĉi lin per veturilo, kutimis eltrajniĝi en la stacidomo de la urbeto de Sankta-Mikaelo; de tie, li alpaŝadis tra la arbaregon ĝis la kastelo. Li alvenis al la parko tra la groto de Sankta-Ĝenoveva, malsupreniris en tiun groton, transpaŝis malgrandan kradaĵon kaj sin trovis en la parko.

Laŭmezure kiam la gepordistoj parolis, mi vidis la vizaĝon de Rultabio malheliĝi, eksterigi kelkan malkontentecon kaj, sen dubi pri tio, malkontentecon kontraŭ si mem.

Evidente, li estis iomete ofendita ke, estante surloke tiom laborinta, estante esplorinta la estulojn kaj la aferojn de la Glanejo kun diligenta zorgo, li ekaŭdis nur nun ke "Arturo Ranco kutime veni en la kastelo".

Malgaja, li petis klarigojn.

- Vi diras ke S^{ro} Arturo Ranco kutimas veni al la kastelo... Sed kiam do li venis lastfoje ?

- Ni ne povus precize diri al vi, respondis S^{ro} Berniero - estis la nomo de la pordisto - konsidere ke ni povis nenion scii dum oni tenis en malliberejo, kaj plie ĉar, se tiu sinjoro, kiam li venas al la kastelo, ne trapasas tra nia krado, li ankaŭ ne trapasas ĝin kiam li forlasas ĝin...

- Nu, ĉu vi scias kiam li venis lastfoje ?

- Ho ! jes sinjoro... antaŭ naŭ jaroj !...

- Li venis en Francio antaŭ naŭ jaroj, respondis Rultabio; kaj ĉi-foje, laŭ via kono, kiom da fojoj li venis en la Glanejo ?

- Tri fojojn.

- Kiam li venis en la Glanejo lastfoje, laŭ "via kono", antaŭ hodiaŭ ?

- Oko da tagoj antaŭ la atenco en la "Flava Ĉambro".

Rultabio ankoraŭ demandis, ĉi-foje aparte al la virino :

- En la sulko de la pargeto ?

- En la sulko de la pargeto, ŝi respondis.

- Dankon, eligis Rultabio, kaj preparu vin por ĉi-vespere.

Li prononcis ĉi tiun lastan frazon, kun fingro sur la buŝo, por rekomendi silenton kaj diskretecon.

Ni eliris el la parko kaj direktis nin al la gastejo de la "Ĉefturo".

- Ĉu vi kelfoje iras manĝi en ĉi tiu gastejo ?

- Kelkfoje.

- Sed vi ankaŭ prenas viajn manĝojn en la kastelo ĉu ne ?

- Jes, Larsano kaj mi, ni servigas nin jen en iu el niaj ĉambroj,

jen en la alia.

- Ĉu S^{ro} Stangerson neniam invitis vin al sia tablo ?

- Neniam.

- Ĉu via ĉeesto ĉe li ne tedas lin ?

- Mi nenion scias pri tio, sed ĉiaokaze li agas kvazaŭ ni ne ĝenus lin.

- Ĉu li neniam pridemandas vin ?

- Neniam ! Li restis en tiu spiritostato de la sinjoro kiu estis malantaŭ la pordo de la "Flava Ĉambro" dum oni murdis lian filinon, kiu enrompis la pordon kaj kiu tute ne trovis la murdinton. Li estas persvadita ke, ekkiam li ne sukcesis "ĉe la freŝa faro" ion malkovri, des pli prave ni ja ankaŭ ne sukcesos malkovri ion pli... Sed li metis al si devon, "ekde la hipotezo de Larsano ", tute ne malhelpi niajn iluziojn.

Rultabio denove enprofundiĝis en siaj pripensadoj. Li fine eliris el ili por sciigi al mi kiel li liberigis la du gepordistojn.

Mi lastatempe iris trovi S^{ron} Stangerson kun paperfolio. Mi diris al li skribi sur tiu folio ĉi tiujn vortojn : "Mi min devontigas, kion ajn ili povus diri, gardi por mia servado miajn du fidelajn geservistojn, Berniero kaj lia edzino" kaj subskribi.

Mi klarigis al li ke kun ĉi tiu frazo mi kapablus paroligi la pordiston kaj lian edzinon kaj mi asertis al li ke mi certis ke ili ne partoprenis en la krimo. Ĉiam estis cetere mia opinio. La enketjuĝisto prezentis ĉi tiun subskribitan folion al la Berniero kiu tiam parolis. Ili diris tion kion mi certis ke ili dirus, ekde kiam oni forigus de ili, la timon perdi sian postenon. Ili rakontis ke ili ŝtelĉasis sur la bieno de S^{ro} Stangerson kaj ke estis dum vespero de ŝtelĉasado ke ili troviĝis ne for de la pavilono ĉe la momento de la dramo. La kelkaj kunikloj kiujn ili tiel akiris, malfavore al S^{ro} Stangerson, estis venditaj de ili al la estro de la gastejo de la "Ĉefturo", kiu uzis ilin por sia klientaro aŭ kiu forvendis ilin en Parizo. Estis la vero, mi konjektis ĝin ekde la unua tago. Memoru pri tiu frazo per kiu mi eniris en la gastejon de la "Ĉefturo" : "Nun necesos manĝi sangan bifstekon !" Ĉi tiun frazon mi aŭdis ĝin matene mem kiam ni alvenis antaŭ la krado de la parko, kaj ankaŭ

vi ja aŭdis ĝin, sed vi tute ne taksu ĝin kiel gravan. Vi scias ke, ĉe la momento kiam ni estis atingontaj tiun kradon, ni haltis por momente rigardi viron kiu, antaŭ la muro de la parko, atende paŝadis konsultante ĉiunmomente sian poŝhorloĝon. Tiu viro estis Frederiko Larsano kiu jam laboris. Nu, malantaŭ ni, la gastejestro sur sia sojlo, diris al iu kiu sin trovis ene de la gastejo : "Nun necesos manĝi sangan bifstekon !

Kial tiu "nun" ? Kiam oni estas kiel mi, serĉante la plej misteran veron, oni lasas nenion eskapi, nek pri tio kion oni vidas, nek pri tio kion oni aŭdas.

Necesas, por ĉio, trovi signifon. Ni alvenis en malgrandan landon, kiu ĵus estis skuita de krimo. La logiko kondukis min suspekti ĉiun prononcitan frazon kiel povanta rilati al la taga evento. "Nun", laŭ mi, signifis: "Ekde la atenco". Ekde la komenco de mia enketo, mi do serĉis por trovi korelativecon inter tiu frazo kaj dramo. Ni iris tagmanĝi ĉe la "Ĉefturo". Mi tuj ripetis la frazon kaj vidis, per la surprizo kaj la enuo de ulĉjo Mateo, ke mi ne havis, pri li, troigi la gravecon de tiu frazo. Mi tiumomente sciigis pri la aresto de la geportistoj. Ulĉjo Mateo parolis al ni pri tiuj homoj kiel oni parolas pri veraj amikoj... kiun oni bedaŭras... Fatala kunligo de la ideoj... Mi diris al mi : "Nun ke la geportistoj estas arestitaj, necesos manĝi sangan bifstekon". Ne plu de geportistoj, ne plu de ĉasaĵo ! Kiel mi estis kondukita al tiu preciza ideo de "ĉasaĵo" ! La malamo esprimita de ulĉjo Mateo por la gardisto de S^{ro} Stangerson, malamo, li asertis, dividita kun la geportistoj iom post iom kondukis min al la ideo de ŝtelĉasado... Nu, kiel tute evidente, la geportistoj ne povis esti en sia lito ĉe la momento de la dramo, kial tiunokte ili estis ekstere ? Por la dramo ? Mi tute ne estis preta kredi tion, ĉar jam mi pensis, pro kialoj kiujn mi diros al vi pli poste, ke la murdinto ne havis komplicon kaj ke tiu tuta dramo kaŝis misteron inter F^{ino} Stangerson kaj la murdinto, mistero en kiu la geportistoj ne havis por fari. La rakonto de ŝtelĉaso klarigis ĉion rilate al la geportistoj. Mi principe akceptis tion kaj mi serĉis pruvon ĉe ili, en ilia loĝejo. Mi eniris en ilia dometo, kiel vi scias tion, kaj

malkovris sub la litoj maŝkaptilojn kaj drato el latuno.

"Evidente! mi pensis, evidente ! Jen ja kial ili estis nokte en la parko". Mi ne surprizis ke ili estis mutaj antaŭ la juĝisto, kaj ke subminace de tiel grava akuzo kiel tiu de komplikeco en la krimo, ili ne tuj respondis konfesante la ŝtelĉasado. La ŝtelĉaso savis ilin el la asiza tribunalo, sed maldungigis ilin el la kastelo kaj ĉar ili tute certis pri ilia senkulpeco pri la krima fakto, ili bone esperis ke tiu ĉi estus rapide solvita kaj ke oni daŭrigis nekoni la ŝtelĉasan fakton. Ĉiam estus ebla por ili ĝustatempe paroli ! Mi rapidigis de ili la konfesadon per la promeso subskribita de S^{ro} Stangerson, kiun mi alportis al ili. Ili donis ĉiujn necesajn pruvojn, estis liberigitaj, kaj sentis por mi viglan dankemon. Kial mi tute ne liberigis ilin pli frue ? Ĉar tiam mi tute ne certis ke en ilia kazo estis nur ŝtelĉasado. Mi volis lasi ilin veni kaj studi la terenon. Mia konvinko fariĝis pli certa nur laŭmezure kiel fluis la tagoj. La morgaŭo de la "neklarigebla galerio", ĉar mi ĉi tie bezonis sindonemajn homojn, mi decidis tuj ligi ilin kun mi ĉesigante ilian malliberecon. Kaj jen !

Tiel esprimiĝis Jozefo Rultabio, kaj mi povis nur ankoraŭ miri pro la simpleco de rezonado kiu kondukis lin al la vero en ĉi tiu afero pri la kunkulpeco de la gepordistoj. Certe ja, la afero estis bagatela, sed mi sekrete pensis ke la junulo, pli malpli frue, tute ne forgesos klarigi al ni, kun la sama simpleco, la timigan nokton de la "Flava Ĉambro" kaj tiun de la "neklarigebla galerio".

Ni estis alvenintaj ĉe la gastejo de la "Ĉefturo".

Ni eniris.

Ĉi-foje, ni tute ne vidis la gastiganton, sed estis la gastigantino, kiu akceptis nin kun bona feliĉa rideto. Mi jam priskribis la ĉambron kie ni estis, kaj mi donis skizon de la ĉarma blondulino kun mildaj okuloj, kiu tuj sin metis sub nia dispono por la tagmanĝo.

- Kiel fartas ulĉjo Mateo ? demandis Rultabio.

- Apenaŭ pli bone, sinjoro, apenaŭ pli bone; li ankoraŭ restas en la lito.

- Lia reŭmatismo ne do forlasas lin ?

- He, ne ! Mi ankoraŭ devis lastnokte fari al li injekton de morfino. Estas nur tiu drogo kiu mildigas liajn dolorojn.

Ŝi parolis per agrabla voĉo; ĉio en ŝi esprimis dolĉecon. Ŝi vere estis bela virino, iom maldiligenta, kun grandaj okuloj bluringaj, amemaj okuloj. Ulĉjo Mateo, kiam li ne havis reŭmatismen, devis esti feliĉa knabo. Sed ŝi, ĉu ŝi estis feliĉa kun tiu kruda reŭmatismulo ? La sceno al kiu ni antaŭe spektis, ne povis kredigi tion al ni, kaj tamen, estis en la tuta sinteno de tiu virino, io kiu tute ne indikis malesperon. Ŝi malaperis en sian kuirejon por prepari nian manĝon, lasante al ni sur la tablo botelon da bonega cidro. Rultabio verŝis ĝin al ni en bovloj, ŝtopis sian pipon, bruligis ĝin, kaj trankvile, fine klarigis al mi la kialon kiu decidigis lin venigi min al la Glanejo kun revolveroj.

- Jes, li diris, sekvante per kontempla okulo la spiralaĵojn de la fumo kiun li tiris de sia stumpopipo, jes, kara amiko, mi atendas ĉi-nokte la murdinton.

Estis mallonga silento kiun mi atentis ne interrompi, kaj li daŭrigis :

- Hieraŭ vespere, ĉe la momento kiam mi estis enlitiĝonta, S^{ro} Roberto Darzak frapis la pordon de mia ĉambro. Mi malfermis al li, kaj li konfidis al mi ke li nepre devis iri al Parizo la morgaŭon matene, tio estas tiu mateno mem. La kialo kiu decidigis lin por tiu vojaĝo estis samtempe nediskutebla kaj mistera, nediskutebla ĉar ne eblis al li ne fari tiun vojaĝon, kaj mistera ĉar ankaŭ ne eblis al li malkaŝi al mi la celon. "Mi foriras, kaj tamen, li aldonis, mi donus la duonon de mia vivo por ne tiumomente forlasi F^{inon} Stangerson". Li tute ne kaŝis al mi ke li kredis ŝin ankoraŭfoje en danĝero. "Io okazus dum la venonta nokto, ke mi apenaŭ mirus pro tio, li konfesis, kaj tamen necesas ke mi forestiĝas. Mi povos reveni en la Glanejon nur postmorgaŭ matene.

Mi demandis al li klarigojn, kaj jen tio kion li klarigis al mi. Tiu ideo de urĝa danĝero devenis al li nur de la koincido kiu ekzistis inter liaj forestoj kaj la atencoj kies F^{ino} Stangerson estis la celo. La nokto de la "neklarigebla galerio", li devis forlasi la Glanejon; la nokto de la "Flava Ĉambro", li ne povus esti en la Glanejo kaj,

fakte, ni scias ke li ne estis tie. Almenaŭ ni scias tion oficiale, laŭ liaj deklarioj. Por ke, ŝarĝita per tia ideo, li denove forestu hodiaŭ, necesis ke li obeu al pli forta volo ol la sia. Estas tio kion mi pensis, kaj estas tio kion mi diris al li. Li respondis al mi : "Eble !" Mi demandis ĉu tiu volo pli forta ol la sia estis tiu de F^{ino} Stangerson; li ĵuris al mi ke ne, kaj ke la decido de lia foriro estis prenita de li, ekster iu ajn instrukcio de F^{ino} Stangerson. Resume, li ripetis al mi ke li kredis en la ebleco de nova atenco nur pro tiu eksterordinara koincido kiun li rimarkis "kaj cetere kiun la enketjuĝisto rimarkigis al li". "Se io okazis al F^{ino} Stangerson, li diris, estus terura kaj por ŝi kaj por mi; por ŝi, kiu unu fojon pli estos inter vivo kaj morto; por mi kiu ne povos protekti ŝin en la okazo de atako, kaj kiu poste estos en la neceso tute ne diri kie mi tranoktis. Nu, mi perfekte konscias pri la suspektojn kiuj pezas sur mi. La enketjuĝisto kaj S^{ro} Frederiko Larsano - ĉi-lasta spursekvis min, la lastan fojon kiun mi iris al Parizo, kaj mi havis ĉiujn malfacilaĵojn de la mondo¹² por liberigi min de li - baldaŭ kredos min kulpa. "Kial vi diras, mi subite ekkriis, la nomon de la murdinto, ĉar vi konas lin ?" S^{ro} Darzak ŝajnis ekstreme konfuzita pro mia ekkrio. Li rebatis per hesita voĉo : "Mi ! Mi konas la nomon de la murdinto ? Kiu sciigus ĝin al mi ?" Mi tuj reparolis : "F^{ino} Stangerson !" Tiam li fariĝis tiom pala ke mi kredis ke li tuj malbone fartus, kaj mi vidis ke mi ĝuste frapis : F^{ino} Stangerson kaj li scias la nomon de la murdinto ! Kiam li iom resaniĝis, li diris al mi : "Mi baldaŭ forlasos vin, sinjoro. Ekde kiam vi estis ĉi tie, mi povis taksi vian esceptan inteligentecon kaj vian senegalan sagacecon. Jen la servo kiun mi petegas de vi. Eble mi malprave timas atencon dum la venonta nokto; sed ĉar necesas antaŭvidi ĉion, mi kalkulas je vi por malebligi tiun atencon. Prenu ĉiujn aranĝojn kiujn necesos por izoli, por gardi F^{inon} Stangerson. Faru ke oni ne povu eniri en la ĉambron de F^{ino} Stangerson. Gvatu ĉirkaŭ tiu ĉambro kiel bona gardhundo. Ne dormu. Tute ne permesu al vi sekundon de ripozo. La viro kiun ni timas, havas nekredeblan ruzecon, kiu eble estis ankoraŭ neniam egalita en la

12 Franca esprimo signifanta "Havi multajn malfacilajn problemojn por fari ion"

mondo. Ĉi tiu ruzeco mem savos ŝin se vi gvatas; ĉar neblas ke li ne sciu ke vi gvatas pro ĉi tiu ruzeco mem; kaj se li scias ke vi gvatas, li nenion provos.

- Ĉu vi parolis pri tiuj aferoj al S^{ro} Stangerson ?

- Ne !

- Kial ?

- Ĉar mi tute ne volas, sinjoro, ke S^{ro} Stangerson diru al mi tion kion vi diris al mi antaŭ momento : vi konas la nomon de la murdinto ! Se vi, vi estas surprizita de tio kion mi ĵus diris al vi : "La murdinto venos morgaŭ !" Kiu estus la surprizo de S^{ro} Stangerson, se mi ripetis al li la saman aferon ! Li eble tute ne akceptos ke mia sinistra prognozo estu bazita nur sur koincidoj kiujn ankaŭ li sendube fine trovas strangaj... Mi diras al vi ĉion ĉi, sinjoro Rultabio, ĉar mi havas grandan... grandan konfidon al vi... Mi kredas ke vi ja ne suspektas min !...

- La kompatindulo, daŭrigis Rultabio, respondis al mi kiel li kapablis ĉiufланke taŭzita. Li suferis. Mi kompatis lin, des pli ke mi perfekte konsciis ke li mortigus lin plivole ol diri al mi kiu estis la murdinto, kiel F^{ino} Stangerson plivole murdiĝus ol denunci la viron de la "Flava Ĉambro" kaj de la "neklarigebla galerio". La viro devas teni ŝin, aŭ devas teni ilin ambaŭ, per terura maniero, kaj ili devas nenion tiom timi kiom vidi S^{ro} Stangerson ekscii ke lia filino estas tenata "de ŝia murdinto". Mi komprenigis al S^{ro} Darzak, ke li sufiĉe defendis sin kaj ke li povis silenti ĉar li ne pli povis ion sciigi al mi. Mi promesis al li vigili kaj tute ne enlitiĝi dumnokte. Li insistis por ke mi organizu veran netranspaseblan baron ĉirkaŭ la ĉambron de F^{ino} Stangerson, ĉirkaŭ la buduaro kie dormis la du gardistinoj kaj ĉirkaŭ la salono kie kuŝiĝis, ekde la "neklarigebla galerio", S^{ro} Stangerson; finfine, ĉirkaŭ la tuta apartamento. Ne nur mi komprenis, pro ĉi tiu insisto, ke S^{ro} Darzak petis al mi nebligis la alvenon al la ĉambro de F^{ino} Stangerson, sed plie fari ĉi tiun alvenon tiom "videble" neblan ke la viro tuj malkuraĝiĝu kaj malaperu sen lasi spuron. Estas tiel mi klarigis en mi la finan frazon kies li salutis min : "Kiam mi estos foririnta, vi povos paroli pri "viaj" suspektoj pri ĉi tiu nokto al S^{ro} Stangerson, al ulĉjo

Jakobo, al Frederiko Larsano, al ĉiuj en la kastelo kaj tiel organizi, ĝis mia reveno, vigladon pri kiu, antaŭ la okuloj de ĉiuj, vi sole havis la ideon.

Li foriris, la kompatindulo, la kompatinda viro, ne plu tro sciante tion kion li diris, antaŭ mia silento kaj miaj okuloj kiuj "kriis" al li ke mi konjektis la tri kvaronojn de sia sekreto. Jes, jes, vere, li devis esti tute konsternita por esti veninta al mi en tia momento kaj por forlasi F^{inon} Stangerson, kiam li havis en la kapo tiun teruran ideon pri "koincido"...

Kiam li estis foririnta, mi pripensis. Mi pripensis pri ĉi tion, ke necesis esti pli ruza ol la ruzaĝo mem, tiel ke la viro, se li devis iri tiunokte en la ĉambron de F^{ino} Stangerson, tute ne suspektus dum sekundo, ke oni povus suspekti lian alvenon.

Certe ja ! Malebligi lin penetri, eĉ per morto, sed lasi lin sufiĉe progresi por ke, morta aŭ vivanta, oni povus klare vidi lian vizaĝon ! Ĉar necesis ĉesi, necesis liberigi F^{inon} Stangerson de tiu latentata murdo !

Jes, mia amiko, asertis Rultabio post esti metinta sian pipon sur la tablon kaj malpleniginta sian glason, necesas ke mi tre precize vidu lian vizaĝon, por certigi ke ĝi eniras en la ringo kiun mi desegnis per la taŭga fundo de mia racio.

Ĉe tiu momento, alportante la tradician omeleton kun lardo, la gastigantino reaperis. Rultabio iom taŭzetis S^{inon} Mateoⁿ kaj tiu ĉi montris sin laŭ la plej ĉarma humoro.

- Ŝi estas multe pli gaja, li diris al mi, kiam ulĉjo Mateo estas alnajlita al la lito per siaj reŭmatismoj ol kiam ulĉjo Mateo estas rapidmova !

Sed mi ne estis nek ĉe la ludoj de Rultabio, nek ĉe la ridetoj de la gastigantino; mi estis entute ĉe la lastaj paroloj de mia juna amiko, kaj ĉe la stranga klopodo de S^{ro} Roberto Darzak.

Kiam li finis sian omleto kaj kiam ni estis denove solaj, Rultabio daŭrigis la sinsekvon de siaj konfidencoj :

- Kiam mi sendis al vi mian depeŝon ĉi-matene, je la unua horo, mi haltis, li diris al mi, ĉe la parolo de S^{ro} Darzak : "La murdinto eble venos la venontan nokton". Nun, mi povas diri al vi ke li

"certe" venos . Jes, mi atendas lin.

- Kaj kio donis al vi ĉi tiun certecon ? Ĉu ne estus hazarde...

- Silentu, interrompis min Rultabio ridetante, silentu, vi baldaŭ diros stultaĝon. Mi certas ke la murdinto venos ekde ĉi tiu mateno, je la deka kaj duono, tio estas antaŭ via alveno, kaj konsekvence antaŭ ol ni ekvidis Arturoⁿ Rancoⁿ ĉe la fenestro de la honorkorto...

- Ha ! Ha ! mi eligis... vere... sed ankoraŭ, kial vi certis ekde la deka kaj duono ?

- Ĉar je la deka kaj duono, mi akiris la pruvon ke F^{ino} Stangerson faris tiom da klopodoj por ebligi al la murdinto eniri ĉi-nokte en sian ĉambron, kiom S^{ro} Roberto Darzak prenis da antaŭzorgoj alparolante al mi, por ke li ne eniris tien...

- Ho ! Ho ! Mi ekkriis, ĉu tio eblas !...

Kaj pli mallaŭte :

- Ĉu vi ne diris al mi ke F^{ino} Stangerson adoris Robertoⁿ Darzak^{on} ?

- Mi diris tion al vi ĉar estas la vero !

- Do vi ne trovas stranga...

- Ĉio estas stranga en ĉi tiu afero, mia amiko, sed bone kredis ke la strangaĝo kiun vi, vi konas, estas nenio apud la strangaĝo kiun atendas vin !...

- Necesus konsenti, mi ankoraŭ diris, ke F^{ino} Stangerson "kaj ŝia murdinto" havas inter si rilatojn almenaŭ perleterajn ?

- Akceptu tion ! mia amiko, akceptu tion !... Vi riskas nenion !... Mi raportis al vi pri la afero de la letero sur la tablo de F^{ino} Stangerson, letero lasita de la murdinto ĉe la nokto de la "neklarigebla galerio", letero malaperinta... en la poŝo de F^{ino} Stangerson... Kiu povus aserti ke, "en tiu letero, la murdinto ne minacordonis F^{inon} Stangerson doni al li sekvontan konkretan rendevuon", kaj fine ke li ne informis F^{inon} Stangerson, "tuj kiam li certis pri la foriro de S^{ro} Darzak", ke ĉi tiu rendevuo devis esti por la nokto kiu venas ?

Kaj mia amiko silente rikanis. Estis momentoj kiam mi demandis al mi ĉu li tute ne primokis min.

La pordo de la gastejo malfermiĝis. Rultabio staris tiel subite, ke oni povus kredi ke li ĵus spertis sur sia seĝo, elektran malŝarĝiĝon.

- S^{ro} Arturo Ranco ! li ekkriis.

S^{ro} Arturo Ranco estis antaŭ ni, kaj, flegme, salutis.

- Ĉu vi rekonas min, sinjoro ? demandis Rultabio al la ĝentlemano.

- Perfekte," respondis Arturo Ranco. Mi rekonis vin kiel la knabeton de la bufedo (karmezina vizaĝo de Rultabio pro kolero pro titolo de knabeto). Kaj mi malsupreniris de mia ĉambro por veni premi al vi la manon. Vi estas gaja knabeto.

Etendita mano de la usonano; Rultabio malsulkiĝas, ridante premas la manon, prezentas min, prezentas S^{ron} Arturoⁿ-Vilhelmoⁿ Rancoⁿ, invitas lin partopreni en nia manĝo.

- Ne, dankon. Mi tagmanĝas kun S^{ro} Stangerson.

Arturo Ranco perfekte parolas nian lingvon, preskaŭ sen akĉento.

- Mi kredis, sinjoro, ne plu havi la plezuron revidi vin; ĉu vi ne devis forlasi nian landon la morgaŭon aŭ la postmorgaŭon de la akcepto en la Elizeo ?

Rultabio kaj mi, ŝajne indiferentaj pri ĉi tiu konversacio de renkontiĝo, tre atente streĉis la orelon al ĉiuj paroloj de la usonano.

La violete rozkolora vizaĝo de la viro, liaj pezaj palpebroj, kelkaj nervaj tikoĵ, ĉio elmontras, ĉio pruvas la alkoholulon. Kiel ĉi tiu fiulo estas la kunmanĝanto de S^{ro} Stangerson ? Kiel li povas esti intima kun la famkonata profesoro ?

Mi devis ekscii, kelkajn tagojn pli poste, de Frederiko Larsano - kiu estis, kiel ni, surprizita kaj scivola de la ĉeesto de la usonano en la kastelo, kaj dokumentis sin - ke S^{ro} Ranco fariĝis alkoholulo nur ekde dekkvinkelke da jaroj, tio estas, ekde la foriro el Filadelfio de la profesoro kaj de lia filino.

En la epoko kiam la Stangerson^{oj} loĝis en Ameriko, ili konatiĝis kaj ofte vizitadis Arturoⁿ Rancoⁿ kiu estis unu el la plej distingitaj **frenologoj** en la Nova Mondo. Li sukcesis, dank' al novajn kaj sagacajn eksperimentojn, transigi grandegan gradon al la scienco de **Gall** kaj de **Lavater**. Fine, necesas memorteni profite al Arturo

Ranco kaj por klarigo de tiu intimeco kun kiu li estis akceptita en la Glanejo, ke la usonona scienculo iam faris grandan komplezon al F^{ino} Stangerson, haltigante, riske de lia vivo, la neregeblajn ĉevalojn de ŝia veturilo. Estis eĉ probable ke, sekve de tiu evento, ia amikeco dummomente ligis Arturoⁿ Rancoⁿ kaj la filinon de la profesoro; sed nenio supozigis, en ĉio ĉi, la plej malgrandan amhistorion.

Kie Frederiko Larsano ĉerpis siajn informojn ? Li tute ne diras tion al mi; sed li ŝajnis preskaŭ certa pri tio kion li antaŭmetis.

Se, ĉe la momento kiam Arturo Ranco venis kuniĝi al ni en la gastejo de la "Ĉefturo", ni konus ĉi tiujn detalojn, verŝajne ke lia ĉeesto en la kastelo estigus nin malpli scivolajn, sed ili ĉiaokaze farintus nur "pliigi la intereson" kiun ni havis por ĉi tiu nova persono. La usonano devis esti kvardekkvinkelkjara. Li respondis tre nature al la demando de Rultabio :

- Kiam mi eksciis pri la atenco, mi prokrastis mian reiron al Usono; mi volis certiĝi, antaŭ ol foriri, ke F^{ino} Stangerson tute ne estis morte trafita, kaj mi reiros nur kiam ŝi estos plene resanigita.

Arturo Ranco tiam kondukis la konversacion, evitante respondi kelkajn demandojn de Rultabio, sciigante nin, sen tio ke ni petis tion al li, siajn proprajn ideojn pri la dramo, ideojn kiuj tute ne estis for, laŭ tio kion mi povis kompreni, de la ideoj de Frederiko Larsano mem, tio estas ke la usonano, li ankaŭ, pensis ke S^o Roberto Darzak "iel estas koncernita en la afero".

Li ne nomis lin, sed tute ne bezonis esti erudiciulo por ekkompreni tion kio estis funde de sia argumentado. Li diras al ni ke li sciis la klopodojn fare de la junulo Rultabio por sukcesi malplekti la konfuzitan implikaĵon de la dramo de la "Flava Ĉambro". Li raportis al ni ke S^o Stangerson informis lin pri la eventoj kiuj okazis en la "neklarigebla galerio". Oni divenis, aŭskultante Arturoⁿ Rancoⁿ, ke li klarigis ĉion per Roberto Darzak. Plurfoje, li bedaŭris ke S^o Darzak ĝuste estu "for de la kastelo" kiam okazis tiel misteraj dramoj en ĝi, kaj ni ekkomprenis la aludon. Fine, li esprimis ĉi tiun opinion ke S^o Darzak estis "tre

bone inspirita, tre lerta", mem loĝigante surloke S^{ron} Jozefoⁿ Rultabioⁿ kiu tute ne malsukcesus - iu tagon aŭ alian - malkovri la murdinton. Li eldiris ĉi tiun lastan frazon kun videbla ironio, stariĝis, salutis nin kaj eliris.

Rultabio, tra la fenestro, rigardis lin malproksimiĝi kaj diris :

- Stranga individuo !

Mi demandis al li :

- Ĉu vi kredas ke li tranoktos en la Glanejo ?

Je mia konsterniĝo, la juna reportero respondis "ke tio estis tute indiferenta al li".

Mi preterpasos la uzon de nia posttagmezo. Ke sufiĉu al vi scii ke ni iris promeni en la arbaroj, ke Rultabio kondukis min al la groto de Sankta-Ĝenoveva kaj ke dum tiu tuta tempo, mia amiko afektis paroli al mi pri tute aliaĵo ol tion kio turmentis lin.

Tiel la vespero alvenis. Mi tute miris vidi la reporteron fari nenium el ĉi tiuj aranĝoj pri kiuj mi atendis. Mi rimarkigis tion al li kiam, en la veninta nokto, ni troviĝis en lia ĉambro. Li respondis al mi ke ĉiuj liaj aranĝoj jam estis faritaj, kaj ke la murdinto ne sukcesis, ĉi-foje, eskapi lin. Ĉar mi esprimis kelkan dubon, rememorigante al li la malaperon de la viro en la galerio, kaj komprenigante ke la sama fakto povus renoviĝi, li rebatis : "ke li vere esperis tion, kaj ke estis ĉio kion li deziris tiun nokton". Mi tute ne insistis, proprasperte sciante kiel mia insisto estintus vana kaj malkonvena. Li konfidis al mi, ke ekde la komenco de la tago, per sia zorgo kaj tiuj de la gepordistoj, la kastelo estis gvatata tiel ke neniu kapablu alproksimiĝi al ĝi sen ke li estu informita de tio; kaj ke, en la okazo se neniu venus de ekstere, li estis tre trankvila pri ĉio kio povis koncerni "tiujn de interne".

Estis tiam la sesa kaj duono ĉe la horloĝo kiun li eltiris el sia veŝtopoŝo; li stariĝis, signis min sekvi lin, kaj sen fari ian ajn singardon, sen eĉ provi mildigi la bruon de siaj paŝadoj, sen rekomendi al mi silenton, li kondukis min tra la galerio; ni atingis la rektan galerion kaj sekvis ĝin ĝis la interŝtuparo de la ŝtuparo, kiun ni transiris. Ni tiam daŭrigis nian paŝadon en la galerio, "maldekstra alo", preterpasantaj antaŭ la apartamento de la

profesoro Stangerson. Ĉe la ekstremo de ĉi tiu galerio, antaŭ ol alveni al la ĉefturo, troviĝis ĉambro kiu estis la ĉambro okupita de Arturo Ranco. Ni sciis tion ĉar ni tagmeze vidis la usonanon ĉe la fenestro de ĉi tiu ĉambro, kiu rigardis al la honorkorto.

La pordo de tiu ĉambro estis laŭlarĝe de la galerio ĉar la ĉambro baris kaj ĉesigis la galerion ĉe tiu flanko. Resume la pordo de tiu ĉambro estis ĝuste fronte al la orienta fenestro "kiu troviĝis ĉe la ekstremo de la alia rekta galerio, dekstra alo, tie kie antaŭe Rultabio lokis ulĉjon Jakobo". Kiam ni turnis la dorson al tiu pordo, tio estas kiam oni eliris el tiu ĉambro, "ni vidis sinsekve la tutan galerion" : maldekstra alo, interŝtuparo kaj dekstra alo. Estis, memkompreneble, nur la turnanta galerio de la dekstra alo kiu oni tute ne vidis.

- Ĉi tiu turnanta galerio, diris Rultabio, mi destinas ĝin al mi. Vi, kiam mi petos tion al vi, vi venos loki vin ĉi tie.

Kaj li enirigis min en triangularan malluman kameron, prenita de la galerio kaj oblikve lokita maldekstre de la pordo de la ĉambro de Arturo Ranco. De ĉi tiu kaŝangulo, mi povis vidi ĉion kio okazis en la galerio tiel facile kvazaŭ mi estus antaŭ la pordo de Arturo Ranco kaj mi ankaŭ povus atenti al la pordo mem de la usonano. La pordo de ĉi tiu kamero, kiu devis esti mia observloko, estis provizita de netravideblaj vitroj. Estis malluma en la galerio kie ĉiuj lampoj estis lumigitaj; estis malluma en la kamero. Tie estis elektinda ejo por spiono.

Ĉar, kion mi faris tie, krom ofico de spiono ? de malsupera policano ? Mi certe malŝatis tion; kaj, krom miaj naturaj instinktoj, ĉu ne estis la digno de mia profesio kiu malkonsentis tian metamorfozon ? Vere, se mia ĉefadvokato vidus min ! se oni sciiĝis pri mia konduto, en la Juĝejo, kion dirus la Konsilio de la Ordeno ? Rultabio ja eĉ ne suspektis ke povus veni al mi la ideon rifuzi al li la servon kiun li petis al mi, kaj fakte, mi tute ne rifuzis ĝin al li : unue ĉar mi timis esti rigardata de li kiel malkuraĝulo; poste ĉar mi pripensis ke mi ĉiam povis aserti ke estis permesita al mi elserĉi ĉien la veron kiel amatoro; fine ĉar estis tro malfrue por tiri min el tio.

Kial mi havis ĉi tiujn skrupulojn pli frue ? Kial mi ne havis ilin ? Ĉar mia scivolemo estis pli forta ol ĉio. Plie mi povus diri ke mi estis kontribuonta por savi la vivon de virino; kaj tute ne estas profesiaj reglamentoj kiuj povu malpermesi tiel noblan intencon.

Ni revenis tra la galerio. Kiam ni alvenis antaŭ la apartamento de F^{ino} Stangerson, la pardo de la salono malfermiĝis, pelita de la ĉefservisto kiu servis vespermanĝon ĉe la tablo (S^{ro} Stangerson vespermanĝis kun sia filino en la salono de la unua etaĝo ekde tri tagoj), kaj ĉar la pordo restis duonmalfermita, ni perfekte vidis F^{inon} Stangerson kiu, profitante de la foresto de la servisto kaj de la tio ke lia patro estis klininta por pluki objekton kiun ŝi ĵus faligis, "haste verŝis la enhavon de fiolo en la glaso de S^{ro} Stangerson".

Tiu gesto, kiu min skuis, tute ne ŝajnis ekstreme tuŝi Rultabioⁿ. Ni retroviĝis en lia ĉambro, kaj eĉ ne parolanta al mi pri la sceno, kiun ni ĵus surprizis, li donis al mi siajn lastajn instrukciojn por la nokto. Ni unue vespermanĝus. Post la vespermanĝo, mi devis eniri en la nigran kameron kaj tie, mi atendus dum la tuta tempo kiun necesus "por vidi ion".

- Se vi "vidos" antaŭ mi, klarigis mia amiko, necesos averti min. Vi vidos antaŭ mi ĉu la viro alvenas en la rektan galerion de tute alia vojo ol la turnanta galerio, ĉar vi gvatos la tutan rektan galerion kaj ke mi ja povas nur vidi la turnantan galerion. Por averti min, vi devos nur malnodi la kordonon de la kurteno de la fenestro de la rekta galerio, kiu troviĝas plej proksima al la nigra kamero. La kurteno falos per si mem, vualante la fenestron kaj tuj farante ombran kvadraton tie kie estis luma kvadrato ĉar la galerio estas lumigita. Por fari tiun geston, vi devos nur etendi la manon ekster la nigra kamero. Mi, en la turnanta galerio kiu estigas ortan angulon kun la rekta galerio, mi distingos tra la fenestroj de la turnanta galerio ĉiujn lumajn kvadratojn kiujn faras la fenestroj de la rekta galerio. Kiam la luma kvadrato kiu koncernas nin, fariĝos malluma, mi scios tion kion tio signifos.

- Kaj tiam ?

- Tiam vi vidos min aperi ĉe la angulo de la turnanta galerio.

- Kaj kion mi faros ?

- Vi tuj paŝos al mi, malantaŭ la viro, sed mi jam estos sur la viro kaj mi estos vidanta ĉu lia vizaĝo eniros en mian ringon...

- Tiu kiu estas desegnita "per la bona flanko de la racio", mi finis ekridetante.

- Kial vi ridetas ? Tio vere estas neutila... Fine, profitu por gajiĝi, de la kelkaj momentoj kiuj restas al vi, ĉar mi ĵuras al vi ke post momento, vi ne plu havos la eblon por tio.

- Kaj se la viro eskapus ?

- Des pli bone ! kviete eligis Rultabio. Mi ne volegas kapti lin; li

povos eskapi falruliĝante tra la ŝtuparo kaj tra la koridoro de la teretaĝo... kaj tio antaŭ ol vi atingus la interŝtuparon, ĉar vi estas ĉe la fundo de la galerio. Mi lasos lin foriri post esti vidinta lian vizaĝon. Estas ĉio kion mi bezonas : vidi lian vizaĝon. Mi poste kapablos aranĝi min por ke li estu morta por F^{ino} Stangerson, eĉ se li restas viva. Se mi kaptus lin vivantan, F^{ino} Stangerson kaj S^{ro} Roberto Darzak eble neniam pardonos tion al mi ! Kaj mi taksas ilian estimon; Ili estas bravaj homoj. Kiam mi vidas F^{inon} Stangerson verŝi narkotaĵon en la glaso de sia patro (por ke tiunokte ŝia patro ne estu vekita de la konversacio kiun ŝi devos havi kun sia murdinto), vi devas kompreni ke lia rekono por mi havus limojn se mi venigus al ŝia patro la viron de la "Flava ĉambro" kaj de la "neklarigebla galerio", kun la pugnoj katenitaj kaj la buŝo malfermita ! Eble estas granda feliĉo ke la nokto de la "neklarigebla galerio", la viro svenis kvazaŭ sorĉe ! Mi komprenis, tion tiun nokton laŭ la subite radianta fizionomio de F^{ino} Stangerson kiam ŝi eksciis ke li eskapis. Kaj mi komprenis ke por savi la kompatindulinon, necesis malpli kapti la viron ol mutigi lin, iel ajn kiel estu. Sed mortigi homon ! mortigi homon ! tio ne estas malgrava afero. Kaj plie, tio ne koncernas min... krom se li donas al mi la okazon por tio !... Aliflanke, mutigi lin sen ke la sinjorino faru al mi konfidencojn... estas tasko kiu unue konsistas diveni ĉion per nenio !... Feliĉe, amiko mia, mi konjektis... aŭ plivole ne, mi rezonis... kaj mi petas al la viro de ĉi-nokto nur alporti al mi la senseblan vizaĝon kiu devas eniri...

- En la ringon...

- Perfekte, kaj lia vizaĝo ne surprizos min !

- Sed mi kredis ke vi jam vidis lian vizaĝon, la vesperon kiam vi ensaltis en la ĉambron...

- Malbone... la kandelo estis sur grundo... kaj plie, tiu tuta barbo...

- Ĉi-vespere ĉu do li ne plu havos ĝin ?

- Mi kredas povi aserti ke li havos ĝin... Sed la galerio estas luma, kaj plie, nun mi scias... aŭ almenaŭ mia cerbo scias... tiam miaj okuloj vidos...

- Se temas nur vidi lin kaj lasi lin eskapi... kial esti armiĝintaj ?
- Ĉar, kara mia, se la viro de la "Flava Ĉambro" kaj de la "neklarigebla galerio" scias ke mi scias, li kapablas ĉion ! Tiam necesos defendi nin.

- Kaj vi certas ke li venos ĉi-vespere ?...

- Tiel certa kiel vi estas ĉi tie !... F^{ino} Stangerson, je la deka kaj duono ĉi-matene, plejeble lerte, sin aranĝis por esti sen flegistinoj tiun nokton; ŝi donis al ili libertempon por dudek kvar horoj, je verŝajnaj pretekstoj, kaj deziris por prizorgi ŝin dum ilia foresto, nur ŝian karan patron kiu dormos en la buduaro de sia filino kaj kiu akceptas ĉi tiun novan rolon kun dankema gajeco. La koincido de la foriro de S^{ro} Darzak (post la paroloj kiujn li diris al mi) kaj de la esceptaj aranĝoj de F^{ino} Stangerson por estigi izolitecon ĉirkaŭ si, permesas neniun dubon. La alveno de la murdinto kiun Darzak timas, F^{ino} Stangerson preparas ĝin !

- Estas terura !

- Jes.

- Kaj la gesto kiun ni vidis ŝin fari, ĉu estas la gesto kiu baldaŭ endormigos sian patron ?

- Jes.

- Resume, por la afero de ĉi tiu nokto, ni estas nur du ?

- Kvar; la pordisto kaj lia edzino trafe aŭ maltrafe gvatatas... Mi kredas ilian gvatadon senutilan, "antaŭ"... Sed la pordisto povos esti utila al mi "poste, se oni mortigas" !

- Ĉu vi do kredas ke oni mortigos ?

- Oni mortigos se li volas !

- Kial ne esti avertinta ulĉjon Jakoboⁿ ? Ĉu vi ne plu utiligas lin hodiaŭ ?

- Ne, respondis Rultabio per seka tono.

Mi silentis dum kelka tempo; poste, deziranta koni la fundon de la penso de Rultabio, mi neatendite demandis al li :

- Kial ne averti Arturoⁿ Rancoⁿ ? Li povus esti efika helpanto por ni...

- Ha do ! eligis Rultabio kun malbona humuro. Vi do volas meti ĉiujn en la sekretojn de F^{ino} Stangerson !... Ni iru vespermanĝi...

estas la horo... Ĉi-vespere ni vespermanĝas ĉe Frederiko Larsano... krom se li estas ankoraŭ kuranta post Roberto Darzak... Li sekvas lin laŭpaŝe. Sed ba ! se li nuntempe ne estas tie, mi bone certas ke li estos ĉi tie ĉi-nokte !... Jen unu kiun baldaŭ superos !

Ĉe tiu momento, ni aŭdis bruon en la apuda ĉambro.

- Devas esti li, diris Rultabio.

- Mi forgesis peti al vi, mi eligis, kiam ni estos antaŭ la policano, ne ian aludon pri la ĉi-nokta ekspedicio, ĉu ne ?

- Kompreneble; ni agas solaj, por nia propra konto.

- Kaj la tuta gloro estos por ni ?

Rultabio, rikanante, aldonis :

- Vi diris tion, orgojlulo !

Ni vespermanĝis kun Frederiko Larsano en lia ĉambro. Ni trovis lin hejme... Li diris al ni ke li ĵus alvenis kaj invitis nin altablĝi. La vespermanĝo okazis en la plej bona humoro de la mondo, kaj mi tute ne malfacile komprenis ke necesis atribui tion al la preskaŭ certeco en kiu Rultabio kaj Frederiko Larsano, unu kaj la alia, kaj ĉiu el sia flanko, estis pro finfine posedi la veron. Rultabio konfidis al la granda Freĉjo ke mi venis propravole vidi lin kaj ke li retenis min por ke mi helpu lin pri grandan laboron kiun li devis liveri ĉi-nokte mem al *La Epoko*. Mi devis reiri, li diris, al Parizo per la trajno de la dekunua, kunportante lian "tajpaĵon", kiu estis speco de felietono kie la juna reportero raportis la ĉefajn epizodoj de la misteroj de la Glanejo. Larsano ridetas pro ĉi tiu klarigo kiel homo kiu tute ne estas trompita de ĝi, sed kiu sin detenas, pro ĝentileco, esprimi la plej malgrandan rimarkon pri aferoj kiuj ne koncernas lin. Kun senfina zorgo en la lingvo kaj ĝis en la intonacioj, Larsano kaj Rultabio sufiĉe longe interparolis pri la ĉeeston en la kastlo de S^{ro} Arturo V. Ranco, pri lia pasintaĵo en Ameriko kiun ili volintus pli bone scii, almenaŭ pri la rilatoj kiujn li havis kun la Stangerson^{oj}. Ĉe iu momento, Larsano, kiu subite ŝajnis al mi suferanta, pene diris :

- Mi kredas, sinjoro Rultabio, ke ni ne havas multon pli por fari en la Glanejo, kaj opinias ke ni ne plu dormos multajn vesperojn.

- Ankaŭ estas mia opinio, sinjoro Freĉjo.

- Ĉu vi do kredas, mia amiko, ke la afero estas finata ?
- Mi fakte kredas ke ĝi estas finata kaj ke ĝi havas nenion pli por sciigi al ni, rebatis Rultabio.
- Ĉu vi havas kulpulon ? Larsano demandis.
- Kaj vi ?
- Jes.
- Ankaŭ mi, diris Rultabio.
- Ĉu li estus la sama ?
- Mi ne kredas, se vi ne ŝanĝis de ideo, diris la juna reportero. Kaj li energie aldonis :
- S^{ro} Darzak estas honesta viro !
- Ĉu vi certas ? demandis Larsano. Nu, mi certas pri la malo...

Do estas batalo ?

- Jes, batalo. Kaj mi venkos vin, sinjoro Frederiko Larsano.
- La junularo dubas pri nenion, ĉesigis la granda Freĉjo ridante kaj skuante al mi la manon.

Rultabio respondis kiel eĥo :

- Ne dankinde !

Sed subite, Larsano, kiu stariĝis por deziri al ni bonan vesperon, frapis ambaŭ manojn al sia brusto kaj stumblis. Li devis sin apogi al Rultabio por ne fali. Li fariĝis ekstreme pala.

- Ho ! Ho ! li eligis, kion mi havas nun ? Ĉu mi estus venenita ?

Kaj li rigardis nin per konsternita okulo... Vane ni pridemandis lin, li ne plu respondis al ni... Li sinkis en fotelon kaj ni ne sukcesis eltiri vorton. Ni ege malkvietiĝis, kaj por li, kaj por ni, ĉar ni manĝis el ĉiuj pladoj al kiuj tuŝis Frederiko Larsano. Ni diligentis ĉirkaŭ li. Nun li ŝajnis ne plu suferi, sed lia peza kapo ruliĝis sur lia ŝultro kaj liaj pezigitaj palpebroj kaŝis al ni lian rigardon. Rultabio klinis sin super lia brusto kaj aŭskultumis lian koron...

Kiam li restariĝis, mia amiko havis vizaĝon tiel kvietan kiel mi antaŭ momento vidis ĝin konfuzitan.

Li diris al mi : "Li dormas !"

Kaj li kuntiris min en sian ĉambron, post esti referminta la pordon de la ĉambro de Larsano.

- La narkotaĵo ? mi demandis... Ĉu do F^{ino} Stangerson volas

endormigi ĉiujn ĉi-vespere ?

- Eble... respondis al mi Rultabio, pensante pri io alia.

- Sed ni !... ni ! mi ekkriis. Kiu diras al mi ke ni ne glutis similan narkotaĵon ?

- Ĉu vi sentas vin malsaneta ? flegme demandis al mi Rultabio.

- Ne, tute ne !

- Ĉu vi emas dormi ?

- Neniel...

- Nu, mia amiko, fumu ĉi tiun bonegan cigaron.

Kaj li transdonis al mi unuakvalitan havanon kiun S^{ro} Darzak proponis al li; pri li, li bruligis sian stumpopipon, sian eternan stumpopipon.

Ni tiel restis en tiu ĉambro ĝis la deka, sen tio ke iu vorto estu eldirita. Enfalinta en fotelo, Rultabio fumis seninterrompe, kun la frunto zorgoplena kaj la rigardo svaga. Je la deka, li demetis siajn ŝuojn, faris al mi signon kaj mi ekkomprenis ke mi devis, kiel li, demeti miajn ŝuojn. Kiam ni estis sur niaj ŝtrumpetoj, Rultabio diris, tiel mallaŭte, ke mi divenis la vorton prefere ol aŭdis ĝin :

- Revolveron !

Mi elprenis mian revolveron el la poŝo de mia jak.

- Pafpretigu ! li ankoraŭ eligis.

Mi pafpretigis.

Tiam li direktis sin al la pordo de sia ĉambro, malfermis ĝin per senfinaj zorgadoj; la pordo ne kriis.

Ni estis en la turnanta galerio. Rultabio faris al mi novan signon. Mi komprenis ke mi devis iri al mia posteno en la nigran kameron. Ĉar mi jam malproksimiĝis de li, Rultabio rekuniĝis al mi kaj "kisis min", kaj poste, mi vidis ke, per la samaj antaŭzorgoj li reiris al sia ĉambro. Mirigita pro tiu kiso, kaj iom maltrankvila, mi alvenis en la rektan galerion kiun mi glate laŭiris; mi transiris la interŝtuparon kaj daŭrigis mian vojon en la galerio, maldekstran alon, ĝis la nigra kamero. Antaŭ ol eniri en la nigran kameron, mi de proksime rigardis la kordonon de la kurteno de la fenestro. Mi fakte devis nur tuŝi ĝin per la fingro por ke la peza kurteno refalu per unu fojo, "kaŝante al Rultabio la kvadrato de lumo" :

konsentita signalo. La bruo de paŝo haltigis min antaŭ la pordo de Arturo Ranco. "Li do ne ankoraŭ enlitiĝis !" Sed kiel li ankoraŭ estis en la kastelo, ne vespermanĝinte kun S^{ro} Stangerson kaj lia filino ? Almenaŭ mi ne vidis lin ĉe la tablo, ĉe la momento kiam ni kaptis la gesto de F^{ino} Stangerson.

Mi izoligis en mia malluman kameron. Mi tie sentis min komforte. Mi sinsekve vidis la tutan galerion, galerion lumigitan kiel tagmeze. Evidente, nenio kiu estis okazonta, povis eskapi al mi. Sed kio baldaŭ okazos tie ? Eble io tre serioza. Nova konfuziva memoro pri la kiso de Rultabio. Oni tiel kisas siajn amikojn nur okaze de specialaj cirkonstancoj aŭ kiam ili baldaŭ endanĝeriĝos ! Ĉu mi do endanĝeriĝus ?

Mia pugno kuntiriĝis sur la tenilo de mia revolvero, kaj mi atendis. Mi ne estas heroo, sed mi ne estas senkuraĝulo.

Mi atendis ĉirkaŭ unu horo; dum tiu horo mi rimarkis nenion eksternorman. Ekstere, la pluvo kiu komencis falegi ĉirkaŭ la naŭa vespere, ĉesis.

Mia amiko diris al mi ke nenio probable okazus antaŭ noktomezo aŭ la unua matene. Tamen, ne estis plu ol la dekunua kaj duono kiam la pordo de la ĉambro de Arturo Ranco malfermiĝis. Mi aŭdis la malfortan knaradon de ĝiaj pordhokoj. Oni dirintus ke ĝi estis pelita de interne kun la plej granda singardeco. La pordo restis malfermita dum momento kiu ŝajnis al mi tre longa. Ĉar ĉi tiu pordo estis malfermita en la galerio, tio estas pelita ekster la ĉambro, mi ne povis vidi nek tion kio okazis en la ĉambro nek tio kio okazis malantaŭ la pordo. Ĉe tiu momento, mi ekrimarkis strangan bruon kiu triafoje ripetigis, kiu venis de la parko, kaj kiu mi ne taksis pli grave ol oni kutimas taksi la miaŭado de katoj kiuj nokte vagas sur la pluvdefluiloj. Sed ĉi tiun trian fojon, la miaŭo estis tiel pura kaj tiel "speciala" ke mi rememoris tion kion mi aŭdis rakonti pri la bleko de la "Dibesteto". Ĉar tiu bleko akompanis, ĝis ĉi tiu tago, ĉiujn dramojn kiuj okazis en la Glanejo, mi ne sukcesis bremsi al mi, kaŭze de tiu pripenso, ekstremadon. Tuj mi vidis aperi, preter la pordo kaj refermante la pordon, viron. Mi unue ne povis rekoni lin, ĉar li turnis al mi sian dorson kaj estis

kliniĝanta super sufiĉe ampleksa pakaĵo. La viro, estanta referminta la pordon kaj portanta la pakaĵon, turnis sin al la nigra kamero, kaj tiam mi vidis tiun kiu li estis. Tiu kiu eliris, en tiu horo, el la ĉambro de Arturo Ranco estis "la gardisto". Li estis la "verda viro". Li havis tiun kostumon kiun mi vidis sur li sur la strato, antaŭ la gastejo de la "Ĉefturo", la unuan tagon kiam mi venis en la Glanejo, kaj kiun li ankoraŭ surhavis matene mem, kiam elirante el la kastelo, ni renkontis lin, Rultabio kaj mi.

Nenia dubo, li estis la gardisto. Mi vidis lin tre klare. Li havis vizaĝon kiu ŝajnis al mi esprimi ian malserenecon. Ĉar la krio de la "Dibesteto" kvarafoje bruis ekstere, li demetis sian pakaĵon en la galerio kaj alpaŝis al la dua fenestro, kalkulante la fenestrojn de la nigra kamero. Mi riskis neniun movadon, ĉar mi timis riveli mian ĉeeston.

Kiam li estis ĉe tiu fenestro, li premis sian frunton kontraŭ la netravideblaj vitraloj, kaj rigardis la nokton de la parko. Li restis tie dum duona minuto. La nokto intermite estis klara, lumigita de brila luno kiu subite malaperis malantaŭ nubego. "La verda viro" dufoje levis la brakon, faris signojn kiujn mi tute ne komprenis; poste malproksimiĝante la fenestron, reprenis sian pakaĵon kaj sin direktis, laŭ la galerio, al la interŝtuparo.

Rultabio diris al mi : "Kiam vi vidos ion, malnodu la kordonon". Mi vidis ion. Ĉu estis tio kion Rultabio atendis ? Tio tute ne koncernis min kaj mi devis nur plenumi la instrukcion kiu estis donita al mi. Mi malnodis la kordonon. Mia koro ĝisrompe batadis. La viro atingis la interŝtuparon, sed je mia tuta konsterniĝo, kiel mi prepariĝis vidi lin daŭrigi sian vojon en la galerio, dekstran alon, mi ekvidis lin malsupreniri la ŝtuparon kondukantan al la vestiblo.

Kion fari ? Stulte mi rigardis la pezan kurtenon kiu estis falinta sur la fenestro. La signalo estis donita kaj mi ne vidis aperi Rultabio" ĉe la angulo de la turnanta galerio. Nenio venis; neniu aperis. Mi estis senkonsila. Fluis duonhoro kiu ŝajnis al mi jarcenton.

"Kion fari nun, eĉ se mi vidis aliaĵon ?" La signalo estis donita, mi ne povis duafoje doni ĝin... Aliflanke, sin riski en la galerion en

tiu momento povus impliki ĉiujn planojn de Rultabio. Finfine, mi havis nenion por riproĉi al mi, kaj se okazis io kiun tute ne atendis mia amiko, tiu ĉi devis nur kulpigi sin mem. Ne plu povante esti ia ajn reala avertohelpo por li, mi ĉion riskis en unu fojo : mi eliris el la kamero, kaj ankoraŭ sur miaj ŝtrumpetoj, mezurante miajn paŝojn kaj aŭskultante la silenton, mi iris al la turnanta galerio.

Neniu en la turnanta galerio. Mi iris al la pordo de la ĉambro de Rultabio. Mi aŭskultis. Nenion. Mi tre dolĉe frapis. Nenion. Mi turnis la manilon, la pordo malfermiĝis. Mi estis en la ĉambro. Rultabio kuŝis, laŭ sia tuta longeco, sur la pargeto.

Mi klinis min kun neesprimebla angoro, super la korpo de la reportero, kaj ĝojis konstati ke lin dormis ! Li dormis en tiu profunda, malsanema dormo en kiu mi vidis endormiĝi Frederiko Larsano. Ankaŭ li estis viktimo de la narkotaĵo kiun oni estis verŝis en niajn manĝaĵojn. Kiel mi mem tute ne suferis la saman sorton ! Mi pripensas tiam ke la narkotaĵo devis esti verŝita en nian vinon aŭ nian akvon, ĉar tiel ĉio klariĝis : "Mi ne trinkas manĝante". Naturdotita de antaŭtempa rondeco, mi sekvas sekan dieton¹³, kiel oni diras. Mi forte skuis Rultebioⁿ, sed mi tute ne sukcesis malfermigi al li la okulojn. Ĉi tiu dormado devis esti, tute sen dubo, la faraĵo de F^{ino} Stangerson.

Tiu ĉi certe pensis ke, ankoraŭ pli ol sia patro, ŝi devis timi la maldormon de tiu junulo kiu antaŭvidis ĉion, kiu sciis ĉion ! Mi rememoris ke la ĉefservisto rekomendis al ni, servante nin, bonegan Ŝablisoⁿ¹⁴ kiu sendube pasis sur la tablo de la profesoro kaj lia filino.

Pli ol kvaronhoro tiel fluis. Mi decidiĝis, en ĉi tiuj ekstremaj cirkonstancoj, kiam ni tiom bezonis esti viglaj, al fortikaj rimedoj. Mi ĵetis al la kapo de Rultabio kruĉon da akvo. Li malfermis la okulojn, finfine ! Malfeliĉajn, malhelajn okulojn, sen vivo nek rigardo. Sed ĉu ne tiu estis unua venko ? Mi volis kompletigi ĝin ; donis paron da vangofrapoj ĉe la vizaĝo de Rultabio kaj levis lin. Feliĉo ! mi sentis ke li rigidiĝis inter miaj brakoj, kaj mi aŭdis lin kiu murmuris : "Daŭrigu, sed ne faru tiom da bruo !..." Daŭrigi vangofrapi lin sen brui, ŝajnis al mi neebla entrepreno.

Mi rekomencis pinĉi kaj skui lin, kaj li sukcesis teni sur siajn krurojn. Ni estis savitaj !

- Oni dormigis min, li diris. Ha ! mi travivis teruran kvaronhoron antaŭ ol cedi al dormado... Sed nun, ĝi finiĝas ! Ne forlasu min !...

13 Seka dieto, franca esprimo, havas 2 signifojn : Brutnutrado per seka furaĝo aŭ sin nutro tute sen alkoholaj trinkaĵoj.

14 Blanka seka vino de Burĝonjo.

Li apenaŭ finis tiun frazon ke ni havis la orelojn ŝiritajn de terura krio kiu tondris en la kastelo, vera kriadado de morto...

- Aĥ ve ! kriegis Rultabio... ni alvenas tro malfrue !...

Kaj li volis sin ĵeti al la pordo; sed li estis tute senkonscia kaj ruliĝis kontraŭ la murego. Mi ja jam estis en la galerio, kun revolvero enmane, kurante kiel frenezulo flanken al la ĉambro de F^{ino} Stangerson. Ĝuste kiam mi alvenis intersekce de la turnanta galerio kaj de la rekta galerio, mi vidis individuon kiu eskapis el la apartamento de F^{ino} Stangerson kaj kiu, per kelkaj saltoj, atingis la interŝtuparon.

Mi ne mastris mian geston : mi pafis... la revolverpafo tondris en la galerio en surdiga bruego; sed la viro, daŭrigante siajn sensencajn saltegojn, jam falruliĝis tra la ŝtuparo. Mi kuris malantaŭ li, kriante : "Haltu ! Haltu ! aŭ mi mortigas vin !" ... Dum mi miavice min ĵetegis en la ŝtuparon, mi vidis antaŭ mi, alvenante el la fundo de la galerio, maldekstra alo de la kastelo, Arturoⁿ Rancoⁿ kriegante : "Kio estas ? Kio estas ?" ... Ni alvenis preskaŭ kune ĉe la malsupro de la ŝtuparo, Arturo Ranco kaj mi; la vestibla fenestro estis malfermita; ni klare vidis la virformon kiu fuĝis; instinkte ni malŝargis niajn revolverojn laŭ lia direkto; la viro ne estis pli ol dek metroj antaŭ ni; li stumblis kaj ni kredis ke li estis falonta; jam ni saltis tra la fenestron; sed la viro rekomencis kuri kun nova vigleco; mi estis sur la ŝtrumpetoj, la usonano estis nudpieda; ni ne povis esperi atingi lin "se niaj revolveroj ne atingis lin" !

Ni pafis niajn lastajn kartoĉojn al li; li ankoraŭ forkuris... Sed li fuĝis al la dekstra flanko de la honorkorto al la ekstremo de la dekstra alo de la kastelo, en tiun angulon ĉirkaŭitan de fosaĵoj kaj de altaj kradoj, de kie neeblos al li eskapi, en tiun angulon kiu ne havis alian eliron, "antaŭ ni", krom la pordon de la malgranda korbela ĉambro nun okupata de la gardisto.

La viro, kvankam li estis neeviteble vundita de niaj kugloj, havis nun kelkdudek metrojn antaŭen. Subite, malantaŭ ni, super niaj kapoj, iu fenestro de la galerio malfermiĝis kaj ni aŭdis la voĉon de Rultabio kiu senespere kriegis : "Pafu, Berniero ! Pafu !"

Kaj la hela nokto, en ĉi tiu momento, la luna nokto estis ankoraŭ striita de fulmo.

En la lumo de ĉi tiu fulmo, ni vidis ulĉjon Bernieroⁿ starantan kun sia fusilo, ĉe la pordo de la ĉefturo.

Li bone celis. "La ombro falis". Sed ĉar ĝi alvenis al la ekstremo de la dekstra alo de la kastelo, ĝi falis ĉe la alian flankon de la angulo de la konstruaĵo; tiel ke ni vidis ke ĝi falis, sed ĝi definitive sterniĝis surgrunden nur ĉe tiu alia flanko de la muro kiun ni ne povis vidi. Berniero, Arturo Ranco kaj mi alvenis ĉe tiu alian flankon de la muro, dudek sekundojn pli poste. "La ombro estis morta ĉe niaj piedoj".

Evidente vekita el sia letargia dormo de la kriadoj kaj la detonacioj, Larsano ĵus malfermis la fenestron de sia ĉambro kaj kriis al ni, kiel kriis Arturo Ranco : "Kio estas ?... Kio estas ?..."

Kaj ni, ni estis klinintaj super la ombro, super la mistera morta ombro de la murdinto.

Rultabio, nun tute vekita, kuniĝis al ni en la momento, kaj mi kriis al li : "Li estas morta ! Li estas morta !..."

- Des pli bone, li eligis... Alportu lin en la vestiblon de la kastelo...

Sed li reparolis :

- Ne ! Ne ! Ni metu lin en la ĉambron de la gardisto!...

Rultabio frapis ĉe la pordon de la ĉambro de la gardisto... Neniu respondis de interne... tio kio kompreneble tute ne surprizis min.

- Evidente li ne estas ĉi tie, eligis la reportero, alie li jam elirus !... Ni do portu ĉi tiun korpon en la vestiblon...

Ekde kiam ni alvenis super la "morta ombro", la nokto fariĝis tiel malluma, sekve de la transpaso de dika nubo sur la luno, ke ni povis nur tuŝi ĉi tiun ombron sen distingi ĝiajn trajtojn. Kaj tamen niaj okuloj deziregis scii ! Ulĉjo Jakobo, kiu alvenis, helpis nin por transporti la kadavron ĝis la vestiblo de la kastelo. Tie, ni demetis lin sur la unuan ŝtupon de la ŝtuparo. Mi sentis sur miaj manoj, dum tiu voĵiro, la varman sangon kiu fluis el la vundoj...

Ulĉjo Jakobo kuris al la kuirejoj kaj revenis de tie kun lanterno.

Li kliniĝis super la vizaĝon de la "morta ombro", kaj ni rekonis la gardiston, tiun kiun la gastejestro de la "Ĉefturo" nomis "la verdan viron", kaj kiun antaŭ unu horo, mi vidis eliri el la ĉambro de Arturo Ranco, ŝarĝita de pakaĵo. Sed, tio kion mi vidis, mi povis raporti tion nur al Rultabio sola, tio kion cetere mi faris kelkajn momentojn pli poste.

Mi ne povus gardi silenton pri la senmezura konsterno - mi eĉ dirus la kruelan disreviĝon - kies montris Jozefo Rultabio kaj Frederiko Larsano, kiu kuniĝis al ni en la vestiblo.

Ili fingrumis la kadavron... ili rigardis ĉi tiun mortan vizaĝon, ĉi tiun verdan kostumon de la gardisto... kaj ili ripetis, unu kaj la alia : "Neeblas ! Tio neeblas !"

Rultabio eĉ ekkriis : "Estas por ĵeti sian kapon al la hundoj !"

Ulĉjo Jakobo vidigis stultan doloron akompanita de ridindaj lamentoj. Li asertis ke oni eraris kaj ke la gardisto ne povis esti la murdinto de lia mastrino. Ni devis silentigi lin. Oni murdintus lian filon ke li tute ne ĝemus pli, kaj mi klarigis ĉi tiun troecon de bonaj sentoj per la timo kiu devis formanĝi lin, ke oni kredus ke li ĝojis pro tiu drama morto; fakte ĉiu sciis ke la ulĉjo Jakobo malamis la gardiston. Mi konstatis ke nur, el ni ĉiuj kiuj estis tre senorde vestitaj aŭ nudpiedaj aŭ sur la ŝtrumpetoj, ulĉjo Jakobo estis tute vestita.

Sed Rultabio ne forlasis la kadavron; genue sur la slabojn de la vestiblo, lumigita de la lanterno de ulĉjo Jakobo, li senvestigis la korpon de la gardisto !... Li nudigis la bruston. Ĝi estis sanga.

Kaj subite, kaptante la lanternon el la manoj de la ulĉjo Jakobo, li de tute proksime ĵetis la radiojn el ĝi sur la faŭkantan vundon. Tiam li restariĝis kaj diris per eksterordinara tono, per tono de spontanea ironio : "Ĉi tiu viro kiun vi kredas esti mortigantaj per pafoj de revolvero kaj kugletaĵoj, mortis pro frapo de tranĉilo en la koro !"

Mi pliafoje kredis ke Rultabio freneziĝis, kaj miavice klinis min super la kadavron. Tiam mi povis konstati ke fakte la korpo de la gardisto havis nenian vundon devenita de pafaĵo, kaj ke nur la kora regiono estis entranĉita per akra klingo.

23 - La duobla spuraro.

Mi ankoraŭ ne retranskribiĝis de la stuporo kiun kaŭzis al mi tia eltrovo kiam mia juna amiko frapis al mi la ŝultron kaj diris al mi :

- Sekvu min !
- Kien ? mi demandis al li.
- En mia ĉambron.
- Kion ni faros tie ?
- Pripensi.

Mi konfesis, pri mi, ke mi estis en la tuta neebleco, ne nur pripensi, sed ankaŭ rezoni; kaj en tiu tragika nokto, post eventoj kies la hororo estis egalita nur de ilia senkohereco, mi malfacile klarigis al mi kiel inter la kadavro de la gardisto kaj la eble agonianta F^{ino} Stangerson, Jozefo Rultabio povis havi la pretendon de "pripensi". Estas tamen tio kio li faris kun la flegmo de la famaj kapitanoj meze de bataloj. Li refermis al ni la pordon de sia ĉambro, montris al mi brakseĝon, trankvile sidiĝis antaŭ mi, kaj evidente, bruligis sian pipon. Mi rigardis lin pripensi... kaj endormiĝis. Kiam mi vekigis, estis plentago. Mia poŝhorloĝo indikis la okan. Rultabio ne plu ĉeestis. Lia fotelo, antaŭ mi, estis malplena. Mi stariĝis kaj komencis elstreĉi miajn membrojn kiam la pordo malfermiĝis kaj mia amiko eniris. Mi tuj vidis, laŭ lia fizionomio, ke dum mi dormis, li tute ne malŝparis sian tempon.

- F^{ino} Stangerson ? mi tuj demandis.
- Ŝia stato, tre zorgiga, ne estas senespera.
- Ĉu antaŭ longe vi forlasis ĉi tiun ĉambron ?
- Ĉe la unua radio de la mateniĝo.
- Ĉu vi laboris ?
- Multe.
- Malkovrinta kion ?
- Duoblan piedsignon tre rimarkindan "kaj kiuj povintus ĝeni min..."
- Ĉu ĝi ne plu ĝenas vin ?
- Ne.

- Ĉu ĝi klarigas ion al vi ?

- Jes.

- Relative al la "nekredebla kadavro" de la gardisto ?

- Jes, ĉi tiu kadavro nun estas tute "kredebla". Mi malkovris ĉi-matene, promenante ĉirkaŭ la kastelo, du malsamajn specojn de paŝoj kies la spuroj ĉi-nokte estis samtempe faritaj flanko ĉe flanko. Mi diras "samtempe"; kaj, vere, apenaŭ eblis esti alie ĉar se unu el ĉi tiuj spuroj venintus post la alia, laŭ la sama vojo, ĝi ofte "surtretus la alian", tio kio neniam okazis. La paŝoj de tiu ĉi tute ne paŝis sur la paŝoj de tiu. Ne, estis paŝoj "kiuj ŝajnis babili inter si". Ĉi tiu duobla spuro forlasis ĉiujn aliajn spurojn ĉirkaŭ la mezo de la honorkorto, por eliri el ĉi tiu korto kaj sin direkti al la kverkejo. Mi forlasis la honorkorton kun la okuloj fiksitaj sur mia spuraro, kiam mi estis kuniĝita de Frederiko Larsano. Tuj, li multe interesiĝis pri mia laboro, ĉar tiu duobla spuro vere meritis ke oni dediĉu atenton al ĝi. Oni retrovis tie la duoblan piedsignojn de la afero de la "Flava Ĉambro" : la krudajn paŝojn kaj la elegantajn paŝojn; sed dum en la afero de la "Flava Ĉambro", la krudaj paŝoj nur kunigis ĉe la rando de la lageto al elegantaj paŝoj por poste malaperi - kies ni konkludis, Larsano kaj mi, ke tiuj du specoj de paŝoj apartenis al la sama individuo kiu nur ŝanĝis la ŝuojn - ĉi tie, krudaj paŝoj kaj elegantaj paŝoj iris kune. Tia konstato estis bone farita por konfuzi min en miaj ĝisnunaj certecoj. Larsano ŝajnis pensi kiel mi; tiel, ni restis klinintaj super tiuj spuroj, ekflarante tiujn paŝojn kiel embuskitaj hundoj.

Mi elprenis el mia monpaperujo miajn plandumojn el papero. La unua plandumo, kiu estis tiu kiun mi eltranĉis laŭ la spuro de la ŝuoj de ulĉjo Jakobo, trovitaj de Larsano, tio estas laŭ la spuro de la krudaj paŝoj, ĉi tiu unua plandumo, mi diras, perfekte almetiĝis al unu el la spuraro kiun ni havis sub la okuloj, kaj la dua plandumo kiu estis la desegno de la "elegantaj paŝoj", ankaŭ almetiĝis al la responda spruaro, sed kun malgrava malsimileco ĉe la pinto.

Resume, ĉi tiu nova spuro de la eleganta paŝo malsimilis al la spuro de la rando de la lageto nur per la pinto de la boteto. Ni ne povis tiri ĉi tiun konkludon ke tiu spuro apartenis al la sama persono, sed

ni ne pli povis aserti ke ĝi ne apartenis al li. La nekonato povis ne plu surhavi la samajn botetojn.

Sekvante ankoraŭ ĉi tiu duobla spuro, Larsano kaj mi, ni estis baldaŭ kondukitaĵ eliri el la kverkejo kaj ni retroviĝis sur la samaj randoj de la lageto kiu vidis nin dum nia unua esploro. Sed ĉi-foje, neniu el la spuroj haltis tie kaj ambaŭ, elektante la malgrandan padon, iris aliĝi al la grava vojo de Epine. Tie ni alvenis sur freŝdata makadamo kiu ne plu montris al ni ion; kaj ni revenis al la kastelo sen diri vorton unu al la alia.

Alveninte en la honorkorto, ni disiĝis; sed, pro la sama vojo kiun prenis nia penso, ni denove renkontiĝis antaŭ la pordo de la ĉambro de la ulĉjo Jakobo. Ni trovis la maljunan serviston en la lito kaj tuj konstatis ke la vestaĵoj kiujn li ĵetis sur seĝo, estis en malbona stato, kaj ke liaj ŝuoj, ŝuoj tute similaj al tiuj kiujn ni konis, estis eksterordinare kotaj. Certe tute ne estis helpante por transporti la kadavron de la gardisto, de la fino de la korto ĝis la vestiblo, kaj irante serĉi la lanternon en la kuirejoj, ke ulĉjo Jakobo tiel mistraktis siajn ŝuojn kaj tramalsekigis siajn vestojn, ĉar tiam ne pluvis. Sed pluvis antaŭ tiu momento kaj pluvis poste.

Koncerne la vizaĝon de la viro, ĝi ne estis bela por vidi. Ĝi ŝajnis esprimi ekstreman lacecon, kaj liaj palpebrumantaj okuloj rigardis nin de la komenco kun timo.

Ni pridemandis lin. Li unue respondis al ni ke li tuj enlitiĝis post la alveno en la kastelo de la kuracisto kiun la ĉefkelnero iris serĉi; sed ni tiel bone instigis lin, tiel bone pruvis al li ke li mensogis, ke li fine konfesis al ni ke li fakte eliris el la kastelo. Ni kompreneble demandis al li la kialon; li respondis al ni ke li sentis kapdoloron, kaj ke li bezonis preni freŝan aeron, sed ke li ne iris pli for ol la kverkejo. Ni tiam priskribis al li la tutan vojon kiun li faris, tiel bone kiel se ni vidis lin paŝi. La maljunulo sidrektiĝis sur sia postaĵo kaj ektremis.

"Vi ne estis sola", ekkriis Larsano.

Tiam, ulĉjo Jakobo : "Ĉu vi do vidis lin ?

"Kiu ? mi demandis. "Sed la nigra fantomo !"

Post tio, ulĉjo Jakobo rakontis al ni ke ekde kelkaj noktoj, li vidis

la nigran fantomon. Ĝi aperis en la parko ĉe la horbato de noktomezo kaj ŝoviĝis kontraŭ la arboj kun nekredebla facileco. Ĝi ŝajnis "trairi" la trunkon de la arboj; dufoje ulĉjo Jakobo kiu ekvidis la fantomon tra sia fenestro en la lunlumo, ellitiĝis kaj rezolute, foriris al ĉaso de tiu stranga aĉaĵo. La antaŭhieraŭon, li preskaŭ kuniĝis al ĝi, sed ĝi svenis ĉe la angulo de la ĉefturo; fine, tiun ĉi nokton, estante elirinta el la kastelo, turmentita de la ideo de la nova krimo kiu ĵus okazis, li subite vidis ekaperi meze de la honorkorto la nigran fantomon. Li sekvis ĝin unue singarde, poste pli proksime... tiel li ĉirkaŭiris la kverkejon, la lageton, kaj alvenis ĉe la randon de la vojo al Epine. "Tie, la fantomo subite malaperis".

"Ĉu vi ne vidis ĝian vizaĝon?" demandis Larsano.

"Ne! Mi vidis nur nigrajn vualojn..."

"Kaj post tio kio okazis en la galerio, ĉu vi ne saltis sur ĝin?"

"Mi ne kapablis tion! Mi sentis min terurita... Apenaŭ estas se mi havis la forton sekvi lin..."

"Vi ne sekvis lin", mi eligis, "ulĉjo Jakobo" - kaj mia voĉo minacis -

"Vi iris kun la fantomo ĝis la vojo al Epine, brako en brako!"

"Ne! li kriis... Ekpluvegis torente... mi revenis!... Mi ne scias tion kio la nigra fantomo fariĝis..."

Sed liaj okuloj forturniĝis de mi. Ni forlasis lin. Kiam ni estis eksteren:

"Ĉu komplico?" Mi pridemandis per aparta tono, rigardante Larsano, tute frontalfronate, por surprizi la fundon de lia penso. Larsano levis la brakojn al la ĉielo.

"Ĉu oni scias?... Ĉu oni scias, en tia afero?... Antaŭ dudek kvar horoj, mi ĵurintus ke ne estis komplico!"

Kaj li lasis min sciigante min ke li tuj forlasos la kastelon por iri al Epine.

Rultabio estis fininta sian raporton. Mi demandis al li:

- Nu! Kion konkludi pri ĉio tio?... Koncerne mi, mi ne vidas!...

Mi ne komprenas!... Fine! Kion vi scias?

- Ĉion! li ekkriis... Ĉion!

Kaj mi neniam vidis de li pli radiantan vizaĝon. Li estis

stariĝinta kaj forte skuis al mi la manon...

- Do, klarigu al mi, mi petis...

- Ni iru peti novaĵojn de F^{ino} Stangerson, li seke respondis al mi.

24 - Rultabio konas la du duonojn de la murdinto.

F^{ino} Stangerson preskaŭ estis murdita por la dua fojo. La malfeliĉo estis ke ŝi fartis multe pli malbone ĉe la dua ol la unua. La tri frapoj de tranĉilo kiujn la viro donis en ŝia brusto dum tiu nova tragika nokto, longtempe elmetis ŝin inter vivo kaj morto, kaj kiam fine la vivo estis pli forta kaj ke oni povis esperi ke la kompatinda virino, ĉi-foje ankoraŭ, eskapus el sia sanga destino, oni rimarkis ke, se ŝi ĉiutage retrovis la uzon de ŝiaj sensoj, ŝi tute ne rekuperis tiun de la racio. La plej malgrava aludo al la terura tragedio delirigis ŝin, kaj ankaŭ tute ne estas tro, mi vere opinias, diri ke la aresto de S^{ro} Roberto Darzak, kiu okazis en la Kastelo de la Glanejo, la morgaŭon de la malkovro de la kadavro de la gardisto, plie fosis la moralan abismon kie ni vidis malaperi ĉi tiun altan inteligentecon.

S^{ro} Roberto Darzak alvenis en la kastelon ĉirkaŭ la naŭa kaj duono. Mi vidis lin alkuri tra la parko, kun la haroj kaj la vestoj malordigitaj, malpura, kota, en malbona stato. Lia vizaĝo estis en morta paleco. Rultabio kaj mi, ni estis kubutapogintaj sur iu fenestro en la galerio. Li ekvidis nin; eligis al ni senesperan krion :

- Mi alvenas tro malfrue !...

Rultabio kriis al li : "Ŝi vivas !..."

Post unu minuto, S^{ro} Darzak eniris en la ĉambron de F^{ino} Stangerson, kaj tra la pordo, ni aŭdis siajn singultojn.

- Fatalo ! ĝemis apud mi, Rultabio. Kiuj inferaj Dioj zorgas do pri la malfeliĉo de ĉi tiu familio ! Se oni ne endormigis min, mi savintus F^{inon} Stangerson de la viro, kaj mutigus lin por ĉiam... kaj la gardisto ne estus morta !

S^{ro} Darzak venis retrovi nin. Li estis larmoplena. Rultabio rakontis al li ĉion : kaj kiel li preparis ĉion por ilia savo, al F^{ino} Stangerson kaj al li; kaj kiel li sukcesus tion ĉiame forigante la viron post esti vidanta sian vizaĝon; kaj kiel sia plano kolapsis en la sango pro la narkotaĵo.

- Ha ! se vi reale fidis al mi, mallaŭte elligis la junulo, se vi

dirintus al F^{ino} Stangerson fidi al mi !... Sed ĉi tie ĉiu malfidas ĉiujn..., la filino malfidas sian patron... kaj la fianĉinon malfidas la fianĉon... Dum vi diris al mi fari ĉion por malebligi la alvenon de la murdonto, ŝi preparis ĉion por esti murdita !... Kaj mi alvenis tro malfrue... duone dormanta... preskaŭ trenante min en tiu ĉambro kie la vido de la kompatindulino, baniĝanta en ŝia sango, tute vekis min...

Pro la peto de S^{ro} Darzak, Rultabio rakontis la scenon. Sin apogante al la muroj por ne fali, dum en la vestiblo kaj en la honorkorto, ni persekutis la murdinton, li sin direktis al la ĉambro de la viktimo... La pordoj de la antaŭĉambro estas malfermitaj; li eniras; F^{ino} Stangerson kuŝas, senviva, duone renversita sur la skribotablo, kun la okuloj fermitaj; ŝia tualetrobo estas ruĝa pro la sango kiu fluegas el ŝia brusto. Ŝajnas al Rultabio, ankoraŭ sub la influo de la narkotaĵo, ke li promenas en ia timiga inkubsonĝo. Aŭtomate, li revenas en la galerion, malfermas iun fenestron, kriegas al ni la krimon, ordonas al ni mortigi, kaj reiras en la ĉambron. Tuj li trairas la senhoman buduaron, eniras en la salonon kies pordo restis duone malfermita, skuas S^{ron} Stangerson sur la kanapo kie li kuŝiĝis kaj vekas lin kiel mi vekis lin mem, antaŭ momento...

S^{ro} Stangerson stariĝas kun konsternitaj okuloj, lasas sin konduki per Rultabio ĝis la ĉambro, ekvidas sian filinon, eligas korŝiran krion... Ha ! li estas vekita ! li estas vekita !... Ambaŭ, nun, kunigante siajn ŝanceliĝajn fortojn, transportas la viktimon sur ŝian liton...

Poste Rultabio volas kuniĝi al ni, por scii... "por scii...", sed antaŭ forlasi la ĉambron, li haltas apud la skribotablo... Tie surplanke estas pako... grandega... pakego... Kion tiu pako faras tie, apud la skribotablo ?... La envolaĵo el serĝo kiu envolvas ĝin, estas malnodita... Rultabio klinas sin... Paperojn... paperojn... fotojn... Li legas : "Nova elektroskopo diferencala kondensilo...

Fundamentaj proprecoj de la intera substanco inter la pesebla materio kaj la nepesebla etero"... Vere, vere, kiu estas ĉi tiu mistero kaj tiu timiga sortmalicaĵo, kiuj volas dum la horo kiam

"oni" murdas al li sian filinon, "oni" venas redoni al la profesoro Stangerson ĉiujn ĉi neutilajn dokumentojn "kiujn li ĵetos en la fajron !... en la fajron !... en la fajron!... la morgaŭon".

En la mateno kiu sekvis tiun teruran nokton, ni vidis S^{ron} de Marketoⁿ, lian registriston, la ĝendarmojn reaperi. Ni ĉiuj estis pridemanditaj, krom kompreneble F^{ino} Stangerson kiu estis en proksima stato de komato. Rultabio kaj mi, post esti interkonsultintaj, diris nur tion kion ni bonvolis diri. Mi atentis transdiri nenion pri mia restado en la malluma kamero aŭ pri la aferoj de narkotaĵo.

Resume, ni silentis pri ĉio kiu povis suspektigi ke ni atendis ion, kaj ankaŭ pri ĉio kiu povis kredigi ke F^{ino} Stangerson "atendis la murdanton". La kompatindulino estis eble pagonta per sia vivo la misteron per kiu ŝi envolvis sian murdinton... Ni tute ne rajtis senutiligi tian oferon... Arturo Ranco rakontis al ĉiuj, tute nature, - tiel nature ke mi estis miregita - ke li lastafoje vidis la gardiston ĉirkaŭ la dekunua vespere. Ĉi tiu venis en sian ĉambron, li diris, preni lian valizon kiun li devis transporti la morgaŭon matene ĉe la unua horo, al la stacidomo de Sankta-Mikaelo, "kaj restadis por longe babilis pri ĉaso kaj ŝtelĉaso kun li" ! Arturo-Vilhelmo Ranco, fakte, devis forlasi la Glanejon dum la mateno kaj piediri, laŭ sia kutimo, al Sankta-Mikaelo; tial li profitis de matena vojaĝo de la gardisto en la urbeto por liberigi sin de sia pakaĵon.

Almenaŭ mi estis kondukita pensi tion ĉar S^{ro} Stangerson konfirmis liajn diraĵojn; li aldonis ke li ne havis la plezuron, la antaŭtagon vespere, akcepti ĉe sia tablo sian amikon Arturoⁿ Rancoⁿ, ĉar tiu ĉi definitive adiaŭis, ĉirkaŭ la kvina, lian filinon kaj lin. S^{ro} Arturo Ranco simple servigis al si teon en sia ĉambro, dirante sin iomete malsaneta.

Berniero, la pordisto, laŭ la indikoj de Rultabio, informis, ke il estis postulita de la gardisto mem, tiun nokton, por postkuri la ŝtelĉasistojn (la gardisto ne plu kapablis kontraŭdiri lin), ke ili ambaŭ sin rendevuis ne for de la kverkejo kaj ke, vidante ke la gardisto tute ne venis, li ja, Berniero, iris renkonte al la gardisto... Li alvenis najbare de la ĉefturo, estante pasinta la malgrandan

pordon de la honorkorto kiam li ekvis individuon kiu forkuregis kontraŭflanke, al la ekstremo de la dekstra alo de la kastelo; pafadoj de revolvero tondris dum la sama momento malantaŭ la fuĝanto; Rultabio aperis ĉe la fenestro de la galerio; li ekvidis lin, Bernieroⁿ, rekonis lin, vidis lin kun lia fusilo kaj kriis al li pafi. Tiam Berniero sendis sian pafon de fusilo kiun li tenis tute preta... kaj li estis konvinkita ke li trafis la fuĝanton, li eĉ kredis ke li mortigis lin kaj tiu kredo daŭris ĝis la momento kiam Rultabio, ekzamenante la korpon kiu falis pro la pafo de fusilo, sciigis al li ke tiu korpo "estis mortigita de frapo de tranĉilo"; ke li cetere restis sen kompreni ion pri tia fantasmagorio, konsidere ke, se la trovita kadavro tute ne tiu de la fuĝanto al kiu ni ĉiuj pafadis, necesis ja ke la fuĝanto estu ie. Nu, en ĉi tiu malgranda angulo de korto kie ni ĉiuj kuniĝis ĉirkaŭ la kadavron, "ne estis loko por alia mortinto aŭ por vivanto" sen tio ke ni vidus lin !

Tiel parolis ulĉjo Berniero. Sed la enketjuĝisto respondis al li ke, dum ni estis en tiu peceto de korto, la nokto estis tre malluma ĉar ni ne sukcesis distingi la vizaĝon de la gardisto, kaj ke, por rekoni lin, necesis al ni transporti lin en la vestiblon... Al kiu ulĉjo Berniero rebatis ke, se oni ne vidis "la alian korpon, mortan aŭ vivan," oni almenaŭ paŝintus sur lin, tiom multe tiu peco de korto estas malvasta. Fine ni estis, sen enkalkuli la kadavron, kvin sur tiu peco de korto kaj vere estus stranga ke la alia korpo eskapus al ni... La sola pordo kiu rigardis al tiu peco de korto, estis tiu de la ĉambro de la gardisto, kaj la pordo estis fermita. Ni trovis tiun ŝlosilon en la poŝo de la gardisto...

Tamen, ĉar la rezonado de Berniero, kiu unuavide ŝajnis logika, instigis diri ke oni mortigis per pafoj de pafiloj iun viron morta pro frapo de tranĉilo, la enketjuĝisto ne longe kroĉiĝis al tio. Kaj estis evidente al ĉiuj, ekde tagmezo, ke ĉi tiu enketjuĝisto estis konvinkita ke ni maltrafis "la fuĝanton" kaj ke ni tie trovis kadavron kiu nenion rilatis al "nia afero". Por li, la kadavro de la gardisto estis alia afero. Li volis prui tion sen prokrasti, kaj estas probable ke "ĉi tiu nova afero" kongruus kun ideoj kiujn li havis de kelkaj tagoj pri la moroj de la gardisto, pri lia konataro,

pri la freŝdata amintrigo kiun li subtenis kun la virino. de la gastejestro de la "Ĉefturo", kaj ankaŭ konfirmis la raportojn kiuj oni verŝajne faris al li rilate al la minacoj de morto eligitaj de ulĉjo Mateo celantaj al la gardisto ĉar, je la unua posttagmeze, ulĉjo Mateo, malgraŭ siaj ĝemadoj de reŭmatulo kaj la protestadoj de sia edzino, estis arestita kaj kondukita kun bona eskorto al Korbejo. Oni tamen malkovris ĉe li nenion kompromitan; sed paroloj diritaj, ankoraŭ la antaŭtagon, al varĉaristoj kiuj ripetis ilin, kompromitis lin pli ol se oni trovis en sia pajlolo la tranĉilon kiu mortigis la "verdan homon".

Ni estis tie, konsternitaj de tiom da eventoj tiel teruraj kiel neklarigeblaj, kiam por plenigi la konsternon de ĉiuj, ni vidis alveni en la kastelon Frederikoⁿ Larsanoⁿ kiu foriris el ĝi tuj post esti vidinta la enketjuĝiston kaj kiu revenis en ĝi akompanata de oficisto de la fervojo.

Ni tiam estis en la vestiblo kun Arturo Ranco, diskutante pri la kulpeco kaj la senkulpeco de ulĉjo Mateo (almenaŭ Arturo Ranco kaj mi estis solaj por diskuti, ĉar Rultabio ŝajnis foririnta por kelka malproksima revo kaj neniel zorgis pri tio kion ni diris).

La enketjuĝisto kaj lia registristo troviĝis en la verda saloneto kie Roberto Darzak enkondukis nin kiam ni unuafoje alvenis en la Glanejo. Ulĉjo Jakobo, kunvokita de la juĝisto, ĵus eniris en la saloneton; S^{ro} Roberto Darzak estis supre, en la ĉambro de F^{ino} Stangerson, kun S^{ro} Stangerson kaj la kuracistoj. Frederiko Larsano eniris en la vestiblon kun la oficisto de la fervojo. Rultabio kaj mi tuj rekonis tiun oficiston per lia blonda malgranda kaprobarbo : "Jen ! La oficisto de Epine-sur-Orĵe ! mi ekkriis, kaj mi rigardis Frederikoⁿ Larsanoⁿ kiu rebatis ridetante : "Jes, jes, vi pravas, li estas oficisto de Epine-sur-Orte". Post tio, Freĉjo sin anoncigis al la enketjuĝisto de la ĝendarmoj kiu estis ĉe la pordo de la saloneto. Tuj, ulĉjo Jakobo eliris, kaj Frederiko Larsano kaj la oficisto estis enkondukitaj. Kelkaj momentoj fluis, eble dek minutoj. Rultabio estis tre malpacienca. La pordo de la saloneto remalfermiĝis; la ĝendarmoj, alvokita de la enketjuĝisto, eniris en la saloneton, eliris el ĝi, grimpis la ŝtuparon kaj malsupreniris ĝin.

Remalfermante tiam la pordon de la saloneto kaj ne refermante ĝin, li diris al la enketjuĝisto :

- Sinjoro juĝisto, S^{ro} Roberto Darzak ne volas malsupreniri !
- Kiel ! Li ne volas !... ekkriis S^{ro} de Marketo.
- Ne ! li diras ke li ne kapablas forlasi F^{ino} Stangerson en la

ŝtato kie ŝi estas...

- Bone, eligis S^{ro} de Marketo, ĉar li ne venas al ni, ni iru al li...

S^{ro} de Marketo kaj la ĝendarmo supreniris; la enketjuĝisto signis al Frederiko Larsano kaj la fervoja oficisto sekvi ilin.

Rultabio kaj mi, ni sekvis.

Oni tiel alvenis en la galerion antaŭ la pordo de antaŭĉambro de F^{ino} Stangerson. S^{ro} de Marketo frapis la pordon. Ĉambristino aperis. Ŝi estis Silvia, iu servistino kies la haroj el sengusta blondo pendis distaŭzite sur konsternita vizaĝo.

- Ĉu S^{ro} Stangerson ĉeestas ? demandis la enketjuĝisto.

- Jes, sinjoro.

- Diru al li ke mi deziras paroli al li.

Silvia iris serĉi S^{ron} Stangerson.

La scienculo venis al ni; li ploris; li vekis kompaton.

- Kion vi ankoraŭ volas de mi ? demandis ĉi tiu al la juĝisto. Ĉu oni ne povus, sinjoro, en tia momento, lasi min iom trankvila !

- Sinjoro, eligis la juĝisto, necesas nepre ke mi tuj interparolu kun S^{ro} Roberto Darzak. Ĉu vi ne povus decidigi lin forlasi la ĉambron de F^{ino} Stangerson ? Alie mi trovus min antaŭ la neceso transiri la sojlon kun la tuta akompanantaro de justico.

La profesoro ne respondis; li rigardis la juĝiston, la ĝendarmon, kaj ĉiuj tiuj, kiuj akompanis ilin kiel viktimo rigardis siajn ekzekutistojn, kaj li eniris en la ĉambron.

Tuj S^{ro} Roberto Darzak eliris el ĝi. Li estis tre pala kaj tute senkuraĝa; sed kiam la kompatindulo ekvidis, malantaŭ Frederiko Larsano, la fervoja oficisto, lia vizaĝo pli konsterniĝis; liaj okuloj fariĝis konfuzitaj kaj li ne sukcesis bremsi obtuzan ĝemadon.

Ni ĉiuj ekkomprenis la tragikan movon de ĉi tiu dolora fizionomio.

Ni ne sukcesis deteni nin ellasi ekkriion de kompatato. Ni sentis

ke tiam okazis io definitiva kiu decidis pri la perdo de S^{ro} Roberto Darzak. Nur Frederiko Larsano havis radian vizaĝon kaj montris la ĝojon de ĉashundo kiu finfine ekkaptis sian predon.

S^{ro} de Marketo diris, montrante al S^{ro} Darzak la junan oficiston kun blonda kaprobarbo : "Ĉu vi rekonas sinjoron ?"

- Mi rekonas lin, eligis Roberto Darzak per voĉo kiun li vane provis firmigi. Li estas oficisto de Orleano ĉe la stacidomo de Epine-sur-Orĝe.

- Ĉi tiu junulo, daŭrigis S^{ro} de Marketo, asertas ke li vidis vin eltrajniĝi en Epine...

- Tiun nokton, ĉesigis S^{ro} Darzak, je la deka kaj duono... Estas vere !...

Estis silento...

- Sinjoro Darzak, reparolis la enketjuĝisto kun tono kiu estis plena de korŝira emocio... Sinjoro Darzak, kion vi venis fari tiun nokton en Epine-sur-Orĝe, je kelkaj kilometroj de la loko kie oni murdis F^{inon} Stangerson ?...

S^{ro} Darzak silentis. Li ne mallevis sian kapon, sed li fermis la okulojn, aŭ ĉar li volis kaŝi sian doloron, aŭ ĉar li timis ke oni povus legi en lia rigardo ion de lia sekreto.

- S^{ro} Darzak, insistis S^{ro} de Marketo, ĉu vi povas doni al mi la uzon de via tempo ĉi-nokte ?

S^{ro} Darzak remalfermis la okulojn. Li ŝajnis esti rekonkerinta sian tutan potencon super si.

- Ne, sinjoro !...

- Pripensu, sinjoro ! ĉar mi estas nepre devonta, se vi persistas en via stranga rifuzo, gardi vin al mia dispono.

- Mi rifuzas...

- Sinjoro Darzak ! En la nomo de la leĝo mi vin arestas !...

La juĝisto apenaŭ eldiris tiujn vortojn ke mi vidis Rultabioⁿ fari subitan movon al S^{ro} Darzak. Li estis certe parolonta, sed tiu ĉi geste ŝtopis al li la buŝon... Cetere, la ĝendarmo jam proksimiĝis al sia malliberulo... Ĉe tiu momento senespera alvoko eksonis :

- Roberto !... Roberto !...

Ni rekonis la voĉon de F^{ino} Stangerson, kaj pro ĉi tiu intonacio

de doloro, ne unu el ni kiu ne tremetis. Larsano mem ĉifoje pro tio paliĝis. Koncerne S^{ron} Darzak^{on}, respondante al la alvoko, li jam sin elĵetis al la ĉambro...

La juĝisto, la ĝendarmo, Larsano kuniĝis malantaŭ li; Rultabio kaj mi restis sur la sojlo de la pordo. Korŝira spektaklo : F^{ino} Stangerson, kies la vizaĝo havis la palecon de morto, leviĝis sur sia lito, malgraŭ la du kuracistoj kaj sia patro... Ŝi etendis tremantajn brakojn al Roberto Darzak sur kiu Larsano kaj la ĝendarmo estis metintaj la manon... Ŝiaj okuloj estis larĝe malfermitaj... ŝi vidis... ŝi komprenis... Ŝia buŝo ŝajnis flustri vorton... vorton kiu mortis sur ŝiaj sensangaj lipoj... vorton kiun neniu aŭdis... kaj ŝi renversiĝis, sveninta... Oni rapide kuntiris Darzak^{on} ekster la ĉambron... Atendante veturilon kiun Larsano iris serĉi, ni haltis en la vestiblo. Nia emocio de ĉiuj estis ekstrema. S^{ro} de Marketo estis larmonta. Rultabio utiligis ĉi tiun momenton de ĝenerala tenereco por diri al S^{ro} Darzak :

- Ĉu vi ne defendos vin ?
- Ne ! rebatis la malliberulo.
- Mi defendos vin, sinjoro...
- Vi ne kapablas, asertis la kompatindulo kun malĝoja rideto.

Tio kion ni ne sukcesis fari, F^{ino} Stangerson kaj mi, vi ne faros tion !

- Jes, mi faros tion.

Kaj la voĉo de Rultabio estis strange serena kaj memfida. Li daŭrigis :

- Mi faros tion, sinjoro Roberto Darzak, ĉar mi scias pli multe ol vi !

- Nu do ! murmuris Darzak preskaŭ kolere.
- Ho! kvietiĝu, mi scios nur tion kio utilos scii por savi vin !
- Necesas nenion scii, junulo... se vi volas rajti mian dankemon.

Rultabio skuis la kapon. Li alpaŝis tute proksime al Darzak :

- Aŭskultu tion kion mi tuj diros al vi, li mallaŭte eligis, kaj ke tio donu al vi konfidon ! Vi, vi scias nur la nomon de la murdisto; F^{ino} Stangerson, ŝi konas nur la duonon de la murdisto; sed mi ja konas liajn du duonojn; mi ja konas la murdiston tute kompletan !...

Roberto Darzak malfermis okulojn kiuj atestis ke li ne komprenis vorton pri tio kion ĝus diris al li Rultabio. La veturilo intertempalvenis kondukita de Frederiko Larsano. Oni enveturigis Darzak^{on} kaj la ĝendarmon. Larsano restis sur la sidloko. Oni forkondukis la malliberulon al Korbejo.

25 - Rultabio foriras en vojaĝon.

La saman vesperon ni forlasis la Glanejon, Rultebio kaj mi. Ni estis tre feliĉaj : ĉi tiu loko havis nenion kiu ankoraŭ povu retenigi nin. Mi deklaris ke mi rezignis deĉifri tiom da misteroj, kaj Rultabio, amike manfrapante min sur la ŝultro, konfidis al mi ke li havis nenion pli por sciigi en la Glanejo, ĉar la Glanejo sciigis ĉion al li. Ni alvenis en Parizon ĉirkaŭ la oka. Ni rapide vespermanĝis, poste lacaj, ni disiĝis interkonsentante rendevuon al la morgaŭo matene ĉe mi.

Je la difinita horo, Rultabio eniris en mian ĉambron. Li vestis sin per kvadratita kostumo el angla drapo, havis mantelon sur la brako, kaskedon sur la kapo kaj sakon en la mano. Li scigis min ke li foriris en vojaĝon.

- Dum kiom da tempo vi estos foririnta ? mi demandis al li.

- Unu monaton aŭ du, li eligis, tio dependas...

Mi ne kuraĝis pridemandi lin...

- Ĉu vi scias, li diris al mi, kiu estas la vorto kiun F^{ino} Stangerson eldiris hieraŭ antaŭ ol sveni... rigardante S^{on} Robertoⁿ Darzak^{on} ?...

- Ne, neniu aŭdis ĝin...

- Jes ! rebatis Rultabio ! Ŝi diris al li : "Parolu !"

- Kaj ĉu S^o Darzak parolos ?

- Neniam !

Mi ŝatintus daŭrigi la interparoladon, sed li forte premis al mi la manon kaj deziris al mi bonan sanon, mi havis nur la tempon demandi al li :

- Vi tute ne timas ke dum via foresto, plenumiĝos novajn atencojn ?...

- Mi ne plu timas ion el tiaĵo, li diris, de kiam S^o Darzak estas en malliberejo.

Post tiu stranga parolo, li forlasis min. Mi devis nur revidi lin en asiza kortumo, ĉe la momento de la proceso de Darzak, kiam li venis al la juĝeja barilo por klarigi la neklarigeblaĵon.

La sekvantan 15an de januaro, tio estas du monatoj kaj duono post la tragikaj eventoj kiujn mi ĵus raportis, *La Epoko* publikigis, en la unua kolumno de la unua paĝo, la sensacian sekvan artikolon :

La juĝantaro de Sejno-kaj-Uazo devas hodiaŭ juĝi unu el la plej misteraj okazoj kiuj estas en la tribunalaĵ analog. Neniam proceso prezentis tiom da malklaraj, nekompreneblaj, neklarigeblaj punktoj. Kaj tamen la prokuroro ne hezitis sidigi sur la asiza benko, viro respektita, estimata, amata de ĉiuj kiuj konas lin, juna scienculo, espero de franca scienco kies la tuta ekzisto estis dediĉita al laboro kaj honesteco. Kiam Parizo eksciis pri la aresto de S^{ro} Roberto Darzak, unuanima krio de protesto aŭdiĝis el ĉiuj flankoj. La tuta Sorbono, malhonorita de la nekredebla gesto de la enketjuĝisto, proklamis sian fidon pri la senkulpeco de la fianĉo de F^{ino} Stangerson. S^{ro} Stangerson mem forte atestis la eraron en kiu perdiĝis la justico, kaj ne estas dubo por iu ajn ke, se la viktimo kapablas paroli, ŝi venus postuli antaŭ la dek du ĵurianoj de Sejno-kaj-Uazo la viron kies ŝi volis fari sian edzon kaj kiun la prokuroro volas sendi al la eŝafodo. Necesas esperi ke iun venontan tagon, F^{ino} Stangerson reakiros sian racion kiu pormomente dronis en la terura mistero de la Glanejo. Ĉu vi volas ke ŝi reperdu ĝin kiam ŝi sciigos ke la viro kiun ŝi amas, mortis per la mano de la ekzekutisto ? Ĉi tiu demando sin direktas al la juĝantaro "kun kiu ni pretiĝas trakti, hodiaŭ mem".

Ni fakte estas decidataj tute ne lasi dek du bravulojn plenumi abomenindan juĝaron. Certe ja, teruraj koincidoj, akuzantaj spuroj, neklarigebla silento de la flanko de la akuzito, enigma tempouzado, la manko de iu ajn alibio povis kaŭzi la konvinkon de la prokuroraro, kiu "vane serĉinte la veron aliloke", decidiĝis trovi ĝin en tio. La akuzajoj ŝajne estas tiel nerefuteblaj de S^{ro} Roberto Darzak, ke necesas eĉ senkulpigi policanon tiel spertan, tiel inteligentan, kaj ĝenerale tiel feliĉan kiel S^{ron} Frederikoⁿ Larsanoⁿ, sin lasi blindigi per ilin. Ĝis tiam, ĉio venis akuzi S^{ron} Robertoⁿ

Darzak^{on} dum la enketo; hodiaŭ, ni baldaŭ defendos lin antaŭ la juĝantaro; kaj ni alportos ĉe la juĝeja barilo, lumon tia ke la tuta mistero de la Glanejo estos klarigita. "Ĉar ni posedas la veron".

Se ni tute ne parolis pli frue, estas ĉar la intereso mem de la kazo kiun ni volas defendi, sendube postulis tion. Niaj legantoj ne forgesis la sensaciajn anonimajn enketojn kiujn ni publikigis pri la "Maldekstra piedo de la strato Oberkampfo", pri la fama ŝtelo de la "Universala Kredito" kaj pri la kazo de la "Orbrikoj de la hotelo de la Mono". Ili antaŭvidigis nin la veron, eĉ antaŭ ol la admirinda inĝeniero de iu Frederiko Larsano tute malkaŝis ĝin. Ĉi tiuj enketoj estis gviditaj de nia plej juna redaktoro, iu dekokjara knabo, Jozefo Rultabio, kiu estos famkonata morgaŭ. Kiam la afero de la Glanejo ekaperis, nia modesta reportero iris surloken, cedigis ĉiujn pordojn kaj ekloĝiĝis en la kastelo, el kie ĉiuj reprezentantoj de la gazetaro estis forpelitaj. Apud Frederiko Larsano, li serĉis la veron; li vidis kun timo la eraron en kiu sinkis la tuta genio de la fama policano; vane li provis eltiri lin ekster la malbona vojo sur kiu li estis enŝovinta : la granda Freĉjo tute ne volis konsentis ricevi lecionojn de tiu negrava ĵurnalisto. Ni scias kie tio kondukis S^{on} Robertoⁿ Darzakⁿ.

Nu, necesas ke Francio sciu, necesas ke la mondo sciu, ke la vespero mem de la aresto de S^{ro} Roberto Darzak, la juna Jozefo Rultabio eniris en la oficejon de nia direktoro kaj diris al li : "Mi foriras en vojaĝon. Kiom da tempo mi foriros, mi ne povus diri al vi; eble unu monaton, du monatojn, tri monatojn... eble mi neniam revenos... Jen letero... Se mi ne estas reveninta en la tago kiam la S^{ro} Darzak aperos antaŭ la asizo, vi malfermos ĉi tiun leteron ĉe la asiza tribunalo, post la pasado de la atestantoj. Interkonsentu pri tio kun la advokato de S^{ro} Roberto Darzak. S^{ro} Roberto Darzak estas senkulpa. En ĉi tiu letero estas la nomo de la murdinto, kaj mi tute ne diros la pruvojn, ĉar la pruvojn, mi iras serĉi ilin, sed la nerefutebla klarigo de lia kulpeco. Kaj nia redaktoro foriris. Ni longe restis sen novaĵoj, sed nekonato venis viziti nian direktoron antaŭ ok tagoj por diri al li : "Agu laŭ la instrukcioj de Jozefo Rultabio, se la afero fariĝas necesa.

La vero estas en tiu letero". Ĉi tiu viro ne volis diri al ni sian nomon.

Hodiaŭ, la 15^{an} de januaro, jen ni ĉe la grava tago de la asizo; Jozefo Rultabio ne estas reveninta; eble ni neniam plu revidos lin. La gazetaro, ĝi ankaŭ, nombras siajn heroojn, viktimojn de devo : la profesion devo, la unua el ĉiuj devoj. Eble, en ĉi tiu horo, li estas mortinta ! Ni kapablos venĝi lin. Nia direktoro ĉi-posttagmeze estos antaŭ la asiza tribunalo de Versajlo, kun la letero : la letero kiu enhavas la nomon de la murdinto !

Ĉe la kapo de la artikolo, oni metis la portreton de Rultabio.

La parizanoj kiuj iris tiun tagon al Versajlo pro la proceso alnomita de la "Mistero de la Flava Ĉambro", certe ne forgesis la nekredeblan svarmon kiu interpuŝiĝis en la stacidomo Sankta-Lazaro.

Oni ne ankoraŭ trovis lokon en la trajnoj kaj oni devis improvizi kromajn trajnojn. La artikolo de *La Epoko* skuis ĉiujn, ekscitis ĉiujn sciavidojn, instigis ĝis la incitiĝo la pasion de la diskutoj. Pugnobatoj estis donitaj inter subtenantoj de Jozefo Rultabio kaj fanatikuloj de Frederiko Larsano, ĉar, stranga afero, la febro de tiuj homoj naskiĝis malpli de tio ke oni eble baldaŭ kondamnos senkulpulon ol de la intereso ke ili montris por sia propra kompreno de la "mistero de la Flava ĉambro". Ĉiu havis sian klarigon kaj konsideris ĝin kiel bona. Ĉiuj kiuj klarigis la krimon kiel Frederiko Larsano tute ne akceptis ke oni povu pridubi la sagacecon de tiu populara policano; kaj ĉiuj aliaj kiuj havis alian klarigon ol tiun de Frederiko Larsano, nature asertis ke ĝi devu esti tiu de Jozefo Rultabio kiun ili ne ankoraŭ konis. La ekzemplero de *La Epoko* en la mano, la Larsanoj kaj la Rultabioj disputis, kverelis ĝis sur la ŝtupoj de la juĝejo de Versajlo, ĝis en la tribunalo. Speciala ordoservo estis ordonita. La grandnombra amaso kiu ne sukcesis eniri en la palaco restis ĝis la vespero ĉirkaŭ la monumento, malfacile bridita de la taĉmento kaj la polico, sciavida pri novaĵoj, akceptante la plej neverŝajnajn onidirojn. Dum momento, la klaĉo rondiris ke oni juŝ arestis, en plena aŭdienco, S^{ron} Stangerson mem kiu konfesis esti la murdinto de sia

filino... Estis frenezaĵo. La ekscitiĝo kulminis. Kaj oni ankoraŭ atendis Rultabio". Homoj asertis koni lin kaj rekoni lin; kaj kiam junulo provizita per paspermeso, trairis la vakan lokon kiu apartigis la homamason de la juĝejo, sinpelado okazis.

Oni kunpremiĝis. Oni kriis : "Rultabio ! Jen estas Rultabio !" Atestantoj, kiuj pli-malpli malprecize similis al la portreto diskonigita de *La Epoko*, estis ankaŭ aklamitaj. La alveno de la direktoro de *La Epoko* estis ankoraŭ signalo por kalkaj manifestadoj. Iuj aplaudis, aliaj fajfis. Estis multaj virinoj en la homamaso.

En la asiza ĉambro, la proceso okazis sub la prezidado de S^{ro} De Roku, juĝisto plena de ĉiuj antaŭjuĝoj de la talaruloj, sed esence honesta. Oni alvokis la atestantojn. Mi kompreneble estis inter ili, same kiel ĉiuj kiuj iamaniere tuŝis la misterojn de la Glanejo : S^{ro} Stangerson, maljuniĝinta de dek jaroj, nerekonebla, Larsano, S^{ro} Arturo V. Ranco, la vizaĝo ĉiam lumigita, ulĉjo Jakobo, ulĉjo Mateo kiu estis alkondukita, mankateno ĉe la manoj, inter du ĝendarmoj, S^{ino} Mateo, larmoplena, la Berniero^j, la du flegistinoj, la ĉefservisto, ĉiuj servistoj de la kastelo, la poŝtisto de la poŝtofacejo 40, la fervoja oficisto de Epine, kelkaj amikoj de S^{ro} kaj F^{ino} Stangerson, kaj ĉiuj favoraj atestantoj de S^{ro} Roberto Darzak. Mi bonŝance estis aŭdita inter la unuaj atestantoj, tio kio permesis al mi ĉeesti dum preskaŭ la tuta proceso.

Mi tute ne bezonas diri al vi ke oni kunpremiĝis en la tribunalo. Advokatoj estis sidantaj ĝis sur la ŝtupoj de la "kortumo"; kaj malantaŭ la juĝistoj en ruĝaj talaroj, ĉiuj prokuroraroj de la ĉirkaŭaĵoj estis reprezentitaj. S^{ro} Roberto Darzak aperis ĉe la benko de la akuzitoj, inter la ĝendarmoj, tiel kvieta, tiel granda kaj tiel bela, ke murmuro de admiro pli ol de kompatato akceptis lin.

Li tuj klinis sin al sia advokato, moŝto Henriko-Roberto kiu, helpata de sia unua sekretario, moŝto Andreo Hesio, tiam komencanto, jam komencis foliumi tra sia dosiero.

Multaj pensis ke S^{ro} Stangerson iru premi la manon de la akuzito, sed la alvoko de la atestantoj okazis, kaj ĉiuj ĉi forlasis la ĉambron sen ke ĉi tiu sensacia ĝentileco okazis. Ĉe la momento

kiam la ĵurianoj lokiĝis, oni rimarkis ke ili ŝajnis multe interesiĝi pri rapida interparolado kiun moŝto Henriko-Roberto havis kun la direktoro de *La Epoko*. Tiu ĉi iris poste sin loki ĉe la unua linio de la publiko. Kelkaj miris ke li ne sekvis la atestantojn en la ĉambro kiu estis rezervita por ili.

La legado de la akuza akto realiĝis kiel preskaŭ ĉiam, sen incidento. Mi ne rakontos ĉi tie la longan pridemandon kiun trapasis S^{ro} Darzak. Li respondis samtempe laŭ la plej natura kaj la plej mistera maniero. "Ĉio kiun li povis diri", aspektis natura, ĉio kiun li silentis, ŝajnis terura al li, eĉ al la okuloj de tiuj kiuj "sentis" lian senkulpecon. Lia silento pri la punktoj kiujn ni konas, stariĝis kontraŭ li kaj ŝajnis ja ke tiu silento nepre frakasis lin. Li malcedis antaŭ la admonojn de la asiza prezidanto kaj de la prokuroro. Oni diris al li ke silenti en tia cirkonstanco, samvaloris kiel morto.

- Bone, li diris, mi do spertos tion; sed mi estas senkulpa !

Laŭ tiu impresa lerteco kiu faris lian reputacion, kaj profitanta de la incidento, la moŝto Henriko-Roberto provis kreskigi la karakteron de sia kliento, per la fakto mem de lia silento, aludante pri moralaj devoj kiujn nur heroaj animoj estas kapablaj trudi sin.

La eminenta advokato sukcesis nur tute konvinki tiujn kiuj konis S^{ron} Darzak^{on}, sed la aliaj restis hezitemaj. Okazis paŭzo de aŭdienco, poste la sinsekvo da atestantoj komencis kaj Rultabio ankoraŭ tute ne alvenis. Ĉiufoje kiam pordo malfermiĝis, ĉiuj okuloj iris al tiu pordo, poste revenis al la direktoro de *La Epoko*, kiu restis flegma en sia sidloko. Oni fine vidis lin kiu traserĉi en sia poŝo kaj kiu "eltiri el ĝi leteron". Obtuzo voĉbruo sekvis tiun geston.

Mia intenco tute ne estas raporti ĉi tie ĉiujn incidentojn de tiu proceso. Mi rememorigis sufiĉe longe pri ĉiuj etapoj de la afero por tute ne postuli al la legantoj la novan sinsekvon de eventoj ĉirkaŭitaj de ilia mistero. Mi malpacience deziras alveni al la vere drama momento de tiu neforgesebla tago. Ĝi ekkazis, kiam moŝto Henriko-Roberto metis kelkajn demandojn al ulĉjo Mateo kiu, ĉe la juĝeja barilo, defendis sin, inter siaj du ĝendarmoj, esti murdinta

"la verdan viron". Lia edzino estis alvokita kaj konfrontita kun li. Ŝi konfesis, ekplorigante, ke ŝi estis "la koramikino" de la gardisto, ke ŝia edzo suspektis tion; sed ŝi ankoraŭ asertis ke tiu ĉi estis por nenio en la murdo de sia "koramiko". Moŝto Henriko-Roberto tiam petis al la kortumo bonvoli tuj aŭdi pri ĉi tiu punkto, Frederikoⁿ Larsanoⁿ.

- En mallonga konversacio kiun mi ĵus havis kun Frederiko Larsano, dum la paŭzo de aŭdienco, deklaris la advokato, tiu ĉi komprenigis al mi ke oni povis alie klarigi la morton de la gardisto ol per la interveno de ulĉjo Mateo. Estus interese koni la hipotezon de Frederiko Larsano.

Frederiko Larsano estis akceptita. Li tre klare komprenigis sin.

- Mi tute ne vidas, li diris, la neceson enmiksi ulĉjon Mateoⁿ en ĉio ĉi. Mi diris tion al S^{ro} de Marketo, sed la murdaj diroj de tiu viro evidente malutilis lin en la menso de S^{ro} enketjuĝisto. Laŭ mi, la murdo de F^{ino} Stangerson kaj la murdo de la gardisto "estas la sama afero". Oni pafis al la murdisto de F^{ino} Stangerson fuĝanta en la honorkorto; oni povis kredi esti trafinta lin, oni povis kredi esti mortiginta lin; vere li nur stumblis ĉe la momento kiam li malaperis malantaŭ la dekstra alo de la kastelo. Tie, la murdinto renkontis la gardiston kiu sendube volis kontraŭstari al sia forkuro. La murdinto ankoraŭ tenis en la mano la tranĉilon per kiu li ĵus frapis F^{inon} Stangerson, li frapis per ĝi la gardiston en la koro, kaj la gardisto mortis pro ĝi.

Ĉi tiu tiel simpla klarigo ŝajnis des pli verŝajna ke jam multaj el tiuj kiuj interesiĝis pri la misteroj de la Glanejo jam trovis ĝin. Murmura aprobo aŭdiĝis.

- Kaj la murdinto, kio li fariĝis en ĉio ĉi ? demandis la prezidanto.

- Li evidente kaŝis sin, sinjoro prezidanto, en malluma angulo de tiu peco de korto, kaj post la foriro de la homoj de la kastelo kiuj forportis la korpon, li sukcesis trankvile fuĝi.

Ĉe tiu momento, funde de la "staranta publiko", juneca voĉo laŭtiĝis. Meze de la konsternego de ĉiuj, ĝi diris :

- Mi samopinias kiel Frederiko Larsano pri la frapo de tranĉilo

en la koro. Sed mi ne plu opinias kiel li pri la maniero per kiu la murdinto forkuris el la peco de korto !

Ĉiuj turnis sin; la asignistoj rapidegis, ordonante silenton.

La prezidanto malkontente demandis kiu laŭtigis la voĉon kaj ordonis la tujan elpelon de la entrudulo; sed oni reaŭdis la saman klaran voĉon kiu kriis :

- Estas mi, sinjoro prezidanto, estas mi, Jozefo Rultabio !

Okazis terura tumulto. Oni aŭdis kriojn de virinoj kiuj malbone fartis. Oni ne plu montris konsideron al "la majesto de justeco". Estis freneza sinpelado. Ĉiuj volis vidi Jozefoⁿ Rultabioⁿ. La prezidanto kriis ke li tuj evakuigos la ĉambron, sed neniu aŭdis lin. Dum tiu tempo, Rultabio saltis super la balustradon kiu apartigis lin de la sidanta publiko, boris al si vojon per kubutaj puŝegoj, alvenis apud sia direktoro kiu senbride brakumis lin, prenis al li "sian" leteron el inter la manoj, enŝovis ĝin en sian poŝon, eniris en la rezervitan parton de la tribunalo kaj tiel alvenis ĝis la juĝeja barilo de la atestantoj, puŝpelata, puŝpelanta, kun ridetanta vizaĝo, feliĉa, skarlata bulo kiun ankoraŭ iluminis la inteligenta ekbrilo de liaj du grandaj rondaj okuloj. Li surhavis tiun angla kostumo kiun mi vidis sur li en la mateno de lia foriro - sed en kia stato, Dio mia ! - kun la mantelo sur lia brako kaj la vojaĝokaskedo en la mano. Kaj li diris :

- Mi pardonpetas, sinjoro prezidanto, la transatlantiko malfruis ! Mi alvenas de Ameriko. Mi estas Jozefo Rultabio !...

Oni eksplodis per rido. Ĉiuj estis feliĉaj pro la alveno de ĉi tiu knabo. Ŝajnis pri ĉiuj konsciencoj ke senmezura ŝarĝo ĵus estis elprenita de ili. Oni spiris. Oni certis ke li vere alportis la veron... ke li tuj konigos la veron...

Sed la prezidanto estis furioza :

- Ha ! Vi estas Jozefo Rultabio, reparolis la prezidanton. Nu, mi instruos al vi, junulo, moki la justicon... Atendante ke la kortumo interkonsiliĝu pri via kazo, mi retenas vin sub la dispono de justico... surbaze de mia laŭvola povo.

- Sed, sinjoro prezidanto, mi petas nur tion : esti sub la dispono de justico... mi venis meti min, sub la dispono de justico... Se mia eniro iom bruis, mi vere petas pardonon pro tio al la kortumo... Bone kredu, sinjoro prezidanto, ke neniu, pli ol mi, respektas la justicon... Sed mi eniris kiel mi povis...

Kaj li ekridis. Kaj ĉiuj ridis.

- Fortrenu lin ! ordonis la prezidanto.

Sed moŝto Henriko-Roberto intermetis sin. Li komencis senkulpigante la junulon, montris lin plena de la plej bonajn sentojn, komprenigis al la prezidanto ke oni povis malfacile rezigni pri la depozicio de atestanto kiu dormis en la Glanejo dum la tuta mistera semajno, ĉefe de atestanto kiu asertis pruvi la senkulpecon de la akuzitoj kaj alporti la nomon de la murdinto.

- Ĉu vi estas dironta al ni la nomon de la murdinto ? demandis la prezidanto, skuita sed skeptika.

- Sed, mia prezidanto, mi venis nur por tio ! eligis Rultabio.

Ni preskaŭ aplaudis en la tribunalo, sed la viglaj ŝŝ ! de la asignistoj reestigis la silenton.

- Jozefo Rultabio, diris moŝto Henriko-Roberto, ne estas regule asignita kiel atestanto, sed mi esperas ke surbaze de sia laŭvola povo, sinjoro prezidanto bonvolos pridemandi lin.

- Bone ! eligis la prezidanto, ni pridemandos lin. Sed unue ni finu kun li...

La ĝenerala prokuroro stariĝis :

- Eble estus preferinde, rimarkigis la reprezentanto de la prokuroraro, ke ĉi tiu junulo tuj diru al ni la nomon de tiu kiun li denuncas kiel estanta la murdinto.

La prezidanto konsentis per ironia aprobo :

- Se sinjoro ĝenerala prokuroro taksas kiel tiel gravan la depozicion de S^{ro} Jozefo Rultabio, mi tute ne vidas ĝenaĵon por tio ke la atestanto tuj diru al ni la nomon de "lia murdinto !

Estus eĉ aŭdebla zumo de muŝo.

Rultabio silentis, rigardante kun simpatio al S^{ro} Roberto Darzak kiu, li, por la unua fojo de la komenco de la debato, montris vizaĝon malkvietan kaj plenan de antaŭtimo.

- Nu, ripetis la prezidanto, ni aŭskultas vin, sinjoron Jozefoⁿ Rultabioⁿ. Ni atendas la nomon de la murdinto.

Rultabio trankvile traserĉis en la poŝon de sia veŝto, eltiris el ĝi grandegan poŝhorloĝon, rigardis sur ĝi la horon, kaj diris :

- Sinjoro prezidanto, mi kapablos diri al vi la nomon de la murdinto nur je la sesa kaj duono ! Ni ankoraŭ havas almenaŭ kvar

horojn antaŭ ni !

La ĉeestantaro aŭdigis mirajn kaj seniluziigajn murmurojn.
Kelkaj advokatoj laŭte diris :

- Li mokas nin !

La prezidanto aspektis kontentega; moŝtoj Henriko-Roberto kaj Andreo Hesio estis embarasitaj.

La prezidanto diris :

- Ĉi tiu ŝerco sufiĉe daŭris. Vi povas forŝteliĝi, sinjoro, en la ĉambro de la atestantoj. Mi gardas vin sub nia dispono.

Rultabio protestis :

- Mi asertas vin, sinjoro prezidanto, li ekkriis, per sia akuta kaj klariona voĉo, mi certigas vin ke kiam mi diros al vi la nomon de la murdinto, vi komprenos ke mi povis diri ĝin al vi nur je la sesa kaj duono ! Promeso de honesta homo ! Sincereco de Rultabio !... Sed intertempe mi tamen povas doni al vi kelkajn klarigojn pri la murdo de la gardisto... S^{ro} Frederiko Larsano kiu vidis min "labori" en la Glanejo, povus diri al vi per kia diligenteco mi esploris tiun ĉi tutan aferon. Kiom ajn mi havas kontraŭan opinion al lia kaj subteni ke arestigante S^{ron} Robertoⁿ Darzak^{on}, li arestigis senkulpulon, li ja ne dubas pri sincereco, nek pri la graveco kiun necesas aligi al miaj malkovroj, kiuj ofte konfirmis liajn !

Frederiko Larsano diris :

- S^{ro} prezidanto, estus interese aŭdi S^{ron} Jozefoⁿ Rultabioⁿ; des pli interese ke li ne samopinias kiel mi.

Aproba murmuro akceptis tiun parolon de la policano. Li lojale akceptis la duelon. La turniro promesis esti alloga inter ĉi tiuj du inteligentuloj kiuj daŭre strebis al la sama tragika problemo kaj kiuj atingis du malsamajn solvojn.

Ĉar la prezidanto silentis, Frederiko Larsano daŭrigis :

- Nu, ni konsentas pri la tranĉilfrapo en la koro kiu estis donita al la gardisto fare de la murdinto de F^{ino} Stangerson; sed ĉar ni ne plu konsentas pri la afero de la fuĝo de la murdinto "en la peco de korto", estus interese scii kiel S^{ro} Rultabio klarigas tiun fuĝon.

- Evidente, eligis mia amiko, tio estus interesa !

La tuta ĉeestantaro denove ekridis. La prezidanto tuj deklaris

ke, se tia okazaĵo rekomenciĝus, li ne hezitus efektivigi sian minacon evakuigi la ĉambron.

- Vere, finis la prezidanto, pri kazo kiel tiu ĉi, mi ne vidas tion kio povas esti ridinda.

- Ankaŭ mi ! diris Rultabio.

Homoj, antaŭ mi, enigis sian nazitukon en la buŝon por ne eksplodi...

- Nu, eligis la prezidanto, vi aŭdis, junulo, tion kion ĵus diris Frederiko Larsano. Kiel laŭ vi, la murdinto eskapis el la "peco de korto" ?

Rultabio rigardis S^{inon} Mateoⁿ kiu malgaje ridetis al li.

- Ĉar S^{ino} Mateo, li diris, bonvolis konfesi la tutan intereson kiun ŝi montris al la gardisto...

- La friponino ! ekkriis ulĉjo Mateo.

- Elirigu ulĉjon Mateoⁿ ! ordonis la prezidanto.

Oni elkondukis ulĉjon Mateoⁿ.

Rultabio reparolis :

- ...Ĉar ŝi faris ĉi tiun konfeson, mi bone povas diri al vi ke ŝi ofte tenis konversacion nokte kun la gardisto, ĉe la unua etaĝo de la ĉefturo, en la ĉambro kiu antaŭe estis oratorio. Ĉi tiuj konversacioj estis aparte oftaj dum la lastaj tagoj, kiam ulĉjo Mateo estis alnajlita al la lito per siaj reŭmatismoj. Injekto de morfino, taŭge enŝprucigita, donis al ulĉjo Mateo la trankvilon kaj la ripozon, kaj trankviligis lian edzinon dum kelkaj horoj dum kiuj ŝi bezonis forestiĝi. S^{ino} Mateo venis al la kastelo dum la nokto, envolvita en granda nigra ŝalo kiuj utilis al ŝi kiom estas eble, por maski ŝian personecon kaj aspektigis ŝin kiel malhelan fantomon kiu kelkfoje ĝenis la noktojn de ulĉjo Jakobo. Por averti sian amikon pri sia ĉeesto, S^{ino} Mateo prunteprenis de la kato de Ulnjo Genua, maljuna sorĉistino de Sankta-Genoveva-de-la-Arbaroj, ĝian sinistran miaŭon; tuj la gardisto malsupreniris de sia ĉefturo kaj venis malfermis la malgrandan poternon al sia amorantino. Kiam la riparoj de la ĉefturo estis ĵuse entreprenitaj, la rendevuoj tamen okazis en la iama gardistejo, ĉe la ĉefturo mem, la nova ĉambro kiun oni provizore cedis al tiu kompatinda

servisto, ĉe la ekstremo de la dekstra alo de la kastelo, disiĝanta de la geedzoj de la ĉefservisto kaj la kuiristino nur per tro maldika septo.

S^{ino} Mateo ĵus forlasis la gardiston en perfekta sano kiam la dramo de la "peceto korto" okazis. S^{ino} Mateo kaj la gardisto, havantaj nenion pli por diri inter si, eliris kune el la ĉefturo... Mi sciigis tiujn detalojn, sinjoro prezidanto, nur tra la ekzameno al kiu mi fordonis min pri la piedsignoj de paŝadoj en la honorkorto la morgaŭon matene... Berniero, la pordisto, kiun mi lokis kun lia fusilo kiel observanto malantaŭ la ĉefturo, tiel kiel mi permesos al li klarigi mem tion, ne kapablis vidi tion kio okazis en la honorkorto. Li alvenis tien iom pli poste nur altirita de la pafadoj de revolvero, kaj siavice pafis. Jen do la gardisto kaj S^{ino} Mateo, en la nokto kaj la silento de la honorkorto. Ili deziras unu la alian bonan vesperon; S^{ino} Mateo direktas sin al la malfermita krado de tiu korto, kaj li reiras enlitiĝi en sia malgranda korbela ĉambron ĉe la ekstremo de la dekstra alo de la kastelo.

Li estas atingonta sian pordon kiam pafadoj de revolvero tondras; li sin turnas; malserena, li retropaŝas; li baldaŭ atingos la angulon de la dekstra alo de la kastelo kiam ombro eksaltas al lin kaj frapas lin. Li mortas. Lia kadavro estas tuj levprenita de homoj, kiuj kredas teni la murdinton kaj kiuj kunportas nur la murdita. Dum tiu tempo, kion faras S^{ino} Mateo? Surprizita de la detonacioj kaj de la invado de la korto, ŝi fariĝas la plej malgranda kiel ŝi povas en la nokto kaj en la honorkorto. La korto estas vasta, kaj troviĝanta apud la krado, S^{ino} Mateo povis nevidate trapasi. Sed ŝi ne "trapasis". Ŝi restis kaj vidis forporti la kadavron. Kun koro premita de tre komprenebla turmentiĝo kaj elpelita de tragika antaŭsento, ŝi venis ĝis la vestiblo de la kastelo, ekrigardis al la ŝtuparo lumigita de la lampeto de ulĉjo Jakobo, ŝtuparo kie oni la etendis la korpon de sia amiko; ŝi "vidis" kaj forkuris. Ĉu ŝi vekis la atenton de ulĉjo Jakobo? Ĉiaokaze tiu ĉi rekuniĝis kun la nigra fantomo kiu jam pasigis al li kelkajn sendormajn noktojn. Ĉi tiun nokton mem, antaŭ la krimo, li estis vekita de la krioj de la "Dibesteto" kaj vidis tra la fenestro la nigran fantomon... Li haste

vestis sin kaj estas tiel ke oni klarigas ke li alvenis en la vestiblon, tute vestinta kiam ni alportis la kadavron de la gardisto. Do tiun nokton, en la honorkorto, li sendube volis, unu fojon por ĉiam, rigardi de proksime la vizaĝon de la fantomo. Li rekonis ŝin. Ulĉjo Jakobo estas malnova amiko de S^{ino} Mateo. Ŝi nepre konfesis al li siajn noktajn konversaciojn, kaj petegis lin savi ŝin el tiu malfacila momento ! La stato de S^{ino} Mateo, kiu ĵus vidis sian amikon mortan, devas esti plorinda. Ulĉjo Jakobo kompatas kaj akompanis S^{inon} Mateoⁿ tra la kverkejo, kaj ekster la parko, eĉ transe de la randoj de la lageto, ĝis la vojo de Epine. Tie ŝi devis nur paŝi kelkajn metrojn pli por reiri hejmen. Ulĉjo Jakobo revenis al la kastelo, kaj ekkomprenante pri la juĝa graveco kiun estus pri la amorentino de la gardisto, pro tio ke oni nesciis tiunokte ŝian ĉeeston en la kastelo, provis laŭeble kaŝi al ni tiun dramatan epizodon de iu nokto kiu jam enhavis tiom pri tio ! Mi havas nenian bezonon, aldonis Rultabio, demandi al S^{ino} Mateo kaj ulĉjo Jakobo por konfirmi tiun ĉi rakonton.

Mi scias ke la aferoj tiel okazis ! Mi simple invokos la rememorojn de S^{ro} Larsano kiu, li, jam komprenas kiel mi sciigis ĉion, ĉar li vidis min la morgaŭon matene, kliniĝanta super duoblan spuraron kie oni renkontis kune vojaĝantaj, la spurojn de paŝado de ulĉjo Jakobo kaj tiujn de sinjorino.

Tiam, Rultabio turnis sin al S^{ino} Mateo kiu restis ĉe la juĝeja barilo, kaj faris al ŝi galantan saluton.

- La spuroj de la piedoj de sinjorino, klarigis Rultabio, havas strangan similecon kun la spuroj de la "elegantaj piedoj" de la murdinto...

S^{ino} Mateo ektremis kaj rigide rigardis kun furioza scivolemo al la juna reportero. Kion li aŭdacis diri ? Kion li volis diri ?

- Sinjorino havas elegantan piedon, longan kaj plivole iom grandan pri iu virino. Estas, krom la pinta ekstremaĵo de la boteto, la piedo de la murdinto...

Estis kelkaj movadoj en la aŭskultantaro. Rultabio, per unu gesto, ĉesis ilin. Oni vere dirintus ke nun estis li kiu nun ordonis la disciplinon de la aŭdienco.

- Mi hastas diri, li eligis, ke tio ne signifas multon kaj ke policano kiu konstruus sistemon sur similaj eksteraj indicoj, sen meti ĝeneralan ideon ĉirkaŭ ĝi, irus rekte al juĝa eraro.! S^{ro} Roberto Darzak, li ankaŭ havas la piedojn de la murdinto, kaj tamen li ne estas la murdinto !

Novaj movadoj.

La prezidanto demandas al S^{ino} Mateo :

- Ĉu vere estas tiel ke, tiun vesperon, la aferoj okazis por vi, sinjorino ?

- Jes, sinjoro prezidanto, ŝi respondis. Estas por kredi ke S^{ro} Rultabio estis malantaŭ ni.

- Vi do vidis la murdinton fuĝi ĝis la ekstremo de la dekstra alo, sinjorino, ĉu ne ?

- Jes, kiel mi vidis forporti, unu minuton pli poste, la kadavron de la gardisto.

- Kaj la murdinto, kio li fariĝis ? Vi restadis sola en la honorkorto, estus tute natura ke tiam vi ekvidis lin... Li ne sciis vian ĉeeston kaj la momento por li eskapi venis...

- Mi nenion vidis, sinjoro prezidanto, ĝemis S^{ino} Mateo. En tiu momento, la nokto fariĝis tre malluma.

- Estas do, eligis la prezidanto, S^{ro} Rultabio kiu klarigos al ni, kiel la murdinto fuĝis.

- Kompreneble ! tuj rebatis la junulo kun tia memfido ke la prezidanto mem ne sukcesis retenigi sin rideti.

Kaj Rultabio rekomencis paroli :

- Ne eblis al la murdinto normale forkuri de la fino de la korto, en kiu li eniris, sen tio ke ni vidintus lin ! Se ni ne vidintus lin, ni tuŝintus lin ! Ĝi estas senvalora bagatelo de korteto, kvadrato ĉirkaŭita de fosaĵoj kaj altaj kradoj. La murdinto paŝintus sur nin aŭ ni paŝintus sur li ! Tiu kvadrato estis preskaŭ praktike fermita de la fosaĵoj, la kradoj kaj de ni mem, tiel kiel la "Flava Ĉambro !"

- Tiam, diru do al ni, ĉar la viro eniris en tiu kvadrato, diru do al ni kiel okazis ke vi tute ne trovis lin !... Jen duonhoro ke mi demandas tion al vi !

Rultabio ankoraŭfoje reelprenis la poŝhorloĝon kiu ornamis la

poŝon de sia veŝto; trankvile ekrigardis ĝin kaj diris :

- Sinjoro prezidanto, vi povas demandi tion al mi ankoraŭ dum tri horoj kaj duono, mi povos respondi al vi pri tio nur je la sesa kaj duono !

Ĉi tiu fojo la murmuroj estis nek malamikaj, nek seniluziigaj. Oni komencis fidi al Rultabio. "Oni fidis lin". Kaj oni amuzis sin pri tiu pretendo kiun li havis por difini horon al la prezidanto, same kiel li difinus rendevuon al kamarado.

Koncerne la prezidanton, post esti demandanta al si, ĉu li devis koleriĝi, li elektis amuziĝi pri tiu ĉi knabo kiel ĉiuj. Rultabio alkroĉis al si simpation, kaj la prezidanto estis jam tute sorbigita de ĝi. Fine li tiel klare difinis la rolon de S^{ino} Mateo en la afero, kaj tiel bone klarigis ĉiun el ŝiaj agoj, "tiun nokton", ke S^{ro} De Roku sentis sin devigita preni lin preskaŭ serioze.

- Nu, sinjoro Rultabio, li eligis, estas kiel vi volos ! Sed ke mi ne plu revidu vin antaŭ la sesa kaj duono !

Rultabio salutis la prezidanton, kaj luletante sian dikan kapon, direktis sin al la pordo de la atestantoj.

Lia rigardo serĉis min. Li tute ne vidis min. Tiam mi tute malrapide liberigis min de la homamaso kiu ĉirkaŭis min kaj eliris el la aŭdiencejo, preskaŭ samtempe kiel Rultabio. Tiu bonega amiko bonkorece akceptis min. Li estis feliĉa kaj babilema. Li ĝojege skuis al mi la manojn. Mi diris al li :

- Mi tute ne demandos al vi, kara amiko mia, tion kion vi iris fari en Ameriko. Vi sendube rebatus al mi, kiel al la prezidanto, ke vi povos respondi al mi nur je la sesa kaj duono...

- Ne, kara Sinklero mia, ne ! Mi tuj diros al vi tion kion mi iris fari en Ameriko, ĉar vi, vi estas amiko : mi iris serĉi la nomon de la dua duono de la murdinto !

- Ververe, la nomon de la dua duono...

- Perfekte. Kiam ni forlasis la Glanejon por la lasta fojo, mi konis ambaŭ duonojn de la murdinto kaj la nomon de unu el ĉi tiuj duonoj. Estas la nomo de la alia duono, kiun mi iris serĉi en Ameriko...

Ni tiumomente eniris en la atestan ĉambron. Ili ĉiuj venis al

Rultabio kun multaj entuziasmoj. La reportero estis tre kompleza, krom al Arturo Ranco, al kiu li montris fortan malvarmecon. Frederiko Larsano tiam eniranta en la ĉambron, Rultabio iris al li, donis al li iun el tiuj manpremoj kies li havis la doloran sekreton, kaj kies ni revenas kun la falangoj rompitaĵ. Por montri al li tiom da simpatio, Rultabio devas esti tre certa esti superanta lin. Larsano ridetis, certa pri si mem kaj siavice demandanta al li tion kion li iris fari en Ameriko. Tiam Rultabio, tre afabla, kaptis lin per la brako kaj rakontis al li dek anekdotojn pri sia vojaĝo. Ĉe iu momento ili malproksimiĝis, interparolante pri pli seriozaj aferoj, kaj pro diskreteco, mi forlasis ilin. Cetere, mi tre scieme volis reveni en la aŭdiencejon kie la pridemando de la atestantoj daŭris. Mi reiris sur mian lokon kaj povis tuj konstati ke la publiko taksis nur kiel relativan la gravecon de tio kio tiam okazis, kaj ke ĝi senpacience atendis la sesan kaj duono.

Tiu sesa kaj duono batis kaj Jozefo Rultabio estis denove enkondukita. Priskribi la emocion kun kiu la homamaso sekvis lin per la okuloj ĉe la juĝeja barilo, neeblas.

Oni ne plu spiris. S^{ro} Roberto Darzak stariĝis ĉe sia benko. Li estis "pala kiel mortinto".

La prezidanto diris kun graveco :

- Mi ne ĵurigas vin, sinjoro ! Vi ne estis regule asignita. Sed mi esperas ke ne bezonas klarigi al vi la tutan gravecon de la vortoj kiujn vi baldaŭ eldiros ĉi tie...

Kaj li aldonis minacante :

- La tutan gravecon de tiuj vortoj... por vi, se ne por la aliaj !...

Rultabio, tute ne emociita, rigardis lin. Li diris :

- Jes, s'njoro !

- Nu, eligis la prezidanto. Ni parolis antaŭ momento pri tiu peco de korteto kiu servis kiel rifuĝon por la murdinto, kaj vi promesis al ni diri al ni je la sesa kaj duono, kiel la murdinto fuĝis el tiu peco de korto kaj ankaŭ la nomon de la murdinto. Estas la sesa kaj duono, sinjoro Rultabio, kaj ni ankoraŭ scias nenion !

- Jen, s'njoro ! komencis mia amiko meze de tiel solena silento ke mi ne memoras esti "vidinta" similan, mi diris al vi ke tiu peco

de korto estis fermita kaj ke neebliis por la murdinto eskapi el tiu kvadrato sen tio ke tiuj kiuj serĉis lin, ekrimarku lin. Estas la ĝusta vero. Kiam ni estis tie, en la kvadrato de kortopeco, la murdinto ankoraŭ troviĝis tie kun ni !

- Kaj vi ne vidis lin !... Estas fakte tio kion la prokuroro asertas.

- Kaj ni ĉiuj vidis lin ! sinjoro prezidanto, ekkriis Rultabio.

- Kaj vi ne arestis lin !...

- Estis nur mi kiu sciis ke li estis la murdinto. Kaj mi bezonis ke la murdinton ne estu tuj arestita ! Kaj plie, tiumomente mi ne havis alian pruvon, nur "mia racio" ! Jes, sole, mia racio pruvis al mi ke la murdinto ĉeestis kaj ke ni vidis lin ! Mi prenis mian tempon por hodiaŭ alporti al la asiza tribunalo, nerefuteblan pruvon, kaj kiu, mi devontigas min , kontentigos ĉiujn.

- Sed parolu ! Parolu, sinjoro ! Diru al ni kiu estas la nomo de la murdinto, eligis la prezidanto...

- Vi trovos lin inter la nomoj de tiuj kiuj estis en la peco de korto, rebatis Rultabio kiu, li, ne ŝajnis urĝema...

Oni komencis malpacientiĝi en la ĉeestantaro...

- La nomon ! La nomon ! oni murmuris...

Rultabio, per tono kiu meritis vangofrapojn, diris :

- Mi lasas iomete daŭri ĉi tiun depozicion, la mian, s'njoro prezidanto, ĉar mi havas kialojn por tio !

- La nomon ! La nomon ! ripetis la homamaso.

- Silentu ! jelpis la asignisto.

La prezidanto diris :

- Necesas tuj diri al ni la nomon, sinjoro !... Tiuj kiuj troviĝis en la peco de korto estis : la gardisto, mortinta. Ĉu estas li la murdinto ?

- Ne, s'njoro.

- Ulĉjo Jakobo ?...

- Ne, s'njoro.

- La pordisto, Berniero ?

- Ne, s'njoro...

- S^{ro} Sinklero ?

- Ne, s'njoro...

- S^{ro} Arturo Vilhelmo Ranco, do ? Restas nur S^{ro} Arturo Ranco kaj vi ! Vi ne estas la murdinto, ĉu ne ?

- Ne, s'njoro !

- Do vi akuzas S^{ron} Arturoⁿ Rancoⁿ ?

- Ne, s'njoro!

- Mi ne plu komprenas !... Kien vi volas alpaŝi ?... Ne pli restas iu en la peco de korto.

- Jes ja, s'njoro !... Estis neniuj en la peco de korto nek malsupre, sed estis iu supre, iu kliniĝanta ĉe sia fenestro, super la peco de korto...

- Frederiko Larsano ! ekkriis la prezidanto.

- Frederiko Larsano ! respondis Rultabio per laŭta voĉo.

Kaj, turnante sin al la publiko, kiu jam aŭdigis protestojn, li ĵetis tiujn vortojn per forto kies mi ne kredis lin kapablan :

- Frederiko Larsano, la murdinto !

Klamado en kiu sin esprimis la miregon, la konsternegon, la indignon, la nekredemon, kaj ĉe kelkaj, la entuziasmon por la malgranda bonulo sufiĉe aŭdaca por maltimi tian akuzon, plenigis la ĉambron. La prezidanto eĉ ne provis kvietigi ĝin; kiam ĝi svenis per si mem pro la energiaj ŝŝ! de tiuj kiuj volis tuj pli scii pri ĝi, oni klare aŭdis Robertoⁿ Darzak^{on} kiu, lasante sin refali sur sian benkon, diris :

- Neeblas ! li estas freneza !... "

La prezidanto :

- Vi kuraĝas, sinjoro, akuzi Frederikoⁿ Larsanoⁿ ! Vidu la efikon de tia akuzo... S^{ro} Roberto Darzak mem nomas vin frenezulon !... Se vi ne estas tiu, vi devas havi pruvojn...

- Pruvojn, s'njoro ! Vi volas pruvojn ! Ah ! Mi tuj donos al vi unu, el pruvoj... eligis la akra voĉo de Rultabio... Ke oni venigu Frederikoⁿ Larsanoⁿ !...

La prezidanto : "Asignisto, voku Frederikoⁿ Larsanoⁿ."

La asignisto kuris al la pordeto, malfermis ĝin, malaperis... La pordeto restis malfermita... Ĉiuj okuloj estis sur tiu pordeto. La asignisto reaperis. Li antaŭeniris meze de la tribunalo kaj diris :

- Sinjoro prezidanto, Frederiko Larsano ne ĉeestas. Li foriris

ĉirkaŭ la kvara kaj oni ne plu revidis lin.

Rultabio triumfante kriegis : "Mia pruvo, jen ĝi !"

- Klarigu vin... Kiu pruvo ? demandis la prezidanto.

- Mia nerefutebla pruvo, eligis la juna reportero, ĉu vi ne vidas ke estas la fugxo de Larsano. Nu ! mi ĵuras al vi ke li ne revenos... Vi ne plu revidos Frederikoⁿ Larsanoⁿ...

Voĉbruoj funde de la ĉambro.

- Se vi ne fajfas pri justico, kial sinjoro, vi ne profitis de tio ke Larsano estis kun vi, ĉe ĉi tiu juĝeja barilo, por fronte akuzi lin ? Almenaŭ li povintus respondi al vi !...

- Kia respondo estus pli kompleta ol tiu, sinjoro prezidanto ?... Li ne respondas al mi ! Li neniam respondos al mi ! Mi akuzas Larsanoⁿ esti la murdinto kaj li forkuras ! Vi opinias ke tio ne estas respondo !...

- Ni ne volas kredi, ni tute ne kredas ke Larsano, kiel vi diras, "fuĝis"... Kiel li fuĝus ? Li ne sciis ke vi baldaŭ akuzos lin ?

- Jes, s'njoro, li sciis tion, ĉar mi mem sciigis tion al li, antaŭ momento...

- Vi faris tion !... Vi kredas ke Larsano estas la murdinto kaj vi donas al li la rimedojn por eskapi !...

- Jes, s'njoro prezidanto, mi tion faris, fiere rebatis Rultebio. Mi ja ne estas de la "justico", mi ne estas de la "polico", mi ja estas modesta ĵurnalisto, kaj mia metio ne estas arestigi la homojn ! Mi servas la veron kiel mi volas... estas mia afero... Antaŭŝirmu, vi mem, la socion, kiel vi povas, tio estas la via... Sed ne estas mi kiu alportos kapon al la ekzekutisto !... Se vi estas justa, sinjoro prezidanto - kaj vi tia estas - vi trovos ke mi pravas... Ĉu mi ne diris al vi antaŭ momento, "ke vi komprenos ke mi ne povis diri la nomon de la murdinto antaŭ la sesa kaj duono". Mi kalkulis ke tiu tempo estis necesa por averti Frederikoⁿ Larsanoⁿ, permesi al li veturi per la trajno de la 4^a kaj 17 al Parizo, kie li kapablus sin kaŝi en sekureco... Unu horo por alveni al Parizo, unu horo kaj kvarono por ke li povu malaperigi ĉiun spuron de sia trapaso... Tio kondukis nin al la sesa kaj duono... Vi ne retrovos Frederikoⁿ Larsanoⁿ, deklaris Rultabio fikse rigardante S^{ron}

Robertoⁿ Darzak^{on}... li estas tro ruza... Li estas viro kiu ĉiam eskapis vin... kaj kiun vi longe kaj vane persekutis... Se li estas malpli forta ol mi, aldonis Rultabio ridante plenkore kaj ridante tutsole, ĉar neniu jam volis ridi... li estas pli forta ol ĉiuj policoj de la mondo. Tiu viro, kiu ekde kvar jaroj, enŝoviĝis en la Sekureco kaj tie iĝis fama sub la nomo de Frederiko Larsano, estas alie famkonata sub alia nomo kiun vi bone konas. Frederiko Larsano, sinjoro prezidanto, estas Balmejero !

- Balmejero ! ekkriis la prezidanto.

- Balmejero ! eligis Roberto Darzak levante sin... Balmejero !...

Estis do vere !

- Ha ! Ha ! S'njoro Darzak, vi nun ne plu kredas ke mi estas freneza !...

Balmejero ! Balmejero ! Balmejero ! Oni nur audas ĉi tiun nomon en la ĉambro. La Prezidanto interrompis la aŭdiencon.

Vi pensas kiom ĉi tiu interrompo de aŭdienco estis tumulto. La publiko havis kion okupiĝi. Balmejero ! Oni trovis ja la knabon "mirigan" ! Balmejero ! Sed la rumoro de lia morto kuris, antaŭ, pri tio, kelkaj semajnoj. Balmejero do eskapis el la morton, kiel dum sia tuta vivo, li eskapis el la ĝendarmoj. Ĉu necesas ke mi rememorigas ĉi tie la heroaĵojn de Balmejero ? Dum dudek jaroj ili fariĝis objekto de la juĝa kroniko kaj la rubriko de la diversaĵoj; kaj se eblas ke kelkaj el miaj legantoj forgesis la aferon de la "Flava Ĉambro", tiu nomo de Balmejero certe ne eliris el ilia memoro. Balmejero estis la vera tipo de altmonda fripono; tute ne estis ĝentlemano pli ĝentlemano ol li; tute ne estis prestidigitisto pli lerta per siaj fingroj ol li; tute ne estis "apaĉo", kiel oni diras hodiaŭ, pli aŭdaca kaj pli terura ol li. Akceptita en la plej bona societo, registrita en la plej ekskluzivemaj kluboj, li ŝtelis la honoron de familioj kaj la monon de eminentuloj per majstreco kiu neniam estis superita.

En kelkaj malfacilaj okazoj, li ne hezitis ekbatali per ponardo aŭ per ŝafoston. Cetere, li neniam hezitis, kaj neniu entrepreno estis super siaj fortoj. Estanta iufoje falinta inter la manojn de la justico, li eskapis la matenon de sia proceso, ĵetante pipron al la

okuloj de la gardistoj kiuj kondukis lin al la asiza tribunalo. Oni sciigis pli poste ke, la tagon de lia fuĝo, dum la plej lertaj policaj serĉistoj de la Sekureco postkuris lin, li trankvile spektis tute ne ŝminkinta "premieron" de la Franca Teatro. Li poste forlasis Francion por labori en Ameriko, kaj la polico de la ŝtato de Ohio iam ekkaptis la esceptan banditon; sed la morgaŭon, li denove eskapis... Balmejero, necesus volumon por paroli ĉi tie pri Balmejero, kaj estas tiu viro kiu fariĝis Frederiko Larsano !... Kaj estas tiu knabeto de Rultabio kiu malkovris tion !... Kaj estas ankaŭ li, tiu bubeto, kiu scianta la pasintecon de iu Balmejero, permesis al li ankoraŭfoje moki la socion, havigante al li la rimedon eskapi ! Pri ĉi tiu lasta vidpunkto, mi nur povis admiri Rultabioⁿ, ĉar mi sciis ke lia intenco estis ĝisfine servi S^{ron} Robertoⁿ Darzak^{on} kaj F^{non} Stangerson liberigante ilin de la bandito sen ke li parolu.

Oni ne jam resereniĝis de tia rivelado, kaj mi jam aŭdis la plej hastemajn ekkrii : "Koncedante ke la murdinto estu Frederiko Larsano, tio ne klarigas al ni kiel li eliris el la Flava Ĉambro !..." kiam la aŭdienco rekomencis.

Rultabio estis tuj asignita al la juĝeja barilo kaj lia pridemandado, ĉar temis nun plivole pri pridemandado ol pri depozicio, rekomencis.

La prezidanto : "Vi diris al ni antaŭ momento, sinjoro, ke neebulis eskapi el la peco de korto. Mi konsentas, kun vi, mi bonvolas konsenti ke, ĉar Frederiko Larsano estis kliniĝinta ĉe sia fenestro super vi, li ankoraŭ estis en tiu peco de korto; sed por sin trovi ĉe sia fenestro, necesis al li forlasi tiun pec on de korto. Li do fuĝis ! Kaj kiel ?"

Rultabio : "Mi diris ke li ne kapablis eskapi 'normale' ... Li do fuĝis 'nenormale' ! Ĉar la peco de korto, mi ankaŭ diris tion, estis nur "preskaŭ" fermita dum la "Flava Ĉambro" estis tute tia. Oni povis grimpi la muron, neebli afero en la "Flava Ĉambro", sin ĵeti sur la terason kaj de tie, dum ni kliniĝis super la kadavro de la gardisto, eniri la teraso el la galerio tra la fenestro kiu rigardas ĝuste super. Larsano havis por fari nur unu paŝon por esti en sia ĉambro, malfermi sian fenestron kaj paroli al ni. Ĉi tio estis nur

infana ludo por akrobato kun la forto de Balmejero. Kaj, sinjoro prezidanto, jen la pruvo de tio kion mi asertas.

Tiam Rultabio eltiris el la poŝo de sia jako iun etan pakon kiun li malfermis, kaj el kiu li elprenis stifton.

Prenu, sinjoro prezidanto, jen stifto kiu perfekte adaptiĝas en truo kiun oni ankoraŭ trovas en la dekstra "konzolo" kiu subtenas la korbelaŭterason. Larsano, kiu antaŭkalkulis ĉion kaj kiu pensis pri ĉiuj rimedoj de fuĝo ĉirkaŭ sia ĉambro - necesa afero kiam oni ludas lian ludon - antaŭe enbatis ĉi tiun stifton en tiun "konzolon". Iu piedo sur la limŝtono kiu estas ĉe la angulo de la kastelo, alia piedo sur la stifto, iu mano ĉe la kornico de la pordo de la gardisto, la alia mano ĉe la teraso, kaj Frederiko Larsano malaperas en la aero... des pli bone ke li estas tre rapidmova kaj ke tiun vesperon, li tute ne endormiĝis pro narkotaĵo, kiel li volis kredigi tion al ni.

Ni vespermanĝis kun li, sinjoro prezidanto, kaj dum la deserto, li ludis al ni la ruzon de la sinjoro kiu falis pro dormemo, ĉar li bezonis esti, ankaŭ li, endormiĝinta, por ke la morgaŭon oni tute ne mirus ke mi, Jozefo Rultabio, mi estis viktimo de narkotaĵo vespermanĝante kun Larsano. Ĉar nun kiam ni suferis la saman sorton, la suspektoj tute ne atingis lin kaj perdiĝis aliloken. Ĉar mi, sinjoro prezidanto, mi estis vere endormigita, kaj de Larsano mem, jes ja !... Se mi ne estus en tiu malĝoja stato, neniam Larsano enirintus en la ĉambron de F^{ino} Stangerson tiun nokton, kaj la malbono ne okazus !...

Oni aŭdis ĝemadon. Estis S^{ro} Darzak kiu ne sukcesis reteni sian doloran plendon...

- Vi komprenas, aldonis Rultabio, ke tranoktante apud ĉe li, mi aparte ĝenis Larsanoⁿ dum tiu nokto, ĉar li sciis, aŭ almenaŭ li povis suspekti, "ke tiun nokton mi vigilis !" Kompreneble li ne povis dumsekunde kredi ke mi suspektis lin ! Sed mi povis malkovri lin ĉe la momento kiam li eliris el sia ĉambro por iri al tiu de F^{ino} Stangerson. Li atendis, tiun nokton, por eniri ĉe F^{ino} Stangerson, ke mi endormiĝu kaj ke mia amiko Sinklero estu okupanta en mia propra ĉambro revigligi min. Dek minutojn pli poste, F^{ino}

Stangerson kriegis helpoj !

- Kiel tiam vi fine suspektis Frederikoⁿ Larsanoⁿ ? demandis la prezidanto.

- "La taŭga fundo de mia racio" indikis lin al mi, sⁿoro prezidanto; tial mi havis okulon sur li; sed li estas terure lerta viro, kaj mi ne antaŭvidis la atakon de narkotaĵo. Jes, jes, la taŭga fundo de mia racio montris lin al mi ! Sed necesis al mi palpebla pruvo; kiel kiu dirus : "Vidi lin ĉe la fundo de miaj okuloj post vidi lin ĉe la fundo de mia racio" !

- Kion vi volas diri per "la taŭga fundo de via racio" ?

- He ! Sⁿoro prezidanto, la racio havas du fundojn : la taŭga kaj la netaŭga. Estas nur unu, sur kiu vi povus firme apogi vin : ĝi estas la bona ! Oni rekonas ĝin pro tio ke nenio povas ŝanceligi ĝin, tiun fundon, kion ajn vi farus ! Kion ajn vi dirus ! Ĉe la morgaŭo de la "neklarigebla galerio", kiam mi estis kiel la lasta el la lastaj el la mizeraj homoj kiuj tute ne kapablas utiligi sian racion ĉar ili ne scias de kie preni ĝin, kiam mi kliniĝis super la grundo kaj super la trompemaj okulvideblaj spuroj, mi subite restariĝis, apogante min sur la taŭga fundo de mia racio kaj mi supreniris en la galerion. Tie, mi ekkomprenis ke la murdinto kiun ni persekutis, povis ĉifoje, "nek normale nek nenormale" forlasi la galerion. Do per la taŭga fundo de mia racio, mi desegnis ringon en kiu mi entenis la problemon, kaj ĉirkaŭ la ringo, mi mense demetis tiujn flamajn literojn : "Ĉar la murdinto ne povas esti ekster ringo, li estas ene !" Kiu do mi vidas en ĉi tiu ringo ? La taŭga fundo de mia racio montras al mi, krom la murdinto kiu necese devas troviĝi ene : ulĉjo Jakobo, S^{ro} Stangerson, Frederiko Larsano kaj mi ! Tio devis do enkalkuli kun la murdinto kvin personojn. Nu, kiam mi serĉas en la ringo, aŭ se vi preferas, en la galerio, por "praktike" paroli, mi trovas nur kvar personojn. Kaj estas pruvita ke la kvina ne kapablis eskapi, ne kapablis eliri el la ringo ! Do mi havas en la ringo, iu persono kiu estas du, tio estas, li estas, krom sia persono, la persono de la murdinto !... Kial mi ne jam ekvidis tion ? Tute simple ĉar la fenomeno de la duobligo de la persono ne okazis antaŭ miaj okuloj. Kun kiu, el la kvar personoj enfermitaj en la

ringo, la murdinto sukcesis duobliĝi sen tio ke mi rimarku lin ? Certe ne kun la personoj kiuj ĉe iu momento, aperis al mi duigitaj de la murdinto. Tiel mi samtempe vidis en la galerio S^{ron} Stangerson kaj la murdinton, ulĉjon Jakoboⁿ kaj la murdinton, min kaj la murdinton. La murdinto povus do esti nek S^{ro} Stangerson, nek ulĉjo Jakobo, nek mi ! Kaj plie, se estus mi la murdinto, mi bone scius tion, ĉu ne, s'njoro prezidanto ?... Ĉu mi samtempe vidis Frederikoⁿ Larsanoⁿ kaj la murdinton ? Ne !... Ne ! Pasis du sekundoj dum kiuj mi perdis el la okulo la murdinton, ĉar tiu ĉi alvenis, kiel mi cetere notis tion en miaj paperoj, du sekundojn antaŭ S^{ro} Stangerson, ulĉjo Jakobo kaj mi, ĉe la vojkruciĝo de la du galerioj. Tio sufiĉis al Larsano por enĵetiĝi en la turnantan galerion, demeti lian falsan barbon kvazaŭ per turno de la mano, turni sin kaj albatigi al ni, kvazaŭ li persekutis la murdinton !... Balmejero faris multajn aliajn ! kaj vi bone komprenas ke tio estis nur ludo por li ŝminki sin tiel ke li aperu jen kun sia ruĝa barbo al F^{ino} Stangerson, jen al poŝtoficisto kun kaŝtankolora laŭmakzela barbo kiu li similigis kun S^{ro} Darzak, kies li ĵuris la pereon ! Jes, la taŭga fundo de mia racio alproksimigis min al tiuj du personoj, aŭ plivole tiuj du duonoj de persono kiun mi ne vidis samtempe : Frederiko Larsano kaj la nekonato kiun mi persekutis... por fari el li la misteran kaj timigan estulon kiun mi serĉis : "la murdinto". Ĉi tiu rivelado skuis min. Mi provis remastri min okupiĝante iom pri okulvideblaj spuroj, eksteraj signoj kiuj ĝis tiam devojigis min, kaj kiujn necesis normale "enirigis en la ringon desegnita de la taŭga fundo de mia racio !

Unue, kiuj estis la ĉefaj eksteraj signoj, tiun nokton, kiuj malproksimigi min de la ideo de Frederiko Larsano murdinto :

- 1) Mi vidis la nekonaton en la ĉambro de F^{ino} Stangerson, kaj kurante al la ĉambro de Frederiko Larsano, mi ene trovis Frederikoⁿ Larsanoⁿ, dormoplena.
- 2) La ŝtupetaro.
- 3) Mi lokis Frederikoⁿ Larsanoⁿ ĉe la fino de la turnanta galerio, dirante al mi ke mi tuj saltos en la ĉambron de F^{ino} Stangerson por provi kapti la murdinton. Nu, mi reiris al la ĉambro de F^{ino}

Stangerson kie mi retrovis mian nekonaton.

La unua ekstera signo malmulte embarasis min. Estas probable ke kiam mi malsupreniris de mia ŝtupetaro, post esti vidinta la nekonaton en la ĉambro de F^{ino} Stangerson, tiu ĉi jam finis tion kion li devis fari tie. Do dum mi eniris en la kastelon, li ja eniris en la ĉambron de Frederiko Larsano, senvestigis sin en palpebruma daŭro, kaj kiam mi venis frapi sur lian pordon, montris vizaĝon de Frederiko Larsano dormema laŭdezire...

La dua signo : la ŝtupetaro, ne pli embarasis min. Estis evidente ke, se la murdinto estis Larsano, li ne bezonis ŝtupetaron por eniri en la kastelon, ĉar Larsano dormis apud ĉe mi; sed tiu ŝtupetaro devis kredigi al la veno de la murdisto "de ekstere", necesa afero por la sistemo de Larsano ĉar tiun nokton, S^{ro} Darzak ne estis en la kastelo. Fine, tiu ŝtupetaro povis ĉiamaniere ebligi la fuĝon de Larsano.

Sed la tria ekstera signo tute konfuzis min. Lokante Larsanoⁿ ĉe la fino de la turnanta galerio, mi ne povis klarigi ke li profitis de la momento kiam mi iris trovi en la maldekstra alo de la kastelo S^{ron} Stangerson kaj ulĉjon Jakoboⁿ por reiri en la ĉambron de F^{ino} Stangerson ! Estis en tio tre danĝera faro ! Li riskis esti kaptita... kaj li sciis tion !... Kaj li preskaŭ estis kaptita... ne havinte la tempon reokupi sian postenon, kiel li certe esperis... necesis ke li havu, por reiri en la ĉambron, tre nepran kialon kiu subite aperis al li, post mia foriro, ĉar li ne, sen tio, pruntedonis sian revolveron ! Pri mi, kiam "mi sendis" ulĉjon Jakoboⁿ ĉe la fino de la rekta galerio, mi nature kredis ke Larsano ankoraŭ estis ĉe sia posteno en la fino de la turnanta galerio kaj ulĉjo Jakobo mem, al kiu cetere, mi tute ne donis detalojn, irante al lia posteno, ne rigardis, kiam li pasis la kruciĝo de la du galerioj, ĉu Larsano estis ĉe lia. Ulĉjo Jakobo pensis nur rapide plenumi miajn ordonojn. Kiu do estis tiu neatendita kialo kiu povis konduki Larsanoⁿ duafoje en la ĉambron ? Kiu ĝi estis ?... Mi pensis ke ĝi povis nur esti okulvidebla signo de lia paso kiu denunciis lin ! Li forgesis ion tre gravan en la ĉambro ! Kion ?... Ĉu li retrovis tiun aĵon ?... Mi rememoris la kandelon sur la planko kaj la viro kurbiĝinta... Mi

petegis S^{inon} Bernieroⁿ kiu aranĝis la ĉambron, serĉi... kaj ŝi trovis nazumon... Tiu nazumo, s'njoro prezidanto !

Kaj Rultabio elprenis el sia eta pako la nazumon kiun ni jam konas...

- Kiam mi vidis ĉi tiun nazumon, mi timegis... Mi neniam vidis nazumon ĉe Larsano... Se li ne surmetis tion, estas do ĉar li ne bezonis tion... Li do ankoraŭ malpli bezonis tion en momento kiam la libereco de liaj movoj estis afero tiel utila por li. Kion signifis tiu nazumo ? Ĝi ne eniris en mia ringo. Krom se ĝi estis tiu de presbiopulo, mi subite ekkriis !... Fakte, mi neniam vidis Larsanoⁿ skribi, mi neniam vidis lin legi. Li do "povus" esti presbiopulo ! Oni certe sciis en la Sekureco ke li estis presbiopulo, "se li estis tia...", verŝajne oni konis lian nazumon... La nazumo de "la presbiopulo Larsano" trovita en la ĉambro de F^{ino} Stangerson, post la mistero de la neklarigebla galerio, tio fariĝis terura por Larsano ! Tiel klariĝis la reiro de Larsano en la ĉambron !... Kaj fakte, Larsano-Balmejero vere estas presbiopa, kaj tiu nazumo, kiun oni "eble" rekonos ĉe la Sekureco, vere estas lia...

Vi vidas, sinjoro, kiu estas mia sistemo, daŭrigis Rultabio; mi ne petas de la eksteraj signoj sciigi al mi la veron; mi simple petas de ili ne iri kontraŭ la veron kiun indikis al mi la taŭga fundo de mia racio !...

Por esti tute certa pri la vero rilate al Larsano, ĉar Larsano murdinto estis escepto kiu meritis ke oni sin ŝirmis per kelkaj garantioj, mi malpravus volante vidi lian "vizaĝon". Mi pro tio estis tre punita ! Mi kredas ke estas la taŭga fundo de mia racio kiu venĝis sin pri tio ke, ekde la neklarigebla galerio, mi ne apogis min firme, definitive kaj plenkonfide sur ĝi... grandioze neglektante trovi aliajn pruvojn de la kulpeco de Larsano ol tiu de mia racio ! Tial F^{ino} Stangerson estis trafita...

Rultabio haltis... nazpuriĝis... intense emociita.

- Sed kion Larsano, demandis la prezidanto, venis fari en ĉi tiu ĉambro ? Kial li provis dufoje murdi F^{inon} Stangerson ?

- Ĉar li amegis ŝin, s'njoro prezidanto...

- Jen evidente kialo...

- Jes, s'njoro, nediskutebla kialo. Li estis freneze plena... kaj pro tio, sed ankaŭ multaj aliaj aferoj, kapabla de ĉiuj krimoj.

- Ĉu F^{ino} Stangerson sciis tion ?

- Jes, s'njoro, sed nature ŝi ne sciis ke la individuo kiu tiel turmentis ŝin, estis Frederiko Larsano... se ne Frederiko Larsano ne estus veninta loĝigi en la kastelo, kaj ne estus dum la nokto de la neklarigebla galerio, enirinta kun ni apud F^{ino} Stangerson, "post la afero". Mi cetere rimarkis ke li staris sin en la ombro kaj ke li konstante lasis la vizaĝon mallevita... liaj okuloj devis serĉi la perditan nazumon... F^{ino} Stangerson devis akcepti la strebadojn kaj la atakojn de Larsano sub nomo kaj sub maskovesto kiun ni ne sciis, sed kiun ŝi povis jam koni.

- Kaj vi, sinjoro Darzak ! demandis la prezidanton... vi eble ricevis pri tio la konfidencojn de F^{ino} Stangerson... Kiel okazas ke F^{ino} Stangerson parolis pri tio al neniu ?... Tio povintus meti la justicon sur la spurojn de la murdinto... Kaj se vi estas senkulpa, ŝparintus al vi la doloron esti akuzita!

- F^{ino} Stangerson nenion diris al mi, eligis S^{ro} Darzak.

- Ĉu tio kion diras la junulo, ŝajnas al vi ebla ? ankoraŭ demandis la prezidanto.

Nekonfuzeble, S^{ro} Roberto Darzak respondis :

- F^{ino} Stangerson nenion diris al mi...

- Kiel vi klarigas ke dum la nokto de la murdo de la gardisto, reparolis la prezidanto turnante sin al Rultabio, la murdinto redonis la ŝtelitajn paperojn al S^{ro} Stangerson ?... Kiel vi klarigas ke la murdinto enŝovis sin en la fermitan ĉambron de F^{ino} Stangerson ?

- Ho ! Pri la lasta demando, estas facile, mi kredas, respondi al ĝi. Viro kiel Larsano-Balmejero devis havigi al si aŭ facile farigi la ŝlosilojn kiuj estis necesaj al li... Koncerne la ŝtelon de dokumentoj, "mi kredas" ke Larsano unue ne pensis pri tio. Ĉie spionante F^{inon} Stangerson, tute decida malhelpi ŝian edziniĝon kun Roberto Darzak, li iam sekvas F^{inon} Stangerson kaj S^{ro} Robertoⁿ Darzak^{on} en la ĉiovendejoj de la Lupino, ekprenas la retikulon de F^{ino} Stangerson kiun tiu ĉi perdas aŭ lasas sin ŝtelece kapti. En tiu

retikulo, estis ŝlosilo kun kupra kapo. Li ne scias la gravecon de tiu ŝlosilo. Ĝi estas indikita al li per la noto kiun F^{ino} Stangerson aperigas en ĵurnaloj. Li skribas poŝtrestante al F^{ino} Stangerson, kiel la noto petas tion. Li sendube petas rendevuon sciigante ke tiu kiu havas la retikulon kaj la ŝlosilon, estas tiu kiu postkuras ŝin ekde kelka tempo, pro sia amo. Li ne ricevas respondon. Li iras konstati ĉe la poŝtofacejo 40 ke la letero ne plu estas tie. Li iras tien, jam preninte la irmanieron kaj laŭeble la veston de S^{ro} Darzak, ĉar decida je ĉio por havi F^{inon} Stangerson, li preparis ĉion por ke, kio ajn okazus, S^{ro} Darzak, amata de F^{ino} Stangerson, S^{ro} Darzak kiun li abomenas kaj kies li volas la pardonon, estus rigardata kiel la kulpulo.

Mi diras : kio ajn okazus, sed mi opinias ke Larsano ne jam pensis, ke li estus reduktata al murdo. Ĉiaokaze, liaj antaŭzorgoj estas prenitaj por damaĝi F^{inon} Stangerson sub la maskovesto de Darzak. Larsano cetere havas proksimume la staturon de Darzak kaj preskaŭ la saman piedon. Ne estus malfacile por li, se necesus, post esti desegninta la spuron de la piedo de S^{ro} Darzak, farigi al si laŭ tiu desegno ŝuojn kiujn li piedvestus. Tiuj estas infanaj artifikoj por Larsano-Balmejero.

Do neniun respondon al sia letero, neniun rendevuon, kaj li ankoraŭ havas la malgrandan nemalgravan ŝlosilon en sia poŝto. Nu, ĉar F^{ino} Stangerson ne venas al li, li iros al ŝi ! De longe lia plano estas farita. Li informiĝis pri la Glanejo kaj pri la pavilono. Iun Posttagmezo, kiam S^{ro} kaj F^{ino} Stangerson ĵus eliris por la promeno kaj kiam ulĉjo Jakobo mem estis foririnta, li enŝoviĝis en la pavilonon tra la vestibla fenestro. Li estas sola, nuntempe, li havas agoliberecon... li rigardas la meblojn... unu el ili, tre kurioza, kaj similanta kiraskeston, havas tre malgrandan seruron... Ha ha ! Tio interesas lin... Ĉar li havas kun si la malgrandan kupran ŝlosilon... li pripensas pri tio... kuniĝo de ideoj. Li provas la ŝlosilon en la seruro, la pordo malfermiĝas... Paperojn ! Necesas ke ĉi tiuj paperoj estu tre valoraj ĉar oni enfermis ilin en tiel aparta meblo... ĉar oni tiom vologas la ŝlosilon kiu malfermas ĉi tiun meblon... He ! He ! tio tamen povas servi... por ĉantaĝeto... tio

eble helpas lin por liaj amintencoj... Rapide li enpakas ĉi tiujn paperaĵojn kaj iras meti ĝin en la akvoĉambro de la vestiblo. Inter la aventuro de la pavilono kaj la nokton de la murdo de la gardisto, Larsano havis tempon por vidi tion kion tiuj paperaĵoj estis. Kion li farus kun tio ? Ili estis sufiĉe kompromitaj... Tiun nokton, li realportis ilin en la kastelo... Eble li esperis pro la revenon de tiuj paperaĵoj, kiuj reprezentis dudek jarojn da laboroj, ian ajn dankemon de F^{ino} Stangerson... Ĉio eblas, en cerbo kiel tiu !... Fine, kia ajn estu la kialo, li realportis la paperaĵojn kaj li vere forigis ilin !

Rultabio tusis kaj mi komprenis tion kion signifis tiu tuso. Li estis evidente embarasita, ĉe ĉi tiu punkto de siaj klarigoj, pro la volo kiun li havis tute ne doni la veran motivon de la timiga konduto de Larsano fronte al F^{ino} Stangerson. Lia rezonado estis tro nekompleta por kontentigi ĉiujn, kaj la prezidanto certe farintus al li la rimarkon, se ruza kiel simio, Rultabio ekkriis : "Nun ni alvenas al la klarigo de la mistero de la Flava Ĉambro !"

Estis en la ĉambro, la movadoj da seĝoj, malgravaj interpuŝiĝadoj, energiaj "ŜŜ !". La scivolemo atingis la supron.

- Sed, eligis la prezidanto, ŝajnas al mi, laŭ via hipotezo, sinjoro Rultabio, ke la mistero de la "Flava Ĉambro" estas tute klarigita. Kaj estis Frederiko Larsano kiu mem klarigis ĝin al ni kontentiĝante trompi pri la persono, metante S^{ron} Robertoⁿ Darzak^{on} en sia propra loko. Estas evidente ke la pordo de la "Flava Ĉambro" malfermiĝis kiam S^{ro} Stangerson estis sola, kaj ke la profesoro lasis pasi la viron kiu eliris el la ĉambro de sia filino, sen haltigi lin, eble eĉ laŭ la peto de sia filino, por eviti ajnan skandalon !...

- Ne, s' nĵoro prezidanto, impete protestis la junulo. Vi forgesas ke F^{ino} Stangerson, svenbatita, ne plu povis peti, ke ŝi ne plu povis refermi post si nek la riglilon, nek la seruron... Vi ankaŭ forgesas ke S^{ro} Stangerson ĵuris per la kapo de sia agonianta filino ke la pordo ne malfermiĝis !

- Estas tamen, sinjoro, la sola maniero klarigi la aferojn ! La flava ĉambro estis fermita kiel kiraskesto. Por mi uzi viajn

esprimojn, ne eblas al la murdinto eskapi de ĝi "normale aŭ nenormale". Kiam oni eniras en la ĉambron, oni ne trovas lin !
Necesas ja ke li eskapu !...

- Estas tute senutile, s'njoro prezidanto...

- Kiel tio ?

- Li ne bezonis eskapi se li ne estis tie !

Voĉbruoj en la ĉambro...

- Kiel, li ne estis tie ?

- Kompreneble ne ! Ĉar li ne povis esti tie, estas ke li ne estis tie ! Ĉiam necesas, s'njoro prezidanto, sin apogi sur la taŭga fundo de sia racio !

- Sed ĉiuj spuroj de lia trapaso ! protestis la prezidanto.

- Tio, s'njoro prezidanto, estas la netaŭga fundo de la racio !...

La taŭga fundo indikas al ni ĉi tion : ekde la momento kiam F^{ino} Stangerson enfermiĝis en sia ĉambro ĝis la momento kiam oni disrompis la pordon, ne eblas ke la murdinto eskapu el ĉi tiu ĉambro; kaj, ĉar oni ne trovas lin tie, estas ĉar de la momento de la fermado de la pordo ĝis la momento kiam oni frakasas ĝin, la murdinto ne estis en la ĉambro !

- Sed la spuroj ?

- He ! S'njoro prezidanto... tio ankoraŭfoje estas la okulvideblaj signoj... la okulvideblaj signoj per kiuj oni realigas tiom da juĝaj eraroj, ĉar ili dirigas al vi tion kion ili volas ! Tute ne necesas, mi ripetas al vi, uzi ĝin por rezoni ! Necesas unue rezoni ! Kaj poste vidi ĉu la okulvideblaj signoj povas eniri la ringon de via rezonado... Mi havas tre malgrandan ringon de nekontesta vero : la murdinto tute ne estis en la flava ĉambro ! Kial oni kredis ke li estas tie ? Pro la signoj de lia trapaso ! Sed li povas esti trapasinta antaŭe ! Kion mi diras : li "devas" esti trapasinta antaŭe. La racio diras al mi ke necesas ke li antaŭe trapasis tie ! Ni ekzamenu la signojn kaj tion kiun ni scias pri la afero, kaj ni vidu ĉu tiuj signoj kontraŭas tiu trapason antaŭ... antaŭ ol F^{ino} Stangerson enfermas sin en sia ĉambro, en la ĉeesto de sia patro kaj la ulĉjo Jakobo !

Post la publikigo de la artikolo en *La Mateno* kaj iu konversacio

kiun mi havis dum la veturo de Parizo al Epine-sur-Or[^]je kun la enketju[^]gisto, la pruvo ŝajnis al mi farita ke la "Flava Ĉambro" estis matematike fermita kaj ke sekve, la murdinto malaperis el ĝi antaŭ la noktomeza eniro de F^{ino} Stangerson en sian ĉambron. La eksteraj signoj estis tiam terure "kontraŭ mia racio". F^{ino} Stangerson ne murdis sin tutsole, kaj tiuj signoj atestis ke ne estis sinmortigo. La murdinto venis do antaŭ ! Sed kiel F^{ino} Stangerson estis murdita nur poste ? aŭ pli ĝuste, "ŝajnis" esti murdita nur poste ? Necesis nature al mi restarigi la aferon laŭ du fazoj, du fazoj tre distingaj unu de la alia per kelkaj horoj : la unua fazo dum kiu oni provis reale murdi F^{inon} Stangerson, provo kiun ŝi kaŝis; la dua fazo dum kiu, sekve de inkubsonĝo kiun ŝi havis, tiuj kiuj estis en la laboratorio, kredis ke oni murdis ŝin ! Mi tiam ne jam eniris en la "Flavan Ĉambron". Kiuj estis la vundoj de F^{ino} Stangerson ? Spuroj de strangolado kaj terura bato al la tempio... La spuroj de strangolado ne ĝenis min. Ili povis esti faritaj "antaŭe" kaj F^{ino} Stangerson vualis ilin sub krispo, boao, io ajn ! Ĉar ekkiam mi kreis, mi devis dividi la aferon en du fazoj, mi devigis min en la neceso diri ke F^{ino} Stangerson kaŝis ĉiujn okazaĵojn de la unua fazo; ŝi sendube havis sufiĉe potencajn kialojn por tio, ĉar ŝi nenion diris al sia patro kaj ke ŝi nature devis rakonti al la enketju[^]gisto la atencon de la murdinto pri kiu ŝi ne povis nei la trapason kvazaŭ tiu agreso okazis dum la nokto, dum la dua fazo ! Ŝi pri tio estis devigita, alie ŝia patro dirintus al ŝi : "Kion vi ja kaŝis al ni ? Kion signifas 'via silento post tia atenco' ? Ŝi do kaŝis la spurojn de la mano de la viro ĉe sia kolo. Sed estis la terura bato al la tempio ! Tion mi ne komprenis ! Ĉefe kiam mi eksciis ke oni trovis en la ĉambro ŝafoston, armilo de krimo... Ŝi ne povis kaŝi ke oni svenbatis ŝin, kaj tamen tiu vundo evidente aperis kiel estanta farita dum la unua fazo ĉar ĝi postulis la ĉeeston de la murdinto ! Mi imagis ke ĉi tiu vundo estis multe malpli severa ol oni diris tion - pri kio mi malpravis - kaj mi pensis ke F^{ino} Stangerson kovris la vundon ĉe la tempio sub hararanĝo kun harbendo !

Koncerne al la spuro, sur la muro, de la mano de la murdinto

vundita de la revolvero de F^{ino} Stangerson, ĉi tiu spuro evidente estis farita "antaŭe" kaj la murdinto nepre estis vundita dum la unua fazo, tio signifas dum li ĉeestis ! Ĉiuj spuroj de la trapaso de la murdinto estis nature forlasitaj dum la unua fazo : La ŝafosto, la nigraj paŝadoj, la bereto, la naztuko, la sango sur la muro, sur la pordo kaj sur la planko...

Tute evidente, se tiuj spuroj ankoraŭ estis tie, estas ĉar F^{ino} Stangerson, kiu deziris ke oni nenion sciuj kaj kiu agis por ke oni nenion sciuj pri ĉi tiu afero, ne ankoraŭ havis tempon por malaperigi ilin ! Tio kiu kondukis min serĉi la unuan fazon de la afero en tre proksima tempo de la dua. Se post la unua fazo, tio estas, post kiam la murdinto eskapis, post kiam ŝi haste mem revenis al la laboratorio kie ŝia patro trovis ŝin laboranta - se ŝi povus denove penetri dum momento en la ĉambron, ŝi almenaŭ forigus la ŝafoston, la bereton kaj la naztukon kiuj kuŝis surplanke. Sed ŝi ne provis tion, ŝia patro estinta ne forlasanta ŝin. Post do tiu ĉi unua fazo, ŝi eniris en sian ĉambron nur je noktomezo. Iu eniris tien je la deka : ulĉjo Jakobo, kiu faris sian taskon kiel ĉiuj noktoj, fermis la ŝutrojn kaj ŝaltis la noktolampeton. En ŝia perturbo ĉe la skribtablo de la laboratorio, kie ŝi ŝajnigis labori, F^{ino} Stangerson sendube forgesis ke la ulĉjo Jakobo baldaŭ eniros en ŝian ĉambron ! Tial ŝi havas reflekson : ŝi petas al ulĉjo Jakobo ne sin ĝeni ! Ne eniri en la ĉambron ! Tio ĉi estas literprecize en la artikolo de *La Mateno*. Ulĉjo Jakobo tamen eniras kaj rimarkas nenion, tiom la "Flava Ĉambro" estas malluma !... F^{ino} Stangerson tiam devis travivi du timigaj minutojn ! Tamen, mi pensas, ke ŝi ne sciis ke estis tiom da signoj de la trapaso de la murdinto en sia ĉambro ! Ŝi sendube, post la unua fazo, havis nur tempon por kaŝi la spurojn de fingroj de la viro ĉe sia kolo kaj por eliri el sia ĉambro !... Se ŝi sciis ke la osto, la bereto kaj la naztuko estis sur la planko, ŝi ankaŭ kolektintus ilin kiam ŝi revenis je noktomezo en sian ĉambron... Ŝi ne vidis ilin, ŝi senvestiĝis en la malforta lumeco de la noktolampeto... Ŝi enlitiĝis, elĉerpita de tiom da emocioj kaj de teruro, la teruro kiu revenigis ŝin en tiun ĉambron nur kiel eble plej malfrue...

Tial mi devis tiel alveni al la dua fazo de la dramo, kun F^{ino} Stangerson sola en la ĉambro, ekkiam oni ne trovis la murdinton en la ĉambro... Tial mi devis nature enirigi en la ringon de mia rezonado la okulvideblajn signojn.

Sed estis aliaj okulvideblaj signoj por klarigi. Pafoj de revolvero estis pafitaj dum la dua fazo. Krioj : "Helpon ! Murdanton !" estis aŭdigitaj !... Kion povis montri al mi en tia cirkonstanco, la taŭga fundo de mia racio ? Koncerne la kriojn, unue : ekkiam ne estas murdanto en la ĉambro, nepre estis inkubsonĝo en la ĉambro ! Oni aŭdis grandan bruon de renversitaj mebloj. Mi imagas... mi devas imagi ĉi tion : F^{ino} Stangerson endormiĝis, hantita de la abomeninda sceno de la posttagmezo... Ŝi sonĝas... la inkubsonĝo precizigas siajn ruĝajn bildojn... Ŝi revidas la murdonto kiu sin ĵetegas al ŝi, ŝi krias : "Murdanton ! Helpon !" kaj ŝia konfuza gesto iras serĉi la revolveron kiun ŝi metis antaŭ ol enlitiĝi sur sia noktotablo. Sed tiu mano albatigas al la noktotablo kun tia forto ke ŝi renversas ĝin. La revolvero ruliĝas sur la planko, pafo foriras kaj iras lokiĝi en la plafonon... Ĉi tiu kuglo en la plafono ŝajnis al mi, jam de la komenco, esti la kuglo de la akcidento... Ĝi vidigis la eblecon de la akcidento kaj konvenis tiel bone kun mia hipotezo de inkubsonĝo, ke ĝi estis unu el la kialoj pro kiuj mi komencis ne plu dubi ke la krimo okazis antaŭe, kaj ke F^{ino} Stangerson, dotita de karaktero el eksterordinara energio, kaŝis ĝin... Inkubsonĝo, revolverpafo... F^{ino} Stangerson en terura spiritostato, vekigis, ŝi provas ellitiĝi; ŝi rulfalas sur la plankon, sen forto, renversante la meblojn, eĉ grumblante... "Murdanto ! Helpon !" kaj senkonsciiĝas...

Tamen, oni parolis pri du revolverpafoj, dum nokto, en la dua fazo. Ankaŭ por mi, en mia tezo - jam ne plu estis hipotezo - necesis du pafoj; sed "unu" en ĉiu fazo kaj ne du en la lasta... unu pafo por vundi la murdanton, antaŭe, kaj unu pafo dum la inkubsonĝo, poste ! Nu ĉu li estis tre certa ke, dum nokto, du revolverpafoj estis pafitaj ? La revolvero aŭdigis sin meze de la bruego de la renversitaj mebloj. En iu pridemandado, S^{ro} Stangerson parolas pri obtuza pafo unue, pri eksploda pafo poste ! Se la obtuza pafo

estis produktita de la falo de la noktotablo el marmoro sur la planko ? Necesas ke ĉi tiu klarigo estu la bona. Mi estis certa ke ĝi estis la bona kiam mi eksciis ke la gepordistoj, Berniero kaj lia edzino, aŭdis nur unu revolverpafon, ili kiuj estis tute proksime de la pavilono. Ili deklaris tion al la enketjuĝisto.

Tiel mi preskaŭ restarigis la du fazojn de la dramo kiam mi eniris, por la unua fojo, en la "Flavan Ĉambron". Tamen, la graveco de la vundo ĉe la tempio ne eniris en la ringon de mia rezonado. Tiu vundo ne estis farita de la murdinto per la ŝafosto dum la unua fazo ĉar ĝi estis tro serioza, ĉar F^{ino} Stangerson ne povis kaŝi ĝin kaj ĉar ŝi ne kaŝis ĝin sub hararanĝo kun harbendo ! Do, ĉi tiu vundo estis "necese" farita dum la dua fazo, dum la momento de la inkubsonĝo ? Estas tio kion mi iris demandi al la "Flava Ĉambro" kaj la "Flava Ĉambro" respondis al mi !

Rultabio elprenis, denove el sia eta pako, pecon de blanka papero kvaroble faldita, kaj el tiu peco de blanka papero eliris nevidebla objekto kiun li tenis inter la dikfingro kaj la montrofingro, kaj kiun li portis al la prezidanto :

- Tiu ĉi, sinjoro prezidanto, estas haro, blonda haro makulita de sango, haro de F^{ino} Stangerson... Mi trovis ĝin gluita al iu el la marmoraj anguloj de la renversita noktotablo... Tiu marmora angulo estis mem makulita de sango. Ho ! bagatela ruĝa kvadrateto ! sed tre grava ! ĉar ĝi informis min, ĉi tiu kvadrateto de sango, ke ellitiĝante, terurita, F^{ino} Stangerson falis laŭ sia tuta alteco kaj tre brutale sur tiu marmora angulo kiu vundis ŝin ĉe la tempio, kaj kiu retenis ĉi tiun haron, ĉi tiun haron kiun F^{ino} Stangerson havis sur la fronto, kvankam ŝi ne surhavis la hararanĝon kun harbendo ! La kuracistoj deklaris ke F^{ino} Stangerson estis svenbatita de kontuzanta objekto kaj, ĉar la ŝafosto estis tie, la enketjuĝisto tuj akuzis la ŝafoston, sed la angulo de noktotablo el marmoro ankaŭ estas kontuzanta objekto, al kiu nek la kuracistoj nek la enketjuĝisto pensis, kaj kiun mi mem eble tute ne malkovris se la taŭga fundo de mia racio ne montris ĝin al mi, antaŭsentigis ĝin al mi.

La ĉeestantaro preskaŭ rekomencis ankoraŭfoje aplaŭdadi; sed

ĉar Rultabio senprokraste daŭrigis sian depozicion, la silento tuj reestiĝis.

- Restis al mi scii, krom la nomo de la murdinto kiun mi devis koni nur kelkajn tagojn pli poste, en kiu momento okazis la unua fazo de la dramo. La pridemandado de F^{ino} Stangerson, kvankam manipulita por trompi la enketjuĝiston, kaj tiu de S^{ro} Stangerson devis riveli ĝin al mi. Tiun tagon, F^{ino} Stangerson ĝuste donis sian horplanon. Ni kalkulis ke la murdonto eniris inter la kvina kaj la sesa en la pavilono; ni supozu ke estis la sesa kaj kvarono kiam la profesoro kaj lia filino denove relaboris. Estas do inter la kvina kaj la sesa kaj kvarono ke necesas serĉi. Kion mi diras, la kvina ! Sed la profesoro tiam estas kun sia filino... La dramo povis nur okazi for de la profesoro ! Necesas do al mi, en tiu mallonga spaco de tempo, serĉi la momento kiam la profesoro kaj lia filino estis apartiĝintaj !... Nu, tiun momenton, mi trovas ĝin en la pridemandado kiu okazis en la ĉambro F^{ino} Stangerson, en la ĉeesto de S^{ro} Stangerson. Estas notita ke la profesoro kaj lia filino reeniris ĉirkaŭ la sesa en la laboratorion. S^{ro} Stangerson diris : "Ĉe tiu momento, mi estis alpaŝita de mia gardisto kiu tenis min dum momento". Do etas konversacio kun la gardisto. La gardisto parolas kun S^{ro} Stangerson pri dishakado de arboj aŭ ŝtelĉasado; F^{ino} Stangerson ne plu ĉeestas; ŝi jam reiris al la laboratorio ĉar la profesoro ankoraŭ diris : "Mi forlasis la gardiston kaj mi rekuniĝis al mia filino kiu jam laboris !"

Estas do dum tiuj mallongaj minutoj ke la dramo okazis. Nepras ! Mi tre bone vidas F^{inon} Stangerson eniri en la pavilonon, penetri en sia ĉambro por demeti sian ĉapelon, kaj sin trovi fronte al la bandito kiu persekutas ŝin. La bandito estis tie, en la pavilono, de kelka tempo. Li devis esti aranĝinta sian aferon por ke ĉio okazu nokte. Li jam demetis la ŝuojn de ulĉjo Jakobo kiuj ĝenis lin en la kondiĉoj kiujn mi diris al la enketjuĝisto, li jam realigis la konfiskon de la paperoj, kiel mi diris al vi antaŭ nelonge, kaj poste glitiĝis sub la lito kiam ulĉjo Jakobo revenis purigi la vestiblon kaj la laboratorion... La tempo ŝajnis longa al li... Li restariĝis, post la foriro de ulĉjo Jakobo, denove vagis en la laboratorio, venis en la

vestiblon, rigardis al la ĝardeno, kaj vidis veni al la pavilono - ĉar en tiu momento la nokto kiu komencis, estis tre hela - F^{inon} Stangerson, tute sola ! Neniam li kuraĝus ataki ŝin dum tiu momento, se li ne kredis esti certa ke F^{ino} Stangerson estis sola ! Kaj, por tio ŝi aperus al li sola, necesis ke la konversacio inter S^{ro} Stangerson kaj la gardisto kiu retenis lin, okazus ĉe malproksima angulo de la pado, angulo kie troviĝus bosketo kiuj kaŝus ilin de la okuloj de la malŝatindulo. Tiam lia plano estas farita. Li estos pli trankvila, sola kun F^{ino} Stangerson en ĉi tiu pavilono, ol li estus meze de la nokto kun ulĉjo Jakobo dormanta en lia subtegmento. Kaj li verŝajne fermis la fenestron de la vestiblo ! Tio kio ankaŭ klarigas ke nek S^{ro} Stangerson nek la gardisto, cetere ankoraŭ sufiĉe malproksimaj de la pavilono, aŭdis la revolverpafon. Poste li reiris al la "Flava Ĉambro". F^{ino} Stangerson alvenas. Tio kio okazis estis verŝajne rapida kiel fulmo !... F^{ino} Stangerson verŝajne kriis... aŭ pli ĝuste volis krii sian timegon; la viro kaptis ŝin ĉe la gorĝo... Eble li estas sufokonta ŝin, strangolonta ŝin... Sed la palpanta mano de F^{ino} Stangerson kaptis, en la tirkesto de la noktotablo, la revolveron kiun ŝi ene kaŝis ekde kiam ŝi timas la minacojn de la viro. La murdonto jam svingas super la kapo de la kompatindulino, tiun armilon terura en la manoj de Larsano-Balmejero, iun ŝafoston. Sed ŝi pafas..., la pafado foriras, vundas la manon kiu forlasas la armilon. La ŝafosto falruliĝas al la plankon, sangokovrita de la vundo de la murdanto... la murdanto ŝanceliĝas, iras sin apogi sur la muro, surmetas sur ĝi siajn ruĝajn fingrojn, timas alian kuglon kaj forkuras... Ŝi vidas lin trairi la laboratorion... Ŝi aŭskultas... Kion li faras en la vestiblo ?... Li bezonas longan tempon por salti tra tiu fenestro... Finfine li saltas ! Ŝi kuras al la fenestro kaj refermas ĝin !... Kaj nun, ĉu ŝia patro vidis ? Aŭdis ? Nun, kiam la danĝero malaperis, ŝia tuta penso iras al ŝia patro... dotita de superhoma energio, ŝi kaŝos ĉion al li se estas ankoraŭ tempo !... Kaj kiam S^{ro} Stangerson revenos, li trovos la pordon de la "Flava Ĉambro" fermita, kaj lia filino, en la laboratorio, kliniĝanta super sia skribotablo, atenta, jam al la laboro !

Rultabio tiam turnas sin al S^{ro} Darzak :

- Vi scias la veron, li ekkriis, diru do al ni, ĉu la afero ne tiel okazis ?

- Mi scias nenion, respondis S^{ro} Darzak.

- Vi estas heroo ! eligis Rultabio, krucante al si la brakojn...

Sed se F^{ino} Stangerson estis, bedaŭrinde, en stato scii ke vi estas akuzita, ŝi levos vin per via vorto ... Ŝi kontraŭdirus vin, ŝi petegus vin diri ĉion kion ŝi konfidis al vi... kion mi diras, ŝi venus mem defendi vin !...

S^{ro} Darzak ne faris movon, ne diris vorton. Li malgaje rigardis al Rultabio.

- Fine, eligis tiu ĉi, ĉar F^{ino} Stangerson ne ĉeestas, necesas ja ke mi ĉeestu ! Sed, kredu min, S^{ro} Darzak, la plej bona rimedo, la sola, savi F^{inon} Stangerson kaj redoni al ŝi la racion, estas almenaŭ senkulpigi vin !

Tondrado da aplaŭdoj salutis ĉi tiun lastan frazon. La prezidanto eĉ ne provis bridi la entuziasmon de la ĉeestantaro. Roberto Darzak estis savita. Necesis nur rigardi la ĵurianojn por certigi sin ! Ilia konduto forte evidentigis sian konvinkon.

La prezidanto tiam ekkriis :

- Sed finfine, kio estas tiu ĉi mistero kiu faras ke F^{ino} Stangerson kiun oni provas murdi, kaŝas tian krimon al ŝia patro ?

- Tio, s'njoro, eligis Rultabio, mi ne scias !... Tio ne interesas min !...

La prezidanto faris novan klopodon ĉe S^{ro} Roberto Darzak.

- Vi ankoraŭ rifuzas diri al ni, sinjoro, kiu estis la uzo de via tempo dum "oni" atencis la vivon de F^{ino} Stangerson ?

- Mi ne povas diri ion al vi, sinjoro...

La prezidanto petegis per rigardo klarigon de Rultabio :

- Oni rajtas pensi, s'njoro prezidanto, ke la mankoj de S^{ro} Roberto Darzak estis strikte ligitaj al la sekreto de F^{ino} Stangerson... Tial, S^{ro} Darzak kredas sin devigata silenti ! Imagu ke Larsano, kiu dum liaj tri provoj, plenumis ĉion por fordirekti la suspektojn al S^{ro} Darzak, ĵus difinis tiujn tri fojojn rendevuojn al S^{ro} Darzak en kompromita loko, rendevuon kie devis esti traktita

pri la mistero... S^{ro} Darzak sin kondamnigos plivole ol konfesi ion ajn, ol klarigi ion ajn kiu tuŝas la misteron de F^{ino} Stangerson. Larsano estas sufiĉe ruza por ankoraŭ fari "tiun artifikon" !...

La prezidanto, konfuzita, sed scivolema, ankoraŭ rebatis :

- Sed kio ja povas esti tiu mistero ?

- Ha ! s'njoro, mi ne povus diri al vi ! eligis Rultabio, salutante la prezidanton; sed mi pensas ke nun vi sufiĉe scias por senkulpigi S^{ron} Robertoⁿ Darzak^{on} !... Krom se Larsano revenu ! sed mi ne kredas ! li eligis ridante per feliĉa ridego.

Ĉiuj ridas kun li.

- Ankoraŭ iu demando, sinjoro, eligis la prezidanto. Ni komprenas, ĉiam akceptante vian tezon, ke Larsano volis fordirekti la suspektojn al S^{ro} Roberto Darzak, sed kia intereso li havis ankaŭ fordirekti ilin al ulĉjo Jakobo ?...

- "La intereso de la policano !" s'njoro ! La intereso sin montri elturniĝema neniigante mem tiujn provojn kiujn li amasigis. Tio estas tre efika ! Estas artifiko kio ofte utilis lin por fordirekti la suspektojn kiuj povintus fiksiĝi sur si mem ! Li pruvis la senkulpecon de unu, antaŭ ol akuzi la alian. Konsideru, sinjoro prezidanto, ke iu afero kiel ĉi tiu devis esti longe "kovita" antaŭtempe de Larsano. Mi diras al vi ke li esploris ĉion kaj ke li konis la estulojn kaj ĉion. Se vi havas soifon scii kiel li sin dokumentis, vi ekscios ke li fariĝis dum momento la peranto inter "la laboratorio de la Sekureco" kaj S^{ro} Stangerson al kiu oni petis "eksperimentojn". Tiel li sukcesis, antaŭ la krimo, eniri dufoje en la pavilonon. Li estis ŝminkinta tiel ke ulĉjo Jakobo ekde tiam ne rekonis lin; sed li ja, Larsano, trovis la okazon ŝteleti de ulĉjo Jakobo malnovan paron da ŝuaĉoj kaj eluzitan bereton, kiujn la maljuna servisto de S^{ro} Stangerson ligis en nazituko por sendube porti ilin al iu el siaj amikoj, karbisto sur la vojo al Epine ! Kiam la krimo estis malkovrita, ulĉjo Jakobo, rekonante la objektojn en si sekrete, tute ne intencis tuj rekoni ilin ! Ili estis tro kompromitaj, kaj estas tio kiu klarigas al vi sian konfuzon, dum tiu momento, kiam ni parolis al li pri tio. Ĉio ĉi estas ege simpla, kaj mi alpremis Larsanon por konfesi tion al mi. Li cetere faris tion

plezure, ĉar se li estas bandito - tio kio ne plu estas, mi aŭdacas
esperi tion, dubo por iu ajn - li ankaŭ estas artisto !... Tio estas lia
maniero de agado, ĉe tiu viro, lia maniero de li... Li same agis dum
la afero de la "Universala Kredito" kaj de la "Orbrikoj de la
Monhotelo !" Kazoj kiujn necesos reekzameni, s'njoro prezidanto,
ĉar estas kelkaj senkulpuloj en la malliberejoj ekde kiam
Balmejero-Larsano apartenas al la Sekureco !

Grandan emociion, murmurojn, bravokriojn ! Moŝto Henriko-Roberto deponis pretendoresumon celantan ke la kazo estu prokrastita al alia kunsido pro enketa suplemento; la prokuroraro mem aliĝis al tio. La kazo estis prokrastita. La morgaŭon, S^{ro} Roberto Darzak estis relasita en provizora libereco, kaj ulĉjo Mateo ĝuis "tujan malkondamnon". Oni vane serĉis Frederikoⁿ Larsanoⁿ. La pruvo de senkulpeco estis farita. S^{ro} Darzak fine eskapis la teruran malfeliĉegon kiu dum momento minacis lin, kaj li povis esperi, post vizito al F^{ino} Stangerson, ke tiu ĉi iam retrovos, per multe da regulaj zorgoj, la racion.

Koncerne ĉi tiun knabon de Rultabio, li kompreneble estis "la homo de la tago" ! Ĉe la elirejo de la juĝejo de Versajlo, la homamaso triumfe surŝultrigis lin. La ĵurnaloj de la tuta mondo publikigis liajn grandfarojn kaj lian foton; kaj li kiu tiom intervjuis famkonatajn gravulojn, estis siavice fama kaj intervjuata ! Mi devas diri ke li ne montris sin pli fiera pro tio !

Ni kune revenis de Versajlo post esti tre gaje tagmanĝintaj ĉe la "Hundo kiu fumas". Sur la trajno, mi komencis meti al li multajn demandojn kiuj jam dum la manĝo sin premis sur miaj lipoj kaj kiujn mi tamen silentis ĉar mi sciis ke Rultabio ne ŝatis labori manĝante.

- Mia amiko, mi eligis, tiu afero de Larsano estas tute sublima kaj digna de via heroo cerbo.

Tiam li haltis min, instigante min paroli pli simple kaj asertante ke li neniam konsolus vidi ke tiel bela inteligenteco kiel mia estis preta fali en la malbelegan abismon de stulteco, kaj tio simple pro la admiro kiun mi havis por li...

- Mi aliras al la afero, mi diris, iom ŝokita. Ĉio kio ĵus okazis, tute ne sciigas al mi tion kion vi iris fari en Ameriko. Se mi bone komprenis vin : kiam vi lastfoje foriris el la Glanejo, vi estis solvinta ĉion pri Frederiko Larsano ?... Vi sciis ke Larsano estis la murdinto kaj vi sciis ĉion pri la maniero kiel li provis murdi ?

- Perfekte. Kaj vi, li eligis, ŝanĝante la temon de la konversacio, vi dubis pri nenio ?

- Pri nenio !

- Estas nekredeble.

- Sed mia amiko... vi bone zorgis kaŝi al mi vian penson kaj mi tute ne vidas kiel mi eniĝintus ĝin... Kiam mi alvenis al la Glanejo kun la revolveroj, "ĉe tiu preciza momento", vi jam suspektis Larsanon ?

- Jes ! Mi ĵus analizis la rezonon pri la "neklarigebla galerio", sed la reiro de Larsano en ĉambro de F^{ino} Stangerson ne jam estis klarigita al mi per la malkovro de la nazumo de presbiopulo... Nu, mia suspekto estis nur matematika, kaj la ideo de Larsano-murdinto ŝajnis al mi tiom eksterordinara, ke mi estis rezoluta atendi "okulvidebajn signojn" antaŭ ol kuraĝi pli longe insisti pri tio. Tamen, tiu ideo min turmentetis, kaj mi kelkfoje havis manieron paroli al vi pri la policano kiu devis atentigi vin. Unue mi tute ne plu elŝovis "lian bonan fidon" kaj mi ne plu diris al vi "ke li eraris". Mi parolis al vi pri lia sistemo, kiel pri mizera sistemo, kaj malestimo, kiun mi montris pri tio, kiu sin direktis en via menso al la policano, reale sin direktis, en la mia, malpli al la policano ol al la bandito kiun mi suspektis lin esti... Memoru... kiam mi listigis al vi ĉiujn pruvojn kiuj amasiĝis kontraŭ S^o Darzak, mi diris al vi : "Ĉio ĉi ŝajnas materiigi la hipotezon de la granda Freĉjo. Estas cetere ĉi tiu hipotezo kiun mi kredas falsa, kiu erarigos lin..." kaj mi aldonis per tono kiu devintus konsterni vin : "Nun, ĉu reale tiu hipotezo erarigas Frederiko" Larsano" ? Jen ! Jen ! Jen !..." Tiuj "Jen !" devintus pripensigi vin; estis ĉiuj miaj suspektoj en tiuj "Jen !" Kaj kio signifis : "ĉu reale ĝi erarigas ?", krom ke ĝi ja povis ne erarigi lin, sed ke ĝi estis destinita por erarigi nin mem ! Mi tiumomente rigardis vin kaj vi ne ektremis, vi ne komprenis... Mi ĝojis ĉar, ĝis la malkovro de la nazumo, mi povis konsideri la krimon de Larsano nur kiel absurdan hipotezon... Sed post la malkovro de la nazumo kiu klarigis al mi la reiron Larsano en la ĉambro de F^{ino} Stangerson... vidu mian ĝojon, mian ekzaltiĝon... Ho ! Mi tre bone memoras ! Mi kuris kiel frenezulo en mia ĉambro

kaj mi kriis al vi : "Mi superruzos la grandan Freĉjo" ! Mi lin superruzos laŭ sensacia maniero !" Ĉi tiuj vortoj tiam direktis sin al la bandito. Kaj dum la vespero mem, kiam ŝarĝita de S^{ro} Darzak prigardi la ĉambron de F^{ino} Stangerson, mi kontentiĝis ĝis la deka vespere, vespermanĝi kun Larsano sen fari neniun alian aranĝon, trankvila ĉar li ĉeestis vidalvide al mi ! Ankoraŭ en tiu momento, kara amiko, vi povintus suspekti ke estis nur tiu viro kiun mi timis... Kaj kiam mi diris al vi, ĉe la momento kiam ni parolis pri la baldaŭa alveno de la murdinto : "Ho ! Mi tute certas ke Frederiko Larsano ĉeestos ĉi tiun nokton !...

Sed ekzistas esencaĵo kiu povintus, kiu devintus tute kaj tuj nin lumigi pri la krimulo, io kiu denunciis al ni Frederiko" Larsano" kaj ke ni lasis elgliti, vi kaj mi !...

Ĉu vi forgesis la enigmon de la irbastono ?

Jes, ekster la rezonado kiu, al ĉiu "logika menso", denunciis Larsano", estis la "enigmo de la irbastono" kiu denunciis lin al ĉiu "observema menso".

Mi estis tre mirigita - sciu do tion - ke dum la enketo, Larsano ne uzis la irbastonon kontraŭ S^{ro} Darzak. Ĉu tiu bastono ne estis aĉetita en la krimvespero de viro kies la priskribo kongruis kun tiu de S^{ro} Darzak ? Nu, mi demandis antaŭ momento al Larsano mem, antaŭ ol li enbrajniĝis por malaperi, mi demandis al li kial li ne uzis la bastonon. Li respondis al mi ke li neniam intencis uzi ĝin; ke en lia penso, li neniam imagis ion kontraŭ S^{ro} Darzak per tiu bastono, kaj ke ni tre embarasis lin dum la vespero de la drinkejo de Epine, provante al li ke li mensogis al ni ! Vi scias ke li diris ke li ricevis ĉi tiun irbastonon en Londono; sed la marko atestis ke ĝi estas de Parizo ! Kial, en tiu momento, anstataŭ pensi : "Freĉjo mensogas; li estis en Londono; li ne povis ricevi tiun bastonon de Parizo, en Londono ?" Kial ni ne diris al ni : "Freĉjo mensogas. Li ne estis en Londono ĉar li aĉetis ĉi tiun irbastonon en Parizo !" Freĉjo mensogulo, Freĉjo en Parizo, en la momento de la krimo ! Tio estas startpunkto de suspekto ! Kaj kiam, post via esploro ĉe Skatoletto, vi informas nin ke tiu irbastono estis aĉetita de viro kiu estis vestita kiel S^{ro} Darzak, dum ni certas, laŭ la paroloj de S^{ro} Darzak

mem, ke ne estas li kiu aĉetis tiun irbastonon, kiam ni certas, dank'al la afero de la poŝtoŝicejo 40, ke estas en Parizo viro kiu mienas kiel Darzak^{on}, kiam ni demandas al ni kiu do estas tiu viro kiu, alivestita kiel Darzak^{on}, sin prezentas la vesperon de la krimo ĉe Skatoleto por aĉeti irbastonon kiun ni retrovas en la manoj de Freĉjo, kiel ? kiel ? kiel ni ne momente diris al ni :

"Sed... sed... sed... tiu nekonato alivestita kiel Darzak^{on} kiu aĉetas bastonon kiun Freĉjo havas inter la manoj... se li estis... se li estis... Freĉjo mem ?..." Certe ja, lia kvalifiko de la agente de Sekureco tute ne estis favora al tia hipotezo; sed kiam ni konstatis la obstinon per kiu Freĉjo amasigis la pruvojn kontraŭ Darzak, la furiozon per kiu li persekutis la kompatindulon... ni povintus esti mirigita de mensogo de Freĉjo tiel grava kiel tiu kiu posedigis lin en Parizo, irbastonon kiun li ne povis havi en Londono. Eĉ se li trovis ĝin en Parizo, la mensogo de Londono ne malpli ekzistis. Ĉiuj kredis lin en Londono, eĉ liaj estroj, kaj li aĉetis irbastonon en Parizo ! Nun, kiel okazas ke, ne unu sekundon, li uzis ĝin kiel bastonon trovita proksimume de S^{ro} Darzak ! Estas tre simple ! Estas tiom simple ke ni ne pensis pri tio... Larsano aĉetis ĝin, post esti iomete vundita al la mano de la kuglo de F^{ino} Stangerson, nur por havi sintenon, por ĉiam havi la manon fermita, por tute ne esti tentita malfermi la manon kaj montri sian internan vundon ? Ĉu vi komprenas ?... Jen tio kion li diris al mi, Larsano, kaj mi memoras esti ripetanta ofte al vi kiel mi trovis stranga "ke lia mano ne forlasis la bastonon".

Ĉe la tablo, kiam mi vespermanĝs kun li, li apenaŭ forlasis ĉi tiun bastonon, li kaptis tranĉilon kiun lia dekstra mano ne plu forlasis. Ĉiuj ĉi detaloj rememorigis al mi kiam mia ideo fiksiĝis sur Larsano, tio estas tro malfrue por ili estu al mi ia ajn helpo. Tiel ke, la vesperon kiam Larsano simulis antaŭ ni ekdormon, mi kliniĝis super li kaj, tre lerte, mi povis vidi, sen tio ke li divenu tion, en lian manon. Restis nur ne pli ol gaza bendo el tafto kiu kaŝis tion kio restis de malgravan vundon. Mi konstatis ke li povintus aserti ĉe tiu momento, ke tiu vundo okazis al li pro tute alia afero ol kuglo de revolvero. Tamen, laŭ mi, en tiu momeno, tio estis nova ekstera

signo kiu eniris en la ringon de mia rezonado. La kuglo, diris al mi Larsano antaŭ momento, nur flugtuŝis al li la polmon kaj kaŭzis sufiĉe abundan hemoragion.

Se ni estus pli sagacaj, ĉe momento de la mensogo de Larsano, kaj pli... danĝeraj... estus certe ke tiu ĉi ellasintus, por fordirekti la suspektojn, la rakonton kiun ni imagis por li, la rakonton de la eltrovo de la irbastonon proksime de Darzak; sed la eventoj tiom rapidegis ke ni ne plu pensis pri la bastono ! Tamen, ni multe ĝenis lin, Larsanoⁿ-Balmejeroⁿ, sen tio ke ni suspektis tion !

- Sed, mi interrompis, se li ne havis intencon, aĉetante la irbastonon, kontraŭ Darzak, kial tiam li havis la eksteraĵon de Darzak ? La mastikkoloran surtuton ? La bulĉapelon ? Ktp

- Ĉar li venis de la krimo, kaj ĉar tuj kiam la krimo estis farita, li revestiĝis per la maskovesto de Darzak kiu ĉiam akompanis lin en lia krima faro kun la intenco kiun vi scias !

Sed jam, vi bone pensas, lia vundita mano ĝenis lin kaj li ekhavis, pasante avenuon de la Operejo, la ideon aĉeti irbastonon, ideon kiun li tuj plenumis !... Estis la oka ! Iu viro, kun la aspekto de Darzak, kiu aĉetas irbastonon kiun mi trovas en la manoj de Larsano !... Kaj mi, kiu divenis ke la dramo jam okazis dum tiu horo, ke ĝi ĵus okazis, kiu estis preskaŭ konvinkita pri la senkulpeco de Darzak, mi ne suspektas Larsanon !... Estas momentoj...

- Estas momentoj, mi eligis, dum kiu la plej vastaj inteligentecoj...

Rultabio fermis al mi la buŝon. Kaj ĉar mi ankoraŭ pridemandis lin, mi ekrimarkis ke li ne plu aŭskultis min... Rultabio dormis. Mi renkontis multajn malfacilaĵojn por ŝiri lin el sia dormo kiam ni alvenis en Parizo.

29 - La mistero de F^{ino} Stangerson.

La sekvajn tagojn, mi havis la okazon ankoraŭ demandi al li tion kion li iris fari en Ameriko. Li apenaŭ respondis al mi pli precize ol li faris sur la trajno al Versajlo, kaj li ŝanĝis la temon de la konversacio al aliaj punktoj de la kazo.

Li fine, iam, diris al mi :

- Sed komprenu ke mi bezonis koni la veran personecon de Larsano !

- Sendube, mi eligis, sed kial vi iris serĉi ĝin en Ameriko ?...

Li fumis sian pipon kaj turnis al mi sian dorson. Kompreneble, mi tuŝis al la "mistero de F^{ino} Stangerson". Rultabio opiniis ke ĉi tiu mistero, kiu ligis tiel terure Larsanoⁿ al F^{ino} Stangerson, mistero pri kiu li ja, Rultabio, trovis neniun klarigon en la vivo de F^{ino} Stangerson "en Francio", li opiniis, mi diris, ke ĉi tiu mistero "devis havi sian originon en la vivo de F^{ino} Stangerson, en Ameriko". Kaj li enŝipiĝis ! Tie li eksciis kiu estis Larsano, li akiris la necesajn materialojn por fermi al li la buŝon... Kaj li foriris al Filadelfio !

Kaj nun, kiu estis tiu mistero kiu "ordonis silenton" al F^{ino} Stangerson kaj al S^{ro} Roberto Darzak ? Post tiom da jaroj, post kelkaj publikigaĵoj de la skandala gazetaro, nun kiam S^{ro} Stangerson scias ĉion kaj pardonis ĉion, noi povas diri ĉion. Estas cetere tre mallonge, kaj tio reĝustigos la aferojn, ĉar troviĝis malĝojaj spiritoj por akuzi F^{inon} Stangerson kiu en ĉi tiu tuta sinistra afero, ĉiam estis viktimo "ekde la komenco".

La komenco datiĝis de malproksima momento kiam, knabino, ŝi loĝis kun sia patro en Filadelfio. Tie ŝi konatiĝis, en vesperfestoj ĉe iu amiko de sia patro, kun iu samlandano, iu franco kiu sukcesis logi ŝin per liaj manieroj, lia spirito, lia dolĉeco kaj lia amo. Oni diris lin riĉa. Li petis la manon de F^{ino} Stangerson al la fama profesoro. Tiu ĉi petis informojn pri S^{ro} Johano Ruselo, kaj jam de la komenco, li vidis ke li traktis kun aferistaĉo. Nu, S^{ro} Johano Ruselo, vi konjektis tion, ne estis alia ol unu el la multaj aliigoj de

la fama Balmejero, persekutita en Francio, rifuĝinta en Ameriko. Sed S^{ro} Stangerson nenion sciis; lia filino ankaŭ ne. Tiu ĉi devis sciis tion nur en la sekvaj cirkonstancoj : S^{ro} Stangerson ne nur rifuzis la manon de sia filino al S^{ro} Ruselo, sed plie li malpermesis al li la aliron de sia loĝejo. La juna Matilda, kies la koro malfermiĝis al la amo, kaj kiu vidis nenion en la mondo pli bela aŭ pli bona ol sia Johano, indignis pro tio. Ŝi tute ne kaŝis sian malkontentecon al sia patro kiu sendis ŝin trankviliĝi ĉe la randoj de **Ohiorivero**, ĉe maljuna onklino kiu loĝis en **Cincinatio**. Johano proksimiĝis al Matilda tien kaj, malgraŭ la granda respekto kiun ŝi havis por sia patro, F^{ino} Stangerson decidis trompi la viglecatenton de la maljuna onklino, kaj fuĝi kun Johano Ruselo, tre decidintaj ke ili ambaŭ estis por profiti de la rimedoj de la usonaj leĝoj por geedziĝi kiel eble plej frue. Tiel estis farita. Ili do fuĝis, ne for, ĝis **Luivilo**. Tie, iun matenon, oni venis frapis sur ilia pordo. Estis la polico kiu volis aresti S^{ron} Johanoⁿ Ruseloⁿ, tio kiun ĝi faris, malgraŭ liaj protestoj kaj la krioj de la filino de la profesoro Stangerson. Samtempe, la polico sciigis al Matilda ke "ŝia edzo" ne estis alia ol la tro fama Balmejero !...

Senespera, post vana provo de memmortigo, Matilda rekuniĝis kun sian onklinon en Cincinatio.

Tiu ĉi preskaŭ mortis pro ĝojo revidi ŝin. Ŝi ne ĉesis ekde ok tagoj, serĉigi Matildaⁿ ĉien, kaj ankoraŭ ne kuraĝis averti la patron. Matilda ĵurigis sian onklinon ke S^{ro} Stangerson neniam sciis ion ! Estis fakte tiel ke deziris tion la onklino kiu sentis sin kulpa pri malseriozeco en ĉi tiu grava cirkonstanco. F^{ino} Matilda Stangerson, unu monaton pli poste, revenis apud sia patro, pentanta , kun la koro morta por la amo, kaj petante nur unu aferon : neniam plu aŭdi paroli pri sia edzo, la terura Balmejero - sukcesi pardoni al si mem sia kulpo, kaj restariĝi antaŭ sia propra konscienco per iu vivo de senlima laboro kaj de sindonemo al sia patro !

Ŝi plenumis sian promeson. Tamen, en la momento kiam, post esti ĉion konfesinta al S^{ro} Roberto Darzak, dum ŝi kredis Balmejeron mortintan, ĉar la rumoro de lia morto diskoniĝis, ŝi

donis al si la superan ĝojon, post esti tiom pentofarinta, sin ligi kun fidinda amiko, la sorto resurektis al ŝi Johanoⁿ Ruseloⁿ, la Balmejeroⁿ de sia junaĝo ! Ĉi tiu informis ŝin ke li neniam ebligus ŝian edziniĝon kun S^{ro} Roberto Darzak kaj ke "li ankoraŭ amis ŝin !" tio kio, bedaŭrinde, estis vera.

F^{ino} Stangerson ne hezitis sin konfidi al S^{ro} Roberto Darzak; ŝi montris al li tiun leteron kie Johano Ruselo / Frederiko Larsano / Balmejero memorigis al ŝi pri la unuaj horoj de ilia kuniĝo en tiu malgranda kaj ĉarma prepostejo kiun ili luprenis en Luivilo : "...La prepostejo nenion perdis pri sia ĉarmo, nek la ĝardeno pri sia brilo". La malŝatindulo asertis sin riĉa kaj havis pretendon "revenigi ŝin" tien. F^{ino} Stangerson konfesis al S^{ro} Darzak ke se ŝia patro sukcesus suspekti tian malhonoron, "ŝi mortigus sin"! S^{ro} Darzak ĵuris al si ke li silentigus tiun amerikanon, aŭ per teruro, aŭ per forto, eĉ se li devos krimi !

Sed S^{ro} Darzak ne havis sufiĉan forton, kaj li venkiĝintus sen tiu bravuleto de Rultabio.

Koncerne F^{inon} Stangerson, kion vi volis ke ŝi faru antaŭ la monstro ? Unuafoje, kiam post antaŭaj minacoj kiuj atentigis ŝin, li staris sin antaŭ ŝi, en la "Flava Ĉambro", ŝi provis mortigi lin. Malbonŝance ŝi ne sukcesis. Ekde tiam, ŝi estis la certa viktimo de tiu nevidebla estulo "kiu kapablis ĉantaĝi ŝin ĝis la morto", kiu loĝis ĉe ŝi, ĉe ŝia flanko, sen tio ke ŝi sciu tion, kiu postulis rendevuojn "en la nomo de ilia amo". La unuan fojon, ŝi "rifuzis" al li tiun rendevuon, "postulita en la letero de la oficejo 40"; el tio rezultis la dramo de la "Flava Ĉambro". La duan fojon, informita de nova letero de li, letero alvenita de la poŝto, kaj kiu normale venis trovi ŝin en ŝia ĉambro de konvaleskantino, "ŝi fuĝis la rendevuon", enfermante sin en sia buduaro kun ŝiaj virinoj. En tiu letero, la malŝatindulo antaŭsciigis ŝin ke ĉar ŝi ne kapablis moviĝi, "pro ŝia stato", li irus ĉe ŝi, kaj estus en ŝia ĉambro tiun nokton, je tiu horo... ke ŝi devis estigi ĉiun dispozicion por eviti la skandalon... Matilda Stangerson, sciante ke ŝi devis ĉion timi de la aŭdaco de Balmejero, "forlasis al li ŝian ĉambron"... Ĉi tio estis la epizodo de la "neklarigebla galerio". La trian fojon, ŝi "preparis la

rendevuon". Estas ke antaŭ forlasi la malplenan ĉambron de F^{ino} Stangerson, en la nokto de la "neklarigebla galerio", Larsano skribis al ŝi, kiel ni devas memori tion, lastan leteron, en ŝia ĉambro mem kaj lasis ĝin sur la skribotablo de sia viktimo; ĉi tiu letero postulis "efektivan" rendevuon, pri kiu li poste difinis la daton kaj la horon, "promesante al ŝi realporti la paperojn de ŝia patro, kaj minacante ŝi bruligi ilin se ŝi denove forŝoviĝis".

Ŝi tute ne dubis ke la malŝatindulo posedis ĉi tiujn altvalorajn paperojn; li probable sendube nur ripetis sensacian ŝteleton, ĉar ŝi delonge suspektis lin, esti antaŭe "kun sia pretervola komplaceco", mem ŝtelinta la famajn paperojn de Filadelfio en la tirkestoj de sia patro !... Kaj ŝi sufiĉe konis lin por imagi ke se ŝi tute ne cedus al lia volo, tiom da laboroj, tiom da penadoj, kaj tiom da sciencaj esperoj baldaŭ estus nur cindroj ! Ŝi decidis ankoraŭfoje revidi lin, vidalvide, ĉi tiun viron kiu estis ŝia edzo... kaj provi cedi lin... ĉar ŝi ne povis eviti lin !... Oni divenas tion kio okazis tiam... La petegoj de Matilda, la sovaĝeco de Larsano... Li postulas ke ŝi forrifuzas Darzak^{on}... Ŝi eldiras sian amon... Kaj li batas ŝin... "kun la firma penso suririgi la alian sur la eŝafodo !" ĉar li ja estas lerta, kaj la masko Larsano kiun li baldaŭ remetos sur la vizaĝon, savos lin... li pensas ... dum la alia... la alia ankoraŭ ĉiufoje ne povos doni sian horplanon... Ĉiflanke, la antaŭzorgadoj de Balmejero estas bone plenumitaj... kaj la inspiro pri tio estis el la plej simplaj, tiel kiel divenis tion la juna Rultabio...

Larsano ĉantaĝas Darzak^{on} kiel li ĉantaĝas Matilda"... per la samaj armiloj, per la sama mistero... En leteroj, insistaj kiel ordonoj, li asertas sin preta por trakti, por liveri la tutan aman poŝtaĵon de antaŭe kaj ĉefe "por malaperi..." se oni volas doni la monon... Darzak devas iri al rendevuoj kiujn li difinis al li, sub minaco de malsekretigo ekde la morgaŭo, tiel kiel Matilda devas akcepti la rendevuojn kiujn li altrudas al ŝi... Kaj en la sama horo kiam Balmejero agas kiel murdanto kun Matilda, Roberto surkajiĝis al Epine kie komplico de Larsano, stranga estulo, "estaĵo de alia mondo", kiun ni iam retrovos, kontraŭvole retenas lin kaj "perdigas al li lian tempon, atendente ke tiu koincido, kies la

akuzoto de morgaŭ ne kapablos decidiĝi doni la kialon, faru perdi al li la kapon..."

Sed Balmejero kalkulis sen nia Jozefo Rultabio !

Ne estas en ĉi tiu horo, ke jen estas klarigita la "misteron de la Flava Ĉambro", ke ni sekvos paŝon post paŝo Rultabioⁿ en Ameriko. Ni konas la junan reporteron, ni scias kiajn potencajn rimedojn de informo, lokitajn en la du ŝvelaĵoj de lia frunto, li disponis "por restarigi la tutan aventuron de F^{ino} Stangerson kaj Johano Ruselo". En Filadelfio, li estis tuj informita pri tio kio koncernas Arturoⁿ-Vilhelmoⁿ Rancoⁿ; li eksciis pri lia ago de sindonemo, sed ankaŭ la prezon kiun li gardis pretendon pagigi tio al si. La klaĉo de lia edziĝo al F^{ino} Stangerson antaŭe diskoniĝis en la salonoj de Filadelfio... La malmulto da diskreteco de la juna scienculo, la neelĉerpebla strebado kies li ne ĉesis tedi F^{ino} Stangerson, eĉ en Eŭropo, la senbrida vivo kiun li decidis je preteksto de "fordrinki siajn ĉagrenojn", ĉio tute ne estis farita por simpatiigi Arturoⁿ Rancoⁿ al Rultabio, kaj tiel klariĝas la malvarmeco per kiu li akceptis lin en la ĉambro de la atestantoj. Cetere li tuj decidis ke la kazo Ranco tute ne eniris en la kazo Larsano-Stangerson. Kaj li malkovris la timindan flirtan de Ruselo-F^{ino} Stangerson. Kiu estis ĉi tiu Johano Ruselo ? Li iris en Filadelfio al Cincinatio, refarante la vojaĝon de Matilda. En Cincinatio, li trovis la maljunan onklino kaj sukcesis paroligi ŝin : la rakonto de la aresto de Balmejero estis por li lumeto kiu klarigis ĉion.

Li sukcesis viziti, en Luivilo, la "prepostejon" - modesta kaj beleta loĝejo en la malnova kolonia stilo - kiu fakte "nenion perdis pri sia ĉarmo". Poste, forlasante la spuraron de F^{ino} Stangerson, li laŭiris la spuraron de Balmejero, de malliberejo al malliberejo, de punlaborejo al punlaborejo, de krimo al krimo; fine, kiam li reenŝipiĝis por Eŭropo sur la kajoj de Novjorko, Rultabio sciis ke, sur ĉi tiuj samaj kajoj, Balmejero enŝipiĝis antaŭ kvin jaroj, havante en poŝo la legitimilojn de iu Larsano, honorinda komercisto de Nov-Orleano, kiun li ĵus murdis...

Kaj nun, ĉu vi konas la tutan misteron de F^{ino} Stangerson ? Ne, ne ankoraŭ. F^{ino} Stangerson havis de sia edzo Johano Ruselo,

infanon, knabon. Ĉi tiu infano naskiĝis ĉe la maljuna onklino kiu tiel bone elturniĝis ke neniam iu sciis ion pri tio en Usono. Kio fariĝis ĉi tiu knabo ? Tio estas alia rakonto kiun mi iam detalos al vi.

*

Ĉirkaŭ du monatoj post ĉi tiuj eventoj, mi renkontis Rultabioⁿ melankolie sidintan sur benko de la juĝejo.

- Nu ! mi diris al li, pri kio vi pensas, kara amiko mia ? Vi ŝajnas tre malĝoja. Kiel fartas viaj amikoj ?

- Krom vi, li diris al mi, ĉu mi vere havas amikojn ?

- Sed mi esperas ke S^{ro} Darzak...

- Sendube...

- Kaj ke F^{ino} Stangerson... Kiel ŝi fartas, F^{ino} Stangerson ?

- Multe pli bone... pli bone... multe pli bone...

- Do necesas ne esti malĝoja...

- Mi estas malĝoja, li eligis, ĉar mi pensas pri la parfumo de la Sinjorino en Nigro...

- La parfumo de la Sinjorino en Nigro ! Mi ĉiam aŭdas vin paroli pri ŝi ! Ĉu vi finfine klarigos al mi, kial tio tiel asidue turmentas vin ?

- Eble iam... iam, eble..., eligis Rultabio.

Kaj li longe suspiris.

Vaksalumeto : Sorte d'allumette qui était fabriquée à partir d'une mèche enduite de cire.

Ŝultrumi : Levi la ŝultrojn.

En la supra ĉambro de konstruaĵo estas tri homoj kaptitaj: Anjo kaj siaj du infanoj, Jenja kaj Jano. Fripono kaptis ilin esperante por mono. La ĉambro havas grandan fenestron, kaj tuj ekstere estas pulio kun ŝnuro sur ĝi kaj korbo je ambaŭ flankoj. La korbo tuj ekster la fenestro estas malplena, kaj tiu sur la tero sube havas ene ŝtonon, kiu estas 30 kg peza. La pezoj de la tri homoj estas: Anjo, 78 kg; Jenja 42 kg, kaj Jano 36 kg. Por sekure uzi la pulion, kiam homo estas en korbo, necesas ke la diferenco inter unu flanko kaj la alia ne estu pli ol 6 kg. Mi povas diri al vi ke, feliĉe, la fripono malsukcesis, kaj la tri eskapis. Sed kiel?

[https://fr.wikisource.org/wiki/Frankenstein,_ou_le_Prom%C3%A9th%C3%A9e_moderne_\(trad._Germain_d%E2%80%99Hangest\)](https://fr.wikisource.org/wiki/Frankenstein,_ou_le_Prom%C3%A9th%C3%A9e_moderne_(trad._Germain_d%E2%80%99Hangest))

[https://fr.wikisource.org/wiki/Histoires_ou_Contes_du_temps_pass%C3%A9_\(1697\)](https://fr.wikisource.org/wiki/Histoires_ou_Contes_du_temps_pass%C3%A9_(1697)) (Les Contes de Perrault)